

BARRY FRIEDMAN
NOVELOJ
KAJ
TRADUKOJ



BARRY FRIEDMAN

NOVELOJ KAJ TRADUKOJ



La Edzino kaj Ŝiaj Gepatroj

Mikroromano

Ŝia menso estis nekredebla! Tio estis evidenta per la maniero, kiel ŝi kunmetis vortojn. Mia menso estis adekvata, sed ĝi ne estis komparebla al ŝia. Se ni edziĝus, niaj infanoj estus brilaj!

2 monatojn poste ni edziĝis; 2 monatojn poste ŝi estis graveda; 2 monatojn poste ni eksciis, ke la bebo estos knabo. Mi estis tiel feliĉa! Tio estis la komenco de la dinastio, kiun mi esperis krei!!

Sed io stranga okazadis. Ŝi neniam alportis siajn salajrojn hejmen al mi. Tio estis duoble stranga ĉar ŝi laboris por siaj gepatroj, kiuj estis milionuloj. Ho, ili estis ŝtelistoj!!!

Iomete da Talento

Kio okazus, se Ŝekspiro aŭ Dikensio skribus filmojn por Holivudo hodiaŭ? En la tempo de Trump-aj Tŭitmesaĝoj kaj Klinton-aj Retpoŝtaj Ekscesoj? Jen la epoko de romantikaj komedioj, fejsbukaj farsoj, i-Pod-interplektaĵoj, radikal-islama uson-politika timigo. George Orwell-o ekviviĝas. Kiel la poliglota vortludo de James Joyce influus la Miley-Cyrus-filmon “Hannah Montana”? Aŭ la daŭrigon de Megan-Vulpo-Transformatoro miksita kun Portreto-de-la-Agad-Figuro kiel Juna Miniatura Projekto?

Jen mi, loĝanta en Holivudo, Los-Anĝeleso, Sunbrila Ŝtato, Kalifornio. Mi ne planis alveni en ĉi tiu loko de transvestitaj prostituitinoj, fikomercistoj, pseŭdo-intelektaj verkistoj kaj muzikistoj kaj aspirantaj filmsteluloj, kiuj ĉirkaŭŝvebas atendante ke la sekva versio de la filmo “Kvindek Ombroj de Grizo” estos filmita kaj dissendita por la ĝojo de milionoj. de enuigitaj usonaj dommastrinoj. Mi vere ne antaŭvidis, ke mia dumviva vojaĝo el la sovaĝejoj de Columbus-o, Ohio, tra la eĉ pli malproksimaj kaj nekartografitaj sovaĝejoj de Worthington-o, Ohio, al Irako, Pakistano, Hindio, Koreio, Japanio, finiĝos en Los-Anĝeleso. Kial iu volus vivi en Los-Anĝeleso? La Urbo de Anĝeloj ne kongruas sian kromnomon.

Mi tamen amas la palmarbojn. Mi amas la belajn knabinojn el la tuta Usono en iliaj bain-de-soleil-aj bikinoj, kaj mallongaj pantalonetoj. Ĉi tiuj knabinoj ŝajnis esti kaŝitaj en mia subpremita kaj fermita kristanismo-ŝarĝita Mezokcidento. Ĉi tiuj Kaliforniaj virinoj estas sen inhibicio kaj posedas senliman liberalismon. La Okcidenta marbordo permesas al homoj esti kio ajn ili volas esti - juda, islamana, geja, transa, Caitlin-o aŭ Christopher-o Jenner-o. Viroj povas esti virinoj, virinoj povas esti viroj, aŭ ambaŭ povas esti ambaŭ se tio estas science ebla. Ĉi tiu estas la lando de malvero kaj bela vero; la vero estas bele transdonita en malveraj rakontoj sur la arĝenta ekrano, kiu ne estas arĝenta. Parolante pri arĝentaj ekranoj, tion mi faras ĉi tie en Lunatik-Lando. Mi verkas skriptojn por

senskrupulaj produktantoj. Eble vi spektis iujn miajn filmojn, kiujn mi lastatempe verkis por la aktorino Morgana Vulp-Terhundo, kiu estas malproksima kuzino de Megan Vulpo. Mi verkis "Kiel Vi Tute Ŝatas Ĝin", "Dekdu-Grada Nokta Muziko", "Somermeza TŭitFest-a Sonĝo", kaj "La Ombroj de Grizo de Romeo kaj Julieta". Tio estis tre plezura. Mi sciis, ke la sovaĝaj seksaj klaŭnaĵoj de Ro kaj Ju devis esti lumigitaj iam en skriba formo. Ĉi tiuj filmoj estis komisiitaj de mia produktanto, Cassius Dukesbury. Nuntempe mi verkas skripton sole por Cassius nomita "Donald Trump". Ĝi estas surbaze de la klasika, historia tragedia ĉefverko "Julio Cezaro" en kiu la titolfiguro, surprize, estas nomita Julio Cezaro. Vi eble aŭdis pri li, itala viro kiu transiris la Rubikonon kaj konkeris Hispanion kaj Gaŭlion kaj estis mortigita de sia samideanaj noblaj romianoj... sed ĉi tiuj ŝekspiraj faktetoj eble lacigos vin.

Ĉiuokaze, Cassius Dukesbury estas de nobla angla genlinio. Lia familio reiras dum ducent dudek kvin generacioj de brita aristokrataro. Sed li estas ŝlimpilka Holivuda produktanto de la plej ridinda kaj finance profitplena fatraso kiu povas ĝojigi la mezan usonan adoleskanton. Ni ne verkas ekscitigan teatron por la angla nobelaro kaj spektantoj en la malmultekosta stand-sekcio de teatro ĉe la Globo en Londono en 1599. Ni produktas romantikajn komediojn kaj ag-plenajn suspensfilmojn kaj deviantajn filmojn por infanoj nomitaj Cody-on kaj Brittany-on kaj Kyle-on kaj Jason-on kaj Deshawnda-on kaj Melanie-on, infanoj kies kapablo koncentriĝi dum pli ol dek kvin sekundoj je unu loko estas preter la domajno de atendado. Ili indulgiĝas pri io ajn elektronika aŭ interreta, sed nenio en la ebloj de la reala vivo. Mi ja kredas, ke la kapablo por usonanoj okupiĝi pri reala konversacio vizaĝo-kontraŭ-vizaĝe sen devi enterigi siajn vizaĝojn en siajn telefonojn forvaporigo en la venontaj kvindek jaroj.

Cassius venadas al mia malgranda, unuĉambra, kaduka, griza, neornamita, dumil-dolaro-pomonata, Los-Anĝelesa loĝejo unufoje preskaŭ ĉiutage por diskuti niajn lastajn filmprojektojn. La filmstudio "Dudek-Jarcenta Nespeifika Besto", tio estas la nova nomo por Dudek-Jarcenta Vulpo, ĉar la uzado de Vulpo estis konsiderata

Politike Malĝusta kaj Rasisma kontraŭ Vulpoj, ĉar oni supozis, ke vulpoj nur ekzistus en la dudeka jarcento kaj ne plu vivus en la dudekunua ... ĉiukaze Dudek-Jarcenta Nespeifika Besto komisiis alian sensencan agplanan-suspensfilmon esti verkita fare de “via verulo”. Sed kiu estas “via verulo”?

“Via verulo” estas vere mi mem ... Jakobo Rosenthal. Mi scias. Ĉu miaj gepatroj povus elekti pli hebrean nomon por ŝarĝi min en la vojaĝo de adoleskeco en la Jesuo-amanta usona Kernlando? Kvankam Jesuo estis samranga israela semito, tiu fakto ŝajnas eskapi la bonajn kristanajn homojn de la Mezokcidento, kiuj estas instruitaj pensi pri judoj kiel bizaraj eksteruloj kiuj ne apartenas al la bona kora Kristo-amanta usona universo. Sed suffice pri tio. Ni estas en bela Kalifornio. Kalifornio vere estas mirinda loko de magia beleco. Unue alveninte en Kalifornion el Japanio, kvankam mi ne estas japana rifuĝinto -mi klarigos tion post 897 paĝoj, se via pacienco ne estos agacita je tiu tempo -mi alteriĝis en la intelekta riĉa metropolo de Los-Anĝeleso. Sed mi trairis la larĝecon de Kalifornio: Monterrey-o, San Luis Obispo, Sacramento, Big Sur-o, San-Diego, Santa Barbara-o, Berkley-o. Ĉi tiuj lokoj estas de nedirebla, spirhaltiga, mirada, mirigada, korhaltiga, korfrapiga, neforgesebla, nekompareble etern-paradiza beleco. Ĉi tiuj estas priskriboj, kiujn mi kutime uzus por provi akiri romantikan kunulinon. Tamen, tiu metodo kutime ne sukcesas! Mi mire rigardis la senfinajn vidojn kaj flaŭron kaj faŭnon kaj ruĝajn arbojn de la kamparo de Nord-Kalifornio, tiel maturaj en hispana arkitekturo, purpuraj kaj verdaj kaj flavaj serpente kompleksaj vitoj, kiuj servas al la arbaretoj por produkti la melodian frukton, kiun ni usonanoj konsumas kun raveco. Pensi, ke ĉi tiu lando de Kalifornio estis indiana, hispana, poste meksika, poste usona, kaj nun kiu scias tion, kio ĝi estas. Eble ĉina aŭ filipina aŭ korea aŭ propra ento de samseksema liberaleco. Mi devas diri, ke mi bone adaptiĝis al ĉi tiu loko. Mi surportis nur ĝinzajn pantalonetojn dum mia tuta tempo ĉi tie. Mi surportas sunokulvitrojn kaj provas havi malplanan perspektivon pri la vivo. Mi povus legi biografion de Ŭinstono Ĉurĉilo aŭ la tuton de Funebra Renkontiĝo por Finnegan en unu spiro, aŭ iri surfi en Strando Venico kun miaj uloj, frato.

Cassius snufas kokainon, kun heroina kudrilo en la brako, kaj drinkas Rhenish-biero. [Pardonu, jen obskura Akto-Unu-Scene-Kvar-Hamlet-a referenco; li vere nur drinkas Smirnoff-on. Ne Yakov Smirnoff-o, la oksimora rusa Komikulo, kvankam Smirnoff-o mem ne estis idioto.] Cassius, kiam ne en ebria stuporo aŭ drogita stato, estas sagaca Holivudo-produktanto kaj komercisto.

"Rosenthal, mi bezonas, ke vi verku ĉi tiun skripton en la venontaj tri semajnoj. La studio devas havi alian filmon de Morgana Vulp-Terhundo. Ŝi estas la varmknabino de ĉi tiu momento. Forgesu Jennifer LaurentiArabia-on, aŭ Scarlett O'Johansonian-on aŭ Kim Kartsuskian-on. La spektantaro nur volas Morgana-on. Vi vestas ŝin per mallongaj bluajn ĝinzoj, igu ŝin kontraŭbatali iujn Transformitajn monstrojn dum surportante dekoltitan, plejdan ĉemizo, metu multe da sekso, ni bezonas tunojn da sekso. Via malneto ne havas sufiĉe da sekso en ĝi, Rosenthal. Eble unu sceno de nur misia vagina penetro. Neakceptebla. Vi scias, ke sekso estas la finfina marketika-punkto por ĉi tiuj uloj."

"Jes, sed, nobla Cassius -" Cassius malamas tiam, kiam mi traktas lin kvazaŭ li estas Cassius de Julio Cezaro.

"Diable, Rosenthal, mi diris al vi, ne parolu al mi kvazaŭ mi estas ŝekspira rolulo! Mi malamas miajn gepatrojn pro tio, ke ili donis al mi tiun stultan antikvan romian nomon! Neniu plu nomas siajn infanojn laŭ romianoj! Se vi parolos tiel denove, mi eltiras vin for de la projekto! Ĉu vi komprenas?"

"Bone."

"Nun, kion vi volis diri?"

"Mi ne aldonis tiom da sekso ĉar mi volis koncentriĝi pri karaktera evoluo. Lasu la spektantaron ekkoni la homojn sur ekrano sen nur salti en sekson kaj senpripensecon."

"Rosenthal, homoj ne volas koni la karakterojn. Ili nur volas vidi senpripensan sekson kaj eksplodojn. Ili havas problemojn. Ili

malamas siajn laborojn, ili malamas siajn edzinojn kaj infanojn, ili malamas siajn vivojn, ili havas kvardek jarojn, ili havas kvindek jarojn! La nura afero malebliganta ilin mortigi sin estas ĉi tiuj stultaj filmoj. Oni eltrovis tion antaŭ 100 jaroj kaj tial Holivudo ankoraŭ daŭras."

"Vi parolas malvere, Cassius."

"Uff... mi diris, ke neniuj elizabetana parolado!"

"Mi volas diri, ke vi eraras, Cassius."

"Tio estas pli bona."

"Mi nur provas transdoni, Cassius, kial ni devas simple tute redukti ĉion al la plej malalta komuna denominatoro ĉi tie en Holivudo?"

"Ĉar, Jakey-poo ..."

"Mi ne ŝatas la nomon Jakey-Poo. Se mi ne povas paroli ŝekspiran al vi, vi ne povas aserti vulgaran necesoj-terminon al mia nomo."

"Sufiĉe, Jakobo, malnova amiko." Eĉ se Cassius estis kreskigita en Suda Kalifornio kaj iris al elitaj loĝlernejoj en Idaho kaj Minesoto, li daŭre preferas paroli en brita slango kaj ideologio. "Jakobo, karulo, mi klarigu ion. La homoj, por kiuj vi verkas, estas de la plej malalta komuna denominatoro. Geuloj, kiuj instruas filozofion kaj historion kaj viktorian kaj mezepokan britan kaj francan literaturon ĉe Universitatoj Harvard kaj Oksfordo kaj Yale kaj ĉe la Universitato de Sicilio ... ili ne havas la paciencon aŭ tempon por iri al kinejo aŭ al tio, kion vi usonaj geuloj nomas la filmoj."

"Ĉu vi ne estas usonano?"

"Usonano en komercaj aferoj, ĝisfunde anglo en ĉio alia."

"Ha, mi komprenas."

"Jes, ni havis kelkajn bonajn filmojn, ekzemple "Listo de Schindler" kaj "Savante Soldaton" Ryan-o, kvankam tiuj du verŝajne estus eĉ pli grandaj sukcesoj se ili estus renomitaj "Volupto de Schindler-o" kaj Savante la Privataj Partoj de Ryan-o."

"Cassius, tio estas malkonvena. Ili estis elprenantaj kaj kompleksaj periodpecoj pri la hororoj kaj neraciaĵoj de la Dua Mondmilito. Ne pornografaj filmoj."

"Ĝuste, sed, la tipa usonano preferus spekti pornaĵon ol 4-horan filmon pri la holokaŭsto. Ĉu mi pravas aŭ malpravas? Mi ne provas esti kruda. Mi nur provas esti fakta."

"Mi supozas, ke vi havas validan argumenton ĉi tie. Mi ne estis komisiita verki la "Liston de Ŝindlero, Parto Du" aŭ la duan "Ponton sur la Rivero Kŭai" aŭ Laŭrenco Post Tiam, Kiam Li Forlasis Arabion" aŭ la re-verkita kaj artiste egala "Baptopatro - Parto III" aŭ "Doktoro Strang-amo: Ni Jam Faligis la Bombon; Kiel Do Ni Purigas Ĉion Kun Nur Unu Persono Restanta sur la Tero?"

"Ĝuste ja." Cassius fariĝis pli kaj pli ensorĉita ene de sia propra narkotismo kaj frenezaj koŝmaroj de hedonismo kaj frivolemo. Mi neniam vidis homon tiel inklinan al absoluta puŝado en malplenan sensignifon, plonĝon en la abismon de plenkreska eskapeco el la neeviteblo de maljuneco, morto, asekurkotizoj, advokataj kotizoj, entombigoj, familia traŭmato, kateteroj, ĉiutagaj kuracisto-vizitoj, dializo, paralizo, kolostomiaj sakoĵ, belaj flegistinoj, kiuj estas neatingeblaj al maljuna rompita iama brita/kalifornia flirtemulo. Ĉi tiuj estas la timoj, kiuj turmentas Cassius-on kaj tiras lin en lian fivoluptecon kaj mizeron. Malĉasteco kondukas al letargio kiu serpentumas en libertinecon, permesilon peli lin en frenezecon, melankolian malŝparon de plorema malleĝeco. Ĉi tiuj estas la solaj lokoj kie mi povas elpensi vortludojn. Ne en miaj malbongustaj kaj sengustaj skriptoj.

"Jakob, malnova sportulo ..."

"Ĝi ne estas La Granda Gatsby, Cassius. Ni estas en Los-Anĝeleso en 2016, ne LongInsulo, Novjorko en 1922."

"Vere ne multe da diferenco, knabeto. Ambaŭ socioj estis diable intencitaj pri indulgiĝo al sensenca festo, adulto, droguzo, krimeco, kaj entute havi gajan amuziĝon."

"Vi havas logikan punkton tie."

"Sed ne estas logika punkto por vi, kara amiko."

"Mi pensas, ke mi scias tion, kion vi volas diri per tio. Sed mi esperas, ke mi eraras."

"Vi pravas ... sed al la ĉefa fokuso de kial mi decidis fari ĉi tiun malkonvenan viziton, mia karulo. F-ino Vulp-Terhundo baldaŭ venos al ĉi tiu kaduka apartamento, kiun vi nomas vivloko."

"Estas la plej bona, kiun mi povis trovi en Los-Anĝeleso, kiu ne estis en la geto ..."

"Mi pensis, ke vi judaj uloj kutimis vivi en getoj."

"Ne ĉi tiajn getojn. Ni havis la Varsovian reziston kontraŭ la nazioj, ne la Militojn inter la Kriptanoj kaj Sanganoj."

"Ĉiuokaze, Morgana venos. Ŝi volas revizii siajn liniojn, provi ŝajnigi sin kiel ia serioza aktorino, kiam la tuta mondo scias, ke ŝi estas nur virinaĉo, paro da mamoj kun pugo por adoleskaj knaboj pribavi kaj sinmasterbadadi."

"Ne estas maniero pruvi tion."

"Ho, sed maniero ja ekzistas."

"Kial Morgana volas veni ĉi tien? Ĉu ni ne povas simple iri al Starbucks-o kaj revizii ĝin tie?"

"Starbucks-o, bona Dio, kia malnobla loko! Se iu famulino kun socia reputacio kiel Morgana dezirus renkontiĝi en kafejo, ĝi ne estus tiom abomena mezklasa antaŭurba enklavo kiel Starbucks-o! Eble Panera-o aŭ Barnes-kaj-Nobles-o estus pli taŭga."

"Mi pensas, ke mi povas konsenti kun vi pri tio." Ĝuste tiam, la purpura kaj rave moderna i-Telefono de Cassius kun ĉiuj taŭgaj programoj kiuj ĝi havas - mesaĝo, video, Fejsbuko, Huntington-banko, babilejo, Interreta Esploristo, notbloko, kalkulilo, trinkmon-kalkulilo, ktp - sonoras kun potenca bruo de ĝeno kaj altrudo, kio estas plej taŭgeco por Holivudo-normoj. Estas la nomo kaj vizaĝo de Morgana en la ekrano de alvokanto.

"Mi devas respondi ĉi tiun, amiko, simple daŭrigi la reviziojn de ... kiel ĉi tio denove nomas?" Mi montris al li la titolpaĝon de la nova filmo, al kiu mi estis asignita:

"TRANSFORMADISTOJ 16: ĈI-FOJE ILI FARIS ĈIUN TRANSFORMADON KAJ VOLAS VENĜON."

"Tio ne estas tre bona titolo, ĉu? Ni devos re-labori tion."

"Dudek-Jarcenta Nespeifika Besto pensis ke ĝi vendiĝus, ke ĝi scivolemegu la spektantaron malkovri kian venĝon ili serĉos."

"Mi pensas, ke la spektantaro serĉos venĝon sur la verkisto pro la kreado de tia ridinda titolo."

"Nu, tial ni havas anonimecon ..." Cassius nun estas enplektita je la voko kun Morgana. Morgana havas tre pledaĉeman, grateman, ne tre flueman, adoleskulin-antaŭurb-uson-mezlernejan voĉon. Kombinaĵo de huraistino/promenbal-reĝino/lerneja malĉastulino/klasa Prezidantino. Mi ne povas kompreni tion, kion Morgana estas diranta aliflanke. Kompreneble, mi povas aŭdi Cassius senpene. Li ne estas feliĉa.

"Kio malbonas, knabineto? Kion vi volas diri, ke vi estas nervoza? Pri kio vi estas nervoza? Mi estas tiu, kiu devas akiri la investojn."

Vi nur devas aspekti rava ... Vi estas nervoza pri renkonti la scenaristo? Kial? Ĉu vi aŭdis, ke li estas malagrabla ulo? Kiu diris al vi tion?"

"Mi estas malagrabla ... nu, eble malagrabla en ia bona maniero ."

"Ho silentu, Rosenthal, ŝi aŭdos vin! Ne, mi diris al Rosenthal, ke li silentu, ne vi, Morgana. Ne ĉio temas pri vi, karulino. Krom ĝi estas ... Nur venu supren, kara ... Mi estos sidanta tuj apud Rosenthal. Neniom el lia malagrableco havos ian influon sur vin, nenio ajn." Per tio, Cassius klake fermis sian i-Telefonon, aŭ malŝaltis, aŭ malkonektis, aŭ elrevigis sin de la puto de superforta teknologio, al kiu ni homoj de la dudekunua jarcento kroĉiĝi.

Post minutoj, Morgana Vulp-Terhundo eniris tra la pordo kun plejebla maltrankvilo kaj absurdaĵo. Kompreneble, estante la unua Ĝi-knabino de Holivudo de la momento, superante Serena Williams Gomez-o, Joseph Haydn Panattiere-o, The Spears of Bretonio, Demi Less-o, Jennifer Low-Fez-o, Henry Jennifer Hudson-o, kaj Beyond-Say-What-to-Know-Less-o, Morgana havas malmolan, robustan, grandan, muskolecan, korpulentan korpogardiston kun razita kapo kaj ŝtalaj okuloj. Ĉi tiu estas viro, kiun oni ne volas kolerigi, precipe en malantaŭa strateto. Lia nomo estas Rodolpho Boris Kartushkeyomilenkov. Li estis elektita de la stabteamo de Morgana el la sovaĝejoj de Ukrainio, ekster Kievo aŭ Odeso - mi ne vere certas ĉi-momente - por esti ŝia senkompata protektanto. Neniu kuraĝus murdi aŭ seksperforti aŭ simple ataki aŭ eĉ preni foton de kara Morgana je nepetita maniero kun kara Rodolpho Boris en la ĉambro. Rodolpho Boris tute ne parolas la anglan. Nek Cassius, nek mi mem, aŭ nek Morgana scipovas eĉ unu vorton de la ukraina. Tial mi scivolas kiel Morgana povas iel ajn komuniki kun Rodolpho Boris. Eble ili parolas per mansignaloj aŭ okulmovo. Aŭ simple teksti per Guglo-tradukilo, tradukante senspritan Holivudan film-famulan lingvon en la ukrainan kaj inverse.

Morgana mem estas rava estaĵino. Memoru, mi diris pli frue, ke ŝi estis malproksima kuzino de Megan Vulpo. Tial ŝi posedas la saman malhelan, terecan, ruĝlipan, navah-ĉerokean tutamerikan belecon.

Morgana havas parte tute-usonan heredon (per tut-usona blankulino mi aludas al la brita, skota, germana, irlanda, kimra, franca kaj dana), parte denaska-usonan heredon, parte navah-ĉerokean heredon, kaj krome ŝi havas iom de hispanan/portugalan/marokan heredon. Sekve oni povas nur imagi la perfektecon de la kombinaĵo de la ekzotika kun la ordinara, la pala kun la fajrema, la milda kun la sorĉada, la ŝika kun la mlamoda. Ŝia haŭto havas ian malhelbrunan brilon de bongusta oliveca nuanco. Ĝi vekas en mi, kaj mi supozas kaj en Cassius kaj en Rodolphon Boris, tiajn flamojn de deziro, ke mia buŝo ne povas malhelpi, ke la salvo elfluas el ĝi. La haŭto estas mola, kremeca, perfekteca en sia manko de fendetoj, makuloj, kaj sulkoj. Ĝi estas la plej dezirinda peco de epidermo, kiu iam aperis sur ina homo. Ŝiaj lipoj estas du elstarantaj ruĝaj ardaĵoj, kiuj nur invitas voluptajn pensojn de viroj, kaj kompreneble la Holivud-elituloj fieras profiti de tio. Ŝiaj haroj falas malsupren per rava akvofal-kaskado de nigra, rekta, senfine fluanteco preskaŭ al la grundo. Ŝia vizaĝo estas sendifekta angul-konstruo de simetrio, altaj vangostoj (pro la navaha flanko certe), sugesto de ruĝaj makuloj sur la vangoj, severa frunto, perle blankaj dentoj kun murdema Jack Nicholson-rideto, kiujn ŝi fakte ŝtelis de Jack Nicholson-o dum la filmado de ŝia antaŭa filmo. Se oni nur rigardus Morgana-on, ŝi ŝajnus esti la idealo de virina sekseco kaj deziro. Nu, la revo de ĉiu viro realiĝis. Sed kiam ŝi malfermas sian buŝon, tiam la koŝmaro de ĉiu viro realiĝas. Ĝi estas adoleska knabineca ĝemado, kiu sonas kiel la voĉo de Fran Drescher-o/Gilbert Gottfried-o/Joan Rivers-o. Preskaŭ iu ajn, kiu trovas sin en la atingopovo de ŝia voĉo, tuj ŝokiĝas. La nura maniero, kiun ŝi povas ĉefroli en ĉiuj ĉi tiuj filmoj, estas per la uzo de voĉ-parolistino. Tiu estas 300-funta kontraktita voĉ-aktorino kun la lango de anĝelo, nomita Gladys Peppinjay-o. Gladys Peppinjay-o ĉiam havos laboron tiel longe kiel Morgana Vulp-Terhundo, kun ŝia ekzotika aspekto kaj volupta kadro, estas la Ĝi-knabino por ĉi tiu generacio de usonaj knaboj.

"Bone, Cassius, mi estas ĉi tie, mi decidis cedi al vi ... kion mi devas fari nun?"

"Mia kara Morgana, mi vokis vin ĉi tien por helpi revizii vian dialogon por ĉi tiu venonta filmo Transformatoro." Morgana, ĉagrenita kaj abomenita, prenas la 298-paĝan scenaron. Poste, per la plej granda krio, blasfemas ĉi tiuj studiojn, obseditanj nur pri profitoj. Ŝi vidas ke ĝi estas alia Transformatoro-filmo.

"Uff! Ĉu alia? Mi malamas fari ĉi tiujn Transformatoro-filmojn! Ĉu ili ne povas simple revenigi mian kuzinon Megan al ili?"

Cassius klarigas por la centa fojo al malsprita Morgana: "Ne, Morgana, karulino. Ĉu vi memoras? Via kuzino Megan volis esplori ŝian seriozan aktoran talenton? Ŝi ludas Rosalind-o en produktado de Kiel vi Ŝatas Ĝin ĉe la Globo en Londono?"

"Ho. Ĝuste. Tio estas, kiel, la libro, pri kiu la filmo de Jakobo Kiel Vi Tute Ŝatas Ĝin estas bazita, ĉu?"

"Mi ĉiam diris, ke vi estas lerta..."

"Mi estas ja lerta... mi diplomiĝis per honoroj ĉe BeverlyHills-a Liceo, ĉu?"

"Neniu dubas pri via inteligenteco, karulino. Nur rigardu vian rolulinon. Ŝia nomo estas Samantha. Ŝi amas Derrik. Sed la Transformadistoj revenis denove por la dekseka fojo por pli da venĝo por ruinigi la planedon Tero per sia tuta ... um ... Transformadista kolerego ... ĉe iliaj senfinaj...transformoj...kiel ĝi estis." Mi decidas interparoli.

"Tio estas tre bone dirita, Cassius."

"Mi ja provas esti elparolema foje."

Rodolpho Boris ankaŭ decidas interveni. "Tsi transformers'ki fil'my prosto zhakhlyvi. Chomu vony ne mozhut' pererobyty doktora Zhyvaho? (Tiuj Transformers-filmoj estas nur sensencaĵoj. Kial oni ne re-faras Doktoron Zhivago?)

Neniu komprenis tion, kion diris Rodolpho Boris kaj ili simple daŭrigas sian debaton.

"Bonvolu, Cassius, mi estas serioza aktorino kun vera talento. Mi aktoris Juliet-on en liceo, kaj Maria-on en la Sono de Muziko, kaj Anne Frank-on en La Taglibro de Anne Frank-o."

Mi decidas enmeti stultan ŝercon por testi ŝian humuron.

"Se vi estus Anne Frank-o, ĉu vi ne estus morta nun?"

"Uf, ne ... ĝi estis rolo en teatraĵo ... mi ne estis vere Anne Frank-o duh"

"Nu, vi diris, ke vi aktoris Anne Frank-on. Vi do estis Anne Frank-o. Sed vi ne estas Anne Frank-o ... do vi estas mensogantino."

Cassius decidas savi la stultan situacion.

"Nu, ni ĉiuj estas mensogantoj en Holivudo, ĉu ne, gekaruloj? Hurao al tio! Nun, Morgana, venu kun mi en la apudan ĉambron ... sole ... kaj reviziu la skripton, kiun nia Semida Ŝlimopilko verkisto ĉi tie tiel kompleze verkis por ni."

"Uf, kial mi kiel devi eniri la ĉambron sola kun vi?" Estas malgracia silento. En ĉi tiu momento, Rodolpho Boris iĝas atentema pri io malbona. Ankaŭ mi atentis pri io misa. Ĉu Cassius provas delogi aŭ devigi ĉi tiun brilantegan sinjorinon kun la vizaĝo de Heleno el Trojo, sed la voĉo de Iago el Aladino, en ion malmoralan kaj malnoblan? Ĉu li uzis ŝin ĝuste por tiu celo? Mi ne scias kaj mi ĝojas esti en la malantaŭa seĝo de ĉi tiu ŝekspira/Molieriana dormoĉambra kapriolo. Ĝi estas la Gajaj Edzinoj de Okcidenta Los-Anĝeleso.

"Ĉar, karulino, la sonoj el la fenestro ĉi tie en la antaŭo estos distraĵo... kaj estus plej bone se ni estas tute solaj, sen ĉi tiu juda ulo kaj tiu ukraina brutulo, kiu ne klopodi lerni la langon de Lia Moŝto."

Morgana demandas malklare, "Kiu estas Lia Moŝto?"

"Nu, Reĝo Karlo."

"Ĉu Usonano havas Reĝon?"

"Ne, kara, Anglio havas Reĝon. Kvankam Usono estis parto de Anglio iam. Do eble vi pravas."

"Ne, Usono estas Usono, Anglio estas Anglio..." Estis ege malkomforta silento. Cassius denove savas la situacion.

"Post tiuj vortoj, karulino, ni iru en la ĉambron por trarigardi vian novan milion-dolaran aktoran rolon. Jakobo kaj he, kia ajn estas via nomo, vi povas havi komfortan babileton ĉi tie. Ĝis."

Morgana Vulp-Terhundo kaj Cassius Dukesbury tiam eniras al mia dormoĉambro. Mi esperas, ke la aŭtoroj de James Joyce-o, Saul Bellow-o, Vladimir Nabakov-o, Geoffrey Chaucer-o, Homero, Virginia Woolf-o, Mohammed Ali-o, Mohamedo la Profeto, Napoleono, Ĉiĉilo, Stalin-o, Hirohito, Franklin Roosevelt-o kaj Carol Burnett-o ne ĝenos ilin kaj, ke ili povas koncentriĝi pri mia skripto - se tio vere estas tio, kion ili faros. Mi embarasite fiksigardas Rodolphon Boris. La grandega lingva breĉo inter ni faras longan silenton. Mi tiam demandas al li, ĉu li volas drinkaĵon. Li murmuris ion nekompreneblan. Mi tiam gestas, ke li sidiĝu ... li gestas sian manon por nyet, mi ne sidus. Mi tiam proponas, ke li spektu ion sur mia grand-ekrana televido kun Netflix, Hulu, Amazon Prime, kaj HBO, sed li faras signon, ke li ne interesiĝas. Rodolpho Boris tiam eltiras kopion de Milito kaj Paco tute en la rusa. Tio, je mia surprizo, ĵaluzas min. Mi ĉiam volis legi Tolstoj-o kaj Dostojevskij-o, Gogol-o kaj Ĉeĥov-o, Turgenev-o kaj Puŝkin-o, nur en la rusa por akiri la veran guston. Kaj ĉi tiu Holivuda korpogardisto povas fari ĝin kvankam iu Holivuda skriptisto ne povas. Tio estas la absurdo de la vivo.

Mia apartamento: blankaj muroj kovritaj per ŝlimo kaj kotaj makuloj kaj la restaĵoj de insektoj, la plej belaj formikoj, araneoj, rampantaj akridoj, formikmanĝuloj. Ĉi tiuj estaĵoj fariĝis miaj plej bonaj amikoj. Televido, librobretaroj plenplenaj kun la tuta klasikaĵo de ĉiu flanko de vivo sur la tero, de The Fabelo of Genji ĝis David

Copperfield-o ĝis La Ludlibro de La Arĝenta Tegmento, kaj La Kajero, 2,000-paĝa superrigardo de ĉiu operoj, komencanta kun Monteverdi kaj irante ĝis Philip Glass-o. Malgranda Baldŭin-piano, mahagonaj kaftabloj, piceaj nigroledaj seĝoj, senfinaj kvantoj da likvoro en la ŝrankoj de mia malvasta, malpura, argent-makulita kuirejo ŝarĝita per nelavitaj forkoj, kuleroj, tranĉiloj, spateloj, fornetoj, fromaĝraspiloj, patoj, frotlaviloj, kaj antaŭtukoj. La alkoholaĵo konsistas el Smirnoffs-o, Jack Daniels-o, Samuel Adams-o, Boston Lagers-o, Fosters-o, Heineken-o, kaj Jagermeister-o. Ĝi ankaŭ enhavas libron "Kiel Tutidiotoj Povas Esti Verkisto", kiu estas ĉe la flanko de mia lito. Mi esperas, ke Morgana kaj Cassius ne malkovros ĉi tion dum ili estas tie, farante Dio-scias-kion - mi volas diri, diskutante miajn Oscar-gajnontajn skriptojn. Estas tie ankaŭ Vortaroj de Larousse pri la hispana, svahila, somala kaj korea, Tezaŭro de Roget, vojaĝaj gvidiloj de Soleca Planedo por Zambio, Aŭstralio, Peruo, Finnlando, Tajlando, Kataro, Omano kaj la Eksteraj Hebridoj de Skotlando. Mi devis serĉi multtempe por trovi vojaĝgvidilon sole por la Eksteraj Hebridoj de Skotlando. Sed danku la sinjoron Eternulo por Amazono.

Cassius kaj Morgana restis en mia dormoĉambro dum duonhoro nun, kaj ili ne montras signojn de foriro de ĝi en la proksima estonteco. Pro enuo kaj frustrigo, mi decidas fari radikalan decidon. Pro mia kompleta stulteco kaj normala konduto por iu el mia generacio, mi forlasos la loĝejon kun Morgana kaj Cassius solaj en ĝi. Ili ŝajnas esti fidindaj homoj. Ili ne malpurigos la lokon, ne rabos, ne redekoracios, ne malĉastos (ne - eble ili jam faris tion), aŭ trouzos la elektron. Li estas sagaca komercisto, ŝi estas malsprita afiŝulino. Kian damaĝon ili povas fari? Mi invitas per mansignaloj mian novan anglolingvo- defiitan amikon, Rodolpho Boris, eksteren por drinki. Mi gestis signojn pri drinkado, aŭtoveturante aŭ piedirante, babilante. Li komprenas kaj komence rifuzas. Mi tiam permane proponas, ke li devu esti enuigita pro tio, ke li devas stari tie tiel longe sen fari ion ajn. Ĉi tio iel magie konvinkas Rodolphon Boris forgliti kun mi en la magian kaoson kaj aĉan idiotecon de la Los-Anĝelesa eksteraĵo. Mi volas diri ekster la rifuĝejo de mia loĝejo,

kie mi ankoraŭ provas reteni ian senton de la intelektulo kaj de la realo.

Rodolpho Boris kaj mi promenas ekster la etaĝkomplekso. La impona grandiozeco de la verdaj plaĉaj palmarboj, brila suneco, ondoj frakasantaj de la ĉiopova Pacifika oceano, feliĉaj artistoj liberspiritaj homoj glitkurantaj apude sur rultabuloj kaj rulglitiloj surportante ekstremaj, ridinde grandaj kaskoj, proponantaj trompajn biletojn al Holivudaj eventoj, iel ankoraŭ ebriigas mian iom naivan Mezokcidentan spiriton kvankam mi jam estis sobrigita per mondaj spertoj. Rodolpho Boris, pro konfuzo, ne scias tion, kion fari en ĉi tiu situacio. Li kutimas nur eskorti aerkapajn stelulinojn ĉirkaŭe en iliaj limuzinoj aŭ ĉe Premio-spektakloj, la Oraj Globoj, la Oskaroj, kaj la Premioj Emmy. Li ne kutimas travagi Los-Anĝeleson kiel libera viro sen ŝarĝo sur la ŝultroj. Ni preterpasas plurajn meksikajn takejojn, kelkajn ĉinajn restoraciojn kun la plej bona rostita anaso, sezama kokido, Generalo Tso-o, Singapura Mei Fung-o, kaj Moo Goo Gai Pan-o. Mi provas decidi, al kiu loko mi alkonduku kompatindan Rodolphon Boris. Li verŝajne ne estas etna restoracio-fajngustulo.

Rodolpho Boris kaj mi eniras en la Ĉinan Palacon de Ying Wu, bela, malgranda, aŭtentika loko en la kvartalo. Ying Wu mem administras la restoracion. Li estas tre afabla, mezaĝa viro, kiu loĝas ĉi tie en Los-Anĝeleso el Ĉinio dum la lastaj dudek jaroj. Li diris, ke li ne povas elteni la komunisman reĝimon en Ĉinio, ke Mao Tse Tung-o vere detruis ĉion. La promeso pri tio, kio Ĉinio povis esti, post la fino de japanaj abomenaĵoj en la dua mondmilito, estis forĵetita kiam la komunista ideologio de frenezeco kaj senfina reformado envenis. Ying Wu kaj mi ŝatas diskuti pri Mao kontraŭ Ĉiang Kai Ŝek-o, komunismaj pensoj kontraŭ libera uson-kapitalismo. Ying Wu bonege regas la anglan, kaj mi ne regas la ĉinan. Mi povas diri eble, 'ni hao' por 'saluton', kaj 'wo yao shi ni de tan peng yeo', por 'mi volas esti via koramiko' se estas bela ĉina kelnerino en la loko. Sed tio estas la amplekso de miaj ĉinaj lingvaj kapabloj.

Mi sidas kun Rodolpho Boris. Ni estas ĉe fora angula tablo apud giganta fiŝujo. Ĉinaj restoracioj ŝajnas amas enhavi gigantajn fiŝujojn. Estas striitaj tigrofiŝoj, grandaj senskvamaj orfiŝoj, malgrandaj aroj, kiuj evitas la ceterajn en siaj silentaj ruzoj kaj gerilaj manovroj. Rodolpho Boris devas decidi inter pork-fritita rizo, blanka rizo, frititaj ĉinaj pastoringoj, aŭ kokida lomejn-o. Li neniam antaŭe manĝis en ĉina restoracio. Ni ankoraŭ ne povas komuniki eĉ unu vorton inter si. Kiel li travivas en Los-Anĝeleso sen scipovo de aŭ la angla aŭ la hispana? Mi decidas do liveri mian vagan monologon al Rodolpho Boris, por simple eviti la mallertecon kaj okazigi la tempon rapide forpasi.

"Mi diros ĉi tion, mi neniam revis esti Holivudo manuskriptinto. Ĉu vi scias tion, Rodolpho Boris? Ĉu mi nomu vin Rodolpho? Boris? Rody? Bory? Jeltsino? Kio do estas tio? Itala/rusa nomo? Ĉu viaj gepatroj amis kaj Ĉajkovskij-ajn kaj Puccini-ajn operojn kaj ne povis decidi en kiu kulturo eduki vin? Vi ne komprenas eĉ vorton, kiun mi diras, ĉu ne?"

"Da." Estas malplena silento. Ĉu Rodolpho Boris efektive komprenis min aŭ ĉu ĉi tio estas nur lia maniero igi min silenti? Mi estas homo, kiu ne povas elteni mallertajn paŭzojn, aŭ la mankon de komunikado, aŭ la neeblo de kompreno inter homoj. Tio estas problemo kiu turmentas la mondon hodiaŭ.

"Ĉiuokaze, mi volis esti bonega usona verkisto. Verkisto kiel Joyce-o, Hugo, Tolsto-oj, Balzac-o, Dickens-o, Ŝakespeare-o, Jonathan Swift-o, George Bernard Shaw-o, Oscar Wilde-o, Georges Faydeux-o, Dostojevskij-o, Lao Tzu-o, Mo Yan-o, Haruki Murakami-o. Envere, neniu el tiuj verkistoj estis usona. Sed vi kompreni la koncepton. Ankaŭ mi ja amas la usonanojn, Rodolpho Boris. Ne miskomprenu min. Mi estis ensorĉita je Fitzgerald-o, Hemingway-o, Ezra Pound-o, kaj T.S. Eliot-o, kvankam mi neniam povis memori ĉu li estis brito aŭ jankio. Steinbeck-o kaptis la Depression-epokon kun tia volupta kaj poezia aŭtentikeco. Ankaŭ estas la judaj verkistoj, kiuj vere kaptis Usonon post la Dua Mondmilito: Norm Mailer-o, Saul Bellow-o, Philly Roth-o, Bernie Malamud-o. Ili vere kaptis la esperon

de enmigrintoj kaj la ĝojojn de sekso kun ĉi tiuj belaj usonaj ŝiksaj knabinoj sen la judaj inhibicioj kaj strikta religia fundamentismo. Ĉi tiuj uloj inspiris min ekverki. Antaŭ ili, mi plejparte okupiĝis pri videoludoj, x-box-o, Grandioz-Ŝtelo Aŭto, la mafio, kaj la Mondo de Warcraft. Mankis al mi intereso pri literaturo. Poste, mi havis bonan klason en kolegio, kaj havis inspirantan instruiston, kiu vivigas la librojn kaj teatraĵojn. Mi multfoje legis Arthur Miller-on, Morto de Vendisto, poste mi legas David Mamet-on, Glengarry Glenn Ross, aŭ kiel ĝi moke nomiĝas, "Morto de Fika Vendisto", ĉar ĝi estas multe pli profunde vulgara interpreto de Morto de Vendisto. De Willy Loman-o ĝis Shelly 'la Maŝino' Levine-o. Ĉiuokaze, mi volis verki novelojn de drama potenco kiel ĉi tiuj uloj verkis. Ili kaptis ion brutalan kaj amuzan kaj kompreneman pri usona vivo. Kiel ni ĉiuj luktas por resti flosante meze de sinkanta ŝipo. Mondo disfalanta, kiel en la tempo de Noaĥo antaŭ la Inundo, mondo de perforto, amaspafadoj, korupto, terorismo, drogoj ĉie, malmoraleco ĉie, homoj en la plej bona parto de sia vivo injektante drogojn kaj estante senhejmaj, senlaboruloj. Nenia direkto. Kiel Bob Dylan-o diris, ni ĉiuj fariĝas ruliĝantaj ŝtonoj. Ĉu vi scias tion, kion mi volas diri?"

"Da."

"Ĉu?"

"Da."

"Nu, mi sciis, ke ni trovos ian komunan bazon."

"Da."

"Mi ne scias ĉu vi vere komprenas min aŭ ne."

"Da."

"Ĉu vi ja komprenas?"

"Da."

"Vi certe estas tre agrabla kaj tre memfida ulo."

Mi sentis grandegan akcelon de memfido ĉar mi ŝajne povis komuniki kun Rodolpho Boris. En ekscitiĝo, mi decidis daŭrigi mian diskuton. Mi estas certa, ke li estas absolute fascinita de ĝi.

"Mi do akiris mian diplomon pri Angla Literaturo. Tio estis en La Ŝtata Universitato de Ohio, kolegio en Columbus-o, Ohio, loko pri kiu vi verŝajne neniam aŭdis, mi certas. Ĉu vi havas ideon, kie estas Columbus-o, Ohio, Rodolpho Boris?"

"Da."

"Bone. Vi do ja scias pri ĝi."

"Da."

"Ĝi estas mezokcidenta ĉefurbo, plena de simpatiaj homoj, bonega zoo, multaj ĉinaj kaj hindaj restoracioj, multaj somalaj rifuĝintoj, amaso da ruslingvaj universitataj profesoroj, amaso da kemiistoj, farmistoj, IT-uloj, terure konfuzaj aŭtovojoj, katastrofe danĝera, mortiga veturkondiĉoj en la vintro, la tut-usona pom-torta urbo. Kie oni kreskigas la familion kaj maljuniĝas kaj mortas en komforta emeritiĝo. Ĝi ne estis por mi. Mi estis destinita esti verkisto ribelula. Mi estis Jack Kerouac-o kun judo-hararo kaj barmicvo kaj hoknazo kaj stranga fascino pri ortodoksa judismo. Estas vere, ke mi ne estas religiema. Mi ne kredas je Dio, sed mi ne povis resti for de miaj kunjudoj Hasidismaj. Mi ne scias tion, kio ĝi estas, ĉu la pieco, la sindediĉo, la ceremonioj, la ĝojo de vivo, kiun tiuj homoj ĉiam havas, la forta komunumo. Mi pensis, ke ĝi estas pli bona. Sed tio estas ekster la logika punkto. Mi volis veni ĉi tien al Los-Anĝeleso, verki la filmojn, kiujn mi volis verki. Pli ol "La Baptopatro" kaj "Dancas kun Lupoj". Verki miajn kvarhorajn epopeojn pri italaj gangsteroj kaj blankuloj vivantaj inter indianoj. Sed, kompreneble, Holivudo estante Holivudo, ĝi ja estas komerco, mi kaptiĝis verkante ĉi tiujn aĉajn filmojn. Kiel "Multa Bruo pri Io, Nur Rigardu Ĝin kaj Eltrovu" kaj "David Ŝteletis Palpon" kaj "Grandaj Seks-Atendoj" kaj "La Mizera Kuŝo" kaj "Mark Antony-o kaj J-Lo:

Amrakonto" kaj "Ĉio estas bona Se Tio Vendas Bone". Ankaŭ mia hororaj filmoj, "McMorto" pri skota seria murdisto, kaj la kontraŭ-rapidmanĝeja filmo, kiun reĝisoris Michael Moore, "Ŝinko". Ankaŭ mi verkas ĉi tiujn terurajn romantikajn komediojn. Vi scias la filmon pri la riĉa dorlotita blankula knabino, kiu enamiĝas kun malsuperklasa nigrulo aŭ latinamerika aŭ azia viro kaj estas kultura kolizio tiam, kiam la du familioj kuniĝas. Estas amuze verki la komedian parton de ĉi tio. Tiam la studioj vere volas agofilmojn. Ili scias, ke agofilmoj estos popularaj. Mi verkis dek unu Transformeradiloj-filmojn ĝis nun. Mi verkis la plej novan filmon "Rapida kaj Furioza". Mi provis aldoni iom da literatura inteligenteco al la skripto, sed la produktantoj kaj reĝisoroj ne permesis tion. Ili nur volas simplan rakonton pri fervoraj viroj veturantaj rapidajn aŭtojn kaj provas mortigi unu la alian por gajni la amon aŭ volupton de iu viraĉo en mallonga pantaloneto kaj kun malmultekostaj brustaj enplantaĵoj. Sed ĝi faras por mi monon kaj ĝi donas al mi mian liberecon for de mia familio kaj ĝi donas al mi la strandon ĉiutage, sunbrilon ĉiutage. Manĝado kaj babilado kun mirindaj, rimarkindaj homoj kiel vi mem kaj Morgana kaj Cassius kaj Ying Wu kaj ĉiuj aliaj unikaj specoj, kiujn ni havas ĉi tie en la kinoindustrio."

"Da."

"Poste mi igos vin skribi artikolon pri ĉio, kion mi ĵus diris, Rodolpho Boris. Ĉu vi scias tion?"

"Da."

"Bone. Vi devas skribi ĝin precize."

"Da."

"Mi trairis la tutan mondon, Rodolpho Boris, kaj mi devas diri, ke Los-Anĝeleso estas mia fina celloko. Mi pasigis iom da tempo en Irako, Pakistano, Barato, Ĉinio, Koreio, Japanio, vi scias, nur normalaj ĉiutagaj lokoj en kiuj homoj troviĝas. Ĉi tiuj estis ĉarmaj lokoj. Kompreneble, la aferoj, kiuj okazis al mi en Irako, ne estis tiel ĉarmaj. Mia kapo preskaŭ estis foreksplodita, sed, vi scias, ĉi tiaj

aferoj ja okazas. Tio estas vivo. Iun tagon vi estas knabin-obsedita universitata studento kun sonĝoj esti granda, rica, sukcesa homo kun amoroalloga blonda edzino, vojaĝante ĉirkaŭ la Mediteraneon; tiam vi estas en la dezerto en Mezoriento batalanta por iu kialo kiu estas finfine mensogo; tiam vi vagas tra la kamparoj de Pakistano kaj Barato malsatmortante; tiam vi havas ian ridindan amrilaton kun iu knabino, kiun vi konis en mezlernejo, kiu nun estas en Japanio, samtempe vi estas ... nu, tio estas multe da informoj. Ĉu vi volas aŭdi la tutan historion?"

"Da."

" Ĉu vi volas? Ĉu ĉion? Ĉu la historion de mia familio? Ĉu la historion de Columbus-o, Ohio? Ĉu la judan sperton? Ĉu la usonan sperton? Ĝi entenas multon. Konsideru la irokezanojn kaj miamanojn, kiuj unue enloĝis la Ohio-areon, iliajn vivojn kaj pasiojn kaj spertojn. Poste envenis la britoj kaj la francoj, poste la Civita Milito, poste la Granda Depresio, la Dua Mondmilito, gehipioj, 9/11-o. Mi volas diri, ke mia familio travivis multon. Ĉu vi vere volas aŭdi ĉi tiun tutan historion?"

"Da."

Subite, mia telefono sonas. Estas panika tekstmesaĝo. Ĝi estis sendita de mia nobla amiko kaj produktanto, Cassius. La mesaĝo estas serioza kaj duon-katastrofa:

**JAKOBO, MORGANA TRODOZIS! MI RAPIDAS ŜIN
AL HOSPITALO!**

La Kvina Rakonto

Clarice Lispector

Ĉi tiu novelo estis verkita origine en la portugala.

Ĉi tiu traduko estis farita de Barry Friedman el angla traduko.

Ĉi tiu rakonto povus esti nomita "La Statuoj". Alia ebla titolo estus "La Mortigo". Aŭ eĉ "Kiel mortigi blatojn." Do mi rakontos almenaŭ tri rakontojn, ĉiuj el ili veraj, ĉar neniu el la tri kontraŭdiros la aliajn. Kvankam ili konsistigas unu rakonton, ili povus fariĝi mil kaj unu, se mi ricevus mil kaj unu noktojn.

La unua rakonto, "Kiel Mortigi Blatojn", komenciĝas tiel: Mi plendis pri la blatoj. Virino aŭdis min plendi. Ŝi donis al mi recepton por mortigi ilin. Mi devis miksi egalajn kvantojn da sukero, faruno kaj gipso. La faruno kaj sukero altirus la blatojn, la gipso sekigus iliajn internaĵojn. Mi sekvis ŝian konsilon. La blatoj mortis.

La sekva rakonto estas vere la unua, kaj ĝi estas nomita "La Mortigo". Ĝi komenciĝas tiel: Mi plendis pri la blatoj. Virino aŭdis min plendi. La recepto sekvas. Kaj tiam okazas la mortigo. La vero estas, ke mi plendis nur abstrakte pri la blatoj, ĉar ili eĉ ne estis miaj: ili apartenis al la teretaĝo kaj grimpis supren laŭ la tuboj en la konstruaĵo en nian loĝejon. Nur kiam mi preparis la miksaĵon, ili ankaŭ fariĝis miaj. En nia nomo do mi komencis mezuri kaj pezi ingrediencojn kun pli granda koncentriĝo. Neklara abomeno ekposedis min, sento de indigno. Tage, la blatoj estis nevideblaj kaj neniu kredus je la mava sekreto, kiu erodis tian trankvilan domanaron. Sed se la blatoj, kiel mavaj sekretoj, dormis tage, tie mi preparis ilian noktan venenon. Zorgeme, fervore, mi preparis la eliksiron de longedaŭra morto. Kolera timo kaj mia propra mava sekreto gvidis min. Nun mi malvarme volis nur unu aferon: mortigi ĉiun blaton ekzistantan. Blatoj grimpas supren laŭ la pipoj dum lacaj

homoj dormas. Kaj nun la recepto estis preta, aspektante tiel blanka. Kvazaŭ mi traktus blatojn same ruzajn kiel mi, mi zorge disvastigis la pulvoron ĝis ĝi aspektis kiel parto de la surfaca polvo. De mia lito, en la silento de la loĝejo, mi imagis ilin suprengrimpantaj unu post la alia en la kuirejon, kie dormis mallumo, soleca viŝtuko atentema sur la vestŝnuro. Mi vekiĝis horojn poste, ektimigita pro tio, ke mi trodormis. Komencis lumiĝi. Mi iris trans la kuirejon. Tie ili kuŝis sur la planko de la potlavejo, grandegaj kaj fragilaj. Dum la nokto mi mortigis ilin. En nia nomo, komencis lumiĝi. Sur apuda monteto kokerikis kokido.

La tria rakonto, kiu nun komenciĝas, estas nomita "La Statuoj". Ĝi komencas dirante, ke mi plendis pri la blatoj. Tiam la sama virino aperas sur la sceno. Kaj tiel ĝi daŭras ĝis la punkto, kie mi vekiĝas dum komencas lumiĝi kaj mi vekiĝas ankoraŭ dormema kaj mi marŝas trans la kuirejon. Eĉ pli dormema estas la potlaveja planko kun sia kaheligita perspektivo. Kaj en la ombroj de tagiĝo, estas purpura nuanco, kiu distancas ĉion; ĉe miaj piedoj, mi perceptas makulojn de lumo kaj ombro, dudekojn da rigidaj statuoj disĵetitaj ĉie. La blatoj, kiuj malmoliĝis de kerno al ŝelo. Iuj kuŝas renverse. Aliaj arestitaj meze de iu movado, kiu neniam estos finita. En la buŝoj de kelkaj el la blatoj, estas spuroj de blanka pulvoro. Mi estas la unua, kiu observis la tagiĝon super Pompejo. Mi scias, kio estis ĉi tiu nokto, mi scias pri la orgio en la mallumo. En iuj, la gipso malmoliĝis same malrapide kiel en iu organika procezo, kaj la blatoj, kun ĉiam pli torturaj movoj, avide intensigis la noktajn plezurojn, penante eskapi el sia interno. Ĝis ili fariĝis ŝtonaj, en senkulpa teruro kaj kun tia, sed tia esprimo de dolora riproĉo. Aliaj — subite atakitaj de sia propra kerno, eĉ sen percepti, ke ilia interna formo fariĝis ŝtona! — ĉi tiuj subite kristaliĝas, same kiel vorto arestita sur ies lipoj: Mi amas . . . La blatoj, vane alvokante la nomon de amo, kantis en somera nokto. Dum la blato tie, tiu kun la brunaj antenoj ŝmiritaj per blankeco, certe tro malfrue komprenis, ke ĝi mumiiĝis ĝuste pro tio, ke ĝi ne sciis kiel uzi aĵojn per la senpaga gracio de la vantuloj: "Estas nur, ke mi tro atente rigardis interne de mi mem! estas nur, ke mi tro atente rigardis internen. . ."

— de mia frida alteco kiel homarano, mi rigardas la detruon

de mondo. Tagiĝas. Ĉi tie kaj tie, la elsekiĝintaj antenoj de mortintaj blatoj tremas en la venteto. La kokido el la antaŭa rakonto kokerikis.

La kvara rakonto malfermas novan epokon en la domanaro. La rakonto komenciĝas kiel kutime: Mi plendis pri la blatoj. Ĝi daŭras ĝis la punkto, kiam mi vidas la statuojn en gipso de Parizo. Neeviteble mortaj. Mi rigardas al la tuboj, kie dum ĉi tiu sama nokto reaperos infestiĝo, svarmanta malrapide supren laŭ indianovico. Ĉu mi renovigu la mortigan sukeron ĉiunokte? kiel iu, kiu ne plu dormas sen la avideco de iu rito. Kaj ĉu mi alkonduku min dormmarŝule al la teraso frue ĉiumatene en mia avideco renkonti la statuojn, kiujn mia ŝvita nokto starigis? Mi tremis per malmorala plezuro je la vizio de mia duobla ekzistado kiel sorĉistino. Mi ankaŭ tremis je la vido de tiu malmoliĝanta gipso, la malmoralo de ekzistado, kiu frakasus mian internan formon.

La malafablega momento de elekto inter du vojoj, kiujn mi pensis disiĝos, konvinkis, ke ĉiu elekto signifus oferi aŭ min aŭ mian animon. Mi elektis. Kaj hodiaŭ mi sekrete portas ŝildon de virto en mia koro: "Ĉi tiu domo estis desinfektita."

La kvina rakonto estas nomita "Leibnitz-o kaj La Transcendeco de Amo en Polinezio". . . Ĝi komenciĝas tiel: Mi plendis pri la blatoj.

Tago en Columbus, Ohio (2022)

2022 estis la jaro el infero ĝis nun. Ĉiuj diris, ke 2020 estis la koŝmara jaro, ĉu ne? Ĉi tiu senĉesa katastrofa tutmonda pandemio konata kiel korona viruso, ne de Meksiko sed de Ĉinio, detruis la homan loĝantaron. Tio ruinigis milionojn da entreprenoj kaj familiojn, kaj kaŭzis morton, detruon, kaj fincan kolapson. La planedo freneziĝis plene, maskoj fariĝis la normo publike. Se oni estus ene de ses futoj de kunhomo sen havi la buŝon kaj nazon kovritaj, tiu farus agon de biologia terorismo. Frenezulejo je homa socio.

Nun ni havas alian koŝmaran scenaron. Mi estas nur fripona viv-malgajninto, tro harplena pseŭdointelektulo proksime de mezaĝo, manĝaĵ- kaj nutraĵ-liveranto en Columbus, Ohio. Kion mi scias pri mondaj aferoj? Pri politikaj tagordoj malantaŭ homa sufero? Pri riĉaj rusaj oligarkoj lasantaj la plebojn de sia tero suferi kaj malkreski dum ili postkuras gloron de akirado de dua Sovetunia imperio. Vlad la Invadanto freneziĝis, Putin ne konas limojn. Ukrainio estas lia celo. En liaj okuloj Ukrainio kaj Rusio estas unu, la Kieva Ruso venis de tie. Kial Vlad ne postulu ĝin? Kial la rusianoj ne plugu en Kievon, Ĥersonon, Dnepropetrovskon, ne venku la feliĉajn vivojn de ukrainaj civitanoj, ne kreu grandegan krizon de rifuĝintoj, ne inundu Pollandon per korŝiritaj milionoj. La oligarkoj fajfas pri ies opinio; la Dioj de Potenco de la Oriento floras dum la peonoj estas devigitaj en atavismon al la pasinteco.

Sed kion mi scias pri ĉi tio? Mi estas nur averaĝa usonano, laboranta forte por satiĝi. Kiel ĉiuj aliaj mi nur volas eksciton. La libereco de la usona revo fari kion ajn vi volas en la vivo. Kredi je ajna Dio, kiun vi volas: Alaho, Mohamedo, Jesuo, Ŝivao, Viŝnuo, la Budho Gaŭtamo. Jen la kialo, ke Usono estas tiel grandioza. Ni povas kredi ajnan frenezan aferon kaj neniu dehakos vian kapon pro tio. Certe, virgulino magie gravediĝis. Se vi volas kredi

je gravedeco sen sekso aŭ artefarita fekundigo, en Usono estas via Konstitucia Rajto fari tio.

Mi estas la averaĝa usonano en la averaĝa usona urbo: Columbus, griza, malvarma, sombra, kaj industria; bierfabriko Anheuser Busch blovas fumon en la melankolian ĉielon de senfina vintro; spirkaptiga bela foliaro en aŭtuno, sufoka humideco en senfina somero de ĝojo, juneco, mezokcidenta trankvilo, la kolerigaj ŝoseoj kiuj zigzagas en kaj el vasta metropolo kun sovaĝaj maniaj ŝoforoj, neniu obeado pri reguloj, neeblaj elirejoj kaj enirejoj, la danĝeroj de interne-de-la-urbo-a vivo; la paco de la trankvilaj antaŭurbaj urboj en Supra Arlington aŭ Dublino, la belegaj, ampleksaj, golfej-kampar-klubaj, novaj kvartaloj ĉirkaŭ Tartan Fields aŭ Avery Muirfield; milionulaj, belaj, grandiozaj, novaj palacetoj. Ankaŭ estas malnovan, malnovan monon en New Albany, spektaklaj, ruĝbrikaj domegoj kiuj parolas pri la plej riĉaj generacioj de malnovmonaj usonaj familioj: la Roosevelts, la Vanderbilts, cilindraj ĉapeloj, smokingoj, bastonoj. Kaj ankaŭ la regionoj de tiom da enmigrintaj komunumoj: orientafrikanoj, somaloj, etiopoj, universitataj studentoj, la granda hinda loĝantaro de informadik-laboristoj kaj restoraciistoj.

Ĉi tie mi eniras. Mi liveras manĝaĵojn kaj nutraĵojn al ĉiuj ĉi tiuj homgrupoj ĉirkaŭ Columbus. Foje mi preferas la pompecajn sed aĉajn areojn ĉirkaŭ la Polaris-Fashion-a loko, kie geto renkontiĝas kun pretiĝo, kie kvartalaĉo kun koro, kie nove riĉaj homoj kiuj estas unu paŝo el la publikaj domoj kaj gajnis sian riĉaĵon per pura laborego, lastatempe ekloĝis en antaŭurbon. Estas verdaj kampoj kaj blankaj palisbariloj. Estas Tom Sawyer pentri la fostojn. Estas la glaciaĵkamiono por la infanetoj. Estas vasta korto por la hundoj. Ĉi tio estas la ideala usona ekzisto, kiu alfrontas detruon kaj estas delikata fantazio atendanta kraŝi sin.

Instakarto estas la prosperanta, ĉefa, plej populara nutraĵ-livera aplikaĵo en Usono nun. Ĉiuj kaj ilia frato uzas ĉi tiun aplikaĵon por ricevi siajn aĵojn rekte en la komforto de siaj propraj hejmoj. Floroj, peonioj, petunioj, diversaj bukedoj. Ĝardena mulĉo, Stella-Artois-aj

bierpakoĵoj, vindotukoj je grandeco 4, viŝtukoj, Ibuprofeno, ĵusmaturaj avokadoj, baterioj, poŝtkartoj, ringoformaj kukoj, Private-Selection-a beba svisfromaĝo, Simple-Truth-a Organika Lakto (ne regula lakto, kiu estas por idiotoj kaj viv-malgajnintoj kaj homoj sen rafinita bongusto.) Mi liveris de ĉiu grava podetalisto, la grandaj vendejoj: Kroger-o, Kostko, Meijer-o, Target-o. Kaj de kelkaj el la pli malgrandaj pli eklektikaj butikoj kun la organikaj specialaj aĵoj: La Merkato de Carfagna en Gemini, la plej aŭtentika itala vendejo, kiun vi iam eniros (ĉi tie vi faros specialan vojaĝon al Italio kiam vi enpaŝas en Carfagna; la plej bona burrat-fromaĝo, kradrita Parmigiana Romano, pizzelkuketoj, mini-kanoloj, la memfarita tomata saŭco de Carfagna kaj itala geedziĝsupo; poste la viandoj. Carfagna havas la plej bonajn viandojn, kolbasojn, bovajn fileojn, bovidon, kaj limonkokidon).

Kostko estas por la grandaj dolaroj; la granda dika Usono, grandega komerco, granda mono, vastaj interkonsentoj. Irante okcidenten por la grandioza revo de amplekso, stokego, kvin dentopastoĵoj en unu pako, 10 funtoj da cerealo aŭ sukero en unu sako. La puŝegoj en la vendejoj fare de homoj batalantaj por la lasta skatolo da Kirkland-a rostitkokido, morna magazencirkaŭaĵo, blua kaj griza, la fajrero de la levĉaroj kuregantaj apud frenezaj aĉetantoj, hindaj enmigrintoj turniĝantaj al la 20-funtaj sakoj da Khazan- kaj Basmati-rizo, la ĉinoj kaptante tiujn BokChoy-saŭcojn, la maljunaj blankuloj etendantaj por la Kirkland-Signatura organika muelita bovaĵo.

Mi ekprenis sesdek tri dolaran aron, laŭ mendo, je Instakarto de Kostko. Ĉi tiu estas la granda tumulto, la MacDonald-hamburgero de nutraĵliverado, tri-personaj programoj, kiuj ligas ŝoforojn kun klientoj. Homoj timas la koronviruson, nun ili plimalboniĝas pro inflacio kaj altiĝantaj prezoj de gaso. Prezidanto Bideno ĉesas naftokomercon kun la rusoj kiel reprezalio por ĉi tiu ukrainia agado. Ni do ĉiuj suferas en Usono. Dankon, Onklo Joe. Laca maljunulo ne estu gvidanto de la Libermundo. Sed mi deflankiĝas. Nu, mi estis en movoplena magazeno de Kostko; ĝi estas sia propra mikrokosmo de la mondo, sia propra metropolo; Sokrato kaj Platono povus

filozofii pri Kostko kiel la bonega ekzemplo de homa komerco kaj ekscito de ideoj. Mi frakasis ĉarojn kun alia ŝajna Instakarta aĉetanto. Li estis malalta, kalva, ruza, bril-denta, feliĉa, fervora, juna afrika viro en poloĉemizo. Vera energiemulo. Mi decidis paroli kun li.

"Ho, ĉu vi ankaŭ faras Instakarton?"

"Jes, Instakarto, jes!"

"Kiom vi perlaboras kontraŭ ĉi tiu mendo?"

"Jes, Instakarto." Eble ĉi tiu moderna, energiemula, afrika ulo ne perfekte regas la anglan. Eble mi juĝas homojn tro severe.

"Mi volas diri 'la pagon'? Kiom?"

"Ĉu pagi? Jes, oni devas pagi por mendo per karto."

"Ne, ne, kiom vi gajnas?"

"Mi gajnas 12 dolarojn."

"Ĉu 12 dolarojn?"

"Jes, kontraŭ 20 eroj estas bona." Kaj la malsaĝula, bufonema, feliĉa enmigrinto forveturis en la Kostko-sovaĝejon de magazena grandkatola usona frenezeco kaj mi neniam revidos lin. Li volonte laboris kontraŭ malaltaj salajroj ĉar li estis dankema pro la promeso de Usono, atingante riĉan kaj feliĉan vivon, grandan domon, belan familion, kaj sendi monon hejmen al la malriĉa familio. Se la viro estis kontenta labori kontraŭ pencoj, tiam tio estis lia elekto. Kiu mi estas juĝi aliajn homojn? Ni ĉiuj devas fari niajn proprajn malfacilajn elektojn kiel plenkreskuloj en ĉi tiu absurda, ridinda, aberacia mondo.

Jen mia aĉetlisto: du 750-mililitraj boteloj da Kirkland-a proseccvino, du funtoj da citterio prosciutto di parma importita el Italio, sep avokadkaĉaj pakoĵ, dudek kvar Kirklandaj ovoĵ, tri pakoĵ da 36 ladskatoloĵ da koka-kolao, kvar gatorade-aj variopakoĵ, dek sep

Pirate'sBooty-aj ĉeddar-aj manĝetaskatoloj, granda 130-dolara mikroondo en blu-nigra ultra-teknologia ĝisdatigo, pakoj da tajlanda rizo, DelMonte-a enlatigita maizo, sovaĝ-kaptita alaska moruo de Morey, Yasso-aj grecaj glaciaĵbrikoj, la Hass-aj avokadoj, organika Cezar-salata miksaĵo, Kirkland-a subskriba ĉi tio, Kirkland-a subskriba tio, kvinoa salato, frenezigaj Kirkland-aj strattakoj, bongusta Kirkland-a kokido alfredo, Lindor-Ĉokolado, la Ghirardelli-dolĉaĵo, la On-the-Bordera tortilja ĝojo. Mi prompte veturis tra la koridoroj, la bretoj, la senfinaj amasoj da senfinaj aĉetantoj, la laboro de Ameriko, elspezante monon, farante interkonsentojn, trarigardas la vivon, trovante la dezirojn kaj celbezonojn. Tiam la surprizo.

Tiu vigla ĝentila bela juna afrika viro nun estis staranta en la mezo de la vasta, mensoŝanceliganta Kostko, ĉi tiu Everesto de ĉiuj podetalistaj pogrondaj vendejoj. Li tenis nigran mikrofonon kaj havas deviantan, intensan, teruran, korhaltigan aspekton en siaj okuloj. Pro timego ĉiuj haltis sin; la hinduoj ĉesis sian ĉason por Khazana-o; la maljunuloj por la rosta kokido; la junuloj por la Lindor-Ĉokolado. La viro eltiris pafilon. Ĉi tio vere okazis! La viro havis pafilon kaj estis ploranta per lacegaj, furiozaj, koleraĵ justaj larmoj. Ili fluis laŭ lia nigra-kiel-karba vizaĝo en senkompata kolerego. Li ekkriis je la supro de siaj pulmoj per rompita akcento dum mi rigardas per miro kaj timo.

"Ĉiuj silentu! Mi mortpafos vin ĉiujn! Mi mortigos vin ĉiujn! Mi havas celon por ĉi tio! Neniu forlasos ĉi tiun Kostkon ĝis mia kuzo Ufemele Oyimalo estos permesita forlasi Ukrainion al Pollando. Li estas niĝeriano kiu vivas en Ukrainio. Li provadas eskapi al Pollando jam de tri tagoj kaj la ukrainaj aŭtoritatoj daŭre prokrastas lin, kune kun la aliaj koloruloj en Ukrainio. Li kaj lia familio malsatas. Ili devas foriri same kiel ĉiuj blankaj ukrainoj. Sed ĉar ili estas geafrikanoj ili donas al ili malbonan traktadon. Ili ne permesas ilin al Pollando. Mi do retenos ĉiujn ĉi tie en Kostko ĝis Prezidento Biden sendos la usonajn soldatojn al Ukrainio por liberigi mian kuzon Ufemele kaj lia familio. Ĉiuj, kiuj provos foriri, mortos! Ili mortos!"

La viro estis maniulo kaj ĉiuj aliaj aĉetantoj en Costco estis nemoveblaj; la dungitoj estis senhelpaj kaj ĉagrenitaj kaj havis neniun nocion pri kio la sekva paŝo devus esti. Administranto, mi kredis, fortika, dika, okulvitrumita kalvulo, la epitomo de uson-kompania robotema vivo, provis alproksimiĝi al la freneza aĉetanto. Mi neniam antaŭe vidis ion tiel frenezegan kaj mi kreskis en juda familio! Ĉiukaze, la kalva manaĝero provis paroli al la pafiloposedanto kun siaj manoj levitaj en paralizita teruro.

"Sinjoro, aŭskultu min...."

"Silentu! Ne parolu! Silentu! Biden devas liberigi mian kuzon Ufemele! Kaj kion li faras? Nenion!"

"Ĉi tio ne estas la maniero por akiri tion, kion vi volas, sinjoro. Bonvolu demeti la pafilon. Ni jam vokis la policon. Ili estas survoje."

"Mi ne zorgas pri la stulta polico! Ili ĉiukaze ĉiam mortigas nigrulojn! Mi volas justecon por mia kuzo kaj lia familio!"

"Neniu ĉi tie povas fari ion helpi vian kuzon kaj lian familion. Ni nur volas, ke vi demetu la pafilon kaj finiĝu kun ĉi tio."

"Ne gravas min! Mi mortigos vin ĉiujn!"

Subite svarmo de Columbus-policianoj plonĝis en la ĥaosan Kostkon, dum la amaso da ŝtoniĝintaj kaj frostigitaj aĉetantoj simple observis la simplan hororon. Kvar policianoj, muskolfortaj, malmolaj, harditaj de la faktoj de vivo kaj realeco de Columbus-a krimo, malgajo, misfunkcio, havis siajn pafilojn tiritaj sur nia malfeliĉa aĉetanto, kiu abunde ploris freneze. Ĉi tiu viro estis preskaŭ psikologie rompita.

Unu oficiro kriis per severa voĉo: "Mallevu sin nun sur la teron! Faligu vian armilon! Metu viajn manojn super vian kapon!"

"Blankulo ne povas diri al mi kion fari! Ne gravas min! Pafu min, se vi volas!"

"Faligi la armilon nun! Faru ĝin!!"

"Mortigu min!"

Unu oficiro pafis en la kruron de la afrikano. Li kriis pro doloro kaj kiel respondo hazarde tiris la ellasilon de sia propra pafilo. La misvagaj kugloj frapis la vastkorpan administranton, kiu estis trafata en la brako. La manaĝero kriegis en agonio.

"Filo de hundino! Fikaj enmigrintoj! Restu en via propra lando! Teroristaj puguloj!"

"Alvoku ambulancon! Nun!"

La kvar oficiroj inundis sin ĉirkaŭ la vundita afrikano, nun tordiĝanta pro doloro sur la planko. Lageto da sango etendiĝis en la malgajan magazenan butikon. Koridoro 313 estis tuta ruĝa. Koridoro 314 havis makulojn kovrantajn la enlatigitajn varojn kaj tomatojn. La Kirkland-signatura siropo estos simbolo de murdo kaj morto kaj memmortigo; verdaj montaraj kafkapsuloj estos memorigilo de malfortikeco, frenezeco, terorismo, kaj politika malordo.

La sanganta kaj ploranta afrikano ekprenis pafilon el unu el la manoj de malmola oficiro. Lia spirito estis rompita kaj li ne plu zorgis pri vivo aŭ morto, justeco aŭ maljusto. Ĉu lia kuzo Ufemele vivos vidi liberecon en najbara Pollando, estos resendita al Niĝerio, aŭ mortos en Ukrainio pro rusaj bomboj? La afrikano prenis la pafilon de la oficiro kaj direktis ĝin al sia propra tempio. La ellasilo estis tirata rapide kaj senpense. Liaj cerboj estis ŝprucataj ĉien sur la Kostko-plankon. Ĝi estis la plej terura vidaĵo, kiun mi iam vidis. Virinoj blekis; viroj anhelis; maljunuloj estis sub ŝoko; enmigrintoj ploris; dungitoj ne povis moviĝi pro paralizo. Normala tago de butikumado, malstreĉiĝo, kaj feliĉeco estis frakasata. La milito en Ukrainio influis la ĉiutagan normalan vivon; Usonanoj ne plu povas ignori mondajn aferojn. Ĉi tiu afrika kunaĉetanto kuŝis morta. La traŭmato estis senfina kaj reala. Mi estis senvorta. Ĉu mi daŭrigu mian mendon? Ĉu mi daŭrigu la normalajn aferojn de la moderna usona vivo fronte

al ĉi tiu tragedio? Ĉu mi daŭrigu miajn ĉiutagajn rutinojn de butikumado, vivtenado, impostopagado, kaj benzinoaĉetado?

La cetero de la tago estis kiel sonĝo aŭ nebuleto; nenio ŝajnis reala aŭ ene de la vivo. Mi ne povis ĉesi pensi pri ĉi tiu okazaĵo. Ĉi tiu afrika viro estis puŝita preter la punkto de nereveno en sia difektita psiko. Lia menso akceptis la ideon ostaĝigi vendejon, poste iri al malliberejo por ĉiam, kaj finfine mortigi sin pro la kialo de la savado de lia familio en Ukrainio. Ĉu mi iam povus efektivigi tiun nivelon de inspiro kaj idealismo, kaj tiun kapablon tiel profunde zorgi pri kunhomoj? Dum mi veturis hejmen sur la aŭtovojo Olentangy River Road, kiu glate deflankiĝas tra Worthington, Strato Henderson, la universitata areo de Ohio State, la urbocentro, kaj poste la suda flanko, mi pensis, ke mi devas esti alia malkompatema usonano, obsedita nur de mono kaj la Granda Revo, la granda dika mono, la Kostko-mono. Kion ĉi tiu okazaĵo signifis en la grandioza skemo de aferoj?

Mi devis pasie amori kun mia sekseca nigrohara edzino, fantazia usona virino kun logaj ruĝaj elstarantaj lipoj, trapikantaj brunaj okuloj, fluantaj nigraj navahaj haroj, kaj simple grandiozaj enormaj terrompaj mamoj. Mi bezonis ĉi tiun senpensan fizikan distraĵon por forgesi pri la realo. Terorismo, ostaĝoj, forkaptado, mondmilito, invado, rusaj bomboj, ukrainaj-afrikaj rifuĝintoj, malsato, infanoj mortintaj en hospitalbombadoj. Sovaĝa sekso estis la sola eskapo. Mi frotis sur ŝian pulsantan klitoron dum kelkaj minutoj kun niaj langoj kunnoditaj en pasia kuniĝo. La kunnodo iris tien kaj reen inter niajn dentojn dum ŝi tenis mian pulsantan penison, kiu estis preta fosi en ŝian ege malsekan vaginon. Mi volis penetri tiel profunde en ŝin kiel kompreni la homan kondiĉon, penetri la kialon, ke tiu afrika viro freneziĝis kaj mortigis sin en Kostko. Kiel li sentis tiel profunde pri sia ukraina kuzo, ekzakte kiel mi estas profunde en mia edzino. Mi nun estas kelkajn colojn interne de mia bela, ekzotika, volupta edzino. Mi forte tiris ŝian hararon dum mi pistis en ŝin. Ŝi kriis, ke la kapo de mia penis estas tiel granda, ke ŝi preskaŭ ne povas preni ĝin sed samtempe ŝi ne povas vivi sen ĝi. Niaj buŝoj kuniĝis per pasia franc-kisado dum mi atingis kiel eble plej profunde en ŝin por

kompreni la mondon. Ŝi diris al mi, ke mi klinu ŝin. Mi ĵetis ŝin al la flanko de la lito, kaj ŝi kaŭris sur la manoj kaj genuoj. Ni estis bestemaj je nia volupto kaj lascivo. Mi plugis la monstron en ŝin de malantaŭe kaj tiris ŝian longan fluantan nigran hararon dum ŝi hurlis pro plezuro. Ŝi volis, ke mi finu sur ŝian vizaĝon. Ni volas esti sendignigaj. Mi deponis mian masivan ŝarĝon da spermo sur ŝian belegan olivkoloran haŭton. Ŝi diris, ke ŝi ĉiam amos min, kiom ajn malbonaj aferoj fariĝos. Ŝi diris, ke ĉi tiu moderna mondo baldaŭ ĉesos ĉar Dio restarigos la justan mondon al la homaro.

Kaj ni diris bonan nokton unu al la alia. Morgaŭ mi denove alportos nutraĵojn al homoj. Sed traŭmato neniam pasas facile malgraŭ la indulgiĝo je plezuro.

La Psomofilo

Carl Djerassi

Tradukis el la angla: Barry Friedman

Carl Djerassi (1923-2015) estas aŭstria-usona kemiisto, romanisto, novelisto kaj dramaturgo, plej konata pro sia kontribuo al la disvolvo de perbuŝaj kontraŭkoncipaj piloloj. Emerita profesoro de ĥemio en la Universitato de Stanford en Usono, Djerassi estas ankaŭ la aŭtoro de pluraj romanoj en la ĝenro “scienco en fikcia”. Ekde 1997 li koncentriĝis je dramaturgio en la ĝenro “scienco en teatra”.

Eĉ antaŭ ol oni aŭdis lian parolmanieron, evidentis, ke li ne estas usonano. Estis spuroj de hispanlingvaĵoj (“**espectacular**” – li **dirus**), kaj okaze ankaŭ itallingvaĵoj supermetitaj sur britismoj kiel “jolly, bloody, beastly”. Bona konjekto eble estus itala familio en Sudameriko, eble en Argentino aŭ Urugvajo, kiu sendis sian fiŝon al lernejo angla. Li portis nur anglajn ŝuojn, kiuj estis fabrikitaj laŭ individua mendo. Liaj jakoj estis ĉiam de itala dezajno, striktaj, kvankam ne tro, du-butonvicaj, kaj faritaj el ŝtofoj kiel venecia lano, kiu ne perdas siajn gladliniojn eĉ en pluvo, aŭ kaŝmiro kvadratita. Nun li loĝis en Hilsborough, unu el la plej riĉaj antaŭurboj de San-Francisko, kaj pendolveturadis al la urbo en ŝoforata Jaguaro.

Sed lia vera marko estis lia pasio por pano. Ne por ĉiaj bakaĵoj, kaj certe ne kukoj, sed por pano aŭ bulkoj. Iam amiko donis al li la nomon “Panifi lo”, sed li ne povis akcepti bastardan terminon greklatinan. Post iom da debatado ili telefonis kipran konaton, kiu mallarĝigis lian elekton ĝis du. “Artofi lo” estis verŝajne la pli ĝusta, bazita sur la antikva greka “artos” por panbulo, tamen la potencialo por konfuzo estis ĝena. Kompreneble li estis artamanto – oni nur devis rigardi la murojn en lia hejmo aŭ ofiĉejo –, tamen dusenceco simple ne taŭgas, kiam oni traktas pri pano, kaj la vorto “artofi lo”

sonus kiel plia hibrido. Ankaŭ “psomofilo” ŝajnis difekta, ĉar la antikvaj grekoj uzis “psomon” pri peceto de pano aŭ de viando, sed ilia kiprano, insistante, ke “psomi estas la moderna greka vorto por pano”, rependigis la tele fonricevilon.

La vorto estis akceptita de la psomofilo, kiu rimarkis, kesuferi je “psomofi io” sonas delice degenere.

Unu helan aŭtunan sabaton en 1980 la psomofilo transformiĝis al komencanta psomofanatikulo. La viro kaj lia edzino estis invititaj al frua tagmanĝo en la hejmo de Berkia profesoro. Ili alvenis malfrue – latineca kutimo. Ilia gastiganto gvidis ilin rekte al la bufedo kaj sugestis, ke ili mem prenu antaŭ ol renkonti la aliajn vizitantojn. Kiam la gastigantino enportis korbon, ĉi tiu fi rma kredanto je manĝebla arto rimarkis, ke la nutraĵo jam estas en malordo, sed ĉi-foje li ne zorgis pri la atencoj, kiujn la antaŭaj gastoj faris: la trufoj elpikitaj el la pateo, la kukuma tranĉaĵo falinta en humuson, aŭ eĉ la dispistitaj bukloj de la butera porcio. Liaj naztruoj ekstremitis kiel tiuj de viro, kiu perceptas parfumon sur virino. Je unua ekvido la varma, ronda panbulo, portata de la gastigantino, eble aspektis kiel ordinara, malmolkrusta, acidpasta pano. Al liaj okuloj tamen la malperfektaĵoj en la surfaco de la pano – la brul-brunaj randoj de la multaj tranĉostrekoj aŭ la amplekso de la veziketoj sub la krusto – estis nemiskomprenebla atestaĵo pri tuŝo speciala.

Estis ingredienco en la aromo, kiun li ne povis identigi. Ĉi tiu kaŭ zis, ke li salivis. Tuj kiam la gastigantino mallevis la korbon sur la tablon, li ĝin aliris kun segildenta pantranĉilo por plenumi la rit aron neeviteblan: fortranĉi la fi npecon de la panbulo. Tio havigis la maksimuman kvanton da krusto, la veran pruvon de la arto de bak isto, kaj ankoraŭ sufiĉan kvanton da pankarno por povi juĝi pri la korpo de la pano. Tuj kiam li ĝin gustumis, li eksciis. Ja parmezano! Nur spuro plej eta, sed dieca! Li rigardis ĉirkaŭen kaj kaŝe tranĉis la alian fi non de la panbulo. Li ne rimarkis, kiajn alian nutraĵojn li elektis; ĉio estis kamufl o por la pano.

Sur la teraso li komplimentis la gastigantinon pri ŝia omleto, kiun li ĝis nun ne gustumis, kaj pri la pano. “Kiel vi venis al la ideo pri

la gusto parmezana? Tiel subtila kaj tamen vera signaturo! Kiu vin instruis baki tian majstroverkon?”

“Vi estas la unua, kiu rekonis la parmezanon. Sed mi ne meritas laŭdon, mi havas ĝin de Alessandro.”

“Alessandro?”

“Ili estas panfarejo loka, triageneracie itala, kiu iel kombinas san franciskan acidpaston kun itala bakado. Nur je sabato ili tiun panon bakas.”

Laŭ ŝiaj instrukcioj, li senpene trovis Alessandro’n. La montrofene stro aspektis kvazaŭ ne lavita de tagoj; kaj escepte de kelkaj eroj solecaj – pleto kun kelkaj bulkoj, unu aŭ du kukoj – ĝi estis malplena. Al sperta psomofilo, tamen, la panfarejo aspektis promesplena. Estis evidente, ke plej multaj varoj jam vendiĝis, kaj ke la arton de elmontrado la proprietulo aŭ malestimis aŭ juĝis nenecesa.

Aŭdiĝis obtuza sonorileto, kiam li malfermis la pordon. Post mal respekta intertempo maljunulo, en jako kaj kun kravato, aperis tra mal antaŭa pordo. “Jes?” estis ĉio, kion li diris. La peto de la psomofilo je bulo de la sabata pano speciala rezultigis mok-ronkon.

“Ĉu je la unua kaj tridek?” demandis la bakisto, atentigante pri la horloĝo sur la muro. “Ĉiam ni elvendas ĉion antaŭ la deka kaj dek kvin. Ni malfermas je la deka.”

La sekvan sabaton je la naŭa kaj kvardek ŝoforo en uniformo sidis parkinte la konkurs-aŭte verdan Jaguaron de la psomofilo antaŭ Alessandro, legante ĵurnalon. La montrofenestro estis pli plena ol en la semajno antaŭa sed plu nelavita. Kiam la unuaj klientoj aperis antaŭ la fermita pordo, la ŝoforo faldis la ĵurnalon kaj aliĝis la vicon. Precize je la deka la pordo estis malŝlosita. Kun preskaŭ neniuj escepto la petoj estis por “la speciala”. Kiam la ŝoforo mendis kvin panbulojn, li estis informata: “po du por kliento, se oni ne mendis antaŭe.”

Dum la postaj kelkaj semajnoj la ŝoforo fariĝis konata fi guro sabata ĉe la panfarejo. Unu matenon la ŝoforo estis akompanata de sia dunganto, kiu faris peton simplan: “Retenu tri panbulojn por mi ĉiun sabaton, eĉ se la ŝoforo ne estas ĉi tie je la deka. Se mi volos pli da panbuloj, mi mendos antaŭe.” La bakisto komprenis komplimenton, eĉ kiam ĝi estis maskita kiel mendo, kaj speciale kiam la mendo estis por livero monatlunga kaj pagita eĉ sen kvitanĉpeto. Alessandro reciprokis per informo: se frostigitaj senprokraste, liaj panbuloj povus esti konservataj kontraŭ putro dum jaroj, ne semajnoj aŭ monatoj, kaj ankoraŭ havus la guston de freŝa pano, kondiĉe, ke – kaj la dekstra montrofi ngro estis levata emfaze – oni senfrostigu ĉiun panbulon malrapide, dum ĝi estas strikte envolvita en malseketa mantuko. “Malrapide” li ripetis, dum li fi ngrofrapetis la kaŝmiran jakon ĝuste sub la poŝtuko silka, “kaj neniam varmigu la panon antaŭ ol ĝi sen frostiĝas komplete. Kaj ne refrostigu ĝin.”

Dum la sekvaj kelkaj jaroj la sabata specialaĵo de Alessandro estis ĉiam trovebla en la kuirejo de la hejmo en Hilsborough. Kutime la psomofilo konsumis unu freŝan panbulon ene de kelkaj horoj ekde la alveno de la pano en la kuirejon. La resto estis tranĉata en duonojn, kaj ĉiu duono estis strikte volvata en plasto kaj poste frostigata. Senfrostigi per la malseket-mantuka metodo ja funkciis kiel Alessandro promesis, sed li neniam elprovis la dumjaran garantian.

Unu sabaton en malfrua 1982 la ŝoforo revenis kun tri panbuloj kaj la sciigo, ke la panfarejo Alessandro estas fermota por ĉiam. La kialoj estis misteraj – iuj klientoj asertis, ke temas pri nuliĝo de la lukontrakto, dum aliaj klientoj aludis al subita rilatrompo inter la pli aĝa Alessandro kaj lia fi lo. Kio ajn estis la kaŭzo, la venonta sabato estos la lasta tago, kiam la specialaĵo de Alessandro estos aĉetebla.

La psomofilo informiĝis de Alessandro per telefono, ke ne mono estas la problemo, ke la decido estas nenuligebla, kaj la bakisto pretis doni iun geston grandiozan, kvankam ne la plej grandiozan el ĉiuj: nome la diskonigon de la recepto por la pano. Tio estus

neimagebla; li eĉ ne pretis malkaŝi la originon de la parmezano, nur avertis, ke sole certa importita marko taŭgas. Li ja akceptis specialan mendon por cent buloj de lia pano. Ĝi povus esti prenita je la lasta ekzistotago de la panfarejo. Alessandro petis nur, ke la Jaguaro parkiĝu en la malantaŭa strateto kaj ne aperu ĝis tagmezo. Li antaŭvidis, ke amaso da klientoj kutimaj venos dum tiu mateno; transdoni cent panbulojn antaŭ iliaj okuloj senbriligus lian reputacion de tenaca egaltraktanto.

La Jaguaro alvenis en la strateton je la dekunua kaj kvindek. La psomofilo portis malhelbluan kompletan kun blua- kaj nigra-stria kravato. Tio estis lia ideo de funebra kostumo. Alessandro malfermis la pordon precize kiam la ŝoforo kaj lia pasaĝero alproksimiĝis la malantaŭan enirejon de la panfarejo. Dudek aŭ pli da blankaj papersakoj estis stakitaj apud la muro. “Ĉi tie vi havas nur naŭdek kvin panbulojn.” La stoko estis elĉerpita pli frue ol kutime, kaj iuj el liaj klientoj plej malnovaj tiom elreviĝis, ke li simple ne kapablis forsendi ilin. “Mi esperas, ke al vi ne gravas. Ĉiuokaze vi nenion povas fari pri la situacio.” Li ridetis acerbe, montrante, ke ankoraŭ li difi nas la ludregulojn. La kofrujo de la Jaguaro ne povis enteni ĉion; la troaĵo transiĝis internen de la aŭto kaj plenigis ĝin per aromo stranga de parmezano, brita ledokaj freŝbakita pano.

La ŝoforo, la kuiristino, la servistino kaj la dommastro komencis tranĉi ĉiujn panbulojn, escepte de kvin, je tri partoj, kaj envolvis ĉiujn partojn hermetike en plaston. La kvin netranĉitaj panbuloj restis por malmultaj okazoj specialaj. Nur kiam la pano estis preta por frostigo, venis al ili en la kapon, ke 275 pako, 5 el kiuj sufiĉe ampleksaj, uzurpus la tutan frostospacon de la kuirejo. Sen momento da hezito ordono estis donita forigi la nunan enhavon de la frostigilo – funton post funto da bifstekoj, kolbasoj, fiŝoj, dolĉa butero, glaciaĵo kaj neetikeditaj ujoj diversaj, ĉio kara al la koro de la kuiristino. Ŝi tuj enlitiĝis kaj ne revideblis ĝis lundo matene.

La psomofilo decidis esti egoisma. Kun tre malmultaj esceptoj nur li kaj lia edzino konsumos tiun panon, kaj eĉ ili limigos sin al unu frostigita porcio en semajno. Pro lia ofta vojaĝado la provizo verŝajne

daŭros almenaŭ ses jarojn. Preter tiu tempoperiodo li rifuzis konsideri.

La februaro de 1986 estis la plej malseka monato dum la okdek jaroj de la veterregistroj san-franciskaj. La torentaj pluvoj, frajitaj de serio da pacifi kaj ŝtormoj, estis akompanataj de tre fortaj ventpuŝoj. Tio kaŭzis elektropaneojn de daŭro senprecedenca. San-Francisko restis relative netuŝita, speciale la regionoj de la gastejoj kaj ofi cejoj urbocentraj; la plej multaj okupantoj de ĉi tiuj altkonstruaĵoj ne konsciis pri tio, kio okazis nur kelkajn mejlojn norde, sude kaj oriente de la urbo, kie la transsendo de elektro estas grandparte supertera. Mallonge post la tagmanĝo la sekretariino de la viro interrompis lin dum kunsido. La noto, kiun ŝi prezentis diskrete, aludis al mesaĝo de lia edzino. Ĝi raportis, ke la elektro en ilia hejmo estas interrompita ekde la deka matene kaj tial ili vespermanĝos probable malvarme. “Rezervu ĉambraron en la Huntington” li diris, “kaj informu mian edzinon, ke ni pasigos la nokton en la urbo.” Vespermanĝo sen gastoj en la urbo, eble kun posta vizito al kinejo, jen lukso, kiun ambaŭ frandis sed nur malofte permesis al si.

La mateno ne komenciĝis favore. Ne nur ke li devis surmeti la sa majn vestojn kiel en la antaŭa tago, sed eĉ buleto da marmelado surfalis lian kravaton, kaŭzante tian makulon je lia eleganto, kiun li neniam tolerus en cirkonstancoj ordinaraj. Kaj poste la telefono sonoris. La servistino vokis el Hilsborough por diri, ke la elektroprovizo ankoraŭ ne estas restarigita. Kion ŝi kaj la kuiristino faru pri la degelantaj nutraĵoj en la frostejo?

‘Ho, ne zorgu prie’ li diris, sed antaŭ ol lia edzino povus pludiri tion, fi ne trafenetris lin la graveco de la servistina mesaĝo: la pano, minimume tri jaroj da panspecialaĵo de Alessandro? Ekrigardo en lian poŝagendon informis lin, ke li povos direktiĝi al la sudo ne antaŭ la dekunua matene. Eble la izolo de la frostejo estis tia, ke la pano ankoraŭ restis frostigita; eble la elektro revenos pli frue ol oni antaŭvidis. La situacio estis eĉ pli grava ol li imagis. De la aŭtomobila radio li eksciis, ke deĵorantoj venas eĉ el Nevado por

helpi la riparlaboron; ne eblis taksi, kiam la elektroprovizo estos restarigita. Dum la ŝoforo kondukis tra unu el la plej malriĉaj partoj de la urbo sur la stratetoj al la ĉefvojo, preterpasante pensionaĉojn, hotelojn kadukajn, kon stru aĵojn tabulkovritajn kaj homojn, kiuj kunpremiĝis en pordejoj por resti sekaj, la psomofilo pensis moroze pri la rapide degelanta, eble jam eĉ tute malfrosta, trijara provizo de pano neanstataŭigebla. La per spektivo de panmanĝa orgio ne konsolis lin – kie li trovus kvardek aŭ kvindek gastojn, kiuj volus manĝi panon kaj fromaĝon en ĉi tiu pluvo en malluma, malvarma domo? La Jaguaro estis senmova ĉe trafi klumo, kiam li vidis vicon de malriĉegaj geviroj premantaj sin al muro de konstruaĵo, dum ili atendis la malfermiĝon de la pordo por ricevi tagmanĝon senpagan ĉe la san-franciska evangelia misiejo.

La pluvo haltis jam dum frua posttagmezo, sed ankoraŭ forta vento blovis. La konjekto plej nuna estis, ke ripariĝo de la elektroprovizo ne okazos antaŭ noktomezo plej frue. La ŝoforo kaj la servistino ŝar ĝis la kofrujon de la Jaguaro per la pano. Ili ne zorgis involvi la cent kvindek-kelkajn pecojn en malseketajn mantukojn; la pano ja estis preskaŭ senfrosta eĉ antaŭ ol ili forveturis, tiel ke ĝi estos certe komplete manĝebla, kiam ili atingos la misiejon.

La ŝoforo strange silentis dum lia pasaĝero aludis al Kristo kaj Lia miraklo de la panoj; li eĉ ne povis eligi el si ridon responde al la fanfaronado de sia dunganto, ke la pano de Alessandro verŝajne gustas pli bone ol la Lia. La psomofilo tiom enamiĝis al la biblia analogio, ke li neniom pripensis la impreson, kiun lia alveno en Jaguaro faros al la homoj de la mizerstrato. Male, la ŝoforo pensis pri nenio alia. Liaj plej malbonaj timoj praviĝis, kiam la aŭtomobilo haltis ĉe la transformita butikantaŭo, kaj li vidis la teditan surprizon, mikse kun malamikeco, en la okuloj de la homoj atendantaj la malfermiĝon de la manĝejo. Krom la supkuireja klientaro ĉeestis vagabondoj laŭlonge de la tuta strataĉo. Granda parto de tiuj estis nigruloj, pli societemaj ol la homoj en la atendovico. Multaj fumis, kaj du grandaj nigruloj trinkis bieron. Ĉiuj fi ksergardis kaj ridis, kiam kaj la alta viro en kamelhara mantelo kaj

la ŝoforo en uniformo plenigis siajn brakojn per pluraj blankaj paperpakoj. La viroj direktiĝis tra la amaso al la antaŭpordo, kie ili estis blokitaj de preskaŭ sendenta oldulo en kadukaj vestoj. “Ili ne mal fermas antaŭ la kvina” li diris sen moviĝo. La ŝoforo rigardis zorgo plene al sia dunganto, kies subita senpoveco impresis tute nekarakteriza.

“Pardonu min, bonvolu” la psomofilo murmuris dum li penis al gliti la pordon preter la oldulo. Nur tiam li konstatis, ke pro la pano en la manoj, liaj piedoj estas la solaj pordofrapiloj disponeblaj. Kel kaj fajnaj frapetoj venigis neniun respondon. Perdinte sian tutan paciencon, la ŝoforo puŝiĝis preter la oldulo kaj piedbatis ripete la pordon, ĝis maldika junulo en ĝinzo kaj griza kitelo malfermis ĝin iomete. “Kio diable...” li ekdiris, sed ĉesis abrupte, kiam du sakoj estis truditaj al li.

“Prenu tiujn kaj enlasu nin.” La komanda akreco de tiuj vortoj sufiĉis por allasi la virojn, post kiuj la pordo estis ĵetfermata antaŭ ol la puŝanta amaso povus sekvi.

Daŭris tiom, ĝis la donaco estis aprobita de la kuirejestro kaj la unua pakopleno malfermita, ke la ŝoforo jam ŝvitis abunde; eĉ ĉe lia dunganto montriĝis globetoj de humido sur la frunto. Kiam ili forlasis la manĝejon por preni duan ŝarĝon, akompanataj de la junulo, kiu malfermis la pordon, ili trovis scenon el fi Imo pri postmilito.

La du nigruloj kun siaj bieroj malstreĉis sin sur la dekliva kapoto de la Jaguaro, kvazaŭ ĝi estus parkbenko. Aliaj apogis sin al la glacoj kaj pordoj de la aŭto – homa glubildo sur verda fono. Kvar homoj, inter kiuj drogulino en ŝirita, ruĝa skjako kaj purpura, lana ĉapo, estis fi kuŝanta sur la kofrokapoto de la aŭto – la malantaŭa glaco servis por ŝi kiel kapkuseno. Sed al la ŝoforo mankis tempo salti sur tiujn eksterajn pasaĝerojn, ĉar manmovo de la junulo dispelis buntan bandon, post kio la psomofilo glitis en la aŭton kaj rapide ŝlosis la pordon.

La ŝoforo kaj la misieja laboranto transportis duan ŝarĝon da pano en la evangelian misiejon. Ili estis kunmetontaj la trian ŝarĝon, kiam oni malŝlosis la misiejan pordon. Tuj la amaso ĉirkaŭ la Jaguaro mal densiĝis, ĉar la vico de atendantoj puŝis sin en la manĝejon. Nur la du biertrinkantoj kaj kelkaj fumantoj, ŝajne ne kutimaj klientoj ĉe la supkuirejo, restis apud la aŭto. Kaj por la unua fojo la okupanto de la aŭtomobilo sentis iom da trankviliĝo. Lia sola deziro nun estis, ke la ŝoforo reaperu, por ke ili povu forlasi ĉi tiun ĉirkaŭaĵon plej malgalilean. Tamen la homo, kiu elimpetis el la manĝejo, ne estis la ŝoforo. La oldulo, kiu antaŭe blokis al ili la vojon, komencis frapegi brue per la pugnoj sur la glaco de la aŭto. Kiam la psomofilo rigardis lin mirigite, li rimarkis sangon fl ueti el la malfermita buŝo de la mal junulo. Li rekonis, inter liaj dikfi ngro kaj montrofi ngro, denton. Nur tiam la ondo de blasfemoj, kiu atingis lin tra la protekta ŝelo de lia Jaguaro, iĝis sencohava: la maljuna viro rompis la denton sur la malmola krusto de la specialaĵo de Alessandro. Probable ĝi estis iom pli malmola ol ordinare, ĉar senfrostigita ne laŭ la reguloj, sed ne tro malmola por la dentoj de loĝanto el Hilsborough, kiu vizitas dentiston dufoje jare. Subite li komprenis, ke tio, kion li adoris pri tiu pano – la krusto fortika, la gusto neordinara kaj la aromo – povus pensigi neiniciton, konantan nur mole blankan panon kartonan, pri ia ŝimado.

La maljunulo ĵetis sian denton kontraŭ la glacon; kiam ĝi trafi s la vitron, aŭdiĝis pik-sono eta, tamen eĉ tiel klare koler-sona. Poste li rerapidis al la manĝejo. La du bierdrinkantoj sur la kapoto de la Jaguaro ĉesis ridi. Por la unua fojo ili montris ian intereson al unu el la klientoj de la supkuirejo. Denove la pordo de la manĝejo malfermiĝis perforte. Amaseto, estrata de la oldulo kun pecoj de Alessandro pano en ambaŭ manoj, sturmis la Jaguaron kaj ekbombardis ĝin per panĵetaĵoj. La batbruoj eĥis laŭlonge de la strato. La bierdrinkantoj desaltis de la kapoto, lasinte siajn bierujojn sur ĝi. La virino en la ruĝa skijako levis unu el la netranĉitaj panbuloj kaj ĵetis ĝin al la aŭtopordo, kio igis la viron interne klini sin instinkte. Kaj nun la bierdrinkantoj decidis fari el la fi asko ian sporton. Unu el la du reprenis la rondan panbulon el la stratdefl uilo kaj ĵetis ĝin al sia kunulo, kiu reprenis sian sidlokon sur la kapoto, kiam

la komenca bombardado malrapidiĝis pro manko de municio. Ridante, la du viroj ĵetadis sian panpilkon tien-reen, tien-reen.

La sceno daŭris nur unu aŭ du minutojn. Ĝuste kiam la unua ondo de atakantoj komencis sian retiriĝon al la manĝejo, la ŝoforo puŝis sin tra la amaso, malŝlosis rapide la aŭton kaj startigis la motoron. Li premis la hupilon plurfoje, sed la komanda sono ne imponis la pilkludanton sur la kapoto. Metante la panbulon inter la kruroj, li klinis sin antaŭen por fronti la ŝoforon tra la antaŭa glaco. "Veturu plu, James!" li ordonis, sed estis neprobable, ke la veturiganto aŭdis tion. Tio, kion li ja aŭdis, estis la posta grunto kolera de malantaŭe: "Damne, Lester, moviĝu, ek!" Tio estis la unua fojo dum iliaj dek unu jaroj kune, ke la viro sakris al sia ŝoforo.

Dum la Jaguaro elrampis el sia parkloko, la nigrulo sur la kapoto ĝoj kriis ravite, levante alten sian pantrofeon. Dekoj da piedirantoj turnis sin tien; infanoj en pasanta lernejbuso kriegis pro plezuro je la spektaklo. Post ne pli ol kvindek jardoj la Jaguaro haltis ĉe ruĝa lumo, kaj la homa kapot-ornamaĵo desaltis. Kun elegante ceda gesto li ĵetis alten la panbulon. Ĝi trafi s la kapoton de la Jaguaro kun laŭta, obtuza bato, antaŭ ol ruliĝi en la mezon de la trafi kfl uo en la strato Howard. Antaŭ la okuloj de la pasaĝero kaj la ŝoforo, la panbulon platigis pasanta kamiono.

La Jaguaro impetis antaŭen tuj kiam la trafi klumo signalis verdon. Nur tiam la pasaĝero rimarkis la sakojn da pano restintajn apud la ŝoforŝego, tiujn kiuj ne estis prenitaj en la supkuirejon. Subita ondo de naŭzo englutis lin; klare li ne povos tuŝi la lastajn, multvalorajn pankrustojn de Alessandro. Eĉ estis imageble, ke neniam plu la psomofilo volus manĝi panon.

La Loterio

Shirley Jackson

Tradukita el la angla de Barry Friedman

La mateno de la 27-a de junio estis klara kaj suna, kun la freŝa varmo de plensomera tago; la floroj abunde floris kaj la herbo estis riĉe verda. La homoj de la vilaĝo komencis kolektiĝi en la placo, inter la poŝtoŝtelo kaj la banko, ĉirkaŭ la deka horo; en kelkaj urbetoj estis tiom da homoj, ke la loterio daŭris du tagojn kaj devis komenciĝi la 26-an de junio, sed en ĉi tiu vilaĝo, kie estis nur ĉirkaŭ tricent homoj, la tuta loterio daŭris nur ĉirkaŭ du horojn, do ĝi povas komenciĝi je la deka horo matene kaj povas esti finita ĝustatempe por permesi al la vilaĝanoj reveni hejmen por la tagmeza manĝo.

La infanoj unue kunvenis, kompreneble. La lernejo estis lastatempe finita por la somero, kaj la sento de libereco sidis maltrankvile sur la plimulto el ili; ili emis kunveni trankvile dum kelka tempo antaŭ ol ekis bruegaj ludoj, kaj ilia babilado estis ankoraŭ pri la klasĉambro kaj la geinstruistoj, pri libroj kaj riproĉoj. Bobby Martin jam plenigis siajn poŝojn je ŝtonoj, kaj la aliaj knaboj baldaŭ sekvis lian ekzemplon, elektante la plej glatajn kaj rondajn ŝtonojn; Bobby kaj Harry Jones kaj Dickie Delacroix — la vilaĝanoj prononcis ĉi tiun nomon “Dellacroy” — post iom da tempo faris grandan amason da ŝtonoj en unu angulo de la placo kaj gardis ĝin kontraŭ la invadoj de la aliaj knaboj. La knabinoj staris flanken, parolante inter si, rigardante trans la ŝultroj la knabojn, kaj la tre malgrandaj infanoj ruliĝis en la polvo aŭ kroĉiĝis al la manoj de siaj pli aĝaj fratoj aŭ fratinoj.

Baldaŭ la viroj komencis kolektiĝi, pririgardante siajn proprajn infanojn, parolante pri plantado kaj pluvo, traktoroj kaj impostoj. Ili staris kune, for de la amaso da ŝtonoj en la angulo, kaj iliaj ŝercoj estis kvietaj kaj ili ridetis prefere ol ridis. La virinoj, surportantaj

paliĝintajn domrobojn kaj sveterojn, venis baldaŭ post iliaj viroj. Ili salutis unu la alian kaj interŝanĝis pecetojn da klaĉo dum ili iris aliĝi al siaj edzoj. Baldaŭ la virinoj, starantaj apud siaj edzoj, komencis voki al siaj infanoj, kaj la infanoj venis kontraŭvole, devante esti vokita kvar aŭ kvin fojojn. Bobby Martin eksubiĝis sub la kaptantan manon de sia patrino kaj kuris, ridante, reen al la amaso da ŝtonoj. Lia patro akre parolis, kaj Bobby venis rapide kaj prenis sian lokon inter lia patro kaj lia plej maljuna frato.

La loterio estis gvidita - kiel estis la kvadratdancoj, la adoleska klubo, la Halovenprogramo - de S-ro Summers, kiu havis tempon kaj energion por dediĉi sin al civitanaj aktivadoj. Li estis rondvizaĝa, gaja viro kaj li administris la karbkomercon, kaj homoj sentis kompaton al li, ĉar li ne havis infanojn kaj lia edzino estis skoldulino. Kiam li alvenis sur la placon, portante la nigran lignan skatolon, aŭdiĝis murmuro de konversacio inter la vilaĝanoj, kaj li mansvingis kaj vokis, "Hodiaŭ iom malfrue, homoj." La poŝtestro, S-ro Graves, sekvis lin, portante trikruran tabureton, kaj la tabureto estis metita en la centron de la placo kaj S-ro Summers metis sur ĝin la nigran skatolon. La vilaĝanoj retropaŝis, lasante interspacon inter si kaj la tabureto kaj kiam S-ro Summers diris, "Ĉu kelkaj el vi uloj volas helpi mi?" estis hezito antaŭ du viroj, S-ro Martin kaj lia plej maljuna filo, Baxter, venis antaŭen por teni la skatolo fikse sur la tabureto dum S-ro Summers kirlis la paperojn ene de ĝi.

La origina ekipaĵo por la loterio estis perdita antaŭ longe, kaj la nigra skatolo, kiu nun estas sur la tabureto, estis uzata eĉ antaŭ ol Maljunulo Warner, la plej maljuna viro en la urbo, naskiĝis. S-ro Summers ofte parolis al la vilaĝanoj pri farado de nova skatolo, sed neniu ŝatis interrompi eĉ la tradicio, tiu estis reprezentita per la nigra skatolo. Estis rakonto, ke la nuna skatolo estis farita uzanta kelkajn pecojn de la skatolo kiu antaŭis ĝin, tiu kiu estis konstruita kiam la unua homoj ekloĝis por fari vilaĝon ĉi tie. Ĉiujare, post la loterio, S-ro Summers komencis paroli denove pri nova skatolo, sed ĉiujare la temo forvelkis sen io ajn farita. La nigra skatolo iĝis pli eluzita ĉiujare; ĝi jam ne estis tute nigra sed estis splitiĝinta malbone laŭ

unu flanko montri la originan lignokoloron, kaj kelkloke estis paliĝinta aŭ makulita.

S-ro Martin kaj lia plej maljuna filo, Baxter, tenis la nigran skatolon sekure sur la tabureto ĝis S-ro Summers plene kirlis la paperojn per sia mano. Ĉar tiom da la rito estis forgesita aŭ forĵetita, S-ro Summers sukcesis havi paperpecetojn anstataŭi la lignopecetojn, kiuj estis uzataj dum generacioj. Lignopecetoj, S-ro Summers argumentis, estis tre bonaj kiam la vilaĝo estis eta, sed nun kiam la loĝantaro estis pli ol tricent kaj verŝajne daŭrigos kreski, estas necese uzi ion, kio pli facile kongruus en la nigran skatolon. Dum la nokto antaŭ la loterio, S-roj Summers kaj Graves estigis la paperetojn kaj metis ilin en la skatolon, kaj poste ĝi estis forprenita al la monŝranko de la karbokompanio de S-ro Summers kaj enŝlosita ĝis S-ro Summers estis preta preni ĝin al la placo la sekvantan matenon. Dum la resto de la jaro, la skatolo estis formetita, foje unu loko, foje alia; ĝi pasigis unu jaron en la garbejo de S-ro Graves kaj alian jaron subpiede en la poŝtoŝtupo, kaj iufoje ĝi estis metita sur breton en la nutraĵvendejo de S-ro Martin kaj lasita tie.

Estis multe da tumulto fari antaŭ ol S-ro Summers deklaris la loterion malfermita. Estis la listoj krei -- de estroj de familioj, estroj de hejmoj en ĉiu familio, membroj de ĉiu domanaro en ĉiu familio. Okazis la ĝusta ĵuro de S-ro Summers fare de la poŝtestro, kiel la oficisto de la loterio; antaŭe, iuj homoj memoris, estis iuspeca recitalo, prezentita de la oficisto de la loterio, deviga, senmelodia ĉanto kiu estis laŭregule deklamis monotone ĉiujare; iuj homoj kredis ke la oficisto de la loterio kutimis stari ĝuste tiel kiam li diris aŭ kantis ĝin, aliaj kredis, ke li devis marŝi inter la homoj, sed antaŭ jaroj kaj jaroj ĉi tiu parto de la rito estis permesita pasi. Estis ankaŭ rita saluto, kiun la oficisto de la loterio devis uzi por alparoli ĉiun personon, kiu venis por loti el la skatolo, sed ĉi tio ankaŭ ŝanĝiĝis dum tempo, ĝis nun estas necese nur ke la oficisto parolu al ĉiu proksimiĝanta persono. S-ro Someroj estis tre bona pri ĉio ĉi; en sia pura blanka ĉemizo kaj blua ĝinzo, kun unu mano ripozanta senzorge sur la nigra skatolo, li ŝajnis tre taŭga kaj grava dum li senfine parolis kun S-ro Graves kaj la Martinoj.

Ĝuste kiam S-ro Summers finfine ĉesis paroli kaj turnis sin al la kunvenintaj vilaĝanoj, venis S-ino Hutchinson haste laŭ la pado al la placo, ŝia svetero ĵetita sur ŝiajn ŝultrojn, kaj glitis en lokon en la malantaŭo de la homamaso. "Mi tute forgesis, kiu tago estis," ŝi diris al S-ino Delacroix, kiu staris apud ŝi, kaj ili ambaŭ mallaŭte ridis. "Mi pensis ke mia edzo estas malantaŭ la domo, stakiganta lignon," S-ino Hutchinson daŭrigis, "kaj tiam mi rigardis tra la fenestro kaj la infanoj estis for, kaj tiam mi memoris, ke estis la dudek- sepa kaj mi venis kurante." Ŝi sekigis la manojn sur sia antaŭtuko, kaj S-ino Delacroix diris: "Vi venis ĝustatempe tamen. Ili ankoraŭ paroladas tie supre."

S-ino Hutchinson streĉis sian kolon por vidi tra la homamaso kaj trovis siajn edzon kaj infanojn starantajn proksime de la fronto. Ŝi frapetis la brakon de S-ino Delacroix kiel adiaŭo kaj komencis trairi la homamaso. La homoj disiĝis bonhumore por lasi ŝin trairi: du aŭ tri homoj diris, en voĉoj nur sufiĉe laŭta por esti aŭdita trans la homamaso, "Jen venas via fraŭlino, Hutchinson," kaj "Bill, ŝi alvenis ĉi tie finfine." S-ino Hutchinson atingis sian edzon, kaj S-ino Summers, kiu atendis, diris gaje, "Mi pensis, ke ni devos procedi sen vi, Tessie." S-ino Hutchinson diris, ridetante, "Ĉu vi ne volas, ke mi lasu miajn pladojn en la lavujo, ĉu, Joe?," kaj milda ridado kuris tra la homamaso dum la homoj removiĝis en pozicion post la alveno de S-ino Hutchinson.

"Nu, nun," S-ino Summers diris sobre, "Mi kredas, ke ni komencu por fini ĉi tion, por ke ni povas denove labori. Ĉu iu ne estas ĉi tie?"

"Dunbar," diris pluraj homoj. "Dunbar, Dunbar."

S-ro Summers konsultis sian liston. "Clyde Dunbar," li diris. "Ĝuste. Li rompis sian kruron, ĉu ne? Kiu lotas por li?"

"Mi, mi supozas," diris virino. kaj S-ro Summers turnis sin por rigardi ŝin. "Edzino lotas por sia edzo," S-ro Summers diris. "Ĉu vi ne havas plenkreskan knabon fari ĝin por vi, Janey?" Kvankam S-ro Summers kaj ĉiuj aliaj en la vilaĝo sciis la respondon perfekte bone, estis la afero de la oficisto de la loterio demandi tiajn demandojn

formale. S-ro Summers atendis kun esprimo de ĝentila intereso dum S-ino Dunbar respondis.

"Horaco havas nur dek ses jarojn," S-ino Dunbar diris bedaŭrinde. "Mi supozas, ke mi devas anstataŭi mian edzon ĉi-jare."

"Ĝuste," S-ro Summers diris. Li faris noton sur la listo, kiun li tenis. Tiam li demandis, "Ĉu la Vatson-knabo lotas ĉi-jare?"

Alta knabo en la homamaso levis la manon. "Jen," li diris. "Mi lotas por mia patrino kaj mi." Li palpebrumis la okulojn nerveze kaj klinis la kapon dum pluraj voĉoj en la homamaso diris rimarkojn kiel "Bona ulo, Jack," kaj "Mi ĝojas vidi, ke via patrino havas viron fari ĝin."

"Nu," diris S-ro Summers, "Mi supozas, ke tio estas ĉiuj. Ĉu Maljunulo Warner estas ĉi tie?"

"Jen," voĉo diris, kaj S-ro Summers kapjesis.

Subita silento falis sur la homamason, kiam S-ro Summers klarigis sian gorĝon kaj rigardis la liston. "Ĉu ĉio estas preta?" li ekkriis. "Nun, mi legos la nomojn — unue la estroj de familioj — kaj la viroj venu ĉi tien kaj elprenu paperon el la skatolo. Tenu la paperon faldita en via mano sen rigardi ĝin ĝis ĉiuj havas turnon. Ĉu ĉio estas klara?"

La homoj jam faris tion tiom da fojoj, ke ili nur duone aŭskultis la instrukciojn: la plimulto estis trankvila, malsekigante siajn lipojn, ne ĉirkaŭrigardante. Tiam S-ro Summers levis unu manon alte kaj diris, "Adams." Viro malaperis de la homamaso kaj venis antaŭen. "Saluton, Steve," S-ro Summers diris, kaj S-ro Adams diris, "Saluton, Joe." Ili grimacis unu al la alia senhumore kaj nerveze. Tiam S-ro Adams atingis en la nigran skatolon kaj elprenis falditan paperon. Li firme tenis ĝin ĉe unu angulo dum li turniĝis kaj haste revenis al sia loko en la homamaso, kie li staris iom aparte de sia familio, ne rigardante malsupren lian manon.

"Allen," S-ro Summers diris. "Anderson Bentham."

"Ŝajnas, ke tute ne estas tempo inter loterioj plu," S-ino Delacroix diris al S-ino Graves en la malantaŭa vico. "Ŝajnas, ke ni havis la lastan nur pasintsemajne."

"La tempo certe pasas rapide," S-ino Graves diris.

"ClarkDelacroix."

"Jen mia maljunulo," diris S-ino Delacroix. Ŝi retenis la spiron dum ŝia edzo iris antaŭen.

"Dunbar," diris S-ro Summers, kaj S-ino Dunbar iris neŝanĝiĝeme al la skatolo dum unu el la virinoj diris, "Daŭrigu, Janey," kaj alia diris, "Jen, ŝi iras."

"Ni sekvas," S-ino Graves diris. Ŝi rigardis dum S-ro Graves ĉirkaŭiris de la flanko de la skatolo, grave salutis S-ron Summers kaj elektis papereton el la skatolo. Ĝis nun, tra la tuta homamaso estis viroj tenantaj la malgrandajn falditajn paperojn en sia granda mano, nervoze turnante ilin ree kaj ree. Sinjorino Dunbar kaj ŝiaj du filoj staris kune, S-ino Dunbar tenante la papereton.

"Harburt Hutchinson."

"Suprenu tien, Vilĉjo," diris S-ino Hutchinson, kaj la homoj apud ŝi ridis.

"Jones."

"Ili ja diras," S-ro Adams diris al Maljunulo Warner, kiu staris apud li, "ke en la nordo vilaĝo oni parolas pri rezigni la loterion."

Maljunulo Warner snufis. "Aro da frenezaj malsaĝuloj," li diris. "Aŭskultante la junulojn, nenio estas sufiĉe bona por ili. La sekva afero, kiun vi lernos, estos, ke ili volos denove vivi en kavernoj, neniu laboru pli, kaj ni ĉiuj vivu laŭ tia maniero dum kelka tempo. Antaŭe estis diro pri 'Loterio en junio, maizo estos abunda baldaŭ.' Kaj

en mallonga tempo ni ĉiuj manĝus stufitajn cikidojn kaj glanojn. Ĉiam okazis loterio," li aldonis malbonhumore. "Estas sufiĉe malbone vidi junan Joe Summers tie supre ŝercante kun ĉiuj."

"Kelkaj lokoj jam forlasis loteriojn," S-ino Adams diris.

"Nenio krom problemoj je tio," diris Maljunulo Warner forte. "Aro da junaj malsaĝuloj."

"Martin." Kaj Bobby Martin rigardis sian patron iri antaŭen. "Overdyke Percy."

"Mi deziras, ke ili rapidus," diris S-ino Dunbar al sia pli maljuna filo. "Mi deziras, ke ili rapidus."

"Ili preskaŭ finiĝis," diris ŝia filo.

"Vi pretiĝas kuri diri al paĉjo," diris S-ino Dunbar.

S-ro Summers laŭtigis sian propran nomon kaj poste precize paŝis antaŭen kaj elektis slipon el la skatolo. Tiam li vokis, "Warner."

"Ĉi tio estas la sepdek-sepa jaro, ke mi estas en la loterio," diris Maljunulo Warner dum li trairis la homamason. "La sepdek-sepa fojo."

"Watson." La alta knabo venis malgracie tra la homamaso. Iu diris: "Ne estu nervoza, Joĉjo," kaj S-ro Summers diris, "Prenu la necesan tempon, filo."

"Zanini."

Post tio, estis longa paŭzo, senspira paŭzo, ĝis S-ro Summers. tenante sian papereton en la aero, diris: "Bone, uloj." Dum minuto, neniu moviĝis, kaj tiam ĉiuj paperetoj estis malfermitaj. Subite, ĉiuj virinoj ekparolis samtempe, dirante, "Kiu ĝi estas?", "Kiu havas ĝin?", "Ĉu ĝi estas la Dunbar-oj?", "Ĉu ĝi estas la Watson-oj?" Tiam la voĉoj komencis diri, "Estas Hutchinson. Estas Bill," "Bill Hutchinson havas ĝin."

"Iru diri al via patro," diris S-ino Dunbar al sia pli maljuna filo.

Homoj komencis ĉirkaŭrigardi por vidi la Hutchinson-oj. Bill Hutchinson staris kviete, fiksrigardante la paperon en sia mano. Subite, Tessie Hutchinson kriis al S-ro Summers, "Vi ne donis al li tempon sufiĉe por preni ajnan paperon, kiun li volis. Mi vidis vin. Ne estis juste!"

"Estu bona sportuloin, Tessie," Delacroix vokis, kaj S-ino Graves diris, "Ni ĉiuj prenis la saman ŝancon."

"Silentu, Tessie," diris Bill Hutchinson.

"Nu, ĉiuj," diris S-ro Summers, "tio estis farita sufiĉe rapide, kaj nun ni devas iom rapidi pli por finiĝi ĝustatempe." Li konsultis sian sekvan liston. "Bill," li diris, "vi lotas por la familio Hutchinson. Ĉu vi havas aliajn domanarojn en la Hutchinson-oj?"

"Estas Don kaj Eva," kriis S-ino Hutchinson. "Igu ilin preni sian ŝancon!"

"Filinoj lotas kun la familioj de siaj edzoj, Tessie," diris S-ro Summers milde. "Vi scias tion kiel bone kiel iu ajn alia."

"Ne estis juste," diris Tessie.

"Mi supozas ke ne, Joe." Bill Hutchinson diris bedaŭrinde. "Mia filino lotas kun la familio de sia edzo; tio estas ja justa. Kaj mi havas neniun alian familion krom la infanoj."

"Do, koncerne lotadon por familioj, tio estas vi," S-ro Summers diris klarigante, "kaj koncerne lotadon por domanaroj, tio estas vi ankaŭ. Ĉu ne?"

"Ĝuste," diris Bill Hutchinson.

"Kiom da infanoj, Bill?" S-ro Summers demandis formale.

"Tri," diris Bill Hutchinson. "Estas Bill pli juna, kaj Nancy, kaj malgranda Dave. Kaj Tessie kaj mi."

"Bone do," diris S-ro Summers. "Harry, ĉu vi ricevis iliajn biletojn reen?"

S-ro Graves kapjesis kaj levis la paperetojn. "Metu ilin en la skatolon, do," S-ro Summers direktis. "Prenu tiun de Bill kaj enmetu ĝin."

"Mi pensas, ke ni devu rekomenci," diris S-ino Hutchinson, kiel eble plej trankvile. "Mi diras al vi, ke ĝi ne estis justa. Vi ne donis al li sufiĉe da tempo por elekti. Ĉiuj vidis tion."

S-ro Graves elektis la kvin slipojn kaj metis ilin en la skatolon, kaj li faligis ĉiujn paperojn krom tiuj sur la teron, kie la venteto kaptis ilin kaj forlevis ilin.

"Aŭskultu, ĉiuj," diris S-ino Hutchinson al la homoj ĉirkaŭ si.

"Ĉu vi estas preta, Bill?" demandis S-ro Summers, kaj Bill Hutchinson, kun unu rapida rigardeto ĉirkaŭe al sia edzino kaj infanoj, kapjesis.

"Memoru," diris S-ro Summers, "prenu la slipojn kaj tenu ilin falditaj ĝis ĉiu persono prenis unu. Harry, vi helpu al la malgranda Dave." S-ro Graves prenis la manon de la knabeto, kiu volonte venis kun li supren al la skatolo. "Prenu paperon el la skatolo, Davy," S-ro Summers diris. Davy metis sian manon en la skatolon kaj ridis. "Prenu nur unu paperon" S-ro Summers diris. "Harry, vi tenu ĝin por li." S-ro Graves prenis la mano de infano kaj forigis la falditan paperon de la streĉa pugno kaj tenis ĝin dum la malgranda Dave staris apud li kaj rigardis supren al li mirinde.

"Nancy poste," diris S-ro Summers. Nancy havis dek du jarojn, kaj ŝiaj lernejoj amikoj spiris peze dum ŝi iris antaŭen ĝustigante sian jupon, kaj delikate prenis slipon el la skatolo "Bill pli juna," S-ro Summers diris, kaj Billy, lia vizaĝo ruĝa kaj liaj piedoj tro grandaj,

preskaŭ renversis la skatolon dum li elprenis paperon. "Tessie," S-ro Someroj diris. Ŝi hezitis dum minuto, defie ĉirkaŭrigardante, kaj poste metis siajn lipojn kaj supreniris al la skatolo. Ŝi elprenis rapide paperon kaj tenis ĝin malantaŭ si.

"Bill," diris S-ro Summers, kaj Bill Hutchinson etendis la manon en la skatolon kaj palpis ĉirkaŭe, kaj fine elprenante sian manon kun la paperpeceto en ĝi.

La homamaso estis kvieta. Knabino flustris, "Mi esperas, ke ne estas Nancy," kaj la sono de la flustro atingis la randoj de la homamaso.

"Ne estas tia, kia ĝi antaŭe estis," Maljunulo Warner diris klare. "Homoj ne estas kiel ili antaŭe estis."

"Bone," diris S-ro Summers. "Malfermu la paperojn. Harry, vi malfermu tiun de eta Dave."

S-ro Graves malfermis la papereton kaj estis ĝenerala suspiro tra la homamaso dum li tenis ĝin supren kaj ĉiuj povis vidi, ke ĝi estas malplena. Nancy kaj Bill pli juna malfermis siajn paperetojn samtempe, kaj ambaŭ ekradiis kaj ridis, turnante sin al la homamaso kaj tenante iliajn paperetojn super siaj kapoj.

"Tessie," diris S-ro Summers. Estis paŭzo, kaj tiam S-ro Summers rigardis Bill Hutchinson, kaj Bill disfaldis sian paperon kaj montris ĝin. Ĝi estis blanka.

"Ĝi estas Tessie," diris S-ro Summers, kaj lia voĉo estis mallaŭta. "Montru al ni ŝian paperon, Bill."

Bill Hutchinson iris al sia edzino kaj devigis la papereton el ŝia mano. Ĝi havis nigran makulon ĝin, la nigran makulon, kiun S-ro Summers faris la antauxan nokton per la peza krajono en la karb-kompania oficejo. Bill Hutchinson tenis ĝin supren, kaj estis tumulto en la homamaso.

"Bone, homoj," S-ro Summers diris. "Ni finu rapide."

Kvankam la vilaĝanoj forgesis la riton kaj perdis la originan nigran skatolon, ili ankoraŭ memoris uzi ŝtonojn. La ŝtonamaso, kiun la knaboj faris pli frue, estis preta; estis ŝtonoj sur la tero kun la moviĝantaj pecetoj da papero, kiuj elvenis el la skatolo. S-ino Delacroix elektis ŝtonon tiel grandan ke ŝi devis prenu ĝin per ambaŭ manoj kaj turnis sin al S-ino Dunbar. "Venu," ŝi diris. "Rapidu."

S-ino Dunbar havis malgrandajn ŝtonojn en ambaŭ manoj, kaj ŝi diris, spiregante, "Mi tute ne povas kuri. Vi devos antaŭiri kaj mi atingos vin."

La infanoj jam havis ŝtonojn, kaj iu donis al la malgranda Davy Hutchinson kelkajn ŝtonetojn.

Tessie Hutchinson jam estis en la centro de senbara spaco, kaj ŝi etendis siajn manojn senespereme dum la vilaĝanoj transloĝiĝis al ŝi. "Ne estas juste," ŝi diris. Ŝtono trafis ŝin je la flanko de la kapo.

Maljunulo Warner estis diranta, "Venu, venu, ĉiuj." Steve Adams estis en la fronto de la homamaso de vilaĝanoj, kun S-ino Graves apud li.

"Ne estas juste, ne estas ĝuste," kriegis S-ino Hutchinson, kaj tiam ili estis sur ŝi.

La Trailor-Murda Mistero

Abraham Lincoln

Tradukita el la angla de Barry Friedman

En la jaro 1841, loĝis, en diversaj lokoj de la ŝtato Ilinojso, tri fratoj nomataj Trailor. Iliaj baptonomoj estis Vilhelmo, Henriko kaj Arĉibaldo. Arĉibaldo loĝis en Springfield, tiam kiel nun la sidejo de registaro de la ŝtato. Li estis sobra, modesta, kaj laborema viro, havis ĉirkaŭ tridekjarajn jarojn; ĉarpentisto laŭ profesio, kaj fraŭlo, loĝanta kun sia komerca partnero - sinjoro Myers. Henriko, unu-du jarojn pli aĝa, estis viro kun similaj modestaj kaj laboremaj kutimoj; havis familion, kaj loĝis kun ĝi en bieno, ĉe Clary's Grove, ĉirkaŭ dudek mejlojn malproksima de Springfield en nordokcidenta direkto. - Vilhelmo, ankoraŭ pli maljuna, kaj kun similaj kutimoj, loĝis en bieno en la gubernio Warren, malproksima de Springfield iom pli ol cent mejlojn en la sama nordokcidenta direkto. Li estis vidvo, kun pluraj infanoj.

En la ĉirkaŭaĵo de la loĝejo de Vilhelmo, estis, kaj estis dum kelkaj jaroj, viro nomata Fiŝero, iom pli aĝa ol kvindek jaroj; ne havis familion, kaj ne konstantan hejmon; sed kiu loĝis iom ĉi tie kaj iom tie, kun homoj por kiuj li iomete laboris. Liaj kutimoj estis rimarkinde ekonomiaj, tiel ke oni havis la impreson, ke li amasigis konsiderindan monon.

En la lasta parto de majo, en la menciita jaro, Vilhelmo decidis viziti siajn fratojn ĉe Clary's Grove kaj Springfield; kaj Fiŝero, tiutempe havante sian provizoran loĝejon ĉe lia domo, decidis akompani lin. Ili ekiris kune en kaleŝo kun ununura ĉevalo. Dimanĉe vespere ili atingis la loĝejon de Henriko, kaj tranoktis. Lunde matene, estante la unua lundo de junio, ili ekiris al Springfield, Henriko akompanante ilin ĉevale. Ili atingis la urbon ĉirkaŭ tagmezo,

renkontis Arĉibaldo, iris kun li al lia pensiono, kaj tie ekloĝis por la tempo, kiam ili devus resti.

Post la vespermanĝo, la tri Traylor-oj kaj Fiŝero forlasis la pensionon kune, kun la konfesita celo pasigi la vesperon kune ĉirkaŭrigardante la urbon. Ĉe la vespermanĝo, la Traylor-oj ĉiuj revenis, sed Fiŝero mankis, kaj iu enketo estis farita pri li. Post la vespermanĝo, la Traylor-oj eliris eksplicite serĉi lin. Ili revenis unu post la alia, la lasta envenis post malfrua teotempo, kaj ĉiu deklaris, ke li estis nekapabla malkovri ion ajn pri Fiŝero.

La sekvan tagon, ambaŭ antaŭ kaj post matenmanĝo, ili denove serĉis eksplicite, kaj revenis tagmeze, ankoraŭ sensukcese. Vespermanĝante denove, Vilhelmo kaj Henriko esprimis decidon rezigni pri la serĉado, kaj ekiri al siaj hejmoj. Ĉi tio estis kontraŭdirita de iuj el la pensionanoj ĉe la domo, pro la kialo, ke Fiŝero estis ie en la ĉirkaŭaĵo, kaj restus sen iu ajn transporto, ĉar li kaj Vilhelmo venis en la sama kaleŝo. La kontraŭdiro estis ignorita, kaj ili foriris respektive al siaj hejmoj.

Ĝis nun, la scio pri la mistera malapero de Fiŝero disvastiĝis tre malmulte preter la malmultaj pensionanoj ĉe Myers, kaj ekscitis neniun konsiderindan intereson. Post la daŭro de tri aŭ kvar tagoj, Henriko revenis al Springfield, kun la ŝajna celo fari pluan serĉadon de Fiŝero. Usante iujn el la pensionanoj, li, kune kun ili kaj Arĉibaldo, pasigis alian tagon en senefika serĉado, kiam ĝi denove estis forlasita, kaj li revenis hejmen.

Neniu ĝenerala intereso estis ankoraŭ ekscitita.

Vendrede, semajnon post la malapero de Fiŝero, la poŝtestro ĉe Springfield ricevis leteron de la poŝtestro, kiu estis la plej proksima al la loĝejo de Vilhelmo, en la graflando Warren, deklarante, ke Vilhelmo revenis hejmen sen Fisher, kaj diris, sufiĉe fanfaroneme, ke Fiŝero mortis, kaj postlasis al li sian monon, kaj ke li akiris ĉirkaŭ dek kvin cent dolarojn per ĝi. La letero plue diris, ke la rakonto kaj konduto de Vilhelmo ŝajnis strangaj, kaj deziris, ke la

poŝtestro ĉe Springfield konstata kaj skribu tion, kio estas la vero en la afero.

La poŝtestro ĉe Springfield publikigis la leteron, kaj tuj ekscito fariĝis universala kaj intensa. Springfield, tiutempe, havis ĉirkaŭ 3.500 loĝantojn, kun urba registaro. La ĝenerala prokuroro de la ŝtato loĝis tie. Komitato estis tuj formita por elpensi la misteron, kaj por ekagadi, la urbestro de la urbo kaj la ĝenerala prokuroro ekgvidis. Serĉi kaj, se eble, trovi la korpon de la homo supozeble murdita, estis decidita kiel la unua paŝo.

Sekvante tion, viroj formiĝis en grandaj partioj, kaj marŝis flank-al-flanke, en ĉiuj direktoj, por lasi neniun colon da tero en la ĉirkaŭaĵo resti neesplorita. Ekzamenoj estis faritaj el keloj, putoj kaj fosaĵoj de ĉiuj priskriboj, kie oni opiniis ebla, ke la korpo povus esti kaŝita. Ĉiuj freŝaj, aŭ tolereblaj freŝaj tomboj en la tombejo, estis malfermitaj, kaj mortaj ĉevaloj kaj mortaj hundoj estis elteriĝintaj, kie, en iuj kazoj, ili estis entombigitaj apud siaj partiaj mastroj.

Ĉi tiu serĉo, kiel aperis, komenciĝis vendrede. Ĝi daŭris ĝis sabata posttagmezo sen sukceso, kiam estis decidite ekspedi oficirojn aresti Vilhelmon kaj Henrikon, ĉe iliaj loĝejoj, respektive. La oficiroj komencis dimanĉe matene; dume, la serĉado de la korpo estis daŭrigita, kaj onidiroj ekfluis, ke la Trailor-oj pasis, en malsamaj tempoj kaj lokoj, plurajn orajn pecojn, kiuj facile laŭsupoze apartenis al Fiŝero.

Lunde la oficiroj venigis Henrikon, arestinte lin, alvenis kun li. La urbestro kaj ĝenerala prokuroro prenis lin, kaj eklaboris por eltiri malkovron de li. Li neis, kaj neis, kaj persistis nei. Ili ankoraŭ pridemandis lin laŭ ĉiu pensebla maniero, ĝis merkredo, kiam, insistante pri sia propra senkulpeco, li deklaris, ke liaj fratoj, Vilhelmo kaj Arĉibaldo, murdis Fiŝeron; ke ili mortigis lin, sen lia ([Henriko](#)) scio tiutempe, kaj provizore kaŝis lian korpon; ke, tuj antaŭ la foriro de li kaj Vilhelmo de Springfield al hejmo, marde, la tagon post la malapero de Fiŝero, Vilhelmo kaj Arĉibaldo komunikis la fakton al li, kaj uzi lin helpi fari ĉiaman kaŝon de la korpo; ke, tiutempe kiam li kaj Vilhelmo foriris supozeble al hejmo, ili ne vojaĝis sur la vojo

rekte, sed, serpentumante tra la stratoj, eniris la arbaron ĉe la nordokcidenta flanko de la urbo, du aŭ tricent jardojn dekstren de kien la vojo, kiun ili devis vojaĝi, eniris; ke, trapenetri la arbaron kelkajn centojn da jardoj, ili haltis kaj Arĉibaldo venis laŭ malsama vojo, piede, kaj aliĝis al ili; ke Vilhelmo kaj Arĉibaldo postenigis lin (Henriko) sur malnovan kaj neuzitan vojon, kiu estis proksime, kiel gardostaranto, por averti pri la alproksimiĝo de iu entrudiĝinto; ke Vilhelmo kaj Arĉibaldo tiam metis la kaleŝon ĉe la rando de densa arbustarbeto, ĉirkaŭ kvardek jardojn for de lia (Henriko) pozicio, kie, forlasante la kaleŝon, ili eniris la arbetojn, kaj post kelkaj minutoj revenis kun la korpo, kaj metis ĝin en la kaleŝon; ke de sia stacio li povis kaj klare vidis, ke la objekto metita en la kaleŝon estas mortinto, laŭ la ĝenerala aspekto kaj grandeco de Fiŝero; ke Vilhelmo kaj Arĉibaldo tiam foriris kun la kaleŝo direkte al la mueleja lago de Hickox, kaj post foresto de duonhoro, revenis, dirante, ke ili metis lin en sekuran lokon; ke Arĉibaldo tiam revenis al la urbo, kaj li kaj Vilhelmo iris al la vojo kaj direktis sin al siaj hejmoj. Ĉe ĉi tiu revelacio, ĉiu daŭra kredemo rompiĝis, kaj ekscito leviĝis al preskaŭ nepensebla alteco.

Ĝis ĉi tiu tempo, la konata karaktero de Arĉibaldo forpuŝis kaj ĉesigis ĉiujn suspektojn pri li. Ĝis tiam tiuj, kiuj pretis ĵuri, ke murdo okazis, estis preskaŭ same certaj, ke Arĉibaldo ne partoprenis ĝin. Sed nun, li estis kaptita kaj ĵetita en malliberejon; kaj fakte, li ĝojis pri tio pro personaj sekurecaj konsideroj. Kaj nun venis la serĉo por la arbustaro, kaj la serĉo en la mueleja lago. La arbustaro estis trovita, kaj la kaleŝaj spuroj ĉe la punkto indikis. Ĉe punkto ene de la arbustaro, la signoj de lukto estis malkovritaj, kaj linio de tie al la kaleŝaj spuroj estis vidita. Provante sekvi la spuron de la kaleŝo el la arbustaro, la spuro estis trovita procedi al la mueleja lago, sed ne povis esti sekvita la tutan vojon. Ĉe la lago, tamen, oni trovis, ke la kaleŝo estis moviĝinta kaj parte estis metita en la akvorandon.

Centoj kaj centoj okupiĝis pri rastado, fiŝkaptado kaj drenado. Post multe da senfrukta penado tiamaniere, ĵaŭde matene, la mueleja digo estis dehakita, kaj la akvo de la lago parte ĉerpita, kaj la samaj serĉaj procezoj denove okazis.

Ĉirkaŭ tagmezo de ĉi tiu tago, la oficiro alvokis Vilhelmon, revenis, tenante lin en aresto; kaj viro nomanta sin doktoro Gilmore, venis kun ili. Ŝajnas, ke la oficiro arestis Vilhelmon ĉe sia propra domo marde frue, kaj ekiris al Springfield kun li; ke post iom da mallumo, ili atingis Lewiston en la grafujo Fulton, kie ili haltis por la nokto; ke malfrue en la nokto ĉi tiu doktoro Gilmore alvenis, deklarante, ke Fiŝero estis viva ĉe lia domo; kaj ke li sekvis por doni la informojn, por ke Vilhelmo estu liberigita sen pliaj problemoj; ke la oficiro, malfidanta doktoron Gilmore, rifuzis liberigi Vilhelmon, sed venigis lin al Springfield, kaj la doktoro akompanis ilin. Atinginte Springfield, la doktoro reasertis, ke Fiŝero estis viva kaj ĉe lia domo.

Nun la homamaso estis dum mallonga tempo tute konfuziĝis. La rakonto de Gilmore estis komunikita al Henriko Traylor, kiu, sen heziti, reasertis sian propran rakonton pri la murdo de Fiŝero. La fideleco de Henriko al sia propra rakonto estis komunikita al la homamaso, kaj tuj la ideo ekestis, kaj fariĝis ne tute kredita sed preskaŭ tute kredita, ke Gilmore estis kunulo de la Traylor-oj, kaj inventis la rakonton, kiun li rakontis, por certigi ilian liberigon kaj eskapi. Ekscito estis denove ĉe la zenito. Ĉirkaŭ la tria horo de la sama vespero, Myers, la partnero de Arĉibaldo, komencis kun duĉevala kaleŝo, por konstati, ĉu Fiŝero estas viva, kiel diris Gilmore, kaj se jes, por revenigi lin al Springfield kun li.

Verdrede jura ekzameno estis farita antaŭ du juĝistoj, pri la akuzo de murdo kontraŭ Vilhelmo kaj Arĉibaldo. Henriko estis prezentita kiel atestanto fare de la procesigo, kaj sur ĵuro, reasertis siajn deklarojn, kiel ĝis nun detale; kaj, ĉe kies fino, li eltenis ĝisfundan kaj rigidan kontraŭ- demandadon sen ŝanceliĝo aŭ malkaŝiĝo. La procesigo ankaŭ pruvis fare de estiminda sinjorino, ke en la lundo vespere de la malapero de Fiŝero, ŝi vidis Arĉibaldon, kiun ŝi bone konis, kaj alian viron, kiun ŝi tiam ne sciis, sed kiun ŝi kredis en la momento de atestado esti Vilhelmo, (tiam ĉeestanta;) kaj ankoraŭ alia, korespondante la priskribon de Fiŝero, ĉiuj eniras la arbarojn ĉe la Nord-Okcidento de la urbo, (la punkto indikita per Henriko,) kaj post unu aŭ du horoj, vidis Vilhelmon kaj Arĉibaldon reveni sen Fiŝero. Pluraj aliaj atestantoj atestis, ke marde, tiutempe Vilhelmo kaj

Henriko deklarike rezignis pri la serĉo de la korpo de Fiŝero kaj ekiris hejmen, ili ne uzis la vojon rekte, sed ja iris en la arbaron, kiel diris Henriko. Per aliaj ankaŭ, estis pruvite, ke ekde la malapero de Fiŝero, Vilhelmo kaj Arĉibaldo elspezis sufiĉe nekutima nombron da orpecoj.

La deklaroj ĝis nun faritaj pri la densejo, la signoj de lukto, la kaleŝospuroj, ktp, estis plene pruvitaj de multaj atestantoj. Je tio la procesigo finis. D-ro Gilmore estis tiam prezentita de la akuzitoj. Li deklaris ke li loĝas en Kantono Warren proksimume sep mejlojn for de la loĝejo de Vilhelmo; ke dum la mateno de la aresto de Vilhelmo, li estis for de sia hejmo kaj aŭdis pri la aresto, kaj pri tio, ke ĝi estas pri la murdo de Fiŝero; ke dum la reveno al sia propra domo, li trovis Fiŝeron tie; ke Fiŝero estis en tre malforta sano, kaj povis doni neniun racian raporton pri kie li estis dum sia foresto; ke li (Gilmore) tiam komencis serĉi la oficiron kiel antaŭe deklarike, kaj ke li estu kunportita Fiŝeron kun li, sed la stato de lia sano ne permesis tion. Gilmore ankaŭ deklaris ke li konis Fiŝeron dum pluraj jaroj, kaj ke li komprenis ke li havas la medicinan malbonfarton de provizora malordo de menso, pro vundo en la kapo ricevita en frua vivo. Ĉirkaŭ D-ro Gilmore estis tiom multe da la aero kaj maniero de vero, ke lia deklaro regis en la mensoj de la publiko kaj de la tribunalo, kaj la Traylor-oj estis forigitaj; kvankam ili donis neniun klarigon pri la cirkonstancoj pruvitaj de la aliaj atestantoj.

La venontan lundon, Myers alvenis en Springfield, kunportante kun li la nun faman Fiŝeron, en plena vivo kaj taŭga persono. Tiel finiĝis ĉi tiu stranga afero; kaj eĉ se estas facile koncepteble ke verkisto de romanoj povus alkonduki rakonton al pli perfekta kulmino, oni povas pridubi, ĉu vere okazis pli stranga afero. Granda parto de la afero daŭras esti misteron ĝis hodiaŭ. La irado en la arbaron kun Fiŝero, kaj la revenado sen li, fare de la Traylor-oj; ilia irado en la arbaron en la sama loko la sekvan tagon, post kiam ili deklaris rezigni la serĉadon; la signoj de lukto en la densejo, la kaleŝospuroj ĉe la rando de ĝi; kaj la loko de la densejo kaj la signoj ĉirkaŭ ĝi, korespondantaj ĝuste kun la rakonto de Henriko, estas cirkonstancoj, kiuj neniam estis klarigitaj.

Vilhelmo kaj Arĉibaldo ambaŭ mortis ekde tiam —Vilhelmo post malpli ol unu jaro, kaj Arĉibaldo post proksimume du jaroj post la supozebla murdo. Henriko ankoraŭ vivas, sed neniam parolas pri la temo.

Ne estas la celo de la verkisto de ĉi tio, eniri en la multajn kuriozajn konjektojn, kiuj povus esti indulgitaj pro la faktoj de ĉi tiu rakonto; tamen li apenaŭ povas abstini rimarkon pri tio, kio preskaŭ certe estus la sorto de Vilhelmo kaj Arĉibaldo, se Fiŝero ne estus trovita vivanta. Ŝajnas ke li forvagis en mensa konfuzo, kaj, se li estus mortita en tiu stato, kaj lia korpo estus trovita en la proksimeco, estas malfacile koncepti tion, kio povus savi la Trailor-ojn de la konsekvenco de murdinta lin. Aŭ, se li estus mortinta, kaj lia korpo neniam trovita, la kazo kontraŭ ili estus tute same malbona, ĉar, kvankam estas principo de leĝo, ke kondamno por murdo ne okazos, se la korpo de la mortinto ne estos eltrovita, estas memorende, ke Henry atestis, ke li vidas la mortan korpon de Fiŝero.

Grafo Drakulo

Woody Allen

Tradukita el la angla de Barry Friedman

Ie en Transilvanio, Drakulo la monstro dormas en sia ĉerko, atendente la nokton. Ĉar ekspozicio al la sunaj radioj certe pereigus lin, li restas protektita en la saten-tegita ĉambro, kiu portas sian familian nomon en arĝento. Tiam venas la momento de mallumo, kaj per ia mirakla instinkto la demono eliras el la sekureco de sia kaŝejo kaj, alprenante la terurajn formojn de la vesperto aŭ la lupo, li vagadas la kamparon, trinkante la sangon de siaj viktimoj. Finfine, antaŭ ol la unuaj radioj de lia ĉefmalamikoj, la Suno, anoncas novan tagon, li hastas reen al la sekureco de sia kaŝa ĉerko kaj dormas, kiam la ciklo komenciĝas denove. Nun li ekmoviĝas. La flirtado de liaj palpebroj estas respondo al ia malnova, neklarigebla instinkto, ke la suno preskaŭ malpliĝas kaj lia tempo estas proksima. Ĉi-vespere, li aparte malsatas, kiam li kuŝas tie, plene vekita nun, en ruĝ-liniita invernosa kapuĉmantelo kaj vosto, atendente senti kun miriga percepto la precizan momenton de mallumo antaŭ ol malfermi la kovrilon kaj emerĝi, kaj li decidas, kiuj estos la viktimoj de ĉi tiu vespero. La bakisto kaj lia edzino, li pensas al si mem. Sukplena, havebla kaj sensuspekta. La penso pri la neatenta paro, kies fidon li zorge kultivis, ekscitas sian sangvolupton al febra nivelo, kaj li apenaŭ povas reteni sin dum ĉi tiuj lastaj sekundoj antaŭ ol elgrimpi el la ĉerko por serĉi sian predon. Subite li scias, ke la suno subiris. Kiel anĝelo de la infero, li leviĝas rapide, kaj ŝanĝiĝante al vesperto, flugas al la dometo de siaj allogaj viktimoj.

"Nu, grafo Drakulo, kia bela surprizo," diras la bakistedzino, malfermante la pordon por allasi lin. (Li refoje alprenis homan formon, kiam li eniras ilian hejmon, ĉarme kaŝante sian raban celon.)

"Kio alportas vin ĉi tien tiel frue?" la bakisto demandas.

"Nia vespermanĝa rendevuo," respondas la grafo. - Mi esperas, ke mi ne faris eraron. Vi ja invitis por ĉi-vespere, ĉu ne?"

"Jes, hodiaŭ vespere, sed tio ne estas ĝis sep horoj poste."

"Pardonu min?" Drakulo demandas, ĉirkaŭrigardante la ĉambron perpleksa.

"Aŭ ĉu vi venis por spekti la eklipson kun ni?"

"Eklipso?"

"Jes. Hodiaŭ estas la tuta eklipso."

"Kio?"

"Kelkaj momentoj de mallumo de tagmezo ĝis du minutoj poste. Rigardu tra la fenestro."

"Uh-ho. Mi havas grandegan problemon."

"Ĉu?"

"Kaj nun se vi pardonos min. . ."

"Kio, grafo Drakulo?"

"Nepre mi devas iri, aha-ho dio. . ." Furioze li serĉas la pordotenilon.

"Ĉu vi iros? Vi ĵus venis."

"Jes, sed mi pensas, ke mi fuŝis multe. . ."

"Grafo Drakulo, vi estas pala."

"Ĉu mi? Mi bezonas iom da freŝa aero. Estis agrable vidi vin. . ."

"Venu. Sidiĝu. Ni drinkos."

“Ĉu drinkos? Ne, mi devas kuri. Er - vi estas paŝanta sur mian kapuĉmantelon.”

“Certe. Malstreĉiĝu. Iom da vino.”

“Ĉu vino? Ho ne, mi ĉesis tion - pri la hepato, ktp vi scias. Kaj nun mi vere devas forrapidi. Mi ĵus memoris, ke mi lasis la lumojn enŝaltitaj en la kastelo - la fakturoj estos grandegaj. . .”

"Bonvolu," diras la bakisto, kun la brako ĉirkaŭ la grafo en firma amikeco. Vi ne entrudiĝas. Ne estu tiel ĝentila. Do vi estas frua.”

"Vere, mi ŝatus resti, sed estas renkontiĝo de maljunaj rumanaj grafoj trans la urbo kaj mi respondecas pri la malvarmaĵoj.”

“Rapide, rapide, rapide. Mirinde, ke vi ne ricevas koratakon.”

“Jes, ĝuste kaj nun - ”

"Mi preparas kokan pilafon ĉi-vespere," interrompas la bakistedzino. "Mi esperas, ke plaĉos al vi."

"Bonege, bonege," la Grafo diras ridetante, dum li puŝas ŝin flanken en iujn lavotaĵojn. Poste, erare malfermante ŝrankpordon, li eniras.

“Kristo. Kie estas la diabla enirpordo?”

"Aĉ," ridas la bakistedzino, "tiel amuza viro, la grafo."

"Mi sciis, ke vi ŝatus tion," diras Drakulo devigante subrido, "nun foriru de mia vojo." Finfine li malfermas la enirpordon sed la tempo elĉerpiĝis.

"Ho, vidu, panjo," diras la bakisto, "la eklipso devas finiĝi. La suno denove aperas.”

"Prave," diras Drakulo, klakfermante la antaŭan pordon. - Mi decidis resti. Tiru malsupren la fenestrokurtenojn rapide-rapide!

Moviĝu!"

"Kiuĵ fenestrokurtenoj?" demandas la bakisto.

"Estas neniuĵ, ĉu ne? Nu, bone. Ĉu vi havas kelon?"

"Ne," afable diras la edzino, "mi ĉiam diras al Jarslov konstrui tion sed li neniam aŭskultas. Jen ia edzo, mia Jarslov."

"Mi estas malgaja pri tio. Kie estas la ŝranko?"

"Vi jam faris tion, grafo Drakulo. Kaj panjo kaj mi ridis pri ĝi."

"Aĉ - tiel amuza viro, la grafo."

"Nu, mi estos en la ŝranko. Frapu je la sepa kaj duono." Kaj kun tio, la grafo enpaŝas la ŝrankon kaj draŝfermas la pordon.

"He-he - li estas tiel amuza, Jarslov."

"Ho, grafo. Eliru el la ŝranko. Ĉesu esti granda stultulo."

De interne de la ŝranko aŭdiĝas la obtuzigita voĉo de Drakulo. "Mi ne povas, bonvolu fidi mian vorton. Lasu min resti ĉi tie. Mi bonfartas. Vere."

"Grafo Drakulo, ĉesigu la klaŭnadon. Ni jam estas senhelpaj pro rido."

"Ĉu mi povas diri al vi, ke mi amas ĉi tiun ŝrankon."

"Jes sed . . ."

"Mi scias, mi scias . . . Ŝajnas strange, sed ĉi tie mi estas kaj mi amuziĝas. Mi ĵus diris al sinjorino Hess la alian tagon, donu al mi bonan ŝrankon kaj mi povas stari en ĝi dum horoj. Dolĉa virino, sinjorino Hess. Grasa, sed dolĉa. . Nun, vi forkuru kaj revenu al mi ĉe la sunsubiro. Ho, Ramona, la da de, Ramona. . ."

Nun alvenas la urbestro kaj lia edzino, Katia. Ili preterpasas kaj decidis viziti al siaj bonaj amikoj, la bakisto kaj lia edzino.

"Saluton, Jarslov. Mi esperas, ke Katia kaj mi ne entrudiĝas?"

"Kompreneble ne, sinjoro urbestro. Eliru, grafo Drakulo. Ni havas vizitantojn!"

"Ĉu la grafo estas ĉi tie?" demandas la urbestro surprizite.

"Jes, kaj vi neniam divenos kie," diras la bakistedzino.

"Estas tiel rare vidi lin tiom frue. Fakte mi neniam povas memori vidi lin dum la tago."

"Nu, li estas ĉi tie. Eliru, grafo Drakulo!"

"Kie li estas?" Katia demandas, ne sciante ĉu ridi aŭ ne.

"Eliru nun! Ek!" la bakista edzino senpacienciĝas.

"Li estas en la ŝranko," diras la bakisto pardonpete.

"Ĉu vere?" demandas la urbestro.

"Ek!" diras la bakisto kun moka humuro dum li frapas sur la ŝrankan pordon. "Sufiĉe estas sufiĉe. La urbestro estas ĉi tie."

"Eliru, Drakulo," lia honoro krias, "Ni drinku."

"Ne, vi drinku sen mi. Mi havas negocojn ĉi tie."

"Ĉu en la ŝranko?"

"Jes, ne lasu ke mi ruinigos vian tagon. Mi povas aŭdi, kion vi diras. Mi aliĝos se mi havas ion por aldoni." Ĉiuj rigardas unu la alian kaj levas la ŝultrojn. Vino estas verŝita kaj ili ĉiuj drinkas.

"Kia eklipso hodiaŭ," diras la urbestro, drinkante el sia glaso.

"Jes" la bakisto konsentas. "Nekredeble."

"Jes. Emociige." diras voĉo el la ŝranko.

"Kio, Drakulo?"

"Nenio, nenio. Lasu ĝin."

Kaj tiel pasas iom da tempo, ĝis la urbestro ne plu povas elteni kaj malfermante la pordon al la ŝranko perforte, li krias, "Venu do, Drakulo. Mi ĉiam pensis, ke vi estas matura viro. Ĉesu ĉi tiun frenezecon."

La taglumo enfluas, kaŭzante la malbonan monstron ekŝriki kaj malrapide dissolviĝi al skeleto kaj poste al polvo antaŭ la okuloj de la ĉeestantaj homoj.

Kliniĝante al la amaso da blanka cindro sur la planko de la ŝranko, la urbestro diras, "Ĉu ĉi tio signifas, ke vespermanĝo estas nuligita?"

Mia milito kun Hersh Rasseyner

Chaim Grade

Verkita origine en la jida

El la angla tradukis Barry Friedman

I

En 1937 mi revenis al Bjalistoko, kelkajn jarojn post kiam mi estis studento en la Novaredoka Jeŝivo de la Musaristoj, movado kiu donas specialan gravecon al la etikaj kaj asketaĵaj elementoj en judismo. Reveninte, mi trovis multajn el miaj malnovaj samlernejoj ankoraŭ tie. Kelkaj eĉ venis al mia prelego iun vesperon. Aliaj vizitis min sekrete, por eviti, ke la estro de Jeŝivo eksciu. Mi povis vidi, ke ilia malriĉeco alportis al ili suferon kaj ke la fajro de ilia juneca fervoro malrapide estingiĝis. Ili daŭre observis ĉiujn leĝojn kaj uzokutimojn zorge, sed la laceco de spiritaĵaj luktoj kuŝis sur ili. Dum jaroj ili provis elŝiri el siaj koroj la deziron pri la ĝuoj de vivo, kaj fine ili konstatis, ke ili perdas la militon kun si mem. Ili ne venkis la malbonan urĝon.

Estis unu, kiun mi senĉese serĉis kaj ne trovis, mian ekssamlernejanon Hersh Rasseyner. Li estis malhela junulo kun brilaj malgajaj okuloj. Mi ne renkontis lin, sed aŭdis, ke li solece sin tenas en sia mansardo kaj eĉ ne venis al la Jeŝivo.

Iam ni renkontiĝis neatendite sur la strato. Li promenis kun la okuloj mallevitaj, kiel estas la kutimo ĉe la Novaredokaj Musaristoj; ili ne deziras esti "okulo kontraŭ okulo" kun la mondo. Sed li tamen vidis min. Li metis la brakojn malantaŭ lin, enŝovinte la manojn en la manikojn, por ke li ne devu premi manon kun mi. Ju pli li proksimiĝis, des pli alte levis la kapo. Kiam ni fine staris vizaĝo kontraŭ vizaĝo,

li atente rigardis min. Li estis tiel kortuŝita, ke liaj nazotruoj ŝajnis tremeti - sed li silentis.

Inter la Musaristoj kiam vi demandas, Kiel vi fartas?, la demando signifas, Kio estas la stato de via religia vivo? Ĉu vi leviĝis je spiriteco? Sed mi forgesis kaj demandis tute simple: "Hersh Rasseyner, kiel vi fartas?"

Hersh iom retiris sin, rigardis min de la kapo ĝis la piedoj, vidis, ke mi estas laŭmode vestita, kaj levis la ŝultrojn. "Kaj kiel vi fartas, Chaim Vilner? Mia demando, vi vidas, estas pli grava. "

Miaj lipoj tremis kaj mi emocie respondis: "Via demando, Hersh Rasseyner, tute ne estas demando. Mi faras tion, kion mi devas.

Ĝuste tie, meze de la strato, li kriis: "Ĉu vi pensas, Chaim Vilner, ke forkurante de la Jeŝivo vi savis vin? Vi scias la diron inter ni: Kiu lernis musaron, tiu ne povas ĝui sian vivon. Vi ĉiam estos misformita, Chaim Vilner. Vi restos kriplulo dum la resto de via vivo. Vi verkas sendiajn versojn kaj ili rekompencas vin frapetante vin sur la vangon. Nun ili plenigas vin per aplaŭdoj, kiel ili plenigus anseron per greno. Ili faras bruon pri vi, vi estas traktata kiel infano naskita dum la maljunaĝo de siaj gepatroj. Sed poste vi vidos, kiam vi komencos iri al ilia lernejo, ho, ĉu la sekularuloj ne batos vin! Kiu el vi ne doloriĝas per kritiko? Ĉu iu el vi vere havas tiom da memestimo, ke tiu ne ĉirkaŭiras petegi aprobon de iu aŭtoritato? Ĉu iu el vi pretas publikigi sian libron anonime? La granda afero ĉe vi homoj estas, ke via nomo estu vidata kaj konata. Por kio vi rezignis nian trankvilecon de spirito? Por pasioj vi neniam povos kontentigi kaj por duboj vi neniam povos respondi, kiom ajn vi suferos."

Post kiam li diris ĉion, Hersh Rasseyner komencis foriri kun rapida, energia paŝo. Sed ankaŭ mi iam estis musaristo, do mi kuris post li.

"Hersh, aŭskultu min nun. Neniu scias pli bone ol mi, kiel vi estas ŝirita. Vi fieras pri vi mem, ĉar vi ne zorgas, ĉu la tuta strato ridas pri vi, ke vi surportis viajn cicitojn ĝis viaj maleoloj. Vi konvinkis vin

kredi, ke la tuko kun la lanaj franĝoj estas vando inter vi kaj la mondo. Vi malestimas vin, ĉar vi timas, ke vi eble trovos favoron en la okuloj de la mondo, tiu edzino de Potifar. Vi timas, ke vi ne havos la forton disŝiri vin kiel la justa Jozefo. Do vi fuĝas de tento kaj pensas, ke la mondo postsekvos vin. Sed kiam vi vidas, ke la mondo ne postsekvos vin, vi koleras kaj krias: Neniu ĝuas la vivon. Vi volas konsoli vin per tiu ideo. Kiam vi loĝas en soleco en via mansardo, tio estas ĉar vi preferus havi nenion ol preni la paneron, kiun la vivo ĵetas al vi. Via modesteco estas aroganteco, ne abnegacio.

Kaj kiu diris al vi, ke mi serĉas plezuron? Mi serĉas veron, kiun vi ne havas. Cetere mi ne forkuris, mi simple revenis al mia propra strato - al strato Jatkev en Vilno. Mi amas la pordistojn kun la dorso rompita de portado de iliaj ŝarĝoj; la metiistoj verŝantaj ŝviton ĉe siaj laborejoj; la merkatinoj, kiuj fortranĉus fingron por doni al malriĉulo panan ŝelon. Sed vi skoldas la malsatojn ĉar ili estas pekuloj, kaj ĉio, kion vi povas diri al ili, estas penti. Vi ridas pri homoj, kiuj laboras, ĉar vi diras, ke ili ne fidigas dion. Sed vi vivas per tio, kion aliaj faris. Virinoj elĉerpitaj de laboro alportas al vi ion manĝi, kaj kompanse vi promesas al ili la mondon estontan. Hersch Rassejner, vi delonge vendis vian parton de la mondo estonta al tiuj kompatindaj virinoj."

Hersch Rassejner ekstremitis kaj malaperis. Mi revenis al Vilno kun ŝarĝo forigita de mia konscienco. En la disputo kun la musaristo mi mem ekkomprenis kial mi forlasis ilin. Se tiutempe, mi diris al mi, mi ne sciis kial kaj kien mi iras, iu alia pensis ĝin por mi, iu alia pli forta ol mi. Tiu iu alia pli forta ol mi estis - mia generacio kaj mia medio.

II

Du jaroj pasis. Milito eksplodis inter Germanio kaj Pollando. Okcidenta Ukrainio kaj okcidenta Blankrusio estis prenitaj de la Ruĝa Armeo. Post kiam ili estis en Vilna kelkajn semajnojn, la rusoj anoncis, ke ili redonos la urbon al la litovoj. Al Vilna komencis veni rifuĝintoj, kiuj ne volis resti sub soveta regado. La Novaredoka

Jeŝivo ankaŭ venis. Dume la sovetianoj restis. Malsato furiozis en la urbo. Ĉiu vizaĝo timiĝis pro la arestoj nokte faritaj de agentoj de NKVD-o. Mia koro estis peza. Iam mi staris en vico por porcio da pano. Subite mi vidis Hersch Rasseyner.

Mi aŭdis ke dume li edziĝis. Lia vizaĝo estis enkadrigita per malgranda nigra barbo, lia irmaniero pli retenita, liaj vestaĵoj pli prezentindaj. Mi tiel ĝojis vidi lin, ke mi forlasis mian lokon en la vico, puŝis tra la homamaso, kaj venis al li.

Li parolis malmulte kaj estis tre singarda. Mi komprenis kial. Li ne fidis min kaj timis problemojn. Mi povis vidi, ke li provas decidi ĉu paroli al mi. Sed kiam li vidis, kiom senkuraĝa mi estas, li kaŝis sian buŝon per la mano, kvazaŭ por kaŝi sian torditan rideton, kaj ekbrilo de mokado venis en lian okulon. Kun la kapo li mansignis al la ponto, sur kiu estis parkitaj kelkaj tankoj kun soldatoj de la Ruĝa Armeo.

"Nu, Chaim," diris Hersch al mi kviete, "ĉu vi estas kontenta nun? Ĉu ĉi tion vi volis?"

Mi provis rideti kaj respondis same kviete, "Hersch, mi ne havas pli da respondeco pri tio, ol vi havas por mi."

Li skuis sin kaj prononcis kelkajn akrajn, tranĉajn vortojn, ŝajnante forgesi sian timon: "Vi eraras, Chaim, mi ja respondecas pri vi." Li retiriĝis kelkajn paŝojn kaj gestis per la okuloj al la soldatoj de la Ruĝa Armeo, kvazaŭ dirante: Kaj vi respondecas pri ili.

III

Pasis naŭ pliaj jaroj, jaroj da milito kaj detruo, dum kiuj mi vagis tra Rusujo, Pollando kaj Okcidenta Eŭropo. En 1948, somere posttagmeze, mi veturis en la Pariza Metroo. Paroj staris proksime kune. Malaltaj francinoj, kvazaŭ svenantaj, pendis flanke de siaj nigrajharaj amantoj.

Mi vidis konatan vizaĝon. Ĝis tiam ĝi estis kaŝita per ies ŝultro, kaj nur kiam la paroj devis iomete moviĝi, tiu angulo de la vagono malfermiĝis. Mia koro ekbatis. Ĉu li vere povus vivi? Ĉu li ne estis en Vilno sub la germana okupado? Kiam mi revenis al la ruinoj de mia hejmo en 1945 mi ne vidis lin aŭ aŭdis pri li. Tamen tiuj estis la samaj okuloj, la sama obstine suprenlevita nazo; nur la larĝa nigra barbo komencis griziĝi. Mirigis min, ke li povas tiel trankvile rigardi la parojn, kaj ke bonkora rideto lumigis lian melankolian rigardon. Tio ne similis al li. Sed post momento mi rimarkis, ke en liaj okuloj estas fora rigardo. Li vere ne vidis la homojn en la trajno. Li estis vestita nete, kun longa mantelo kaj pura blanka ĉemizo butonumita ĉe la gorĝo, sen kravato. Mi pensis al mi mem: Li neniam surhavis kravatojn. Ĉi tio pli ol io alia konvinkis min, ke ĝi estas li.

Mi puŝis min tra la pasaĝeroj kaj ekkriis, "Pardonu, ĉu vi ne estas Reb Hersh Rasseyner?"

Li rigardis min, sulkigis sian frunton kaj ridetis. "Ha, Chaim, Chaim, ĉu vi estas? Sholom aleichem! Kiel vi fartas?"

Mi povis konstati ke ĉi-foje, kiam Hersh Rasseyner demandis: "Kiel vi fartas?" li ne signifi tion, kion li signifis dek unu jarojn antaŭe. Tiam lia demando estis kolera kaj moka. Nun li faris la demandon kviete, simple. Ĝi venis el lia koro kaj ĝi montris zorgon, kiel por malnova amiko.

Ni eniris angulon kaj li mallonge diris al mi, ke li estis en tendaro en Latvio. Nun li estis en Germanio, ĉe la kapo de Jeŝivo en Salzheim.

"Ĉu la estro de Jeŝivo en tendaro en Germanio? Kaj kiuj estas viaj lernantoj, Reb Hersh? "

Li ridetis. "Ĉu vi pensas, ke la Sanktulo estas por tiel diri orfo? Ni ankoraŭ havas knabojn, laŭdo al la Ĉiopovulo, kiu studas Toraon."

Li diris al mi, ke li estis en la tendaro kun ĉirkaŭ dek lernantoj. Li proksimigis ilin al li kaj instruis al ili judecon. Ĉar ili ankoraŭ estis

nur infanoj kaj tre malfortaj li helpis ilin en ilia laboro. Nokte ili kutimis kolekti sin ĉirkaŭ lia liteto kaj ĉiuj kune deklamus Psalmojn. Estis kuracisto en la tendaro, kiu kutimis diri, ke li donus duonon de sia vivo por ankaŭ povi deklami Psalmojn. Sed li ne povis. Li malhavis fidon, kompatindulo.

Mi estis feliĉa renkonti lin kaj mi preferis eviti debaton, do mi simple demandis, "Kaj kio alportas vin ĉi tien tiel ofte? Ĉu vi komercas?"

"Kompreneble ni komercas." Li karesis sian barbon kun kontento. "Granda komerco. Ni venigas Jeŝivajn homojn ĉi tien kaj sendas ilin al Israelo kaj Usono. Ni reprenas librojn de ĉi tie. Kun la helpo de la Ĉiopovulo, mi eĉ flugis dufoje al Maroko."

"Ĉu Maroko? Kion vi faris tie, Reb Hersh?"

"Revenigis studentojn de la marokaj judoj, parolis en ilia sinagogo."

"Kaj kiel vi parolis kun ili? Vi ne scias la araban aŭ la francan."

"La Ĉiopovulo helpas. Kio estas la diferenco kiel oni parolas? La ĉefa afero estas tio, kion vi parolas."

Neatendite li komencis paroli pri mi. "Kiel estos kun vi, Chaim? Estas tempo, ke vi ekpensu pri pento. Ni estas pli proksime ol pli malproksime."

"Kion vi celas?"

"Mi volas diri," li diris, eltirante siajn vortojn per ĉanto, "ke ni ambaŭ vivis pli ol duonon de niaj vivoj. Kio okazos al Reb Chaim?" Li forte akcentis la vorton Reb. "Kien vi vojaĝas? Kune kun ili, eble?" Liaj okuloj ridis pri la junaj paroj. "Ĉu vi deiros tie, kie ili deiros? Aŭ ĉu vi ankoraŭ kredas je ĉi tiu malkompatema mondo?"

"Kaj vi, Reb Hersh," mi demandis subite iritite, "ĉu vi ankoraŭ kredas je aparta providenco? Vi diras, ke la Sanktulo ne estas kvazaŭ orfo. Sed ni estas orfoj. Miraklo okazis al vi, Reb Hersh, kaj vi saviĝis. Sed kiel pri la resto? Ĉu vi ankoraŭ povas kredi?"

"Kompreneble mi kredas," diris Hersh Rasseyner, apartigante siajn manojn en senkulpa miro. "Vi povas tuŝi apartan providencon, ĝi estas tiel palpebla. Sed eble vi pensas pri tia homo, kiu kredas, ke la Ĉiopovulo troveblas nur en la agrablaj lokoj de ĉi tiu mondo, sed ne troveblas, Dio malpermesu, en la dezerto kaj rubejlandoj? Vi scias la regulon: same kiel viro devas fari benon super la bono, tiel li devas fari benon super la malbono. Ni devas fali antaŭ la grandeco -"

"Kion vi volas, Reb Hersh?" Mi interrompis. "Ĉu mi vidu la grandecon de Dio en la penso, ke nur Li povus kaŭzi tian detruon, ne karno kaj sango? Vi superas la Psalmojn, kiujn vi recitadis sur via lito en la koncentrejo. La Psalmisto vidas la grandecon de Dio en la fakto, ke la suno leviĝas ĉiutage, sed vi vidas miraklojn eĉ en katastrofoj."

"Sendube," respondis trankvile Hersh Rasseyner, "mi vidas ĉie, en ĉio, en ĉiu momento, apartan providencon. Mi ne povus resti sur la tero dum unu minuto sen la penso de Dio. Kiel mi povus elteni sen Li en ĉi tiu murdema mondo?"

"Sed mi ne diros, ke Lia juĝo estas ĝusta. Mi ne povas!"

"Vi povas," diris Hersh Rasseyner, metante amikecan manon sur mian ŝultron, "vi povas iom post iom. Unue la pentanto komprenas, ke la mondo ne povas esti sen Gvidilo. Tiam li komprenas, ke la Gvidilo estas la Dio de Israelo kaj ke ne ekzistas alia potenco krom Li por helpi Lin gvidi la mondon. Finfine li rekonas, ke la mondo estas en Li, kiel ni legas: 'Ne ekzistas loko vaka de Li.' Kaj se vi komprenus tion, Chaim, vi ankaŭ komprenus, kiel la Ĉiopovulo rivelas Sin en malfeliĉo same kiel en savo."

Hersh Rasseyner parolis per varma voĉo. Li ne eĉ unufoje deprenis sian manon de mia ŝultro. Mi sentis grandan amon por li kaj vidis, ke li fariĝis pli pia ol iam ajn.

IV

Ni forlasis la Metroon proksime al la juda kvartalo, ĉe la strato de Rivoli, kaj ni preterpasis la malnovan urbodomon, la Hôtel de Ville. En la niĉoj de la muroj de la Hôtel de Ville, inter la fenestroj, en tri vicoj, staras ŝtonaj figuroj, iuj kun glavo, iuj kun libro, iuj kun peniko kaj paletro, kaj aliaj kun instrumentoj de geometristoj.

La Rasseyner vidis min rigardi la monumentojn.

Li ekrigardis ilin per la angulo de la okulo kaj demandis: "Kiu estas tiuj idoloj?"

Mi klarigis al li, ke ili estas famaj francoj: ŝtatistoj, herooj, erudiciuloj kaj artistoj.

"Reb Hersh," mi petegis lin, "rigardu tiujn statuojn. Alproksimiĝu kaj vidu la lumon fluantan de iliaj marmoraj okuloj. Vidu kiom da boneco kuŝas kaŝita en iliaj ŝtonaj vizaĝoj. Vi nomas ĝin idolkulto, sed mi diras al vi vere, mi povus plori, kiam mi promenas ĉirkaŭ Parizo kaj vidas tiujn skulptaĵojn. Ja estas miraklo. Kiel homo povus enspiri la vivspiron en ŝtonon? Kiam vi vidas vivantan homon, vi vidas nur unu homon. Sed kiam vi vidas viron elverŝitan en bronzo, vi vidas la homaron mem. Ĉu vi komprenas min? Tiu tie, ekzemple, estas poeto fama tra la tuta mondo. La granda verkisto plilarĝigas nian komprenon kaj stimulas nian kompaton pri niaj kunhomoj. Li montras al ni la naturon de la viro, kiu ne povas superi siajn dezirojn. Li ne punas eĉ la malvirtulon, sed vidas lin laŭ liaj suferoj en la milito, kiun li faras kun si kaj la resto de la mondo. Vi ne diras, ke li pravas, sed vi komprenas, ke li ne povas deteni sin. Kial vi tiras vian barbon kun tia kolero, Reb Hersh?"

Li fiksrigardis min kun brulantaj okuloj kaj kriis: "Je honto! Kiel vi povas diri tiajn malsaĝajn aferojn? Ĉu vi do povus plori, kiam vi rigardas tiujn pentritajn materiobulojn? Kial vi ne ploras pri la karbigitaj muroj, kiuj sole restas de la sinagogo Gaon de Vilna? Tiuj viaj artistoj, tiuj monumenthakistoj; tiuj poetoj, kiuj kantis pri siaj imperiestroj; tiuj akrobatoj, kiuj dancis kaj ludis antaŭ la regantoj - ĉu tiuj viaj mastroj eĉ ĝenis sin pensi, ke ilia patrono masakros tutan urbon kaj ŝtelos ĉion, kion ĝi havis, nur por aĉeti ilin, viajn mastrojn, per oro? Ĉu la profetoj flatis reĝojn? Ĉu ili prenis donacojn de la salajroj de putinoj? Kaj kiel kompatema vi estas! La verkisto montras, kiel la malvirtulo estas viktimo de siaj propraj malbonaj inklinoj. Mi pensas, ke tion vi diris. Vere estas domaĝo pri la aroganta ribelulo! Li detruas aliajn, kaj kompreneble li ankaŭ estas detruita. Kia domaĝo! Ĉu vi pensas, ke estas pli facile esti bona viro ol adultulo? Sed vi aparte ŝatas priskribi la voluptan homon. Vi konas lin pli bone, estas io de li en vi artistoj. Se vi ekskuzas la homon, kiu ĝojegas pri sia malboneco, tiuokaze laŭ mi via tuta skribaĉado estas malpura kaj netaŭga. Kondamnu la malvirtulon! Kondamnu la manĝemulon kaj drinkulon! Ĉu vi diras, ke li ne povas deteni sin? Li devas deteni sin! Vi kantis belan kanton de laŭdo al la putraj idoloj, Chaim Vilner."

Hersh Rasseyner rigardis miajn okulojn per la akra, minaca mieno, kiun mi vidis dek unu jarojn antaŭe, kiam ni renkontiĝis en tiu Bjalistoka strato. Lia voĉo fariĝis malmola kaj resona. Preterpasantoj haltis kaj fikse rigardis la barban judon, kiu skuis sian fingron al la skulptaĵoj de la Hôtel de Ville. Hersh ne rimarkis la preterpasantojn. Mi sentis min embarasita antaŭ ĉi tiuj francoj, ridetantaj kaj scivoleme rigardantaj nin.

"Ne kriu tiel," mi diris al li kolereme. "Vi vere pensas, ke vi havas monopolon pri kompato kaj vero. Vi komencas, kie ni ĉesis antaŭ dek unu jaroj. En Novaredoko vi ĉiam tenis la fenestrojn fermitaj, sed tio estis ankoraŭ tro luma por vi en la Studodomo, vi do forkuris al via mansardo. De la mansardo vi malsupreniris en kelon. Kaj de la kelo vi enfosiĝis en truon sub la tero. Tie vi povus observi vian ordonon pri soleco kaj tie vi konvinkis vin, ke la pensoj kaj sentoj

de viro similas al liaj haroj; se li volas, li povas tondi siajn harojn kaj lasi nenion krom barbo kaj orelingoj - sankta penso kaj pia konduto. Vi pensas, ke la mondo estas tio, kion vi imagas ĝin, kaj vi havos nenion komunan kun ĝi. Vi pensas, ke viroj estas tio, kion vi imagas ilin, sed vi diras al ili esti la malo. Sed eĉ la koncentrejoj ne povis diferencigi virojn ol kiaj ili estas. Tiuj, kiuj estis malbonaj, fariĝis pli malbonaj en la tendaroj. Alikaze ili eble vivus siajn vivojn kaj ne sciis sin mem je kio ili estis, sed en la krizo viroj vidis sin kaj aliajn malkaŝitajn. Kaj kiam ni ĉiuj estis liberigitaj, eĉ la pli bonaj inter ni ne estis liberigitaj de la veneno, kiun ni devis trinki malantaŭ la pikdrato. Nu, se la koncentrejo ne povus ŝanĝi virojn de supro malsupren, kiel vi povas atendi ŝanĝi ilin?"

La Rasseyner rigardis min kun miro. La kolero, kiu ekflamis en liaj okuloj, kvietiĝis, kvankam lasta ekbrilo de ĝi ŝajnis resti.

"Vi ne scias, pri kio vi parolas, Chaim," li diris mallaŭte kaj kontraŭvole."

Kiu diris al vi, ke tiaj suferoj plibonigas homojn? Estas tute klare, ke eksteraj kaŭzoj ne povas treni homojn reen al juda vivo. La koro kaj menso de viro devas esti pretaj.

"Se viro ne venis tien kun soifo por pli alta vivo, li certe ne levis sin en la koncentrejo. Sed la spirita viro scias, ke ĉiam kaj ĉie li devas peli sin pli alten, alie li falos pli malalten. Kaj pri la aserto, ke viro ne povas ŝanĝiĝi - tio estas kompleta mensogo. 'En mia karno mi vidos Dion!' La kazo de Hersh Rasseyner pravas, ke viro povas ŝanĝiĝi. Mi ne rakontos al vi longan historion pri kiom da voluptoj mi suferis; kiom ofte la vejnoj mem en mia kapo preskaŭ eksplodas pro la sangobulado; kiom da obstinoj mi devis elŝiri el mi mem. Sed mi sciis, ke tiu, kiu neas sin, atestas la Mastron de la Mondo. Mi sciis, ke la plej malbona kondamno, kiu povas esti donita al viro, estas, ke li ne povos rezigni pri sia malnova naturo. Kaj ĉar mi vere volis konkeri min, la Ĉiopovulo helpis min."

"Vi estas severa en viaj juĝoj," mi respondis. "Vi ĉiam estis, Reb Hersh, se vi pardonos mian diron. Vi nomas ĉi tiujn saĝulojn putraj

idoloj, sed vi rifuzas vidi, ke ili levis la homaron el ĝia besta stato. Ili ne estis buĉistoj de la animo kaj ili ne konvinkis sin kredi, ke homoj povas eltiri siajn pli malaltajn impulsojn kaj dehaki ilin. Ili tre bone konsciis pri la kaŝita radikoj de la homa raso. Ili volis lumigi la mensojn de homoj per saĝo, por ke homoj povu foriri de siaj sovaĝaj deziroj. Vi ne povas forigi ombrojn per balailo, nur per lumigita lampo. Ĉi tiuj grandaj homoj -"

Hersh komencis ridi tiel laŭte, ke mi devis interrompi min. Li tuj ĉesis ridi kaj suspiris. "Mi estas tre laca," li diris. "Mi vojaĝis la tutan nokton. Sed iel mi ne volas forlasi vin. Ja vi iam estis studento ĉe Novaredoko; eble ankoraŭ restas en vi ie fajrero de la spirito."

Ni piediris al benko silente. Je la unua renkontiĝo kun li, mi pensis, ke li fariĝis pli milda. Nun mi konstatis bedaŭre, ke liaj postuloj al mi kaj lia neado de la tuta mondo kreskis. Mi tamen esperis, ke la paŭzo mildigos la streĉiĝon, kiu estiĝis inter ni, kaj mi ne volas rapidi esti la unua paroli denove. Hersh tamen sulkigis sian frunton kvazaŭ li kolektas siajn pensojn, kaj kiam ni sidis, li revenis al miaj lastaj vortoj.

V

"Ĉu vi diris, ke ili estas grandaj viroj? La germanoj insistas, ke ili produktis ĉiujn grandajn virojn. Mi ne scias, ĉu ili produktis la plej grandegajn, sed mi ne supozas, ke vi sekularaj homoj neus, ke ili ja produktis klerajn homojn. Nu, ĉu tiuj filozofoj influis sian propran nacion por fariĝi pli bonaj? Kaj la vera demando estas, ĉu la filozofoj mem estis bonaj viroj? Mi ne volas, ke vi pensu, ke mi subtaksas iliajn sciojn. Dum miaj jaroj en la koncentrejo mi aŭdis multon. Estis escepte kleraj viroj inter ni, ĉar la germano miksis nin ĉiujn, kaj en niaj libertempaj momentoj ni kutimis paroli. Poste, kiam kun la helpo de la Ĉiopovulo mi saviĝis, mi mem rigardis en la librojn de vi sekularaj homoj, ĉar mi ne plu timis, ke ili vundos min. Kaj mi vere estis tre impresita per iliaj ideoj. Ifoje mi trovis en iliaj verkoj tiom da talento kaj profundo, kiom en niaj propraj sanktaj libroj, se la du povas esti menciitaj per unu spiro. Sed ili estas kontentaj per

parolado! Kaj mi volas, ke vi kredu min, kiam mi diras, ke mi koncedas, ke iliaj poetoj kaj sciencistoj volis esti bonaj. Nur — nur ili ne kapablis. Kaj se iuj ja havis bonajn kvalitojn, ili estis esceptoj. La amasoj kaj eĉ iliaj saĝuloj ne iris pli ol bonan paroladon. Koncerne paroladon, ili parolas pli bele ol ni.

Ĉu vi scias, kial ili ne povis pliboniĝi? Ĉar ili estas konsumita per pasio ĝui la vivon. Kaj ĉar plezuro ne estas io kion oni povas havi per si mem, murdo ekestis inter ili - la plezuro de murdo. Kaj tial ili parolas tiel belan paroladon, ĉar ili volas uzi ĝin por trompi sin fari bonajn agojn. Sed tio ne helpas. Ili estas kontentaj pri retoriko, kaj la kialo estas, ke ili ĉefe zorgas pri sistemoj. La nacioj de la mondo heredis de la grekoj la deziron al ordo kaj al belaj sistemoj.

“Unue ili faras tion, kion ili faras publike. Ili havas neniun plezuron pro siaj voluptoj, se ili ne povas peki malkaŝe, publike, por ke la tuta mondo sciu. Ili diras pri ni, ke ni estas nur hipokrituloj, dum ili faras tion, kion ili volas fari publike. Sed ili ŝatas militi, ne nur kun aliaj, sed ankaŭ kun si mem, kverelas kun si mem ([kompreneble, ne tro vigle](#)), eĉ suferas kaj pentas. Kaj kiam ili venas fari penton, ankaŭ la tuta mondo scias pri tio. Ilia estas tia pentado, kiu donas al ili intensan plezuron; ilia memamo estas tiel ekstrema, ke ĝi limas je malsano. Ili eĉ ŝatas siajn viktimojn, ĉar iliaj viktimoj havigas al ili la plezuron peki kaj la dolĉajn afliktojn de bedaŭro.”

La Rasseyner malproksimiĝis de mi al la alia fino de la benko kaj komencis rigardi min, kvazaŭ venis al li en la kapon, ke erare li eble parolas kun fremdulo. Poste li mallevis la kapon kaj murmuris kvazaŭ al si mem: "Ĉu vi memoras, tiu tempo en Bjalistoko?" Li silentis momenton kaj tiris haron el sia barbo kvazaŭ li elprenus siajn memorojn per ĝi. "Ĉu vi memoras, Chaim, kiel vi diris al mi sur tiu bjalistoka strato, ke ni forkuras de la mondo, ĉar ni timis, ke ni ne povos rezisti al tento?" Musaristo povas labori dum la tuta vivo plibonigi siajn kvalitojn, tamen unusola vorto de kritiko fiksis en li kiel tranĉilo. Jes, estas vere! Dum ĉiuj tagoj de mia juneco mi rigardis la teron, sen rigardi la mondon. Poste venis la germano. Li prenis min je mia juda barbo, tiris mian kapon supren kaj diris al mi, ke mi

rigardu lin rekte en la okulojn. Mi do devis rigardi en liajn mavajn okulojn, kaj ankaŭ en la okulojn de la tuta mondo. Kaj mi vidis, Chaim, mi vidis - vi scias, kion mi vidis. Nun mi povas rigardi ĉiujn idolojn, legi ĉiujn malpermesitajn malpuraĵojn kaj pripensi ĉiujn plezurojn de la vivo, kaj ĝi ne plu tentos min, ĉar nun mi konas la veran vizaĝon de la mondo. Ho, Reb Chaim, turnu kaj pentu! Ne estas tro malfrue. Memoru tion, kion diris la profeto Jeremio: 'Ĉar mia popolo faris du malbonojn: ili forlasis Min, la fonton de vivaj akvoj, kaj elhakis el ili putojn, rompitaĵojn, kiuj ne povas teni akvon.' "

Hersh parolis kiel rompita viro. Larmoj falis sur lian barbon. Li frotis siajn okulojn por reteni la larmojn, sed ili plu fluus laŭ liaj vangoj. Mi prenis lian manon kaj diris al li kun emocio:

"Reb Hersh, vi diras, ke mi forlasis fonton de vivaj akvoj por rompita cisterno. Mi devas diri al vi, ke vi eraras. Mi ĉerpas akvon de la sama fontano kiel vi, nur kun alia vazo. Sed trankviliĝu, Reb Hersh. Vi mem diris, ke vi kredas, ke la nacioj de la mondo havas saĝulojn kaj agemulojn, kiuj volis esti bonaj, sed ne povis. Mi pensas, ke mi citas vin precize. Kion mi ne komprenas estas ĉi tio. Ĝi estas baza principo de judismo, ke la homo havas liberan volon. La novaredokanoj efektive asertas, ke eblas atingi tian staton de perfekteco, ke ni povas fari bonajn agojn sen la interveno de niaj fizikaj korpoj. Nu do, se viro efektive povas senigi la malbonajn ŝelojn de si mem, kiel li senŝeligus cepon, kiel vi respondas ĉi tiun demandon: Ĉar la saĝuloj inter la nacioj volis esti bonaj, kial ili ne povus?"

Mi ne povis ekskludi mokan triumfon el mia demando. Ĝi ekscitis la Rasseyner el lia malgaja abstraktado. Konscie li rektigis sin kaj respondis milde.

"Chaim, vi ŝajne forgesis tion, kion vi lernis ĉe Novaredoko, do mi memorigos vin. En sia granda amo al la homaro, la Ĉiopovulo donis al ni racion. Se niaj saĝuloj, de benita memoro, diras al ni, ke ni povas lerni de la bestoj, certe ni povas lerni ankaŭ de racio. Kaj

ni scias, ke la maljunuloj de Ateno starigis moralajn sistemojn laŭ pura racio. Ili havis multajn disĉiplojn, ĉiu kun sia propra lernejo.

Kaj ju pli li rekonis kiel politike malĝusta tio estis, kiom katastrofa tia sopiro povus esti por lia kariero kaj lia partio, des pli li volis fali je siaj genuoj, rampi sub la tablon, kaj malhonoru sin antaŭ la tuta registaro per la malrapida forigo de negra leda fremd-farita balŝuo...

"Rolly, kion vi opinias?" demandis la ĉefministro. Ili rigardas lin, inkluzive de la disvolviĝa virino kun sia longaj, kremokoloraj kruroj kaj sia longaj, rozkoloraj piedfingroj. Eble tio ne estis pri raso. Eble tio estis nur, ke li sciis, ke tiuj estis piedoj, kiujn iu lekis. Ili estis lekeblaj. Pretaj esti lekataj-

Tio devis halti.

La registaro provis eltrovi kiel akiri plian helpomonon el Usono, kaj la financa ministro diris ili eldonu kelkajn terurajn ciferojn pri la milionoj da dolaroj de damaĝo kaj pri la jaroj bezonataj por rekuperi. Sed la turisma ministro indikis ke la turisma sezono estas nur kelkajn monatojn fore kaj ili ne faru ion, kio eble igus la situacion ŝajni tro malbona. La ĉefministro indikis ke li devos voki elektojn antaŭ la turisma sezono.

Rolly Austin faris mensan noton provi vidi kun kiu la turismo ministro dormas. La ministro loĝis iom malproksime, sed Rolly eble povus vidi fenestron super la orienta levo.

Kiam la kunveno finiĝis, Rolly iris hejmen. Baldaŭ Sarah alvenis. Sed li ignoris ŝin. Li povis vidi ke la disvolviĝa virino kaj la kunordiganto komencis denove, sed li ne volis ke Sarah vidu ke li estas rigardanta. Li volis esti sola rigardi. Kolere, Sarah faris ŝian

laboron, ŝablonis nomojn kaj bildojn sur sakojn kaj kazojn. Farante tiom multe da bruoj, kiun ŝi povis. Kial li subite estis ignoranta ŝin?

"Iranta al la kriza centro. Mi revenos," li diris, ĵetante unu lastan melankolian rigardon tra la fenestro antaŭ ol li foriris. La kriza centro estis starigita en la oficejo de la ĉefministro, kiu estis malgranda lika konkreta konstruaĵo desegnita aspekti nuntempa - arkitekturo al kiu Eŭnice ne estis afabla. Ĝi ankoraŭ havis sian plafonon, krom unu flankiĝo, sed la tapiŝoj odoris de ŝimo kaj estis multekolorigitaj kun akvaj markoj de la inundoj. La malnova mielkuka Financa Ministerio eltenis pli bone, sed la ĉefministro malfidis la ambiciojn de la financa ministro kaj li volis ke oni diru ke la kriza centro estis "en la Oficejo de la Ĉefministro." Blua tolbindita libro kun vicigitaj paĝoj kaj la vorto "Records" reliefigita en la kovrilo atendis registaroficistojn kiuj ĵus ekzamenis la insulon peti urĝe bezonitajn materialojn por la venonta helpflugo. Rolly Austin, kiu estis ekzamenita la okcidentan marbordon, kie tegmentoj estis forblovitaj kaj homoj dormis en tendaroj, petis en la libro ducent litkovrilojn. Li hezitis momenton kaj poste skribis, "unu binoklo." Tiam li pensis kiom suspekta la vorto "unu" ŝajnis kaj volis ŝanĝi ĝin al "dudek." Sed li ne volis transtreki la "unu"-on. Li kontemplis "cent"-on, sed decidis por "dekduo"-n. Li tiam vidis la vorton "binoklo" denove. La financa ministro petis cent faldeblajn litetojn kaj dek binoklojn. La turisma ministro petis du cent poŝlampojn, pilojn kaj dek kvin binoklojn.

La sekvan tagon flugo venis de Miami kun binokloj. Ili ne estis la ordo de Rolly. Li sciis tion, ĉar ne estis litkovriloj. Sed li prenis unu binoklon ĉiuokaze. El lia fenestro li povis vidi trans la nuda ravino al la domo de la turisma ministro - la turisma ministro kaj Fraŭlino Beryls. Ŝi aspektis plibona sen sia vesto ol Rolly imagis. Sed ŝiaj piedoj ankoraŭ estus plataj. Sur lia propra monteto, super la skeletaj branĉoj, la ĉefministro estis en sia ĉambrorobo rigardanta en siajn grandekranan televidon. La disvolviĝa virino estis en sia punto denove. La katastrofa kunordiganto estis postkuranta ŝin, rampul-simila, sur manoj kaj genuoj.

Rolly devis konjekti pri tiuj homoj. Ili ne estis normalaj. Li ĝustigis sian binoklon. Jes, ŝiaj piedfingroj estis longaj. Ili aspektis sufiĉe longe por ekpreni ion, preskaŭ kiel fingroj, longaj blankaj fingroj kun rondaj rozkoloraj pintoj.

Tiu montoflanko estis la nur parto de la insulo, kiu akiris denove elektron. Teknikistoj el Usono laboris en la resto de la insulo, sed la registaro kaj la evolua virino konsentis ke en ĉi tiu kritika periodo ili devis havi elektron por labori en la nokto. La telefonoj ankoraŭ ne funkciis, kaj Rolly povus elŝalti siajn lumojn kaj senti sin tute sola en sia malluma domo. Rolly Austin fariĝis nevidebla nokta besto.

Dum la tago Sarah estis etiketanta tie. Kiam mallumo venis, Rolly prenis sian lokon ĉe la fenestro. Unue li provus rezisti kaj indiferente irus tien malrapide. Manĝu iom da vespermanĝo unue. Post kelkaj noktoj, li eĉ manĝis sian vespermanĝon ĉe la fenestro.

La katastrofa reliefa kunordiganto estis ĉiam nuda. Li certe komenciĝis kunveste, sed Rolly neniam vidis tiam, kiam la vestaĵo foriris. Kaj li estis ĉiam sur la planko ie. Kelkfoje li estis sub la fenestro kaj Rolly ne povis vidi lin ajn. Tiam subite du manoj ekprenis la karnon de la evolua virino aŭ kapo atakus ŝin kvazaŭ por vori ŝin. La disvolviĝa virino dancis malrapide. Dum de horoj ili rolus senfinan varion de ritoj. Poste dum la nokto, li ĉiam havus ŝiajn piedojn. Estis kiel la satelita kanalo kiun vi ne devis rigardi multe pli frue vespere, ĉar vi sciis, ke ĝi estus tie longe post kiam la registaraj kanaloj estis mallumigitaj.

La turisma ministro kaj Fraŭlino Beryls estis pura pacienco - ia cinéma vérité, honesta en sia antaŭvidebla disvolviĝo, sen dramo aŭ intrigo. La lumo malsupre la monteton estis Pastoro Thomas, kiu malsukcesis provizi skandalon. La pastoro, en T-ĉemizo sen manikoj kaj verda pantaloneto, ŝanĝis sian pezon de flanko al flanko, kurante en loko kun ritmo kaj swingo de la brakoj kiuj sugestis ke li estis faranta tion kun muziko. La du junaj filoj de la financa ministro praktikis morton kaj resurekton, bategante unu la alia kun glavosimilaj strioj de ligno kiel du tre malgraciaj kavaliroj. Nur la vido de Pearl Cartwright kaj ŝia filino pasigante vesperojn kune

preparante manĝon valoris la rigardon. Tiuj estis la manieroj ke homoj kondutis kiam neniu rigardis, kaj Rolly, nerimarkita, povis vidi ĉion. Certe iunokte George forlasus el sia angulo kaj metis siajn grandajn manojn ĉie sur Pearl. Sed ĝi ne okazis ankoraŭ.

Brownlie Harrison metis liajn manojn sur Merle. Kutime ĉirkaŭ la oka kaj tridek iliaj vizaĝoj iĝus malbelaj, iliaj dentoj eletendiĝus, fruntoj iĝus rigidaj kaj vejnaj. Tiam Brownlie komencus bati ŝin, veraj batoj kiuj venis de malproksime el la dekstro kaj surteriĝis kun la forto frapi ŝin malsupren. Diru li ion? Rolly demandis al si. Faru li ion? Kion li povus diri? Kiel li povus konfesi ke li rigardis ilin, estis rigardanta ĉiujn ilin?

Pli-malpli frue li komencus pripensi leki la piedojn de la disvolviĝa virino. Kaj li tremus per timo. Tiuj homoj atendis multon de siaj gvidantoj. La seksa heroaĵoj de la ĉefministro, kiu havis kvin edzinojn kaj kvin eksedziĝojn, estis parto de lia populara popolscio. Lia antaŭulo, la sendependeca ĉefo, laŭdire estis dorminta kun la plimulto de la insulo. Sed la unu afero, kiu ne estus permesita ĉi tie estis laboristgvidanto kiu ŝatas rampi al la piedoj de blankaj virinoj. Ĉu tio estis vere tio, kion li volas fari? Li prenis la binoklon, stumblante kontraŭ iuj novaj sendoj de enladigita bovaĵo.

La unuajn kelkajn noktojn ĉiuj aliaj rigardis ankaŭ. Li povis vidi ilin ĉe iliaj fenestroj. Sed post unu semajno tio estis plejparte li. Preskaŭ ĉiuj rigardus dum mallonga tempo, sed nur li rigardadis. Rolly ekstremis, kiam li pripensis ke iu el ili malkaŝiĝus lin.

Li komencis rimarki aferojn dumtage, ke li neniam rimarkis antaŭe. Merle havis kontuzojn. Pastoro Thomas estis tre san-aspekta sub sia lozaj vestaĵoj. Pearl Cartwright aspektis soleca.

Sed Rolly ekalkutimiĝis al sia propra nevidebleco. Li parolis nemulte en aŭ ekster renkontiĝoj. Li ne plu societumis nokte sed senbrue iris al sia fenestro. Unu nokton li vekiĝis en la mallumo pro koŝmaro en la formo de fraptitolo sur la Insula Rekordo: AUSTIN SUĈAS BLANKAJN PIEDFINGROJN.

La Rekordo estis tie. Glenis Laws aĉetis hejmon sur la fundo de la monteto. Ĝi estis la plej malbona domo sur la monteto - malnova viktorian-stila kun altkliniĝa tegmento. Antaŭ Eŭnice alvenis, ĝi ŝajnis inklini dek gradojn. Sed ĝi aspektis ne pli malbona post kiam Eŭnice forlasis.

Glenis Laws perlaboris malmultan monon kiel la stelulina kaj vere nur raportisto ĉe la Rekordo, kaj ŝi ne ŝatis siajn najbarinojn kiuj konstruis novajn domojn kaj ne devis barakti supren el Strato Malsupra-Allentown. Precipe ŝi memoris ke la DLM-o, malgraŭ sia sendependecaj promesoj, ne helpis ŝin iri for de la insulo kaj akiri sian diplomon, kaj la NPP-o faris.

Glenis fiksrigardis supren la monteton kaj pripensis pri la enketoj de sia ĵurnalo. La aktuala partio ĉiam profitas el katastrofo ĉar homoj timas, ke se la regantaj politikistoj estis forvoĉdonitaj, ili prenis la eksterlandan helpmonon kun ili. Tamen, la ĉefministro konstante estis malleviĝanta en la enketoj. Kaj kiam elekto venas. Kial li ne uzis la eksteran monhelpon? Kio okazis al la helpmono, pri kiu ili estis fanfaronantaj?

Ŝi fiksrigardis supren la monteton ĉe la maljunulo - jes, por la unua fojo li aspektis kiel maljunulo, en lia flava ĉambrorobo, kun la kolumo alta, antaŭ sia televido. Ĉu homoj estis indignataj pri li ĉar li havas la solan televidon? Ne, kompreneble ne. Tio estis potenco. Oni ne povus turni sin kontraŭ la sola viro sur la insulo kun eksterlanda televidprogramado.

Ŝi demandis al la opinisondistoj de la Rekordo kial la ĉefministro falis tiom kaj li diris "perdo de mistiko." Ekde la uragano, ĉiuj en la rumtrinkejo estis ridantaj pri la ĉefministro en sia ĉambrorobo rigardanta usonajn dramseriojn. Tio neniam estis lia bildo. Ŝi parolis kun sia fonto en la partio, la financa ministro, kiu diris ili ĉiuj estas konsciaj pri la problemo. Sed neniu kuraĝis diri al la ĉefministro, ke ili ĉiuj estas rigardantaj lin en lia ĉambrorobo nokte. "Mi ne volus esti tiu, kiu diras al li tion," diris la financministro kun afabla rideto. Glenis Laws ne konfidis la financan ministron, sed ŝi ne povis kompreni kial la ĉefministro ne uzis la reliefon pro la baldaŭaj elektoj.

Nokto falis. La senvestigitaj branĉoj fariĝis nigraj ungegoj kontraŭ la malrapide malheliĝanta varmega korala ĉielo. Kiel la insulo ekmalaperis, la lumoj sur ĉi tiu unu sinpovigita monteto ekaperis. La disvolviĝa virino estis hejme. Sed ŝi ŝajnis esti sola. La turisma ministro kaj Fraŭlino Beryls estis nur parolantaj kaj trinkantaj bieron. La financa ministro ne estis hejme. Lia edzino estis ĉe la fenestro kun binoklo rigardanta la foran deklivon kiun Rolly ne povas vidi. Ŝi devis esti rigardanta la domon de Sarah Bellot. Fulmo de kolero leviĝis en Rolly. Nur penso. Kion ŝi regardis ĉe la domo de Sarah? Kion Sarah faris hodiaŭ vespere? Kial estis tiu domo la unu domo kiun li ne vidas? Kompreneble Sarah estis ĉe lia domo ĉiutage laboranta kaj kolere gapanta al li. Kial do li zorgas pri tio, kion la edzino de la financa ministro rigardis?

Rolly estis ordinara viro. Ĉiuj en la politiko ŝercis pri tiel, kiel seninteresa Rolly Austin estis. Lia realigo estis, ke li donis al banaleco estimon en politiko. La ĉefministro elektis lin pro lia banaleco. La ĉefministro ne ŝatis la ambician financon ministron, kiu montris tro klare, ke li volas anstataŭi lin. La ĉefministro eĉ diris ĝin. "La am-afero de sendependeco estas finita, kaj nun estas tempo por la DLM-o turni sin al ordinaraĵ homoj por solvi la ordinaraĵn problemojn de ĉiutaga vivo."

La ĉefministro ne estis ordinara, nek estis lia antaŭulo. Nek estis la du gvidantoj de la opozicio kiujn la NPP-o estis produktitaj. Ili estis elstaraj atletoj, renomaj amantoj, instigantaj oratoroj. La ĉefministro en lia juneco estis bovingisto por la Okcidentaj Indioj. La opozicia gvidanto kantis tiel bone ke li surbendigis iujn diskojn kun sia tria edzino, brita regea stelulino, kiun li renkontis ĉe koncerto kaj emocie superfortis. Ĉi tiuj estis ĉiuj homoj, kiuj povis emocie superforti homojn. Kaj nun, iel, Rolly metis sin en loko preni ilian lokon.

La ĉefministro pensis ke Rolly povus plenumi la enuigajn aferojn de bona registaro dum homoj memoris lian propran lerton kun iom da nostalgio. La ĉefministro, kio ajn estis liaj atingoj, estis legendo, kaj li ne deziras esti sukcedita per alia legendo. Li opiniis ke estus bone por sia lando kaj sia reputacio, se la plej bona vortoj, kiun oni

povus diri pri lia posteulo, estis: "Li estis kompetenta," vorto prave aŭ malprave oni neniam uzis lige kun la ĉefministro. Elektante la ĝustan posteulon estis la ŝlosilo akiri la ĝustan lokon en historio.

Rolly maltrankvilis ke post la ĉefministro malaperis kaj li estis sola, neniuj apogus lin, ĉar li estis tiel ordinara. Sed nun ĝi ŝajnis ke li ne estas ordinara ajn. Li estis perversulo. Rigardemulo. Viro, kiu spionis nudan blankan virinon kaj volis suĉi ilian rozkolorajn piedfingrojn. Ĉu tio estis vere fiigita? Ĉu tio ne estis nur ŝato? Ĉu inklino?

Kaj nun nova degenera fazo de lia malsano alvenis. Degenera. Ĝuste. Profundiĝo de la perverseco. Rolly kredis nur malfacile ke tiu estas li, Rolly Austin, en tia situacio. Se li estis ŝokanta sin mem, kio farus ... Tiu ŝajnis esti alia iu, kiun li observis - alia iu, kiu fakte ŝtelis la ŝuon.

Li rigardis time la amason da litkovriloj sub kiu ĝi estis kaŝita. Almenaŭ ĝi estis kaŝita. Kio se iu trovis ĝin? Sarah povis trovi ĝin tie. Li palpserĉis tra la amaso kaj ĝi estis ankoraŭ tie - nigra ledo, fremda-farita maldekstra ŝuo. De tiam, kiam li prenis ĝin, li vivis en timo pri malkovro. Li eĉ ne povis ĝui ĝin. Ĉu ĝui ĝin? Pri kio li estis parolanta? Estis nenio ĝui. Li havus remetinta ĝin se li povus. Sed tio estus tro danĝera. Kiam ŝi estis reveninta al la rando de la vojo, ŝi povis trovi nur unu. Sendube ŝi estis scivolanta pri ĝi ekde tiam. Ŝi verŝajne ne povis imagi. Kio posedis lin? Kial li ŝtelis ĝin?

Ne, li subite ekkonsciis. Ŝi sciis. Tiu estis virino, kies piedoj estis amaĉataj ĉiunokte. Neniu ordinara virino. Eble tio estis la afero, kiu ekscitis lin. Eble li estis normala finfine. Ĉu ne estus normale por ordinara homo voli fari ion neordinaran kun eksterordinara virino?

Havante ĉi tiujn pensojn, li premegis la ŝuon firme kaj tenis ĝin sufiĉe proksime por detekti la odoron de fremda ledo dum la supra haŭto premis kontraŭ lia vango. Li volis faligi ĝin el lia mano, ĵetu ĝin ien. Li ektimis kaj traserĉis sian plenplenigitan domon por loko por kaŝi la ŝuon. Sub la lavadejo? Ne. Kion ili pensus se ili trovas ĝin tie? Kiuj estis ili?

Ie multe for el lia vido. Eble li entombigus ĝin. Ne. Li metus ĝin sub sia lito. Viro en lia posteno devus havi virinan ŝuon aŭ du sub sia lito. Probable la ĉefministro havis multe da virinaj ŝuoj sub sia lito. Estis io malprecize stimulema pri tiu penso.

La disvolviĝa virino verŝajne opiniis ke la reliefa kunordiganto ŝtelis la ŝuon. Sed supozu ke li estis kun ŝi? Cetere, tia virino povas vidi aĵojn. Ŝi scius. Ŝi vidus lin rigardanta ŝiajn piedojn kaj ŝi scius. Li tenegis sian binoklon kaj turnis sin maltrankvile al sia fenestro.

La disvolviĝa virino estis ankoraŭ sola, surportanta grandan T-ĉemizon, sia hararo envolvita en mantuko, kaŭris en angulo leganta libron, siaj piedoj metis sub si. Ĝi estis blua libro. Ĝi estis la rekvizicia libro. Ŝi estis studanta la rekviziciojn - ekzamenanta tiujn, kiuj ordonis binoklojn. Rolly platigis sin kontraŭ la malhela muro.

Ne, multaj el ili ordonis binoklojn. Li elrigardis denove. La ĉefministro estis en sia domo. Li ne rigardis televidon. Eble ne ekzistis dramserioj ĵaŭdon. Anstataŭe, li estis svinganta siajn manojn kaj turniĝanta sin, kvazaŭ alpreĝi spiritojn. Rolly vidis, ke la financa ministro estis tie. Li do ne estis kun Sarah tiukaze. Tiam li vidis, ke Sarah estis tie ankaŭ. Ili estis havantaj ian renkontiĝon sen li. Ĉu pri li? Ĉu ili iel trovis ion pri li? Ĝi estis Sarah. Ŝi sciis. Eble ŝi trovis la ŝuon.

Alia homo estis tie ankaŭ. Rolly provis reĝustigi sian binoklon. Subite, la ĉefministro senpacience prenis sian propran binoklon kaj skanis malsupren la monteton, haltante ĉe la fenestro de Rolly. Rolly konsciiĝis, ke ili rigardis fikse unu la alian. Ĉu la ĉefministro ĉiam rigardadis lin?

Sammomente, ambaŭ Rolly kaj la ĉefministro demetis liajn binoklojn. Rolly ne konsciis ke, starante en sia fenestro, li estis brilanta, elmontrita en la pala lumo de granda blanka luno. Li volis rigardi la ĉefministron, sed li ne kuraĝis repreni la binoklon denove. Eĉ de malproksime, li povis vidi la senpaciencon ticon de la

ĉefministro. Per troigita svingo de la brako, li gestis al Rolly ke li iru supren la monteton.

Rolly veturis per la longa vojo al la domo de la ĉefministro. Ĉu ili vere estis dirontaj ĝin? Ĉu ili estis postulontaj ke li klarigu sin? Li esperis trankvilan degradiĝon. La malnova angla maniero, kie nenio estis iam dirita sed oni sciis ke la kariero estis blokita. Malgraŭe, tio estus sciigita ĉie en la insulo en ĉiu rumtrinkejo. Estus kantoj kaj ekzistus epidemio de piedfingraj ŝercoj

La domo de la ĉefministro estis konstruita malalta, kaj ĝis Eŭnice, neniu povis eĉ vidi ĝin. La teroj ankoraŭ estis kovritaj per stakoj de konstruaj materialoj. Ridetanta ĉefministro salutis lin per glaso da ĉampano, dirante, "importita ĉampano, Rolly?" Ĉiuj ĉiam parolis tiel sur la insulo: "Importita ĉampano." "Havu iom da importita viskio." "Ĉarma importita aŭto." Kvazaŭ estis hejmaj aŭtoj aŭ insula ĉampano.

La ĉampano ne estis bona signo. La ĉefministro estis kultivita bildon de alta vivo, kaj ju pli maltrankviligita li sentis sin, des pli li provis dandi tian vivon. La financa ministro, alta kaj maldika, maĉante siajn ungojn, fiksrigardis malsupren la nudan monteton. Rolly povis vidi sian propran mallumigitan fenestron. Kia ĉefministro estus la financministro, mordante la ungojn? Speciala Konsilistino Sarah Bellot estis evitanta la rigardon de Rolly. Aŭ ĉu li estis evitanta ŝian?

La ĉefministro metis patran brakon ĉirkaŭ la ŝultrojn de Rolly Austin kaj marŝis lin for de la aliuloj. "Permesu ke mi diros ĉi tion tre simple. Rolly, knabo, vi estis trovita."

Rolly sentis sin malsana. "Sinjoro, mi ..."

"Aŭskultu, Rolly, mankas tempo por tio. Iel Glenis Laws eltrovis tion, kion vi kaŝis en via domo. Tio aperos en la Rekordo proksimsemajne. Estas do nur unu ago fari. Forpelu ĝin. Faru ĝin hodiaŭ nokte. "

"Jes, sinjoro. Kio pri la"

La ĉefministro krakis sian manplaton al la dorso de Rolly. "Nur faru ĝin, homo." La ĉefministro ridetis varme. "Kiam infere la didamnitaj folioj kreskos reen?" Li subite saltis al la teraso. "Ni havas paperon kovri. Kie diable estas Fraŭlino Beryls!"

"Ŝi estas ankoraŭ kun la turisma ministro, sinjoro," diris Sarah Bellot.

"Kiam ili estos finitaj kun ĉiu tio!" diris la senpacienca ĉefministro.

Mi kontrolos, sinjoro," diris la financministro, kaj, prenante la binoklon, li elpaŝis sur la terason.

Rolly veturis malsupren al la fundo de la monteto, turnis dekstre, kaj poste grimpis duondaŭre supren denove al sia domo. Sen lumenŝaltiĝo, li palpserĉis sub sia lito ĝis li trovis la nigran ŝuon, kiun li rapide ŝovis en sian ĉemizon. Li veturis laŭ la suda marborda vojo, pensante ke li ĵetus ĝin en la oceanon. La fluo en la sudo moviĝis for de la insulo. Se la ŝuo ne subakviĝis, ĝi alvenus en Miamio.

Sed ne plu estis trankvila loko en la suda marbordo. La tuta marbordo fariĝis rifuĝinta tendaro de plejparte memfaritaj budoj kaj tendarfajroj. Li do rondiris al la norda marbordo. Li remetis la ŝuon tie, kie li trovis ĝin ĉe Golfeto Kajman, kie homoj banis sin en la trankvila akvo, kio estis tiu, kiun la disvolviĝa virino estis faranta kiam li trovis siajn ŝuojn.

Li parkis sian aŭton kaj eliris, serĉas lokon apud la vojflanko por faligi la ŝuon. Sed li ekkonsciiĝis, ke la mallarĝaj bero laŭ la lunlumigita plaĝo pleniĝis per bangastoj. Estis brilaĵaĉita lunardanta nokto. Paro alproksimiĝis al li dum li hezitis kun la ŝuo ankoraŭ en sia mano.

Per inversa ĵeteto, la ŝuo flugrenversadis super la kanoj. Tio estis la fino de ĝi, kaj li saltis reen en sian aŭton kaj forveturis - eĉ ne aŭdinte la surprizitan grunton de la katastrofa reliefa kunordiganto,

kiu sidis sur la strando, konsiderante vesperan naĝon, ĝuante la varman insulan vesperon.

La kunordiganto tuj kaj ameme rekonis la ŝuon. Li tenegis ĝin pasie, ĉi tiun grandiozan artefakton de sekretaj momentoj, tenante ĝin kontraŭ sia vango, memorante multajn aferojn, kiel la tempoj kiujn ili pasigis kune en ĉi tiu sama loko. Li estus lasonta baldaŭ, ironta reen al sia edzino en Marilando. Tio estis kie ŝi perdis la alian ŝuon dum tiu mirinda posttagmezo. Ŝi estis kolera, diris ke ili estis bonaj ŝuoj kaj oni ne povas fidi insulanojn plu, la turismo igis ke ili ĉiuj estas tiel. Ŝi diris deklarojn kiujn ŝi ne estu dirinta, sed ŝi estis kolera pri la ŝuo.

Li frotis la ŝuon tenere kaj ridetis, pensanta pri ĉi tiu malbonhumora virino kiu veturis ĉi tien por ĵeti ŝian senutilan alian ŝuon al li. Unu nokto for kaj ŝi jam sentis la foreston de li. Li devu doni ĝin reen, tamen. En la okazo se la alia ŝuo reaperus.

Rolly Austin bone dormis. Li konsciiĝis, ke la apudesto de tiu ŝuo en sia domo ĝenis sian dormon. Nun li povis dormi kun la kvieteco de senkulpeco.

Ĝis la Rekordo elvenis.

Estis nenio pri ŝuoj aŭ piedoj, sed estis plena frontpaĝa rakonto pri kiel Ŝtata Sekretario Rolly Austin estis stokanta reliefajn provizojn en sia hejmo, presanta la bildon de la ĉefministro kaj partian logon sur la aĵojn. La plano, kiel la Rekordo rivelis, estis tenadi la provizojn kaj poste disdoni ilin kun la novaj markoj tuj kiam la elektoj estis anoncataj. La ĉefministro neis la raporton. "En ĉi tiu horo de nacia katastrofo, dum nia popolo estas ankoraŭ senhejma kaj kaŭras en litkovriloj ĉe la suda marbordo, la NPP-o uzas la homan tragedion por fari malaltan politikon."

La ĉefministro estis bona. Ĉiuj devis admiri lin. Sed tiam, mirinde, inspekto de la hejmo de Rolly Austin montris, ke la provizaĵoj estis ankoraŭ tie kun la logo kaj bildo ŝablonitaj. La ĉefministro, viro de granda karaktero kiu estis ĉiam lojala al siaj amikoj, staris

ĉe Rolly Austin kiam li klarigis al la gazetaro ke "ni ĉiuj estis ŝoketitaj iomete fare de la uragano. Austin estas dediĉita publika servisto sed li nur ne pripensadis klare pro la malordo de Eŭnice. Estas home erari." Li tiam, de subite larĝigiita malproksim-angulo de sia okulo, pafis duon-sekundan rigardeton murdeman en la direkton de Rolly kaj donis al li varman manon sur lia dorso. Rolly povis vidi la dorsofrapeton kiu venis malantaŭe kiel grandega mano fortrafanta lian politikan estontecon. Tamen, li sentis sin trankviligita. Almenaŭ li ne estis elmontrita kaj humiligita. Anstataŭe, li nur estis akuzita pri la malĝusta direktado de eksterlanda helpo, respektinda politika krimo, la speco de karno-kaj-sanga afero kiun lia popolo komprenus ĝustatempe.

La ĉefministro devis voki elektojn, kaj la NPP-o gajnis tri el kvin paroĥojn. Eĉ la ĉefministro perdis sian sidlokon.

La DLM-a partikonferenco nomis la eksan financon ministron esti partiestro. La nova partiestro deklaris ke Sarah Bellot estu partia sekretario, kaj ŝi ŝajnis esti en linio por ministerio se la DLM-o regajnus regnon, kiu ŝajnis verŝajne, ĉar Rekordaj opinisondoj montris, ke la publiko jam estis seniluziigita ke katastrofa reliefo ne pliboniĝas sub NPP-a gvidado.

La folioj kreskis reen.

Rolly Austin iĝis direktoro de la Asocio de Fabrikantoj.

La katastrofa reliefa kunordiganto revenis al Marilando. Lia edzino entuziasme renkontis lin ĉe la flughaveno. "Kia ekscita tempo vi devis havi. Diru al mi ĉion." Li metis sian brakon ĉirkaŭ ŝin dum ili marŝis al la aŭto. "Mi diros," li diris varme, kun la senjunta ritmo de viro kiu estis en politikaj arenoj.

La disvolviĝa virino neniam trovis sian mankintan ŝuon.

Ĉu la Damo aŭ la Tigro?

Frank Stockton

Traduko: Barry Friedman

En la tre antikva epoko loĝis duon-barbara reĝo, kies ideoj, kvankam iom poluritaj kaj akritaj per la progresemo de malproksimaj latinaj najbaroj, estis ankoraŭ grandaj, floraj kaj senbridaj, estis kongruita al la duono de li, kiu estis barbara. Li estis viro de gajemega fantazio, kaj, kune kun tio, de aŭtoritato tiel nerezistebla, ke laŭ sia volo li transformis siajn diversajn fantaziojn en faktojn. Li estis tre inklinita al mempensado, kaj, kiam li kaj li mem konsentis pri io, la afero estis farita. Kiam ĉiu membro de liaj enlandaj kaj politikaj sistemoj glate moviĝis en sia asignita kurso, lia naturo estis banala kaj afabla; sed, iam ajn estis malgranda problemeto, kaj iuj el liaj astroj foriris el iliaj orbitoj, li estis eĉ pli banala kaj pli afabla, ĉar nenio plaĉis al li tiom, kiom fari la malrektajn rektajn kaj dispremi neegalaĵojn.

Inter la pruntitaj nocioj, per kiuj lia barbareco modifis, estis tio de la publika areno, en kiu, per ekspozicioj de vireca kaj besteca valoro, la mensoj de liaj regatoj estis rafinitaj kaj kultitaj.

Sed eĉ ĉi tie la gajemega kaj barbara fantazio manifestiĝis. La areno de la reĝo estis konstruita, ne por doni al la homoj ŝancon aŭdi la rapsodojn de mortantaj gladiatoroj, nek ebligi ilin vidi la neeviteblan konkludon de konflikto inter religiaj opinioj kaj malsataj makzeloj, sed por celoj, kiuj estis multe pli taŭgaj plilarĝigi kaj evoluigi la mensajn energiojn de la homoj. Ĉi tiu vasta amfiteatro, kun ĝiaj ĉirkaŭantaj galerioj, ĝiaj misteraj volboj, kaj ĝiaj nevidataj pasejoj, estis agento de poezia justeco, en kiu krimo estis punita, aŭ virto rekompencita, per la dekretoj de senpartia kaj nekoruptebla ŝanco.

Kiam homo estis akuzita pri sufiĉe grava krimo por interesi la reĝon, estis publika sciigo, ke en elektita tago la sorto de la akuzito estus decidita en la areno de la reĝo, strukturo, kiu vere meritis sian nomon, ĉar, kvankam ĝia formo kaj plano estis pruntita de malproksimo, ĝia intenco emanis nur el la cerbo de ĉi tiu viro, kiu, estante tuta reĝo, sciis neniun tradicion, al kiu li ŝuldis pli da fideleco ol plaĉi al sia fantazio, kaj kiu enŝovita en ĉiun adoptitan formon de homa penso kaj ago la riĉan kreskadon de sia barbareca idealismo.

Kiam ĉiuj homoj kunvenis en la galerioj, kaj la reĝo, ĉirkaŭita de lia korteganoj, sidis alte sur sia trono de reĝa ŝtato sur unu flanko de la areno, li donis signalon, pordo sub li malfermiĝis, kaj la akuzito elpaŝis en la amfiteatron. Ĝuste kontraŭ li, ĉe la alia flanko de la enfermita spaco, estis du pordoj, precize similaj unu-al-aliaj kaj flank-al-flankaj. Estis la devo kaj la privilegio de la juĝito marŝi rekte al ĉi tiuj pordoj kaj malfermi unu el ili. Li povis malfermi ajnan pordon, kiun li volis; li estis submetita al neniuj gvidado aŭ influo krom tiu de la antaŭdirite senpartia kaj nekoruptebla ŝanco. Se li malfermus unu pordon, eliĝus el ĝi malsata tigro, la plej furioza kaj plej kruela, kiun oni povis havigi, kiu tuj saltus sur lin kaj disŝirus lin je pecetoj kiel puno por lia kulpo. Tiumomente, kiam la proceso de la krimulo estis tiel decidita, funebraj feraj sonoriloj estis batataj, grandaj vekrioj supreniris de la dungitaj funebrantoj asignitaj esti ĉe la ekstera rando de la areno, kaj la vasta spektantaro, kun klinitaj kapoj kaj tristigitaj koroj, malrapide vagis hejmen, lamentante multe, ke homo tiel juna kaj beleta, aŭ tiel maljuna kaj respektata, devis meriti tiel tragikan sorton.

Sed, se la akuzito malfermis la alian pordon, el ĝi eliris sinjorino, la plej taŭga por liaj jaroj kaj rango, kiun la reĝa moŝto povis elekti inter siaj noblaj regatoj, kaj al ĉi tiu sinjorino li tuj geedziĝis, kiel rekompenco de sia senkulpeco. Ne gravis, ke li eble jam posedis edzinon kaj familion, aŭ ke liaj korinklinoj povis esti engaĝitaj sur objekto de sia propra elekto; la reĝo ne permesis tiajn subordajn aranĝojn malhelpi sian grandiozan skemon de venĝo kaj rekompenco. La nupto, kiel en la alia kazo, okazis tuj, kaj en la

areno. Alia pordo malfermiĝis sub la reĝo, kaj pastro, sekvata de grupo de ĥoristoj, kaj dancantaj knabinoj blovantaj ĝojan melodiojn sur oraj kornoj kaj tretantaj nuptstile, antaŭeniris al tie, kie la paro staris, unu apud la alia, kaj la geedziĝo estis rapide kaj ĝoje solenigita. Tiam la gajaj latunaj sonoriloj sonis siajn feliĉajn sonorajn, la homoj kriis gajemajn huraojn, kaj la senkulpa viro, antaŭita de infanoj ĵetantaj florojn sur lia vojo, kondukis sian novedzinon al sia hejmo.

Ĉi tio estis la duon-barbareca metodo de la reĝo por la administrado de justeco. Ĝia perfekta praveco estis memevidenta. La krimulo ne povis scii el tiu pordo venus la damo; li malfermis ajnan pordon, kiu plaĉis al li, sen la plej malgranda ideo, ĉu en la sekvonta momento li estus vorita aŭ edziĝinta. Ifoje la tigro eliris el unu pordo, kaj ifoje el la alia. La decidoj de ĉi tiu tribunalo estis ne nur justaj, ili estis pozitive definitaj: la akuzito estis tuj punita se li trovis sin kulpa, kaj, se senkulpa, li estis rekompencita tuj, ĉu li ŝatis tion aŭ ne. Ne estis eskapo for de la verdikto de la areno de la reĝo.

La sistemo estis tre populara. Kiam la homoj kunvenis dum unu el la grandegaj prijuĝaj tagoj, ili neniam sciis ĉu ili spektus sangan buĉadon aŭ ridigan geedziĝon. Ĉi tiu ero de necerteco liveris al la okazo intereson, kiun ĝi alimaniere ne povus atingi. La amasoj do estis amuzitaj kaj kontentaj, kaj la pensema parto de la komunumo ne povus akuzi ĉi tiu planon pri maljusteco, ĉar ĉu la akuzito ne havis la tutan aferon en siaj propraj manoj?

Ĉi tiu duon-barbara reĝo havis filinon tiel ekflorantan kiel siaj plej floraj revoj, kaj kun animo tiel fervora kaj imperia kiel sia. Kiel kutime en tiaj kazoj, ŝi estis la pomo de lia okulo, kaj estis amata de li super ĉiu homaro. Inter liaj korteganoj estis junulo de tiu fajneco de sango kaj subeco de rango komunaj al la kutimaj herooj de romano kiuj amis reĝajn virgulinojn. Ĉi tiu reĝa virgulino estis tre kontenta kun sia amanto, ĉar li estis bonaspekta kaj kuraĝa je grado, kiu estis ne transpasita en la tuta regno, kaj ŝi amis lin kun ardo, kiu havis sufiĉe da barbareco en ĝi por fari ĝin treege varma kaj forta. Ĉi tiu amafero daŭris feliĉe dum multaj monatoj, ĝis unu tago la reĝo

ekmalkovris ĝian ekziston. Li nek hezitis nek prikonsiliĝis rilate al sia devo en la situacio. La junulo tuj estis enprizonigita, kaj tago estis selektita por sia proceso en la areno de la reĝo. Ĉi tio kompreneble estis speciale grava okazo, kaj la reĝa moŝto, same kiel ĉiuj homoj, ege interesiĝis pri la funkciado kaj disvolviĝo de ĉi tiu proceso. Neniam antaŭe okazis tia kazo; neniam antaŭe subulo aŭdacis ami la filinon de la reĝo. Dum la postaj jaroj tiaj aferoj fariĝis sufiĉe kutimaj, sed tiam ili estis laŭ neniu gradeto tutnovaj kaj konsternantaj.

La tigrokaĝoj de la regno estis serĉitaj por la plej sovaĝajn kaj malcedemajn bestojn, el kiuj la plej furioza monstro estis elektita por la areno; kaj la vicoj de virgulina junulineco kaj beleco tra la tuta lando estis zorge esploritaj fare de kompetentaj juĝistoj por ke la junulo havu taŭgan novedzinon se la sorto ne determinis por li alian destinon. Kompreneble ĉiuj sciis, ke la ago, per kiu la junulo estis akuzita, estis farita. Li amis la principinon, kaj nek li, ŝi, nek iu alia pensis nei la fakton; sed la reĝo ne priatentus permesi tian fakton perturbi la funkciadon de la tribunalo, en kiu li akiris tiom da ĝojo kaj kontento. Ne gravis kiel la afero finiĝis, la junulo estus forigita, kaj la reĝo gajnus estetikan plezuron per la rigardado de la kurson de la eventoj, kio determinus, ĉu la juna viro faris ion malĝustan, kiam li permesis sin ami la principinon.

La difinita tago alvenis. De lokoj foraj kaj proksimaj homoj kolektiĝis, kaj amasis sin en la grandaj galerioj de la areno, kaj svarmoj, nekapablaj gajni eniron, amasis sin kontraŭ ĝiaj eksteraj muroj. La reĝo kaj lia korteganoj estis en siaj lokoj, kontraŭe de la ĝemelaj pordegoj, tiuj fatalaj portaloj, tiel teruraj je ilia simileco.

Ĉio estis preta. La signalo estis donita. Pordo sub la reĝa anaro malfermiĝis, kaj la amanto de la principino promenis en la arenon. Alta, bela, blonda, lia aspekto estis bonvenigita per mallaŭta zumado de admiro kaj maltrankvilo. Duono de la spektantoj ne konis, ke tia imponega junulo loĝis inter ili. Ne estis miraklo, ke la principino amis lin! Kia terura afero, ke li estis tie!

Dum la junulo antaŭenis en la arenon, li turnis sin, laŭ kutimo, por klini sin al la reĝo, sed li tute ne pensis pri tiu reĝa gravulo. Liaj okuloj estis fiksitaj al la princino, kiu sidis dekstre de sia patro. Se ne estus barbarecoparto en ŝia karaktero, verŝajne tiu sinjorino ne estus tie, sed ŝia intensa kaj fervora animo ne permesus ke ŝi estus foresta je okazo, en kiu ŝi tiom interesiĝis. Ekde la momento, kiam la dekreto eliris, ke ŝia amanto decidus sian sorton en la areno de la reĝo, ŝi pensis pri nenio, nokte aŭ tage, krom ĉi tiu grandega evento kaj la diversaj temoj ligitaj al ĝi. Havante pli da potenco, influo, kaj forto de karaktero ol iu, kiu iam antaŭe estis interesinta en tia kazo, ŝi faris tion, kion neniu alia faris - ŝi lernis la sekreton de la pordoj. Ŝi sciis, en kiu el la du ĉambroj, trovitaj malantaŭ tiuj pordoj, staris la kaĝo de la tigro, kun ĝia malfermita fronto, kaj en kiu atendis la sinjorino. Tra ĉi tiuj dikaj pordoj, peze kurtenitaj per haŭtoj interne, estis neeble, ke iu ajn bruo aŭ sugesto venus de interne al la homo kiu alproksimiĝus por levi la riglilon de unu el ili. Sed oro, kaj la potenco de virina volo, venigis la sekreton al la princino.

Kaj ne nur ŝi sciis, en kiu ĉambro staras la damo, kiu estis preta emerĝi, tute ruĝiĝanta kaj brilanta, se sia pordo estus malfermita, sed ŝi sciis, kiu estas la damo. Ŝi estis unu el la plej blondaj kaj plej ravaj el la junulinoj de la kortego, kiu estis elektita kiel la rekompenco por la akuzita junulo, se li estus pruvita senkulpa pri la krimo de aspiro al iu tiel malproksima super li; kaj la princino malamamis ŝin. Ofte ŝi vidis, aŭ imagis, ke ŝi vidis, ĉi tiun blondan homaĉon ĵetante ekrigardojn de admiro al la persono de ŝia amanto, kaj foje ŝi opiniis, ke ĉi tiuj ekrigardoj estis perceptitaj, kaj eĉ redonitaj. De tempo al tempo ŝi vidis, ke ili interparolis; tio estis nur dum momento aŭ du, sed multe oni povas diri en mallonga spaco; tio eble estis pri plej bagatelaj temoj, sed kiel ŝi povus scii tion? La knabino estis ĉarma, sed ŝi aŭdacis levi sian okulojn al la amato de la princino; kaj kun la tuta intenseco de la sovaĝa sango transdonita al ŝi per longaj linioj de tute barbaraj prapatroj, ŝi malamamis la virinon, kiu ruĝiĝis kaj tremis malantaŭ tiu silenta pordo.

Kiam ŝia amanto turnis sin kaj rigardis ŝin, kaj lia okulo trafis ŝiajn dum ŝi sidis tie, pli pala kaj pli blanka ol ĉiuj en la vasta oceano

de maltrankvilaj vizaĝoj ĉirkaŭ ŝi, li vidis, per tiu potenco de rapida percepto, kiu estas donita al ties, kies animoj estas unu, ke ŝi sciis malantaŭ kiu pordo la tigro kaŭris, kaj malantaŭ kiu la damo staris. Li anticipis, ke ŝi sciis ĝin. Li komprenis ŝian naturon, kaj lia animo estis certigita, ke ŝi neniam ripozus ĝis ŝi informiĝis pri tiu afero, kaŝitan al ĉiuj aliaj rigardantoj, eĉ al la reĝo. La sola espero por la junulo, en kiu estis iu ajn ero de certeco, baziĝis sur la sukceso de la princino malkovri de ĉi tiu mistero; kaj en la momento kiam li rigardis ŝin, li vidis, ke ŝi ja sukcesis, ĉar en sia animo li sciis, ke ŝi sukcesus.

Tiam estis, ke lia rapida kaj maltrankvila ekrigardo demandis: "Kiu?" Estis tiel klare al ŝi kvazaŭ li kriis ĝin de kie li staris. Ne estis momento esti perdita. La demando estis demandita fulmrapide; ĝi devis esti respondita same.

Ŝia dekstra brako kuŝis sur la kusenita parapeto antaŭ ŝi. Ŝi levis sian manon, kaj faris iometan, rapidan movon dekstren. Neniu krom ŝia amanto vidis ŝin. Ĉiu okulo krom lia estis fiksata sur la viro en la areno.

Li turnis sin, kaj kun firma kaj rapida paŝo li piediris trans la malplena spaco. Ĉiu koro ĉesis bati, ĉiu spiro estis tenata, ĉiu okulo estis fiksata nmoveble al tiu viro. Sen la plej eta hezito, li iris al la pordo dekstra, kaj malfermis ĝin.

Nun, la ĉefpunkto de la rakonto estas jene: ĉu la tigro eliris el tiu pordo, aŭ ĉu la damo?

Ju pli ni pripensas ĉi tiun demandon, des pli malfacile respondi. Koncerniĝas studo de la homa koro, kiu kondukas nin tra ruzaj labirintoj de pasio, el kiuj malfacilas trovi nian vojon. Pensu pri ĝi, justa leganto, ne kvazaŭ la decido de la demando dependus al vi mem, sed al tiu varmeg-sanga, duon-barbara princino, ŝia animo je blanka ardo sub la kombinitaj fajroj de malespero kaj ĵaluzo. Ŝi perdis lin, sed kiu havu lin?

Kiel ofte, dum ŝia vekiĝantaj horoj kaj en ŝiaj sonĝoj, ŝi ektimis je senbrida hororo, kaj kovris sian vizaĝon per siaj manoj dum ŝi pripensis pri ŝia amanto malfermante la pordon, ĉe la alia flanko de kiu, atendis la kruelaj dentegoj de la tigro!

Sed kiom pli ofte ŝi vidis lin ĉe la alia pordo! Kiel en ŝiaj doloraj revoj ŝi grincis siajn dentojn, kaj disŝiris siajn harojn, kiam ŝi vidis lian komencon de ekstaza ĝuego dum li malfermis la pordon de la damo! Kiel ŝia animo brulis je agonio kiam ŝi vidis lin rapidi renkonti tiun virinon, kun ŝia ekruĝanta vango kaj kristalopura okulo de triumfo; kiam ŝi vidis lin konduki ŝin antaŭen, lia tuta kadro flamigita per la ĝojo de reakirita vivo; kiam ŝi aŭdis la gajajn kriojn de la homamaso, kaj la sovaĝan sonadon de la feliĉaj sonoriloj; kiam ŝi vidis la pastron, kun liaj ĝojaj sekvantoj, antaŭenirante al la paro, por igi ilin esti geedzantojn antaŭ ŝiaj propraj okuloj; kaj kiam ŝi vidis ilin forpiediri kune sur ilia vojeto de floroj, sekvata de la grandegaj kriegoj de la gajega homamaso, en kiu ŝia unu desperanta kriĉo estis perdita kaj dronita!

Ĉu ne estus pli bone por li, ke li mortu tuj, kaj iru atendi ŝin en la benitaj regionoj de duon-barbara estonteco?

Kaj tamen, tiu abomeninda tigro, tiuj ekkriegoj, tiu sango!

Ŝia decido estis indikita en momento, sed ĝi estis farita post tagoj kaj noktoj de angora pripensado. Ŝi sciis, ke ŝi estos demandita, ŝi decidis tion, kion ŝi respondos, kaj sen la plej eta hezito ŝi movis sian manon dekstren.

La demando de ŝia decido estas demando, kiun oni ne frivole konsideru, kaj ne estas al mi pretendi starigi min esti la unu persono kapabla respondi al ĝi. Kaj do mi lasas ĝin al vi ĉiuj: kiu elvenis el la malfermita pordo - la damo, aŭ la tigro?

Okazo ĉe Ponto Strigroja

Ambrose Bierce

Traduko: Barry Friedman

I

Viro staris sur fervoja ponto en norda Alabamo, rigardante malsupren en la rapidan akvon dudek futojn sube. La manoj de la viro estis malantaŭ lia dorso, la pojnoj ligitaj per kordo. Ŝnuro mallarĝe ĉirkaŭvolvis lian kolon. Ĝi estis alligita al dika kruc-ligno super lia kapo kaj la loza parto falis ĝis la nivelo de liaj genuoj. Iuj malfiksaj tabuloj metitaj sur la ŝpaloj subtenantaj la metalojn de la fervojo provizis bazon por li kaj liaj ekzekutistoj - du privataj soldatoj de la Federacia armeo, direktitaj de serĝento, kiu en la civila vivo eble estis deputito-ŝerifo. Ĉe malgranda distanco sur la sama provizora platformo estis oficiro en la uniformo de sia rango, armita. Li estis kapitano. Sentinelo ĉe ĉiu fino de la ponto staris kun sia fusilo en la pozicio konata kiel "subteno", tio estas vertikala antaŭ la maldekstra ŝultro, la martelo ripozanta sur la antaŭbrako ĵetita rekte trans la bruston -- formala kaj nenatura pozicio, deviganta rektan teniĝon de la korpo. Ne ŝajnis devo de ĉi tiuj du viroj scii, kio estis okazanta ĉe la centro de la ponto; ili nur blokis la du finojn de la piedplanko, kiu trairis ĝin. Preter unu el la sentineloj neniu estis videbla; la fervojo rekte iris en arbaron por cent jardoj, poste kurbiĝinte, kaj estis perdita al vido. Sendube estis pikado pli malproksime. La alia bordo de la rojo estis nefermita tero --milda supreniro kovrita de baraĵo da vertikalaj arbaraj trunkoj, kun paftuoj por fusiloj, kun sola embrazuro tra kiu eliris la buŝego de latuna kanono, kiu komandis la ponton. Meze de la deklivo inter la ponto kaj fortikaĵo estis la spektantoj -- unu kompanio de infanterio en linio, je "parad-ripozo", la pafilstumpoj de la fusiloj sur la tero, la paftuboj kliniĝantaj iomete malantaŭen kontraŭ la dekstra ŝultro, la manoj

krucitaj sur la kolboj. Leŭtenanto staris dekstre de la linio, la punkto de lia glavo sur la tero, la maldekstra mano apoganta sur la dekstra. Escepte la grupon de kvar en la centro de la ponto, neniu viro moviĝis. La kompanio alfrontis la ponton, fiksrigardante ŝtoneme, senmove. La sentineloj, alfrontantaj la bordojn de la rivereto, eble estis statuoj por ornamo la ponton. La kapitano staris kun krucitaj brakoj, silente, observante la laboron de siaj subuloj, sed farante neniun signon. Morto estas dignulo, kiu, kiam li venas anoncote, estu ricevita per formalaj manifestoj de respekto, eĉ de tiuj, kiuj plej multe konas lin. En la kodo de milita etiketo silento kaj fikseco estas formoj de respektindeco.

La viro, kiu okupiĝis pri esti pendigita, estis ŝajne ĉirkaŭ tridek kvin jaroj. Li estis civilulo, se oni povus juĝi laŭ lia vesto, kiu estis tiu de plantisto. Liaj trajtoj estis bonaj - rekta nazo, firma buŝo, larĝa frunto, el kiu liaj longaj, malhelaj haroj estis kombinitaj rekte malantaŭen, falante malantaŭ la oreloj al la kolumo de lia bonkonformita frako. Li havis liphararon kaj pintan barbon, sed neniujn vangharojn; liaj okuloj estis grandaj kaj malhelgrizaj kaj havis afablan esprimon, kiun oni apenaŭ atendus en unu, kies kolo estis en la kanabo. Evidente ĉi tiu estis neniu vulgara asaseno. La liberala milita kodo provizas por pendigi multajn specojn de homoj, kaj ĝentlemanoj ne estas ekskluditaj.

La preparado estis kompleta, la du privataj soldatoj retiriĝis kaj ĉiu eliris la tabulon, sur kiu li staris. La serĝento turnis sin al la kapitano, salutis kaj lokis sin precize malantaŭ tiu oficiro, kiu siavice movis sin aparte unupaŝe. Ĉi tiuj movoj lasis la kondamniton viron kaj la serĝenton starantajn sur la du ekstremoj de la sama planko, kiuj etendiĝis je tri el la ŝpaloj de la ponto. La fino, sur kiu la civilulo staris preskaŭ, sed tute ne, atingis kvaran. Ĉi tiu planko antaŭe estis tenita pro la pezo de la kapitano; ĝi nun estis tenita de tiu de la serĝento. Je signo de la unua, ĉi-lasto deturniĝus, la planko kliniĝus kaj la kondamnito malsuprenirus inter du ŝpaloj. La aranĝo ŝajnis al lia jugado simpla kaj efika. Lia vizaĝo ne estis kovrita, nek liaj okuloj bandaĝis. Li rigardis dummomente sian "ŝanĝiĝeman piedtenon", kaj tiam lasis sian rigardon vagi al la kirliĝanta akvo de la rivereto

kuregante freneze sub liaj piedoj. Peco de dancanta flosligno kaptis lian atenton kaj liaj okuloj sekvis ĝin laŭ la fluo. Kiel malrapide ĝi aperis moviĝi, Kia malvigla rivereto!

Li fermis la okulojn por koncentrigi siajn lastajn pensojn pri siaj edzino kaj infanoj. La akvo, tuŝita al oro per la frua suno, la kovantaj nebuletoj sub la bordoj ĉe iom da distanco laŭ la rivereto, la fortikaĵo, la soldatoj, la peco de flosligno -- ĉio distris lin. Kaj nun li konsciiĝis pri nova perturbo. Frapado tra la penso pri liaj karuloj estis sono, kiun li nek povis ignori nek kompreni, akra, klara, metala perkutado kiel la bato de la martelo de forĝisto sur la amboso; ĝi havis la saman tinkvaliton. Li scivolis, kio ĝi estas, kaj ĉu senmezure malproksima aŭ proksima, - ĝi aspektis ambaŭ. Ĝia ripetado estis regula, sed tiel malrapida kiel la sonorado de morta sonorilo. Li atendis ĉiun frapon kun senpacienca kaj -- li ne sciis kial - anksieco. La intertempoj de silento pli kaj pli longiĝis, la prokrastoj frenezigiĝis. Kun ilia pli granda malofteco la sonoj pliiĝis en forto kaj akreco. Ili doloris lian orelon kiel la ekpuŝo de tranĉilo; li timis, ke li kriegos. Tio, kion li aŭdis, estis la tiktakado de lia horloĝo.

Li malfermis la okulojn kaj vidis denove la akvon sub li. "Se mi povus liberigi miajn manojn," li pensis, "mi eble elĵetos la maŝon kaj saltos en la rivereton. Per plonĝo mi povos eviti la kuglojn kaj, naĝante vigle, atingi la bordon, iri al la arbaro kaj foriĝi hejmen. Mia hejmo, dankon al Dio, estas ankoraŭ ekster iliaj linioj; mia edzino kaj malgranduloj ankoraŭ estas preter la plej malproksiman antaŭeniron de la invadanto. "

Dum ĉi tiuj pensoj, kiuj ĉi tie devas esti skribataj, estis fulmataj en la cerbon de la kondamnita viro anstataŭ evolui el ĝi, la kapitano kapjesis al la serĝento. La serĝento paŝis flanken.

II

Peyton Farquhar estis prospera plantisto, de malnova kaj tre respektata Alabama familio. Estante sklavposedanto kaj kiel aliaj sklavposedantoj politikisto, li estis nature originala secesiisto kaj

arde estis sindediĉata al la Suda kaŭzo. Cirkonstancoj de aroganta naturo, pri kiuj ne estas necesa raporti ĉi tie, malebligis lin servi kun la galanta armeo, kiu batalis la katastrofajn kampanjojn finiĝantajn kun la falo de Korinto, kaj li ĉagreniĝis sub la malgloriga sinreteno, sopirante la liberigon de siaj energioj, la pli granda vivo de la soldato, la ŝanco por distingo. Tiu okazo, li opiniis, venos, kiel tio venas al ĉiuj je milita tempo. Dume li faris tion, kion li povis. Neniu servo estis tro humila por li plenumi por helpi la Sudo, neniu aventuro tro danĝera por li entrepreni se kongrua kun la karaktero de civilulo, kiu estis en fundo soldato, kaj kiu bonfide kaj sen tro da kvalifiko akceptis almenaŭ parton de la malkaŝeme kanajla deklaro, ke ĉio estas justa en amo kaj milito.

Unu vesperon, dum Farquhar kaj lia edzino sidis sur rustika benko proksime al la enirejo de siaj grundoj, grize vestita soldato rajdis al la pordego kaj petis trinkon da akvo. Sinjorino Farquhar estis ja feliĉa servi lin per siaj propraj blankaj manoj. Dum ŝi alportis la akvon, ŝia edzo proksimiĝis al la polva rajdosoldato kaj demandis avide pri novaĵoj de la fronto.

"La Jankioj estas riparantaj la fervojojn," diris la viro, "kaj estas preparantaj alian antaŭeniron. Ili atingis Ponton Strigrojan, ordonigis ĝin kaj konstruis tabulbarilon sur la norda bordo. La komandanto donis ordonon, kiu estas afiŝita ĉie, deklarante ke iu ajn civilulo kaptita malhelpante kun la fervojo, ĝiaj pontoj, tuneloj aŭ trajnoj estos senprokraste pendigitaj. Mi vidis la ordonon."

"Kiom malproksime estas al Ponto Strigroja?" Farquhar demandis.

"Ĉirkaŭ tridek mejlojn."

"Ĉu ne ekzistas taĉmento ĉi-flanke de la rojo?"

"Nur pikedata taĉmento duonmejlon for, sur la fervojo, kaj unu sentinelo ĉe ĉi tiu fino de la ponto."

"Supozu, ke viro -- civilulo kaj studento de pendigado -- povas ĉirkaŭruzi la pikedan taĉmenton kaj eble trompi la sentinelon", diris

Farquhar ridetante, "kion li povus plenumi?"

La soldato reflektis. "Mi estis tie antaŭ unu monato," li respondis. "Mi observis, ke la inundo de la pasinta vintro puŝis grandan kvanton de flosligno kontraŭ la lignopiero ĉe ĉi tiu fino de la ponto. Ĝi nun estas seka kaj brulus kiel filamento."

La sinjorino nun alportis la akvon, kiun trinkis la soldato. Li dankis ŝin ceremonie, klinis sin al lia edzo kaj forveturis. Horon poste, post noktiĝo, li repasis la plantejon, irante norden en la direkton el kiu li venis. Li estis federacia skolto.

III

Dum Peyton Farquhar rekte falis malsupren tra la ponto, li perdis la konscion kaj estis kiel ulo jam mortinta. De ĉi tiu stato, li estis vekita -- eraoj pli poste, ŝajnis al li -- per la doloro de akra premo sur la gorĝo, sekvita de sento de sufokado. Tranĉaj, acerbaj agonioj ŝajnis pafi de lia kolo suben tra ĉiu fibro de lia korpo kaj membroj. Ĉi tiuj doloroj ŝajnis ekbruliĝi laŭ difinitaj linioj de vojforko kaj bati kun nekonceptebla rapida periodeco. Ili ŝajnis kiel torentoj de pulsanta fajro varmiganta lin al netolerebla temperaturo. Koncerne lian kapon, li konsciis pri nenio krom sento de pleneco - de kongesto. Ĉi tiuj sensacoj estis neakompanataj de penso. La intelekta parto de lia naturo jam estis forskrapata; li havis povon nur senti, kaj sento estis turmento. Li konsciis pri moviĝo. Ĉirkaŭita en lumiga nubo, de kiu li nun estis nur la fajrema koro, sen materia substanco, li svingiĝis tra nepenseblaj arkoj de oscilado, kiel vasta pendolo. Tiam ĉiuj samtempe, kun terura subiteco, la lumo ĉirkaŭ li pafis supren kun la bruo de laŭta plaŭdo; timiga muĝado estis en liaj oreloj, kaj ĉio estis malvarma kaj malhela. La potenco de penso estis restarigata; li sciis, ke la ŝnuro rompiĝis kaj li falis en la rivereton. Ne estis plia strangolado; la maŝo pri lia kolo jam sufokis lin kaj tenis la akvon for de liaj pulmoj. Morti de pendiĝado ĉe la fundo de rivero! -- la ideo ŝajnis al li ridinda. Li malfermis la okulojn en la mallumo kaj vidis super si ekbrilon de lumo, sed kiel malproksima, kiel neatingebla! Li estis ankoraŭ sinkanta, ĉar la lumo pli kaj pli malfortiĝis ĝis ĝi estis

nura brileto. Tiam ĝi komencis kreski kaj heliĝi, kaj li sciis, ke li leviĝas al la surfaco -- sciis ĝin kun malvolemo, ĉar li nun estis tre komforta. "Por esti pendigita kaj dronita," li pensis? "tio ne estas tiel malbona; sed mi ne deziras esti mortpafita. Ne; mi ne estos mortpafita; tio ne estas justa."

Li ne konsciis pri la penado, sed akra doloro en la pojno informi lin, ke li penas liberigi siajn manojn. Li donis al la lukto sian atenton, kiel pigrulo eble observus la elfaron de ĵonglisto, sen intereso en la rezulto. Kia superba peno! -- kia grandioza, kia superhoma forto! Ha, tio estis bona klopodo! Bravo! La ŝnuro forfalis; liaj brakoj disiĝis kaj flosiĝis supren, la manoj vidataj malheligitaj ambaŭflanke en la kreskanta lumo. Li rigardis ilin kun nova intereso, kiam unue unu kaj poste la alia alsaltis la maŝon ĉe lia kolo. Ili forprenas ĝin kaj forpuŝas ĝin flanken furioze, ĝiaj ondetoj similantaj al tiuj de akva serpento. "Remetu ĝin, remetue ĝin!" Li pensis, ke li kriis ĉi tiujn vortojn al siaj manoj, ĉar la malfariĝo de la maŝo estis sekvata de la plej terura doloro, kiun li ankoraŭ spertis. Lia kolo doloregis; lia cerbo ekbrulis; lia koro, kiu vibradis feble, faris grandan salton, klopodante devigi sin eksteren ĉe lia buŝo. Lia tuta korpo estis streĉata kaj tordata per nesuperebla angoro! Sed liaj malobeemaj manoj ne atentis la komandon. Ili batis la akvon vigle per rapidaj, malsuprenirantaj frapetoj, devigante lin al la surfaco. Li sentis, ke lia kapo superakviĝas; liaj okuloj estis blindigataj per la sunlumo; lia brusto konvulsie etendiĝis, kaj kun superega kaj kronanta agonio liaj pulmoj ĉirkaŭprenis grandan trablovon da aero, kiun li tuj forpelis kun kriĉo!

Li nun estis en plena posedo de siaj fizikaj sencoj. Ili estis ja supernature akutaj kaj atentaj. Io en la aĉa konsterniĝo de lia organika sistemo tiel altigis kaj rafinis ilin, ke ili registris aferojn neniam antaŭe perceptitajn. Li sentis la sulkojn sur sia vizaĝo kaj aŭdis iliajn apartajn sonojn kiam ili batis. Li rigardis la arbaron ĉe la bordo de la rivereto, vidis la individuajn arbojn, la foliojn kaj la vejnadon de ĉiu folio -- vidis la insektetojn sur ili: la akridojn, la brilkorpajn muŝojn, la grizajn araneojn, kiuj estis etendantaj siajn araneaĵojn de branĉeto al branĉeto. Li rimarkis la prismajn kolorojn

en ĉiuj la rosoj sur miliono herbotrunketoj. La zumado de gnatoj, kiuj dancis super la vorticoj de la rivereto, la batado de la flugiloj de la libeloj, la strekoj de la kruroj de akvo-araneoj, kiel remiloj kiuj levis sian boaton - ĉiuj ĉi faris aŭdeblan muzikon. Fiŝo glitis laŭlonge de liaj okuloj kaj li aŭdis la rapidadon de ĝia korpo apartigi la akvon.

Li venis al la surfaco rigardante laŭ la rivero; dum unu momento la videbla mondo ŝajnis ruliĝi malrapide, li mem estis la pivota punkto, kaj li vidis la ponton, la fortikaĵon, la soldatojn sur la ponto, la kapitano, la serĝento, la du unuaklasaj soldatoj, liaj ekzekutistoj. Ili estis en silueto kontraŭ la blua ĉielo. Ili kriis kaj gesticulis, montrante lin. La kapitano eltiris sian pistolon, sed ne ekpafis; la aliaj estis senarmilaj. Iliaj movoj estis groteskaj kaj teruraj, iliaj formoj gigantaj.

Subite li aŭdis akran bruegon kaj io frapis la akvon vivece ene de kelkaj coloj for de lia kapo, kiu surŝprucigis lian vizaĝon per akvogutetoj. Li aŭdis duan bruegon, kaj vidis unu el la sentineloj kun sia fusilo ĉe la ŝultro, malpeza nubo de blua fumo leviĝanta el la fusilotubo. La viro en la akvo vidis la okulon de la viro sur la ponto fiksrigardanta lian tra la celiloj de la fusilo. Li rimarkis, ke ĝi estas griza okulo kaj memoris, ke li legis, ke grizaj okuloj estas plej efikaj, kaj ke ĉiuj famaj markistoj havas ilin. Tamen ĉi tiu maltrafis.

Kontraŭ-akvokirlo kaptis Farquhar kaj turnis lin duone; li denove rigardis en la arbaron sur la bordo kontraŭ la fortikaĵo. La sono de klara, alta voĉo en monotona kantado nun sonoris malantaŭ li kaj venis trans la akvo kun klareco, kiu trapikis kaj subigis ĉiujn aliajn sonojn, eĉ la batadon de la plaŭdetoj en liaj oreloj. Kvankam neniu soldato, li vizitadis militotendarojn sufiĉe scii la anksiecan signifon de tiu malrapidema, pligrandiga, elspira ĉanto; la leŭtenanto sur bordo partoprenis la matenan laboron. Kiel malvarme kaj senkompate -- kun kia ebena, serena intono, aŭgurante, kaj obeigante trankvilecon ĉe la viroj - kun kiaj precize mezuritaj intervaloj falis tiuj kruelaj vortoj:

"Atentu, kompanio! ... Levu la fusilojn! ... Pretiĝu! ... Celu! ... Pafu!"

Farquhar plonĝis - plonĝis kiel eble plej profunde. La akvo roris en liaj oreloj kiel la voĉo de Niagaro, tamen li aŭdis la obtuzan tondron de la pafilado kaj, leviĝante denove al la surfaco, renkontis brilajn pecojn da metalo, tre platigitaj, oscilante malrapide malsupren. Iuj el ili tuŝis lin sur la vizaĝon kaj manojn, poste forfalis, daŭrigante sian malsupreniron. Unu fiksiĝis inter lia kolumo kaj kolo; ĝi estis malkomforte varma kaj li elprenis ĝin.

Dum li leviĝis al la surfaco, anhelante spiron, li vidis, ke li estis subakve tre longe; li estis percepteble pli malproksime laŭ la rivereto kaj pli proksima al sekureco. La soldatoj preskaŭ finis reŝargi; la metalaj stangoj eklumis samtempe en la sunbrilo, kiam ili estis eltiritaj de la bareloj, turnitaj en la aero kaj enpuŝitaj en siajn ingojn. La du sentineloj pafis denove, sendepende kaj neefike.

La ĉasita viro vidis ĉion ĉi super sia ŝultro; li nun naĝis vigle laŭ la fluo. Lia cerbo estis tiel energia, kiel liaj brakoj kaj kruroj; li pensis kun la rapideco fulmo.

"La oficiro," li rezonis, "ne faros tiun eraron de disciplinulo duan fojon. Estas tiel facile eviti salvon kiel unupafon. Li verŝajne jam donis la ordonon pafi laŭvole. Dio helpu min, mi ne povas eviti ilin ĉiujn! "

Forloga plaŭdo ene de du jardoj de li estis sekvita de laŭta, ventopuŝa sono, dekresĉendo, kiu ŝajnis vojaĝi reen tra la aero al la fortikaĵo kaj mortis en eksplodo, kiu kirlis la ĉi tiu riveron ĝis la profundo!

Leviĝanta folio de akvo kurbigis sin supre li, falis sur lin, blindigis lin, strangolis lin! La kanono partoprenis en la ludo. Dum li skuis la kapon for de la agitiĝo de la frapita akvo, li aŭdis la deflankan pafbruon zumadante tra la aero antaŭen kaj senprokraste ĝi krakis kaj frakasis la branĉojn en la arbaro pretere.

"Ili ne faros tion denove," li pensis; "La venontan fojon ili uzos mitrajlon. Mi devas rigardi la pafilon; la fumo sciigos min -- la sono

alvenas tro malfrue; ĝi postrestas malantaŭ la misilo. Tio estas bona pafilo."

Subite li sentis sin turniĝanta -- turniĝanta kiel turbo. La akvo, la bordoj, la arbaroj, la nunmalproksima ponto, fortikaĵo kaj viroj - ĉiuj estis unuigitaj kaj malklarigitaj. Objektoj estis reprezentitaj nur per siaj koloroj; cirklaĵ horizontalaj strioj de koloro -- tio estis ĉio, kion li vidis. Li estis kaptita en vortico kaj estis turniĝanta kun rapideco de antaŭeniĝo kaj rotacio, kiu kapturnigis kaj malsanigis lin. En kelkaj momentoj li estis deĵetita sur la gruzon ĉe la piedo de la maldekstra bordo de la rivereto -- la suda bordo -- kaj malantaŭ projekcia punkto, kiu kaŝis lin de liaj malamikoj. La subita haltiĝo de lia movo, la abrazio de unu el liaj manoj sur la gruzo, renovigis lin, kaj li ploris kun ĝojo. Li fosis siajn fingrojn en la sablon, ĵetis ĝin sur sin per manplene kaj aŭdeble benis ĝin. Ĝi aspektis kiel diamantoj, rubenoj, smeraldoj; li povis pensi pri nenio bela, al kiu ĝi ne similis. La arboj ĉe la bordo estis gigantaj ĝardenaj plantoj; li rimarkis certan ordon en ilia aranĝo, enspiris la bonodoron de iliaj floradoj. Stranga, rozema lumo brilis tra la spacoj inter iliaj trunkoj kaj la vento faris en iliaj branĉoj la muzikon de ventoharpoj. Li havis neniun deziron perfektigi sian eskapon -- kontentiĝis resti en tiu rava loko ĝis la repreniĝo.

Siblo kaj klako de mitrajloj inter la branĉoj alte super lia kapo vekis lin el lia sonĝo. La perpleksa kanonisto pafis al li aleatoran adiaŭon. Li ekiris al la piedoj, suprenrapidis la deklivan bordon kaj plonĝis en la arbaron.

La tutan tagon li vojaĝis, elpensante la kurson laŭ la rondanta suno. La arbaro ŝajnis senfina; nenie li malkovris en ĝi rompon, eĉ ne irejo por forstisto. Li ne sciis, ke li loĝas en tiel sovaĝa regiono. Estis io sinistra en la revelacio.

Je noktiĝo li estis lacigita, dolorpiede, malsatega. La penso pri lia edzino kaj infanoj plivigligis lin. Fine li trovis vojon, kiu kondukis lin en tion, kion li sciis esti la ĝusta direkto. Ĝi estis same larĝa kaj rekta kiel urba strato, tamen ĝi ŝajnis neuzita. Neniu kampoj ĉirkaŭas ĝin, neniu loĝejo ie. Ne eĉ la bojado de hundo sugestis homan loĝadon.

La nigraj korpoj de la arboj formis rektan muron ambaŭflanke, finiĝante sur la horizonto en punkto, kiel diagramo en leciono pri perspektivo. Supre, dum li suprenrigardis tra ĉi tiu fendo en la arbaro, brilis grandaj ĝardensteloj aspektantaj nekonataj kaj grupigitaj per strangaj konstelacioj. Li estis certa, ke ili estas aranĝitaj en iu ordo, kiu havis sekretan kaj malbonan signifon. La arbaro ambaŭflanke estis plena de unuopaj bruoj, inter kiuj -- unufoje, dufoje, kaj ree - li distingeble aŭdis flustrojn en nekonata lingvo.

Lia kolo doloris kaj levinte la manon, ĝi trovis ĝin terure ŝvelinta. Li sciis, ke ĝi havas nigrocirklon, kie la ŝnuro kontuzis ĝin. Liaj okuloj sentis sin tropleniĝintaj; li ne plu povis fermi ilin. Lia lango estis ŝvelinta pro soifo; li malpezigis ĝian febron ĵetadante ĝin antaŭen inter la dentoj en la malvarman aeron. Kiel kareseme la gazono tapiŝis la netuŝitan vojon - li ne plu povis senti la vojon sub liaj piedoj!

Sendube, malgraŭ sia sufero, li ekdormis dum la marŝado, ĉar nun li vidas alian scenon -- eble li nur resaniĝis de deliro. Li staras ĉe la pordego de sia propra hejmo. Ĉio estas kiel li lasis ĝin, kaj ĉio hela kaj bela en la matena sunbrilo. Li nepre devus vojaĝita la tutan nokton. Dum li puŝmalfermas la pordegon kaj piediras laŭ la larĝa blanka piediro, li vidas flirtadon de inaj vestoj; lia edzino, aspektanta freŝa kaj enorda kaj dolĉa, paŝas malsupren de la verando por renkonti lin. En la fundo de la ŝtupoj ŝi staras kaj atendas, kun rideto de neesprimebla ĝojo, sinteno de senegala graco kaj digno. Ho, kiel ŝi estas bela! Li saltas antaŭen kun etenditaj brakoj. Tuj kiam li estos ekĉirkaŭbrakanta ŝin, li sentas sensentigan baton ĉe la dorso de la kolo; blindiga blanka lumo flamas tute ĉirkaŭe de li kun sono kiel la ŝokbruo de kanono -- tiam ĉio estas mallumo kaj silento!

Peyton Farquhar estis morta; lia korpo, kun rompita kolo, svingis milde de flanko al flanko sub la lignaĵoj de la Ponto Strigroja.

La kronikoj de D-ro Hoffman

Sofo, leda brakseĝo kaj skribotablo estas sur la scenejo. Ĉiujaliaj rekvizitoj en la oficejo estas imagaj. Oni nur parolas pri ili kaj ŝajnigas uzi ilin. D-ro Marvin Hoffman, havanta 45 jarojn, kun griza, nete tondetita barbo kaj skot-drapa jakso, sidas ĉe sia skribotablo kaj rigardas en diversajn dosierojn. Li estas patosema intelektulo, kiu komprenas la profundon de la homaj kondiĉoj kaj ankaŭ estas superŝutita de ili. Lia klientaro eluzis lin sed lia bezono savi ian homan animon estas daŭra. Li murmuris al si dum traserĉas imagitan stakon da raportoj.

D-ro Hoffman:

Kvindek miligramojn da litio... cent miligramojn da prozako... deprimado de dekeljaruloj... du-polusa malsano... ne-specifa maltrankvilo... eksa alkoholulo... nekrofilio. (Li haltigas la traserĉadon de la raportoj.) Jesuo, estas en la mondo multaj frenezuloj. Kaj ili ĉiuj amase venas al mi. Ho, ĝojo de ĝojoj, ke mia sorto en la vivo estas havi psikozulojn kaj patrinobseditajn seksajn deviuojn ĉiam en ĝi. (Li daŭrigas la traserĉadon, prenas raporton kaj legas.) "Ellen kaj James Larsson: komunikaj kaj seksaj problemoj." Ah, mia dio, ne alia geedza paro kun seksa misfunkcio! Kia ĝi estas do? Ĉu ne pli da ekscitiĝo? Ĉu la samaj pozicioj? Ĉu la manko de tempo, energio? Kion ili volas de mi? Kion mi faros por revigligi ilian amoradon? Eble mi konsilos, ke la edzo prenu amorantinon kaj ilia seks-vivo revenos pro la ne-racia ĵaluzeco de la edzino. Aŭ iliaj vivoj estos finitaj per murdo. Per tiu aŭ alia maniero ili estos for de mia listo de pacientoj. (Li legas alian raporton.) "Kronika sendormeco." Ha, mi vidas, ke ni havas alian vampiron. Eble li prenu dudek pilolojn; tiuj sendus lin al la lito. Kial li ne povas dormi? Laŭ mia sperto, la dormo estas la plej bona parto de la tago, ĉar tiam oni ne konstatas, ke oni devas vivi en ĉi tiu aĉa mondo, kiu ne ĉesas ronĝi homojn kiel hundo. (Li leviĝas el la seĝo kaj senpere alparolas la spektantaron.) Mi petas, ke vi toleru mian cinikismon; ĝi estas

kromrezulto de mia longa vivo! Mi estas profesia psikiatro jam de pli ol dudek jaroj. Dudek jarojn! Dum du jardekoj mi aŭskultis plej ridindajn sensencaĵojn de la plej absurdaj homoj. Ĉi tiuj estas homoj, kiuj opinias ke ili havas psikajn problemojn, sed vere ili havas nur tro da mono kaj tro da libera tempo. Efektive ĉiuj havas psikajn problemojn. He, ankaŭ mi! Kaj mi rifuzas serĉi kuracadon. Neniu trairas la vivon sen la disvolvado de ia mensa perturbo. Tio ne estus natura. Se oni vivas sufiĉe ongtempe, io atakos la cerbon. Sed ĉi tiuj homoj, kiuj venas al mia oficejo, opinias, ke ili povas malŝarĝi ĝin per ĝemado kaj pli da ĝemado, kaj finfine ili forpelos siajn demonojn. Tamen ĉi tio ne okazos. La demonoj neniam foriras. La trarompo neniam okazos. (Post paŭzo.) Sed, tio, kion ili ricevas, estas iom da trankviliĝo kaj la falsa opinio, ke ili ja a maniere elkuracigis la mensan malordon. Kaj ili reiras al siaj kutimaj vivoj ekster la terapia ĉambro, kaj ili daŭrigas siajn aktivecojn afable ĝis la venonta semajno, kiam la doloro revenas kaj la pulsado en iliaj koroj pelas ilin al angoro. Kaj mia semajna dozo de falsa espero, kiu inkluzivas bebumadon kaj tro dorlotadon, eŭforiigas ilin denove. Vi vidas do, ke mi donas onan servadon al la socio. Mi malaltigas la mort-procenton, se ĉi tio estas io bona. (Li revenas al la skribotablo kaj rigardas iujn paperojn.) Nu, mi havas hodiaŭ novan pacienton. Li baldaŭ estos ĉi tie. Ni revuu la raporton. (Li legas la paperon.) “Hamleto, Reĝido de Danujo.” (Tre konfuzite li paŭzas.) Kio!? (Li rigardas la paperon denove kaj poste alrigardas la spektantaron.) Mi devas relegi ĉi tion. Nepre estas tajpistina eraro. (Li legas denove.) “Hamleto, Reĝido de Danujo.” (Liaj okuloj larĝiĝas pro malkredo.) Hamleto!! Kio diable okazas? Kio? (Li freneziĝas.) Ni pri pensu. Ni cerbumu pri tio. Ni ellaboru tion sen ekscitiĝemo. Certe ekzistas klarigo. Li venas el la literaturo, ne el la realeco. (Li pripensas longtempe.) Ha! Aĥ! Eble li estas skizofreniulo. Eble li nur estas viro, kiu opinias, ke li estas Hamleto. Memkom preneble, mi estas tiel stulta! Tio estas la evidenta situacio. Kiel mi ne povis kompreni tion? Kiu estas lia problemoj? Kio skribiĝis ĉi tie en la papero? (Li denove rigardas la paperon kaj konsternite legas.) “Severa deprimio pro la antaŭelonga morto de lia patro kaj eta edipa komplekso.” (Li suprenrigardas kaj hezitas.) Ĉi tio ja estas ia lertaĵo. Tio ne estas vera. Mi revas. Mi suferas je halucino. Je Dio, mi estas

jam terapiisto tiel longtempe, ke mi frenezegiĝas!! (Li furioze premas la imagitan sonorilon sur la skribotablo.) Sharon! Sharon!

Voĉo de Sharon:

Jes?

D-ro Hoffman:

Venu ĉi tien – tuj!

Voĉo de Sharon:

Kion?

D-ro Hoffman:

Mi diris, venu ĉi tien – tuj!

Voĉo de Sharon:

Pardonu, sed mi ne povas aŭdi vin bone. La sonorilo rompiĝas kaj via voĉo estas obtuzigita.

D-ro Hoffman:

(kriegas en ĝin) Eniru infere ĉi tien nun! Sharon, tridek-kelk-jaraĝa, eniras la ĉambron. Stulta virino, ŝi ĉiam estas fonto de incitiĝo por D-ro Hoffman. (Li furioze turnas sin al ŝi kaj montras al ŝi la paperon. Ŝi poste ridetas.)

Sharon:

Jes, D-ro Hoffman?

D-ro Hoffman:

Bonvolu klarigi tion al mi? (Li tenas la paperon antaŭ ŝi kaj paŭzas.)

Sharon:

Klarigi kion?

D-ro Hoffman:

Ĉi tion! (Li daŭrigas teni la paperon antaŭ ŝi. Ŝi naive staras senmove.)

Sharon:

Tio estas la pacient-raporto pri via nova paciento.

D-ro Hoffman:

Tion mi scias, sed ĉu vi dirus al mi, kio estas skribita en la pacient-raporto?

Sharon:

Kion?

D-ro Hoffman:

Nur rigardu ĝin.

Sharon:

Bone. Ne estu tiel kolera.

D-ro Hoffman:

Ho, mi havas multajn kialojn esti kolera.

Sharon:

(prenas la paperon kaj legas malrapide) “Hamleto, Reĝido de Danujo.” (ŝi rigardas d-ron Hoffman senmiene.) Nu?

D-ro Hoffman:

Ĉu vi ne opinias, ke io estas stranga rilate al tio?

Sharon:

Pri kio? Tio estas la nomo de la paciento. "Hamleto". Kia malordinara nomo. Mi neniam aŭdis tiun nomon antaŭe.

D-ro Hoffman:

(fiksrigardas ŝin skeptike) Nu, vi estas la virino, kiu tajpas la pacient-raportojn kaj donas ilin al mi. Mi volas informiĝi precise pri tiu, kiun mi vidos. Ĉu li vere diris, ke lia nomo estas Hamleto, Reĝido de Danujo?

Sharon:

Nu, mi ne senpere parolis al la paciento telefone.

D-ro Hoffman:

Kiu do planis ĉi tiun kunsidon? Certe temas pri ia ŝerco. Verŝajne iu opinias, ke estus komike sendi Hamleton, la psikologie plej malsimplan individuon de Ŝekspiro, al la oficejo de efektiva terapiisto. Sed, ne estas komike! Estas kruele kaj malnoblige por mi kaj mia profesio.

Sharon:

Mankas al mi ia ideo pri kio vi parolas. Mi nur scias, ke viro altelefonis kaj diris, ke lia nevo havas deprimon depost la morto de sia patro kaj ke li opinias, ke la juna viro tuj bezonas terapion.

D-ro Hoffman:

(eĉ pli ŝokita) Ĉu viro telefonis kaj diris, ke la paciento estas ties nevo?

Sharon:

Jes.

D-ro Hoffman:

Ĉu la viro, kiu telefonis, donis sian nomon?

Sharon:

Jes, li diris, ke la nomo estas Klaŭse aŭ Klaŭdo aŭ iel simile. Ĝi ŝajnis esti franca. Oh, kaj ĝi havis "ius"-on aŭ "io"-n ĉe la fino. Aĥ, mi ne povas memori la precizan nomon.

D-ro Hoffman:

Ĉu la nomo estis Klaŭdio?

Sharon:

Jes, ĝi estis Klaŭdio!

D-ro Hoffman:

(al si) Mi ne povas kredi ĉi tion!! (Li turnas sin al ŝi.) Vi estas idiotino! Ĉu vi vere ne komprenas tion, kio okazas ĉi tie?

Sharon:

Ne. Ĉu io estas eksterordinara? Ĉu mi alportu al vi tason da kafo por helpi al trankviliĝo?

D-ro Hoffman:

Ne. Aŭskultu min, vi malplenkapulino. Estas evidente, ke iu faris al ni neamuzan ŝercon. Li ŝajnigis, ke li estas Klaŭdio de la teatraĵo "Hamleto" de Ŝekspiro. Verŝajne li mem bezonas terapion. Ĉu vi ne komprenas, ke ĉi tio estas petolaĵo?

Sharon:

Mi nur faris mian taskon, D-ro Hoffman. Klaŭdio estas nur nomo. Iu povas havi tiun nomon.

D-ro Hoffman:

(opinianta, ke la situacio estas komprenita de Sharon) Nu bone. Tiu krizo estas finita. Metu ĉi tiun paperon en la disŝirilon kaj reiru al via laboro. Eble vi relegu la literaturon, kiun vi lernis kiam vi estis en lernejo. Tio helpus vin fari viajn taskojn.

Sharon:

Pardonu, D-ro Hoffman. Mi ja informos vin venontfoje, se iu pretendas esti onklo de Hamleto.

D-ro Hoffman:

Se vi estus informinta min pri ĉi tio pli frue, ni estus evitintaj ĉi tiun konfuzon. Forlasu ĉi tiun ĉambron. Mi ne povas resti kun vi nun.

Sharon:

Jes, D-ro Hoffman. Sed, ĉu mi venigu por vi kafon?

D-ro Hoffman:

Ne, mi ne volas ion! Foriru!!

Sharon:

Jes, D-ro Hoffman. (Ŝi foriras. D-ro Hoffman estas tre kolera.)

D-ro Hoffman:

Kia virino! Kiu povas kredi tion?! Tiu virino neniam informiĝis pri la teatraĵo "Hamleto"! Kaj ŝi havas universitatan diplomon. Je dio!!! (Li eklegas la diversajn dosierojn kiam denove la sonorilo aktiviĝas.)

Voĉo de Sharon:

D-ro Hoffman?

D-ro Hoffman:

(agitita) Kion vi volas? Mi jam diris al vi ne maltrankviligi min.

Voĉo de Sharon:

Via paciento estas ĉi tie.

D-ro Hoffman:

(ĉesas la legadon) Kiu? Kiu paciento?

Voĉo de Sharon:

Uhh ... Sinjoro Hamleto, el Danujo.

D-ro Hoffman:

(stariĝas) Kion vi diris?! Aĥ, diable! Mi jam diris al vi, ke ĉi tio estas petolaĵo. Kaj nun la psikopato venas ĉi tien por... (Li kriegas en la sonorilon.) Mi venas renkonti lin. Ne faru ion. Mi mem traktos la aferon. La lumoj nun enfokusigas alian areon de la scenejo. Hamleto, malafabla juna viro, vestita per nigraj, dek ses-jarcentaj, reĝaj vestoj, staras inter sia patrino, Gertrudo, kaj sia onklo, Klaŭdio. Ili estas vestitaj simile. Sharon sidas sur la seĝo kaj laboras sen atenti ilin. D-ro Hoffman aliras la triopon tre hezite.

D-ro Hoffman:

Jes? Ĉu mi povas helpi vin?

Klaŭdio:

Saluton, mia nomo estas Klaŭdio kaj ĉi tiu estas mia edzino, Gertrudo.

Gertrudo:

(skuas la manon de D-ro Hoffman) Estas rave koni vin.

Klaŭdio:

Mi opinias, ke vi povas helpi nin.

D-ro Hoffman:

(konsternegita) Ĉu – diable – vi povas unue helpi min per klarigo pri tio, kio okazas ĉi tie?

Klaŭdio:

Pardonu?

D-ro Hoffman:

Ĉu vi diris, ke via nomo estas Klaŭdio?

Klaŭdio:

Jes.

D-ro Hoffman:

Klaŭdio kiu?

Klaŭdio:

Nur Klaŭdio. Mankas al mi dua nomo.

D-ro Hoffman:

Kaj kial?

Klaŭdio:

Neniu iam donis al mi duan nomon.

Gertrudo:

Ankaŭ ne al mi. Mankas ankaŭ al mi dua nomo.

D-ro Hoffman:

Nu, ĉikaze vi ambaŭ nepre bezonas psikiatran ku-racadon.

Klaŭdio:

Oh ne, ne ni.

Gertrudo:

Ne, ni estas sanaj. Mia filo havas problemon. Pro li ni estas ĉi tie hodiaŭ.

D-ro Hoffman:

Ĉi tio estas ofendegaĵo! Ĉu vi ambaŭ estas mal-sanaj? Ĉu vi estas tute perturbitaj?

Klaŭdio:

Kion vi klopodas diri?

D-ro Hoffman:

Kion mi klopodas diri? Rigardu vin mem! Vi estas ĉirkaŭparadantaj en ĉi tiuj renesanc-stilaj kostumoj kaj vi asertas, ke vi estas Klaŭdio kaj Gertrudo, kiuj estas protago-nistoj el teatraĵo verkita antaŭ kvarcent jaroj! Ĉu mi kredu tion? Kian trukon vi provas?

Klaŭdio:

Mi ne scias, kion vi klopodas diri. Pri mia edzino kaj mi? Pri mia nova edzino kiun mi amas kaj adoras kaj dorlotas abunde.

Gertrudo:

Oh, mia kara Klaŭdio, mi ne povas esprimi mian amegon por vi!
Ĝi estas senlima kaj mirinda!

Klaŭdio:

Ho, mi ne povas reteni min! Venu, rapide kisu min! (Ili kisas unu la alian pasie. D-ro Hoffman furioziĝas kaj apartigas ilin.)

D-ro Hoffman:

Hmm, tio sufiĉas!! Mi ne scias, kiuj vi diable estas, sed vi tuj foriros el mia oficejo kaj se vi ne foriros, mi telefonos al la policianoj.

Klaŭdio:

Ĉu vi telefonos al la policianoj? Kiaj policianoj? Mi ne komprenas, pri kio vi parolas.

Gertrudo:

Ni venis ĉi tien por serĉi helpon, Doktoro, ne esti forordonitaj kvazaŭ ni estus kamparanoj.

Klaŭdio:

Ĉu vi bonvole povas helpi nian filon?

Hamleto:

(amarvoĉe) Mi ne estas via filo! Ne diru, ke mi estas via filo! Mi neniam povus esti via filo. Ne-ni-am!

Klaŭdio:

Ĉu vi vidas ĉi tion, Doktoro? Rimarku, kiom li estas malafabla. Kial li devas paroli tiel? Al sia propra onklo!

D-ro Hoffman:

(ne scias kion diri)Nu, bonvolu foriri. Mi ne volas, ke vi homoj estu ĉi tie kaj ĝenu mian klientaron. Iru em-buski alian homon per viaj petolaĵoj. Mi havas efektivajn pacientojn, kiujn mi devas kuraci.

Gertrudo:

(ekprenas la doktoron ĉagrene) Sed nia filo havas psi-kan bezonon. Eble li mortigos sin mem!

D-ro Hoffman:

Vi ne estas reala! Vi ŝajnas esti fikcia individuo!

Gertrudo:

Mi ne estas fikcia! Mi estas Gertrudo, la Reĝino de Danujo. Tiu estas Klaŭdio, la Reĝo de Danujo. Kaj ĉi tiu estas nia filo, Hamleto. Li estas tre melankolia lastatempe. Mi ne scias la kialon kaj mi bezonas vian helpon por determini la kaŭzon de lia malĝojiĝo por ke ni fine povos vivi feliĉe kiel familio.

Hamleto:

Je Jesuo, patrino, ĉu vi estas tiel senindika, ke vi ne scias la kaŭzon, kial mi sentas min malfeliĉa. Ĉu vi ne opinias, ke eble la kaŭzo estas la morto de mia patro kaj la posta edziniĝo de mia patrino al mia onklo?! Ĉu vi ne opinias, ke eble tio povus esti katalizilo al ĉio? Huh? Vi malmorala putino!! Kia virino? Ĉu tio estas ia ludo por vi? Vi nur saltas de unu edzo al alia edzo.

Klaŭdio:

Juna viro, vi montru respekton al via patrino kaj ne parolu pri ŝi tiamaniere.

Hamleto:

Ne diru al mi, kion mi faru. Vi ne estas mia patro. Mankas al vi la rajto dikti al mi ion, vi ŝlima bastardo.

Klaŭdio:

Mi estas via patro nun; ne per sango, sed per titolo kaj spirito kaj vi montru la ĝustan respekton, kiun mi meritas. Ĉu vi komprenas?

Hamleto:

Mi komprenas, ke vi estas mensoganta kreteno.

D-ro Hoffman:

Haltigu ĉi tion! Vi ĉiuj estu en psikiatria malsanulejo. Mi diros ĉi tion denove: vi ĉiuj ne estas la fikciaj ŝekspiraj individuoj de Klaŭdio, Gertrudo, kaj Hamleto. Kiuj vi estas? Mi ne scias. Verŝajne vi estas iuj malsukcesintaj geaktoroj, kies cerboj ekrompiĝis, kaj ne povas forlasi viajn rolojn. Aŭ vi estas nur frenezuloj. Sed, mi ne konsentas kuraci vin. Foriru do el mia oficejo!
([Longa paŭzo](#))

Gertrudo:

Ni foriros, doktoro.

D-ro Hoffman:

Bone!

Gertrudo:

Sed kondiĉe ke...

D-ro Hoffman:

Ke kio?

Gertrudo:

Ke vi kuracu mian filon.

(D-ro Hoffman, Klaŭdio, Gertrudo kaj Hamleto staras senmove.)

(Post duonminuto D-ro Hoffman nerveze turnas sin al la spektantaro.)

D-ro Hoffman:

Mi ne scias, kion mi faru! Kiel oni traktas ĉi tian situacion? Kiel oni anticipas ĉi tian situacion? Mankas al mi ideo pri la venonta ago... Ha, ha, mi vivas en la moderna mondo kaj ĉi tiuj homoj ne vivas en la moderna mondo. Mi pruvos ĉi tion al ili. (Li turnas sin al la triopo.) Pardonu min, Sinjoro Klaŭdio?

Klaŭdio:

Jes?

D-ro Hoffman:

Dum kiu jaro vi naskiĝis?

Klaŭdio:

Mil kvarcent sesdek kvara.

D-ro Hoffman:

Hmm. Kaj kiu jaro estas nun?

Klaŭdio:

Mil kvincent naŭa.

D-ro Hoffman:

Hmm-mmm. Kaj ĉu vi legis ĵurnalon lastatempe? Aŭ ĉu vi spektis CNN-on lastatempe?

Klaŭdio:

Mi ne scias, kion vi volas diri per ĉi tio. Se vi demandas, kiamaniere mi ricevadas la novaĵojn, mesaĝisto raportas ilin al mi ĉiutage.

D-ro Hoffman:

Bone. Kaj permesu, ke mi starigas al vi alian demandon. Ĉu vi iam informiĝis pri viro, kiu nomiĝis Sigmund Freud?

Klaŭdio:

Ne, Doktoro. Kiu estas ĉi tiu Freud, pri kiu vi parolas? Ĉu li estas unu de la germanaj visigotaj barbaroj? Lia nomo estas tia.

D-ro Hoffman:

Sigmund Freud estas la viro, kiu kreis la profesion, en kiu mi laboras kaj ĉi tiu profesio donis al mia vivo, kaj donas al mi nun, novajn nivelojn de konfuzo kaj maltrankviliĝo.

Klaŭdio:

Hmm. Mi bedaŭras aŭdi tion. Mi konas konfuzon kaj maltrankviliĝon ĉar mi estas reĝo de lando.

Hamleto:

(malice) Jes, la mallaŭleĝa, malmeritplena reganta monarko.

Gertrudo:

Hamleto, ĉesigu tion.

D-ro Hoffman:

Kie vi kaj via edzino loĝas, Sinjoro Klaŭdio?

Klaŭdio:

Nia loĝejo estas Kastelo Elsinore.

D-ro Hoffman:

Ĉu Kastelo Elsinore? Ĉu tio estas sur bulvarado Hollywood?

Klaŭdio:

Ne, ĝi estas en Danujo.

D-ro Hoffman:

Nu, bone. (Li turnas sin al Gertrudo.) Sinjorino Gertrudo, ĉu eble mi rajtas demandi al vi ion?

Gertrudo:

Jes?

D-ro Hoffman:

Ĉu vi edziniĝis jam antaŭe aŭ ĉu Klaŭdio estas via unua eniro en la krabroneŝton?

Gertrudo:

Jes. Mi volas diri, ke mi estis edziniĝinta jam antaŭe. Ankaŭ jam antaŭe mi estis atakita per plena nesto da krabroj.

D-ro Hoffman:

Kaj kiu estis via antaŭa edzo?

Hamleto:

Viro, kiu estu ŝia nuna edzo.

Klaŭdio:

Tio sufiĉas!

D-ro Hoffman:

Ne interrompu, juna viro.

Gertrudo:

Mia unua edzo estis la antaŭa Reĝo de Danujo, Hamleto la Plimaljuna.

D-ro Hoffman:

Mi vidas.

Klaŭdio:

Vi vidas kion?

D-ro Hoffman:

Huh?

Klaŭdio:

Vi diris "Mi vidas". Kion vi volas esprimi per ĉi tio? Ĉu io estas ĉi tie, kion oni povas vidi?

D-ro Hoffman:

Mi uzas tiun esprimon pro terapeŭtika kutimo.

Klaŭdio:

Ah, nu eble vi pligrandigu vian vortprovizon. Gravas esti klera.

D-ro Hoffman:

(respondas arogante.)Efektive mi havas diplomon pri psikiatrio de la Universitato de Vieno. Tio estas tre impona, ĉu ne?

Klaŭdio:

Tio estas nur meznivela. Mi estas suverena estro de lando. Mi batalis kontraŭ la svedoj, la norvegoj, la francoj kaj la nederlandanoj. Kaj ĉiu el ili estas fia grupo. Ĉi tio estas pli impona.

D-ro Hoffman:

(turnis sin al Gertrudo) Mi petas, ke ni ne forlasu la temon. Mi volas scii ion pri via unua edzo.

Hamleto:

(kriegas) Li estis nobla, glora viro! Li estis rava, brava, kuraĝa kaj brila. Kaj ĉi tiu serpento ĉi tie... (Li montras per fingro al Klaŭdio.) Ĉi tiu hundaĉo kaj sencerba fiulo ŝtelis lian edzinon kaj lian reĝlandon. (Li turnas sin al sia patrino.) Panjo, kiel vi povas!? Kiel vi povas dormi apud ĉi tiu fiviraĉo? Ĉi tio estas kontraŭnatura!

Gertrudo:

Hamleto, kiam vi estos pli maljuna vi komprenos ĉi tiujn aferojn.

Klaŭdio:

La konfuzo de la junularo neniam estas facila, mia filo.

Hamleto:

(kriegas) Mi ne estas via filo!!!

D-ro Hoffman:

(preskaŭ hipnotigita) Kara Dio! Vi homoj ja estas la individuoj! Kaj vi estas ja ĉi tie en mia oficejo! Ĉi tio ne povas esti vera... Ĉi tio estas mallogika... Ĉi tio estas vigliganta! Mi volas, ke vi ĉiuj venu

nun al mia terapeŭta ĉambro. Bonvolu veni. (Li premas la sonorilon kiel maniulo.) Sharon, mi volas ke vi eliminu miajn aliajn rendevuojn de hodiaŭ.

Voĉo de Sharon:

Ĉu mi diru kial?

D-ro Hoffman:

Nur faru tion. Mi ne povas pripensi vian demandon nun.

Voĉo de Sharon:

Bone.

D-ro Hoffman:

(turnas sin al la triopo) Se vi homoj vere estas Hamleto, Gertrudo kaj Klaŭdio, do mia revo kiel terapiisto ja estas efektivigita. Se vi (li montras per fingro al Hamleto) estas "la" Hamleto, la plej komplika, fascina individuo en la tuta literaturo, kaj vi estas mia psikiatria paciento, mi estos la plej renoma psikiatro en la tutmonda historio!

Hamleto:

Ĉu mi estas fakte tiel komplika? Eble mi ne havis sufiĉajn koitojn. Eble tio estas la kialo, ke mi estas ankoraŭ tiel anus-faza.

D-ro Hoffman:

Vi ne komprenas! Vi tri okupos mian tutan tempon! Kiaj pli bonaj pacientoj estas por psikiatro ol Ŝekspiro. Mi volas diri, la individuoj de Ŝekspiro. Ĉi tio devas signifi ion. Ĉi tio devas esti signalo, ke mia vivo kaj mia laboro estas utilega, eĉ esenca por la mondo. Mi ne estas negravulo. Vi tri venis ĉi tien por provizi al mi celon kaj intencon, por doni al mi energion.

Klaŭdio:

Vi estas tre egoisma. Terapiistoj ne estu egoismaj, ĉu?

D-ro Hoffman:

Nu, mi aŭskultas la problemojn de aliaj homoj ĉiutage. Mi meritas pensi pri mi mem iufoje. Sed sufiĉas pri mi kaj miaj problemoj. Ni nun parolu pri vi. Ĉu ni planu kutimajn rendezvuojn por la juna Hamleto?

Gertrudo:

Oh, tio estus rava!

Klaŭdio:

Jes, tio antaŭmalhelpus multajn kapdolorojn.

D-ro Hoffman:

Kion vi opinias, juna viro?

Hamleto:

(per malafabla, monotona voĉo) Bone. Mi faros kun vi ian tutan sesion. Mankas al mi aliaj aferoj por fari kun mia tempo. Ĉio, kion mi faris dum mia tuta vivo, estas senutila ĉiukaze.

D-ro Hoffman:

(Li parolas al Klaŭdio.) Bonege! Ĉiun lundon je la tria, do, Hamleto venos ĉi tien por unu horo. Kaj unufoje po monato mi volas, ke vi kaj via edzino akompanu lin por ke vi povu vidi lian progreson, se li fakte faros iun progreson.

Hamleto:

Kiun progreson? Nenio en la vivo faras progreson. Ĉio nur malkreskas ĝis kadukiĝo kaj morto.

D-ro Hoffman:

Nu, tio estas temo, pri kiu eble ni diskutos dum la terapiaj kunsidoj. Preparu vin, juna viro. Mi malŝlosos vian cerbon per intriga maniero. Mi suspektas, ke neniu iam faris al vi tion, kion mi faros al vi.

Hamleto:

Mi estas flatata scii, ke mia cerbo estos malŝlosata. Ordinare ĝi pleniĝas per absurdaĵoj.

D-ro Hoffman:

Mi ankaŭ preskribos por vi prozakon, se vi kon-sentas.

Klaŭdio:

Ĉu prozakon?

Gertrudo:

Kio en la mondo estas prozako?

D-ro Hoffman:

Oh, nu, ĝi estas medikamento, kiu mildigos la deprimon de Hamleto.

Hamleto:

Nenio povas mildigi min, ne eĉ hundido.

D-ro Hoffman:

Jes, tio estas alia afero, pri kiu ni diskutos dum la terapiaj kunsidoj.

Klaŭdio:

Sed ĉu vi opinias vere, ke Hamleto bezonas medika-menton?

Gertrudo:

Jes, ĉu la parol-terapio ne sufiĉas? Ni ne volas, ke lia nervsistemo estu malordigita.

D-ro Hoffman:

Oh, prozako neniel afekcias la nervsistemon, almenaŭ ne negative.

Klaŭdio:

Nu, ni ne volas, ke li perdos sian kapablon pensi pro-funde. Li estos reĝo de Danujo, vi scias.

Hamleto:

Kiel ĉarme, ke vi rememorigas min pri tio, Onklo.

Gertrudo:

Hamleto, li estas nun via patro; ne alparolu lin kiel Onklon!

Hamleto:

Ho, mi kapitulacas. (Li rigardas malsupren.)

D-ro Hoffman:

Ĉu ni do havas interkonsenton?

Klaŭdio:

Jes.

Gertrudo:

Estas evidente. (Ili manpremas kun la doktoro kaj poste leviĝas.)

D-ro Hoffman:

Ni komencu lundon je la tria.

Gertrudo:

Ĉu mia edzo kaj mi povos observi la unuan sesion?

D-ro Hoffman:

Ne, ne la unuan sesion. Hamleto kaj mi bezonos tempon por ekkoni unu la alian. Ni volos formi intiman ligilon. Tio komfortigos la terapion. Ĉu vi komprenas?

Klaŭdio:

Ĉu intiman ligilon?

D-ro Hoffman:

Jes, ni formos intiman, emocian ligilon.

Klaŭdio:

Hmm... Mi vidas. Nu, bone, vi estas la profesiulo.

D-ro Hoffman:

Jes. Kaj mi opinias, ke mi scias tion, kion mi faru.

Klaŭdio:

Kaj mia edzino kaj mi same opinias. Ni fidus vin, Doktoro. Ni esperas, ke vi povos forigi la turmenton, kiu tiom afekcias lin.

D-ro Hoffman:

Mi penos per mia tuta kapablo.

Gertrudo:

Dankon, dankon, Doktoro. Vi ne scias, kiel trankviligita mi nun estas. Kiam mi memoras kiel dolĉa Haĉjo estis tiam, kiam li estis malgranda knabo, kiel milda, kiel adorinda! Nun li aspektas kvazaŭ li havas la diablon interne de si. Mi volas havi mian Haĉjon denove.

Hamleto:

Mi neniam plu estos tia, patrino. Vi devas akcepti tion.

D-ro Hoffman:

(al Klaŭdio kaj Gertrudo) Ne atentu lin. Vi ambaŭ reiru al la kastelo kaj mi restos ĉi tie kun Hamleto.

Gertrudo:

(preskaŭ ploras) Adiaŭ, filo. Mi esperas, ke ĉi tio helpos vin.

Klaŭdio:

Jes, Hamleto, resaniĝu rapide. Vi havos multajn taskojn en la estonteco kaj bezonas akran menson kaj fortan spiriton por tio. Adiaŭ, Doktoro.

(Klaŭdio kaj Gertrudo eliras. Hamleto kaj D-ro Hoffman estas solaj. Post paŭzo Hamleto parolas kviete.)

Hamleto:

Mi ne estu ĉi tie. Ĉi tio estas ridinda.

D-ro Hoffman:

Kio estas ridinda?

Hamleto:

La tuto. Ĉi tiu ideo pri terapio. Mi estas normala.

D-ro Hoffman:

Laŭ via dosiero vi ne estas normala.

Hamleto:

Nu, kial tio estas grava al vi? Ĉu vi vere okupiĝas pri mi?

D-ro Hoffman:

Memkompreneble jes. Mi estas nun via kuracisto. Tio estas mia laboro.

Hamleto:

Ah, ha! Ĉu mi ne komprenas? Tio estas via filaboro! Se neniuj donus al vi monaĉon kontraŭ ĉi tio, vi komplete forrigardus for de mi kaj dirus ke mi malaperu.

D-ro Hoffman:

Tio ne estas vero, Hamleto. Mi profunde volas, ke vi estu feliĉa. Havi puran kaj nedistorditan psikon estas unu el la plej esencaj aferoj por vivi feliĉan vivon.

Hamleto:

Ĉu vere?

D-ro Hoffman:

Jes, ja jes.

Hamleto:

Hmmm. (Paŭzo)

D-ro Hoffman:

Nu, ni komencu kun vi. Diru al mi iom pri via vivo.

Hamleto:

Kion vi volas scii?

D-ro Hoffman:

Mi volas havi multe da informoj. Se ni iros en profundan terapion, mi bezonos scii preskaŭ ĉiun aspekton de via vivo. Kaj vi devas scii, ke ĉi tio ne estos facila. Ĉi tio estos embarasema kaj doloriga, sed ni devas antaŭeniri. Ĉu vi komprenas?

Hamleto:

Mi komprenas, ke ĉi tio estas aĉa arlekenaĵo. Sed, mi supozas, ke mi kunlaboros.

D-ro Hoffman:

Tio estas pli bona respondo ol “ne”. Nu, pafu.

Hamleto:

Ĉu “pafu”? Kion vi volas diri per tio?

D-ro Hoffman:

Komencu.

Hamleto:

Oh, mi opiniis, ke vi volas, ke mi pafu vin. Mi ne havas kanonon kun mi.

D-ro Hoffman:

Mi petas, ke vi ne penu esti komika nun. Tio ne helpas la situacion. Ĉi tiuj sesioj estas tre seriozaj. Se vi penas esti komika, mi ne povos helpi vin.

Hamleto:

Tio ne ŝanĝos ion. Vi ne helpas min iel.

D-ro Hoffman:

(konsideras ĉi tion) Bone, ni esploru tiun ideon. Kiel vi scias, ke mi ne helpas vin iel? Kial vi supozas tion?

Hamleto:

Pro via aspekto! Vi estas pretekstema, narcisisma pseŭdo-intelektulo, kiu opinias ke li havas eksternaturan talenton por terapio, sed vi estas nur alia malgajnanto kiel la ceteraj homoj, kiel mi.

D-ro Hoffman:

Ĉu vere? Kaj kiel vi akiris ĉi tiun analizon pri mi?

Hamleto:

Ĝi estas evidenta. Via parolmaniero, via vestmaniero, ktp. Vi estas unu de tiuj viroj, kiuj bezonas rememorigi sin konstante pri sia intelekta supereco kompare kun la aliaj, "pli malnoblaj" viroj en ĉi tiu mondo. Vi faras ĉi tion per legado kaj verkado, per la uzado de monduma vortprovizo, kaj per la portado de klasafektula sinteno, kiu diras: "Mi estas brila kaj vi estas malforta." Efektive, tamen, vi estas nur soleca ŝelo de viro, kiu serĉas senespere realan kontakton al homa patoso, kaj vi opinias, ke vi estas enkapitata per la pozicio, kiun vi kreis por vi en ĉi tiu mondo.

D-ro Hoffman:

(ekekscitiĝas) Ohhhhh... Ohhhhhh... Ĉu vi opinias, ke vi estas juna geniulo? Vi arogas al vi scii ĉion pri mi ĉar vi estas en mia

oficejo kvin minutojn?

Hamleto:

Mi scias sufiĉe. Mi scias, ke vi estas tiel tordiĝinta kiel viaj pacientoj, kiel la tuta mondo.

D-ro Hoffman:

Ĉu tio estas kiel vi spektas la mondon, kvazaŭ ĝi estas plena je tordiĝintaj psikozuloj?

Hamleto:

Ĉiu spektu ĝin tiel, ĉu ne?

D-ro Hoffman:

Ne! Oni ĉiam havu pozitivan perspektivon! Ĉar se oni ne havas tion, kio estas la celo de vivo? Se vi supozas, ke ĉiu estas freneza kaj ne valoras vian atenton, vi estos tre soleca kaj tre malgaja. Ĉu ĉi tia estas la vivo, kiun vi volas por vi? Ĉu ĉi tio vere estas kion vi deziras?

Hamleto:

Mi deziras, ke vi ĉesigu la bombardadon per idiotaj demandoj.

D-ro Hoffman:

(iras al Hamleto kaj ekprenas lian kolumon) Fiatentu, diable! Vi estas sub mia zorgo nun. Mia tasko estas esplori vian menson por ke vi povu atingi sanan mensstaton per psikanalizo. Se vi ne konsentas kunlabori laŭ matura, plenaĝa maniero, vi diable forlasu mian oficejon kaj neniam revenu! Iru por vivu vian mizeran vivon kie vi opinias, ke vi estas super la intelekto kaj mensa sano de la aliaj homoj en la mondo. Mi ne havas tempon por via mensludoj kaj via rezisto.

Hamleto:

(iom timigata) Mi ne ludis mensludojn kun vi. Mi estas kunlaboranta.

D-ro Hoffman:

Vi ne estas kunlaboranta! Vi donas al mi pli da kapdoloroj ol mia helpantino!! (Li rigardas intense en lian vizaĝon.) Nu, ĉu vi kunlaboros kun mi? Aŭ ĉu ni havos senfinan ludon de parolaj dueloj? Respondu al mi!!

Hamleto:

Se vi formovos vian vizaĝon for de mia vizaĝo, mi faros ĉion ajn, kion vi volas.

D-ro Hoffman:

Bone. (Li sidiĝas trankvile.) Mi ĝojas, ke vi decidis tion. Nun, ĉu vi respondos mian demandon? Ĉu vi informos al mi pri vi?

Hamleto:

Nu, bone. (Paŭzo)

D-ro Hoffman:

Mi atendas.

Hamleto:

Mi bezonas minuton por pripensi tion. La demando estas tre komplika.

D-ro Hoffman:

Kial la parolado pri vi mem estas komplika? Tio estu malkomplika.

Hamleto:

Nu, al mi tio ne estas malkomplika. Fakte, informu min pri mi.

D-ro Hoffman:

Kiel mi povus paroli pri vi? Mi ne konas vin.

Hamleto:

Kompreneble, vi konas min.

D-ro Hoffman:

Kiel?

Hamleto:

Vi jam legis pri mi ofte en viaj libroj pri terapio, ĉu ne? Mi estas certa, ke vi scias ĉion pri mia vivo.

D-ro Hoffman:

Hmmm... Tio estas stranga aserto... Vi scias, ke vi vidiĝas en libroj?!

Hamleto:

Nepre jes. Mi ne estas sensciulo kiel mia patrino kaj onklo. Kaj mi ankaŭ scias, ke mi ekzistas en du dimensioj: la beletra kaj la reala.

D-ro Hoffman:

Ahhh... Ĉi tio estas eksterordinara! Vi scias do, ke vi estas fikcia individuo.

Hamleto:

Jes, mi scias tion kaj tio estas parto de la problemo. Mi scias kiu estas mia sorto. Mi scias kiel la historio finiĝas.

D-ro Hoffman:

(singarde) Kiu historio?

Hamleto:

Mia historio, mia tragedio. Sed mi devas sekvi ĝin.

D-ro Hoffman:

Kial? Kial vi devas sekvi ĝin?

Hamleto:

Ĉar la publiko postulas ĉi tion.

D-ro Hoffman:

Hmmm.... Kial do vi venas al la dua dimensio? Kial vi estas ĉi tie?

Hamleto:

Mi bezonas moviĝi inter la du dimensioj por konstante memori la dualismon de la homaro. Ne ekzistas pli bona metodo ol tiu.

D-ro Hoffman:

(metas la manojn sur la kapon) Pardonu, sed ĉi tio estas tute mens-skuinta. Kiel vi povas konscii pri via loko en la mondliteraturo? Mi ne komprenas. Mi trafis mensan barieron.

Hamleto:

Ankaŭ mi ne komprenas ĝin. Ĝi perpleksigas min kiel ĝi perpleksigas vin.

D-ro Hoffman:

Nu, bone. Mi diros tion, kion mi faros. Kiajn ajn psikologiajn problemojn vi havas pro via dualisma rolo kiel homo kaj literatura individuo ne gravas al mi. Mi kuracos vin kiel mi kuracas ajnan pacienton, ĉar mi opinias, ke vi estas aflik-tita per la samaj homaj problemoj kiel aliaj homoj. Ĉi tio estos eksperimento. Se miaj taktikoj efikos sur vin, eble ni povos male-blighi vian tragedion.

Hamleto:

Ĉu maleblighi mian tragedion? Ĉu vi volas diri, ŝanĝi la finiĝon?

D-ro Hoffman:

Jes! Precize! Eble mi povos ŝanĝi vian sorton, Hamleto.

Hamleto:

Vi ne povos fari tion. Mia sorto estas neevitebla. Ĉu vi neniam legis iujn klasikajn grekajn teatraĵojn? Ĉio estas skribita en la steloj.

D-ro Hoffman:

Mi legis nur la verkon “La Trilogio de Edipo”. Mi ne estas klera pri la greka literaturo.

Hamleto:

Ja vi legu ĉi tian verkaron! Ĝi estas tre ilumina. Ĝi montras, ke malgraŭ la tempopaso, la homaro kaj la homa psikologio neniam ŝanĝiĝas. Viroj batalis kontraŭ aliaj viroj por akiri virinojn kaj regnojn antaŭ du mil jaroj kaj ankoraŭ ili faras tion hodiaŭ.

D-ro Hoffman:

Kaj ĉu tio rezultigas krizon de malĝojo en vi?

Hamleto:

Nu, jes. Se ni neniam ŝanĝiĝos kiel homoj, kial ni daŭru? Ĉu ni ne estas en senfina ciklo de ripetada sensencaĵo? De unu generacio post la alia? Ĉi tio deprimas min!

D-ro Hoffman:

Aha!!! Vi do konfesas vian deprimon, finfine.

Hamleto:

Tio ne estis konfeso pri deprimado. Tio estis konfeso pri nepersista mensstato, kiun mi havas nun.

D-ro Hoffman:

Jen pli da trompparolo, Hamleto. Konfesu, ke vi suferas pro deprimado. Vi ne hontu pri ĉi tio. Vi akceptu ĝin. Multaj homoj suferas pro ĝi.

Hamleto:

Ĉu jes? Kaj kiel vi scias tion?

D-ro Hoffman:

Mi estas rajtigita terapiisto; mi ja vidis multajn kazojn de ĝi.

Hamleto:

Sed ĉu ili reale estis deprimataj? Aŭ ĉu ili inventis fan-taziojn pri deprimado por plenigi la malplenojn en siaj vantaj vivoj?

D-ro Hoffman:

Mi ne scias, eble ambaŭ.

Hamleto:

Kaj kiaj estas ĉi tiuj homoj, kiujn vi kuracas?

D-ro Hoffman:

Nu, ili estas kutimaj pacientoj. Vi certe scias la specon.

Hamleto:

Ne, mi ne scias. Mi loĝas en Danujo dum la dek-sesa jarcento. Ĉi tio estas Usono dum la dudek-unua jarcento.

D-ro Hoffman:

Hmmm.... Vi pravas. Mi devas pripensi iom. Hmmm.... Mi havas larĝan palettron da psikozuloj. Ne estas facile enfokusiĝi al specifa speco.

Hamleto:

Bonvolu peni.

D-ro Hoffman:

Bone.... Mi havas alkoholulojn, tedajn dom-mastrinojn, seks-maniulojn, viktimojn de impotenteco, mal-sekurajn dekelkjarulojn, streĉitajn poŝtoŝicejulojn, antaŭajn morfino-maniulojn, ktp. Estas multaj problemuloj, Hamleto. Kaj ili ĉiuj ekscitas min. Mi havas radon kun iliaj nomoj sur ĝi kaj ĉiun tagon mi rulas ĝin por vidi tiujn, kiuj envenos por la sesioj. Estas ekscite scii se mi havos ekzemple alkoholulon aŭ seks-maniulinon.

Hamleto:

Vi do ricevis plezuron kuraci seks-maniulinojn, ĉu ne?

D-ro Hoffman:

Kion vi volas diri per tia komento?

Hamleto:

Vi ja scias tion, kion mi sugestas. Ĉu seks-manio havas ian specialan signifon al vi?

D-ro Hoffman:

Ĝi estas mensa malsano kiel la aliaj mensaj malsanoj.

Hamleto:

Ĉu ĝi ne estas natura, homa instinkto? Eble ĝi ne estas malsano.

D-ro Hoffman:

Ĉu natura?

Hamleto:

Memkompreneble ĝi estas natura! La bezono por tre oftaj amorvekaj agadoj ne estu vidita kiel malsano.

D-ro Hoffman:

Estas malsano, kiam la paciento masturbas sin meznombro po dudekkvinfoje en tago. Kaj kelkfoje en la oficejo.

Hamleto:

Kio? Ĉu vere? Ĉu en la oficejo? Tio estas terura!

D-ro Hoffman:

Tio estas mia profesio. Ĉi tion mi vidas ĉiutage.

Hamleto:

Nu, krom ĉi tiu negativa flank-aspekto, kio estas tiel malbona pri seks-manio?

D-ro Hoffman:

Ĉu estas necese, ke ni diskutu ĉi tion nun? La celo de ĉi tiu sesio estas helpi vin, helpi viajn problemojn.

Hamleto:

Nu, eble mi suferas je seks-manio. Eble mi ne povas havi sufiĉe de ĝi. Eble mi ne amoras sufiĉe.

D-ro Hoffman:

Hmmm.... Ĉu vi havas...

Hamleto:

Ĉu mi havas kion?

D-ro Hoffman:

Ĉu vi havas amorantinon?

Hamleto:

Ne, tio ne estas ebla. Mi malamas virinojn. Mi malamegas virinojn. Fakte, mi tre malamegas ilin.

D-ro Hoffman:

Ahhh.... Ĉi tio estas interesa. Vi tre malamegas virinojn. Kial?

Hamleto:

Kial? Mi diros al vi la kialon. Unue, ili ĉiuj estas aerkapulinoj. Ila ajn inteligenta viro interkonsentus pri tio.

D-ro Hoffman:

Ĉu aerkapulinoj?

Hamleto:

Jes! Ili ĉiuj priparolas nur pri siaj aspektaĉoj. Vi scias: pri la hararo, pri la ŝminko, pri la ŝuoj, k.t.p. Neniu el ili eĉ havas profundan penson en la kapo. Ilia sola celo estas enkapti viron por edziniĝo. Ili uzas siajn mamojn kiel ilojn.

D-ro Hoffman:

Ĉu vi konsideras, ke ĉiuj virinoj estas tiaj? Ke ili uzas siajn virinajn korpopartojn por akiri kion ili volas?

Hamleto:

Definitive. Ĉi tio estas natura. Al la malbelulinoj mankas ia ŝanco. Pro ĉi tio oni forsendas ilin al monaĥinejoj. Neniu viro volas tuŝi monaĥinon, speciale malbelegan monaĥinon.

D-ro Hoffman:

Ohh... Mi komprenas. Vi ŝajnas esti tre sagaca.

Hamleto, mi volas demandi –

Hamleto:

Jes?

D-ro Hoffman:

Ĉu vi ne opinias, ke ĉi tiu konvinko estas iomete absurda?

Hamleto:

Kial ĝi estas absurda? Ĝi ne estas pli absurda ol ĉiuj aliaj kredoj pri vivo.

D-ro Hoffman:

Vi diras nun, ke ĉiuj kredoj pri la vivo estas absurdaj? Ne nur viaj kredoj pri virinoj?

Hamleto:

La tuto pri la vivo estas absurda. La ekzistencialistoj pravis. Homoj, kiuj ne scias ke la vivo estas absurda kaj havas feliĉajn pensojn, simple ne estas inteligentaj. Kaj iafoje mi envias ilin.

D-ro Hoffman:

Vi envias malinteligentajn homojn?

Hamleto:

Kiu ne farus? Mankas al ili turmentaj pensoj, kiuj konstante premas en la cerbon. Ĉio, kion ili bezonas, estas plaĉa manĝo kaj agrabla amoro. Kun ĉi tio ili havas kontentigon. Oh, se mia vivo povus esti tiel simpla!

D-ro Hoffman:

Kial ĝi ne povus esti tiel simpla?

Hamleto:

Nu, nu, nu... Nu, ĉar ĝi ne povas esti!

D-ro Hoffman:

Kial ne? Kial vi ne povas akcepti la vivon kia ĝi estas? Kial vi ne povas ĝui ĝin? Kio malebligas tion?

Hamleto:

Mi... Mi scias, ke ni ĉiuj mortos en la estonteco. Ni ĉiuj estas peonoj en la kruela ŝerco de la universo. Ne estas pozitiva flanko kaj ne estas finiĝo. Kaj mi ne povas ĝui la vivon blinde ĉar ĉi tiaj pensoj ĉiam konsumas mian cerbon.

D-ro Hoffman:

Sed kial ili estas tie?

Hamleto:

(nun kolera) Mi ne scias! Mi ne scias kial ili estas tie! Mi opiniis, ke tio estas via tasko. Vi trovu tion, kio estas misa pri mi.

D-ro Hoffman:

Sed parto de la kuracado estas, ke vi mem devas malkovri la kialon. Mi povas gvidi vin, sed vi devas eltrovi ĝin.

Hamleto:

Ehh... Ehh... Tiukaze, al fidiablo kun la kuracado! Mi ne bezonas vian kuracadon ĉar ĝi estas tute senutila! Rigardu. Mi havas problemojn. Mi venas al terapiisto. Kaj li petas, ke mi mem solvu la problemojn. Kia ridinda sistemo, ĉu ne?

D-ro Hoffman:

(penas esti trankvila) Oni nomas ĝin “mem-konscieco”. Ĝi estas efika ĉar ĝi informas la pacienton, ke tiu venkis la konfliktojn volonte kaj tute per sia mensa forto. Vi aprecos ĝin estonte.

Hamleto:

Ho, ho... Mi deziras, ke la estonteco venus nun. Mi ne povas elteni vivi en la nuntempo.

D-ro Hoffman:

(ekkriegas) Ankaŭ ne aliaj homoj! Kion ni do faru? Ĉu ni plorsingultu kiel infanoj? Ĉu ni restu hejme kaj lamentu pri la malŝpara karaktero de la vivo, pri kiel ni estas kondamnitaj al tragika sorto? Ĉu ni maltrafu la plezurojn en nia mondo? Mi ne komprenas vin. Se nia tempo en nia mondo estas tiel mallongdaŭra kaj plej kara, kial ni ĉiam pensu pri la trage-dia karaktero de ĝi? Kial ni ne ĝuu ĝin? Vi estas ankoraŭ juna, vi estas inteligenta, vi havas

multajn pozitivajn atributojn por doni al la mondo. Detenu vin for de la fiksado pri via privata malfeliĉo kaj ĉirkaŭprenu la ĝojojn de la bela vivo kiam ili estas ĉi tie.

Hamleto:

Ne kriegu ordonojn al mi. Tia konduto ne troviĝu en terapeŭta sesio!

D-ro Hoffman:

Nun, Hamleto, mi forlasas mian kutimajn tekni-kojn ĉar mi ne scias kiel atingi vin. Kiam ni trafas temon, kiun vi ne ŝatas, vi ofendiĝas kaj paŭzas. Diru al mi, do, tion, kion mi devas fari por malfermi vian menson, por malfermi vian animon?

Hamleto:

Vi demandas al mi tro malsimplajn demandojn. Ĉi tio timigas min. Kiel mi reagu?

D-ro Hoffman:

Mi ne volas, ke vi timiĝu. Mi volas, ke vi traktu min kiel amikon. Per ĉi tiu metodo ni faros trarompon.

Hamleto:

Nia konversacio frenezigas nin.

D-ro Hoffman:

Mi ne estas tiu, kiu estas freneza ĉi tie.

Hamleto:

Mia terapiisto estas nomanta min freneza!?

D-ro Hoffman:

Kial mi ne faru tion? Vi ja estas! Estas evidente. (Paŭzo. Ili ambaŭ havas senesperan frustrosenton.) Rigardu, mi scias vian opinion, ke mi ne komprenas vin. Sed, mi ja kom-prenas vin. Mi komprenas tian homon, kia vi estas kaj tion, kion vi pripensas. Kaj vi devas fidi al mi. Se vi farus tion, mi kondukos vin al mensaj lokoj, kie vi povus iri sen mi. Ĉu vi fidus al mi?

Hamleto:

(per raŭka voĉo) Bone. Mi kunlaboros. Demandu al mi ion ajn, kion vi volas scii.

D-ro Hoffman:

Ĉu vi estas certa? Ĉu vi ne protestos?

Hamleto:

Mi ne protestos. Mi petas, ĉesigu la plorplendadon.

D-ro Hoffman:

Nu... Bone. Ni ekprogresas.

Hamleto:

Ni nur deflankiĝas laŭ mia opinio.

D-ro Hoffman:

Mi decidas tion, ne vi.

Hamleto:

Via vantemo estas mirkonsterna.

D-ro Hoffman:

Ni ne parolas pri mi, ni parolas pri vi. Jes? Nun, mi volas demandi vian opinion pri via patro.

Hamleto:

(tordiĝas sur la seĝo.) Ho Jesuo, ĉu reale ni devas fari ĉi tion?

D-ro Hoffman:

Jes, vi promesis al mi.

Hamleto:

Mi ne promesis. Ni nur interkonsentis. Estas granda diferenco.

D-ro Hoffman:

Vi diris ke vi permesos al mi meti la demandojn. Mia interpreto de tio estas, ke mi povas demandi pri via patro. Ĉu ne?

Hamleto:

Ne! Kaj kial vi demandu pri li? Kial li rilatas al ĉi tiu sesio?

D-ro Hoffman:

Eh... Ne ŝercu. Li rilatas multe al ĉi tiu sesio. Li estas la kialo, pro kio vi estas ĉi tie. Li kaŭzis vian mornan sintenon al ĉio. Ĉu tio ne estas memevidenta?

Hamleto:

Nu, bone. Ŝajnas, ke mi malpravis.

D-ro Hoffman:

(al si kviete kaj mallaŭte) Je Dio, Hamleto ne scias ke la patro-morto estas la kaŭzo.

Hamleto:

Mi ja scias, damno! Mi ne komprenis, ke ĝi estas ligita al mia severa deprimado. Mi nur sciis, ke ĝi kolerigis kaj konfuzis min.

D-ro Hoffman:

Ĉu vere? Ĉu ĝi kolerigis vin?

Hamleto:

Kompreneble! Kio vi estas? Ĉu vi estas idioto? Kiu ne ĉagreniĝis pro la morto de la patro je tiel juna aĝo?

D-ro Hoffman:

Ahh... Bone... Ni progresas. Vi estas konfesanta, ke la morto de via patro kolerigis vin.

Hamleto:

Jesuo, kio vi estas? Ĉu papago? Vi sonas kiel Polonio.

D-ro Hoffman:

Mi nur klopodas provi, ke ĉi tio estas vera emocio kaj ne mensogo.

Hamleto:

Ĉu mensogo? Kion vi volas diri per "mensogo"? Ĉu vi supozigas, ke mi estas falsema?

D-ro Hoffman:

Mi ne scias, mi ne scias! Ĉesigu la malamikecon. Ĉi tio estas terapia sesio, ne pridemanda sesio en milita malliberejo! Nur respondu mian demandon pri la morto de via patro. Ĉu tio estas tiel aĉe nepensebla?

Hamleto:

(burleske) Ho Sinjoro mia! Li blasfemis! Li eldiris sakron. Kia malklera viro. Kia besto!

D-ro Hoffman:

Hamleto, mi ne toleros ĉi tion. Se vi rifuzas respondi simplan demandon, mi ĝoje montros al vi la pordon kaj invitojn vin foriri. Ĉu ĉi tio estas komprenebla al vi?

Hamleto:

Jam ni diskutis ĉi tion. Mi scias, ke vi ne elpelos min.

D-ro Hoffman:

Kial ne?

Hamleto:

Ĉar mi scias, ke vi estas sorĉita de mi. Mi fascinas vin. Vi faros ion ajn por analizi min. Mi nur ŝatas malfaciligi vian laboron.

D-ro Hoffman:

Oh, vi ŝatas tion. Vi do estas sadisto. Mi povas nun aldoni alian eron al la listo.

Hamleto:

Ĉu mi estas sadisto? Ĉu la tuta mondo ne estas sadista? Ni ĉiuj ricevas plezuron el la suferado de aliuloj.

D-ro Hoffman:

Kial? Ĉar ĝi ne okazas al ni?

Hamleto:

Precize. Ni sentas nin superaj.

D-ro Hoffman:

Tiukaze, ĉu la morto de via patro donas al vi plezuron? (Ĉi tiu demando trafas Hamleton kiel fulmo. Li estas ŝokita de ĉi tiu penso, saltas el la seĝo kaj ekprenas D-ron Hoffman je la vangoj.)

Hamleto:

Neniam diru tion denove!!! Neniam, neniam, neniam eĉ sugestu ion, kio estas malproksime simila al tio! Mi amegis mian patron! Mi amegis lin per ĉiu centimetro de mia animo. Li estis Dio sur la tero. Li estis la plej bona viro, kiu iam vivis. Li estis heroo inter la kanajloj en la mondo. Kaj mi idoligis lin kaj adoris la grundon tie, kie li piediris. Mi ja donis al li amon, ne kiel al mia patrino, kiu estas prostituitino aŭ al mia onklo, kiu estas hirudo. Lia morto neniel donas al mi eron da feliĉo! Ĉu vi komprenas!?

D-ro Hoffman:

Finfine! Ĉi tio estas la respondo, kiun mi serĉis. Nun, bonvolu demeti la manojn for de mia vizaĝo. (Hamleto, estante emocie ŝarĝita, reiras al la seĝo.)

Hamleto:

Nu, ĉu vi nun estas kontenta? Ĉu vi ricevis tion, kion vi volis el mi?

D-ro Hoffman:

Efektive mi estas. Tio estis tre honesta deklaro. Vi konfesis multajn aferojn, kiuj ĝenadas vin.

Hamleto:

Kiel kion? (Li viŝas sian nazon.)

D-ro Hoffman:

Ke vi opinias, ke vi montris al via patro la plimulton de amo kompare kun via patrino kaj via onklo.

Hamleto:

Nu, tio estas vera. Mia patrino estas simple oportunistino.

D-ro Hoffman:

Ĉu vi vidas vian patrinon tiel? Kiel nur oportunistinon?

Hamleto:

Mi ĵus diris tion. Ĉi tiu taktiko, la ripeto-de-ĉio-kion-mi-diras, ne estas tre utila, Doktoro.

D-ro Hoffman:

Ĉu via patrino ne estas pli malsimpla ol tio?

Hamleto:

Ŝi estas la plej simpla homo, kiun mi konas. Ŝi nur estas unu plia virino, kiu uzas sian korpon por kapti riĉan viron. La farso daŭras kaj daŭras kaj ŝi estas en tio nur unu plia kontribuantino.

D-ro Hoffman:

Ĉu vi opinias, ke ŝi estas malgaja pro la morto de via patro?

Hamleto:

Ne, nepre ne! Mi jam diris al vi, ŝi estas senanima, ĝuste kiel mia onklo. Ili estas perfekta paro, unu kun la alia. Kia alia klarigo estus por ekspliki la edziniĝon nur unu monaton post la morto de antaŭa edzo?

D-ro Hoffman:

Eble ŝi sentis sin senkunulino kaj pro ĉi tio enfalis en la brakojn de via onklo? Ne estas malofte, ke homoj en afliktostato serĉas amon rapide.

Hamleto:

Kaj pri la funebrado por mia patro? Pri la montrado de respekto por li?

D-ro Hoffman:

Evidente ŝi kredis, ke unu monato sufiĉas.

Hamleto:

Nu, ne sufiĉas. Ne estas sufiĉa tempo. Ne por viro, kiu estis tiel grandioza, eminenta, glora, kaj nobla.

D-ro Hoffman:

Hamleto, permesu, ke mi demandas al vi...

Hamleto:

Vi ne bezonas permeson por demandi. Nur demandu.

D-ro Hoffman:

Nu, bone. Kial vi opinias, ke via patro estis tiel grandioza, eminenta, glora, kaj nobla? Kial vi metas lin sur piedestalon, super la aliaj homoj en la mondo?

Hamleto:

Ĉu vi vere estas demandanta al mi ĉi tion? Ĉu vi ne komprenas? Vi estas tiel dikkrania kiel la aliuloj. La viro estis sanktulo!

D-ro Hoffman:

Ĉu li estis sanktulo? Sed li mortigis virojn dum bataloj. Ĉu tio estas la ago de sanktulo?

Hamleto:

Li estis estro de nacio. Memkompreneble li devis mortigi virojn! Tio estis lia devo.

D-ro Hoffman:

Se li estis tiel sanktula, kial li ne uzis ne-perfortan metodon por solvi la konfliktojn?

Hamleto:

Huh? Ĉu kun ĉi tiuj hundviroj? Milito estis la sola maniero. Mia patro neniam faris malbonan agon sen bonaj intencoj.

D-ro Hoffman:

Hmmm... Oni povas interpreti tian aserton larĝe.

Hamleto:

Al mi ne gravas kiel vi interpretas ĝin. La fakto estas, ke mia patro estis vere mirinda viro.

D-ro Hoffman:

Eble, sed vi ne donis al mi precizan kialon, kial li estis mirinda. Vi nur diras malprecizajn deklarojn. Ĉu vi povas doni al mi ion pli bonan, ion pli konkretan?

Hamleto:

Mi... Mi.... Diable, kion vi volas, ke mi diru? Vi puŝas min en angulon.

D-ro Hoffman:

Vi povas diri ion ajn, kion vi volas.

Hamleto:

Nu, mi jam diris al vi ion.

D-ro Hoffman:

Sed tio ne kontentigis min.

Hamleto:

Tio estas al mi indiferenta! Ĉi tiu sesio helpu min, ne vin!

D-ro Hoffman:

Hamleto, ne ŝanĝu la temon. Ni parolas pri via patro. Ĉu vi povas rememori ion por pruvi, ke li estis mirinda?

Hamleto:

Nu, li neniam, neniam plendis pri mia patrino. Kaj li neniam frapis ŝin. Li tuŝis ŝin nur ame. Li neniam traktis iun malestime aŭ arogante. Li respektis eĉ siajn plej malamitajn malamikojn. Li ĉiam batalis bone kaj estis amikema al ĉio.

D-ro Hoffman:

Ho, mi petas, bonvolu haltigi ĉi tiujn paradaĉajn, pretendemajn priskribojn! Vi penas eviti la fakton, ke via patro estis reala, karn-kaj-sanga homo kiel ajna alia homo. Li havis ankaŭ malperfektaĵojn.

Hamleto:

Ne!!! Mankis al li malperfektaĵoj! Mankis al li difektoj! Li estis dia!

D-ro Hoffman:

Hamleto, neniŭ estas dia. Ni ĉiuj estas homaj. Al ni mankas perfekteco. Hamleto. Ĉu vi estas filozofo?

D-ro Hoffman:

Post certa aĝo ĉiu travivas sufiĉe da sufero kaj tiam filozofiĝas.

Hamleto. Nun vi ludas vortludojn. Ĉiakaze mi rifuzas akcepti la ideon, ke mia patro estis nedia.

D-ro Hoffman:

Aha, vi finfine agnoskas ĝin. Kaj ĉar vi ne povas vidi, ke via patro havis difektojn, vi konsideras, ke lia morto estas pli tragika ol normala morto. Ĉi tio konstante afekcias vin kaj akcelas vian deprimon, ĉu ne?

Hamleto:

Kion vi volas diri per “pli tragika”?

D-ro Hoffman:

Vi konsideras, ke la morto de via patro estis la morto de Dio aŭ la morto de mitologia heroo. Tial, tio estas pli granda ol privata tragedio. Al vi tio estas grandega apokalipsa okazaĵo. Kaj vi estas obsedata, ke supernatura heroo estis forigita per la natura evento de homa morto. Ĉi tiu situacio estas por vi kaj malsankta kaj mallogika. En via menso la universo nun estas malordigita.

Hamleto:

Kial vi diras ĉi tion?

D-ro Hoffman:

Ĉar ĉi tio estas la kerno de via problemo. Se vi povus kompreni, ke via patro estis homa, vi do povus akcepti la reedziniĝon de via

patrino. Kaj vi povus vivi je feliĉa stato. En via menso via patro estis pli grandioza ol ĉiuj kaj neniuj povis anstataŭi lin.

Hamleto:

Nu, tio estas vera. Neniu povas anstataŭi mian patron, speciale ne mia onklo.

D-ro Hoffman:

Ehh... Ni parolu nun pri via onklo.

Hamleto:

Ne!

D-ro Hoffman:

Pardonu?

Hamleto:

Mi rifuzas paroli pri li. Ne petu, ke mi faru tion. Ne demandu al mi ion pri li.

D-ro Hoffman:

Hamleto, ni devas diskuti ĉi tion. Via onklo estas tre grava parto de la dilemo interne de via kapo.

Hamleto:

Ne. Li ne rilatas al ĉi tiu afero.

D-ro Hoffman:

Mi ne permesos, ke vi evitas la diskutadon pri via onklo.

Hamleto:

Nu, nu... vi devas akcepti tion.

D-ro Hoffman:

Ne. Mi ne akceptos tion! Nun diru al mi, ĉu vi parolos pri li aŭ ne?!

(Longa paŭzo. Ambaŭ havas streĉitajn vizaĝojn. Nun Hamleto leviĝas el la seĝo.)

Hamleto:

(per furioza voĉo.) Mi ne povas kompreni vin. Vi scias ja, ke ĉiuj skribas pri mi kaj diras, ke mi estas freneza. Ili diras, ke mi havas senfinajn komplikaĵojn kaj psikologiajn faktorojn. Sed efektive mi estas normala. Mi estas nur homo, kiu volas korekti la maljuston kontraŭ mia patro. Vi, Doktoro, estas la frenezulo ĉi tie. La fakto, ke vi daŭre ŝovas vian nazon en frem-dan vazon, ke vi konstante klopodas trovi ian solvon al via pro-pra metafizika krizo pri homaro, sed vi fakte trovos nenion es-cepte de senfina frustrado...

D-ro Hoffman:

Hamleto, sidiĝu kaj ni daŭrigu...

Hamleto:

Ne! Mi ne plu akceptos viajn ordonojn!

D-ro Hoffman:

Vi uzas mian tempon nun, Hamleto, kaj vi do respektos tion, kion mi volas fari.

Hamleto:

Nenio estas en mia kapo, Doktoro! (Li fingromontras al sia kapo.) Mi estas malplena. Mi estas nululo. Ĉu vi ne povas vidi tion? Mi ne komprenas, kial ĉiuj supozas, ke mi estas kom-plika.

D-ro Hoffman:

Tio estas ridinda. Dum la lastaj kvin minutoj mi aŭdis pli da memkontraŭdiraj asertoj ol mi aŭdis dum la prezidenta debato. Vi diras unu deklaron, sed vi kredas je la tuta malo. Vi opinias, ke via patrino estas putino sed samtempe vi neas la rolon de via onklo, kiu kaŭzis, ke ŝi putiniĝas.

Hamleto:

Mi ne estas memkontraŭdira. Mi nur diras la klaran, malkaŝan, kaj simplan veron.

D-ro Hoffman:

Hamleto, ĉesigu la mensogadon. Ĉesigu la men-sogojn al mi kaj al vi mem. Vi havas realajn problemojn, kiujn oni ne povas nei.

Hamleto:

Vi diras refoje ĉi tion, Doktoro? Kial terapiistoj faras ĉi tian teknikon? Ĉu vi ne laciĝas de la samaj senutilaj artifikoĵoj denove kaj denove?

D-ro Hoffman:

Nu, sufiĉe. Nia sesio estas finita. (Li leviĝas kaj trenas Hamleton al la pordo.)

Hamleto:

(per tono sarkasma dum la trenado) Sed Doktoro, anko-raŭ restas dek kvin minutoj.

D-ro Hoffman:

Jes, dek kvin minutojn da tempo, kiun vi malŝparos. (Li malfermas la pordon.) Mi volas, ke vi foriru. Ne revenu ĝis vi maturiĝas.

Hamleto:

Ĉu ĝis mi maturiĝas?

D-ro Hoffman:

Jes, revenu tiam, kiam vi havos emocian seksmaturecon kaj vi povos rigardi aferojn per la okuloj de racia plenaĝulo. Ĝis tiam mankas al mi intereso peni kuraci vir-infanon.

Hamleto:

Bone, Doktoro. Ĉi tiu vir-infano foriros kaj ludos kun aliaj geinfanoj.

D-ro Hoffman:

Se la ludado estos for de mi, mi estos feliĉa. (Longa paŭzo. Hamleto nur staras spiteme en la pordokadro kaj ridetas malice.) Kial vi nur staras tie?

Hamleto:

Mi ne scias.

D-ro Hoffman:

Oh, mi opiniis, ke vi estus feliĉa iri for de mi.

Hamleto:

Ĉu vi vere volas, ke mi iru, Doktoro?

D-ro Hoffman:

(traserĉas stakon da imagecaj raportoj) Jes.

Hamleto:

Ĉu vi estas certa?

D-ro Hoffman:

Jes, mi estas certa.

Hamleto:

Fundamente vi ne volas, ke mi foriru, ĉu ne?

D-ro Hoffman:

Mi volas ja, ke vi foriru, Hamleto. Mi rezignas. Dum la lasta duonhoro vi ne montris al mi, ke vi havas deziron atingi psikologian trarompon. Vi paŭtis kaj plendis. Vi havis stultan, idiotan sintenon. Ĉio, kion vi diris, estis tegita per pretendemo. Antaŭe mi opiniis, ke la peno kuraci vin estus bona eksperimento, sed mi malpravis. Nun mi ne vidas kialon daŭrigi la sesiojn. Adiaŭ.

Kial Usono fariĝu Japanio

Ĉiu, kiu vivas en la moderna mondo kaj ne estas kreskigita sub granita plejstocena dentita roko de grandega grandeco devus kompreni fundamentan koncepton de homa ekzisto. Ni devas transporti nin. Tio estas vera ĉu la transportado estas per aŭto aŭ trajna sistemo aŭ aŭtobuso en Parizo, la u-bahn-o en Berlino, la ŝanceliĝantaj kaj oraj kaj oranĝaj tramoj nomitaj Deziro kaj Kanalo en Nouvelle Orleans (aŭ [Nov-Orleano por la proletaro, kiu ne komprenis flua franc-kapabloj](#)), la tramoj en Lisbono, Portugalio, portanta generacio de portugalaj kaj nordafrikaj islamaj kaj kristanaj rifuĝintoj al siaj libereco for de la bomboj kaj militoj de teruro faligitaj sur ilin per la senskrupula Usona reĝimo de oleo-fikomercistoj. La vasta trajn-retoj de Japanio kaj Sud-Koreio estas superaj kaj starigis flamantan ekzemplon por la resto de la mondo. Ni bezonas fortajn trajn-rilatojn porti nin de laboro al alia laboro, familia fiasko al familia kunveno, geedziĝoj al entombigoj, intervjuoj al unuaj tagoj al emeritiĝo, la restoracio al la Bolshoi-a baleto, la prelego pri leninismo al la seksema partio en Chelsea-o aŭ la sudflanko de Ĉikago aŭ la orientflanko de Kolumbuso, Ohio, la plej mallumaj kvartalowharfj de urinoplenigita Sankta Francisko aŭ la Ĉinkvartalo aŭ Rusa Monteto aŭ la varfo. Sed bedaŭrinde tiu vasta matrico de trajna efikeco mankas en la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. Jes, Novjorko havas la faman subteran metron kiu ĵetas homojn de Brooklyn al Tajmskaro kaj la Bronkso kaj Harlemono kaj Malgranda Italio kun rapideco, sed ĝi estas malpura kaj superplena kun trampo kaj narkotiuloj kaj senhejmuloj kaj sufokanta varmego en somero kaj neeltenebla malgaja frostigita Arkta malvarmeco en la vintro. Ĉikago havas lian El-on, kiu faras bruegon super la morna urbopanoramo de ukrainaj kaj polaj enmigrintaj familioj kaj afrik-usonanoj vivantaj per registara asistismo kaj pafantaj unu la alian ĝis antaŭtempa mortoj en adolesko ĉar la hip-hop-a muziko produktita amase de la sondiskaj firmaoj diras ilin agi tiel en metoda modo por malrapide malpliigi la loĝantaron kaj ebligi, ke la Illuminatio kontrolu ĉiujn mondanj aferojn. La trajnsistemoj do estas danĝeraj kaj

nekompetentaj. La normalaj ĉiuj-usonaj homoj de ajna etna fono kiuj volas vivoj je paco kaj komforto do devas turni sin al la aŭto por iri ie kaj ĉie. La kuracistejo, la banko, la provizanto, librejo, muzeo, antaŭurba festo, urbocentra ceremonio, kolegia asocio-domo, judstudenta unio, hindia lingvoleciono, islama moskeo-observado de la zakat-o kaj la rigardo al Mekko de la mezokcidento de Usono. Tio estas tie, kie mia rakonto envenas.

Mi estas intelekta, laborist-klasa, idiota, ĉiuj-usona, blank-rubema, juda entreprenisto kiu ĉiam serĉas uzi tro da vortoj kaj enuigi ajn personon, kiu hazarde estas ene de la atingo de mia super-entuziasma buŝo elsputi malkaŝan intelektularo-ŝargitan sensencaĵon. “Kiu estis pli radikala en la senco de la uzado de brutaleco propagi la komunistan sistemon en post-Cara Rusio? Ĉu Lenino aŭ Stalino? Lenino uzadis perforton elpeli la caron kaj carinon kaj iom Aleksandron kaj Anastazion... sed Stalino, post kiam li prenis potencon neniigis pli ol 20 milionoj el sia popolo en rapida movado je kolektivigo kaj industriigo. Bonvolu respondi do la demandon.” “Ĉu la franca sonas pli ridinda ol la Somalia? Ambaŭ estas rapidema kaj nazema.” “Ĉu la ĉina popolo aŭ koreaj popolo sonas pli henema kaj blekema? Ĉinio havas la komunistan sistemon malsuprenpasis de Markso al Lenino al Mao al Xengo Dao Pingo. Kial ne povis Chiango Kai-Sheko halti lian leviĝon en la ĉeflando kaj estis devigita disvolvi la liberan demokratian ŝtaton de Tajvano en malgranda insulo en la Sudĉina Maro? Generalego Chiango havis la subtenon de la Usonan militistaron kaj financistaron por venki tiujn sendiajn komunistojn kaj li ankoraŭ perdis! Tio alkondukis al la katastrofaj militoj en Koreio kaj Vjetnamio kiuj kostas centojn de miloj de juna usonana, korea, vjetnama kaj ĉina vivojn. Ĉiuj sencele.” “Kial Guglo produktas pli da rezultoj en baza serĉo ol Jahuo? Kial i-Pod-oj estas pli konvenaj ol la malgranda Verizon-a supromalfermanta telefono, kiun mi ankoraŭ uzas ĝis hodiaŭ en aĝo de tuta fido je ĉio ĉe la tuŝo de fingro?” “Kio okazis al la kirliĝado de la propa butero? Laborado la vojon tra vivo sen registara asistismo kaj stipendioj kaj registaraj disdonaĵoj kaj senkostaĵoj?” “Ĉu Usono velkos en malhelan eraon sub la ĉefeco de Donald J.

Trump, nesincera entreprenisto sen senco de poluro kaj diplomatio?
”

Mi ŝutas tiujn demandojn sur ajnan ĉagrenitajn kaj ne-kuriozajn najbarojn, kiujn mi renkontas sur la buso, sur la strato, en la Madeleine franc-bistro sur North High Strato, en la Mozart-Café ĉe la angulo de Strato Morse apud la Teejay bifestekorestoracio kie oni povas ĝui superbajn patkukojn, laktoskuaĵojn, land-frititajn kokid-bifestekojn, ŝinkon, ĉion ajn, kion la ĉiu-usona apetito deziras. Ili estas libere haveblaj. Mi ne estas aparte lerta kun la aŭto. La aŭto kaj mi estas havinta milton je menskapablo ekde kiam mi havis 16 jarojn kaj mi estis devigita kompreni la movadojn de veturado en ĉi tiu aŭto-obsedita kaj kristanismo-ŝarĝita socio, en kiu bedaŭrinde mi plenkreskis kaj edukita per fervoraj, kapitalismo-pelitaj, morale malplenaj gepatroj kaj tia familio. La puŝo estas fariĝi advokato. Kuracisto. Demokratiano. Liberalulo. Puŝi por la Israela enloĝigado de palestina lando kaj elradikigo de palestina popolo. Puŝi por pli da asistismo por la senhavuloj kaj subpremataj malplimultoj de la Usono. Perlabori pli da 100,000 dolaroj poĵare, aĉeti la antaŭurban domon. Posedi la Toyota-on, la Subaru-on, la Honda-on, la Ford-on, la Dodg-on, la Chevi-on, limuzinon, la Chrysler-on. Daŭrigu vojaĝojn al Novjorko por vidi Tajmskaron kaj Brodŭaj-aj spektakloj kun Nathan Lane kaj Hugh Jackman kaj Tom Hanks. Vidi la strangajn enmigrintojn el triamondaj landoj en Afriko kaj Latin-Ameriko kaj la Proksima Oriento, kiuj inundas la stratojn kun siaj sensencaĵaj lingvoj. Kio estas la araba krom kriado kaj “La La La Alaho La La La”? Kio estas la somala krom lang-alklakaj bruoj? Kio estas la hispana krom rapida mitral-batalado pri la ne-respondita amo de iu virino nomita Maria sur televido?

Jen mi, meznombra alteco, meznombra pezo, la ĉiu-Amerika blankula masklo kiu ne lasas sin esti premlatigitaj malsupren per la fermita menseco de kristanismo. Ne, Jesuo ne estis la Filo de Dio, la Sinjoro, eble li estis nur homo, kiu havis grandegan kvanton de karismo kaj povis influi la masojn de juda popolo sekvi siajn instruojn. Rabeno kiu vekis la Fariseojn sub Caiaphus-o por timi judan ribelon kontraŭ la Romia Imperio je tiu tempo, kaj estis tial

krucumita kiel ago de politika preteksto. Nenio religia, nenio spirita, teologia, teozofia, filozofia, ĉiela, ĉielglora. Viro de sia tempo, marioneto de sorto, dorno sur la branĉo de aĉa historio. Mi rifuzas iri kune kun la plimulto de la usonanoj kiuj estas cerbo-lavitaj per tiu sensencaĵo. Hodiaŭ estas tago de pliakutigo pri aŭtoj, teknologio, ĉel-telefonoj, nekompetenta burokratismo, montet-homaĉoj, pseŭdo-intelektaj judoj kiuj asertis ke ili legis ĉiujn Saul Bellow-on, Isaac Bashevis Singer-on, Bernard Malamud-on, Sholem Alechem-on, la Malnova Testamenton en la originala hebrea, Amos Oz-on, Aharon Appelfeld-on, la paroladojn de Benjamin Netanjahu-o, David Ben Gurion-on, Itzhak Rabin-on, rabeno Akiva-on, Moseon, Maimonides-on. Sed efektive ili estis perditaj je la postkurado al ne-judaj belvirinoj en senfina serĉo de malpleneco. La blonda ĝentila plaĉa virino en la vakera ĉapelo kaj blankaj angoraj sveteroj kaj botoj, kiu estos afabla kaj kvieta kaj faros, ke oni sentas sin kiel tiu fariĝis vera usonano. Ne plu pri la juda enmigrinta mizero, sur la ŝipo eskapante la pogromoj, vivante en malriĉeco en Nov-Jorka aŭ Ĉikaga loĝaĉejo kun miloj de aliaj, kunuzante banĉambro kun ĉiu familio, kriante en la jida aŭ en tre malbone-parolata angla pri manĝaĵo, vestoj, kies turno nun kaki, viŝi, iri al la buĉisto, ne la pork-buĉisto sed la koŝer-buĉisto, la ĉina lavejo, la itala bakejo, uzu la metron iri al la fabrik-laboro en Manhatano, skribi leteron en la jida al la Malnova Landa, in der heim, a la pais original. Ekzistis ĉiam Hispania najbaroj en ĉi tiuj areoj de Novjorko.

Mia patro estas en la urbo hodiaŭ, vizitis la Mezokcidento por la vintraj ferioj. La okazo de Kristnaskaj lumoj brilantaj en ĉiu hejmo en ĉiuj apudaj najbarecoj kie tiuj supozeble kristanaj familioj festas la tagon de la naskiĝo de Jesuo Kristo . En realeco tamen neniu scias la veran naskiĝtagon de Jesuo. Kaj la ferio de Kristnasko devenas de Saturnalio, la romia pagana festo, al la nord-Eŭropaj paganaj festoj en la vintro koncernante arbojn kaj lumojn kaj donacojn. La veraj kristanoj, ekzemple la Eklezio de Lasttagaj Sanktuloj, Septagaj Adventistoj, Atestantoj de la Eternulo, rifuzas partopreni en tiu fiasko. Sed observu! Tuta lando, la Usono, trompita de falsa pagana festotago. Sed por la resto de ni, kiuj ne estas trompitaj, ni ricevas tempon for de laboro kaj lernejo, manĝoj ĉe ĉinaj

bufedoj, ĉar la ĉinoj estas sendiaj komunistoj kiuj observas neniajn religiajn feriojn kaj havas neniujn konscidubojn pri la malfermiĝo je Kristnasko, Pasko, Pesaño, Hanukao, Novjara Tago, Kwanzaao, Ramadano, la listo daŭras kaj daŭras. Mia patro estis loĝanta en urbeto en orienta Novjork-Ŝtato, ĝuste kie la limoj de Konektikuto kaj Masaĉuseco “konekti” en “Masa” maniero, pardonu la provon ĉe malbona vortludoj. Kiel mi ja avertis la leganton multe foje, mi estas iomete mem-indulgema. Tio tamen ĉiam kreas la plej bonan literaturon. Forgesu Hemingŭaj-on kaj minimalismon, brakumi Victor Hugon kaj Herman Melvill-on. Adoru la centojn da paĝoj de tangentoj pri parizaj kloakoj, 19-a-jarcentan usonan balenĉasadon kaj ĉiujn eblajn detalojn de balenoj, ĉiujn eblajn detalojn de franca Katolikismo kaj klerikaro kaj la Latina, catholicam ad nauseum, en nomini Patris et Filii et Spirtuo Sancti: Amen. Gloria en Excelsis. Mi amas esplori lingvojn. Mia patro ne. Li estas sciencisto. Li vivas por la kemio, fiziko, biologio, neŭro-scienco, bio-fiziko, anatomio, astrofiziko. Al kie ajn la limoj de scienco povas puŝi, li estas preta grimpi la monton al la supro de Olimpo. Esti Greko kaj Romia Dio de scienco, Zeŭso de la Neŭrono, Hércules de Plutonio. Li estas pli aĝa Nord-orienta sinjoro, kiu estas polurita de vivo en Teksaso kaj la Mezokcidento. Miksu la neŭrozon kun la vakero. Kaj oni havas veran usonanon. Li batalas la judan patrinon kaj la Ĉerokon. Mallonga griza hararo, malalta figuro kun tio, kion adoleskantoj en Usono hodiaŭ nomas “vir-mamoj.” Liaj oreloj ĉiam malboniĝas. Ĉiu alia frazo, kiun li eldiras, kutime finiĝas, “Kio? Kio?! KIO?! Mi NE BEZONAS FONOFOROJN!” “Sed li estas mia patro. Sen lia penado mi ne estus vivanta skribi ĉi rakonton por via ĝuo kaj plezuro. Tiel vi danku lin por la estonteco de la usona literaturo.

La tago komenciĝis simple. La plano estis tre baza kaj minimuma; mia nuna aŭto, kiu estas nova kaj kiun mi posedis nur du monatojn, estis havanta kelkajn malgrandajn problemojn, aŭ pli ĝuste mi opiniis, ke ili estas malgrandaj tiutempe. Ekhaltanta, kontrolumotora lumo ekbrilanta, bontenado bezonata, la pedalo estas ŝanceliĝanta, la aŭto ne irus rapide sur la senfinaj ŝoseoj en la urbo kie mi loĝas, Ŝoseoj 270, 315, 70 Okcidento, 670 Oriento al la flughaveno, la Toyota-a Korolo, griz-arĝenta japana híbrida miro-

aŭto. La japanoj gajnis tiom da mono per la vendado de siajn teruraj aŭtoj al Usonanoj, ke estas malfacile kredi, ke la Usono faligis du atomajn bombojn sur ilia lando kaj murdis centojn da miloj de liaj senkulpaj civiluloj per tio, kio estas verŝajne la plej granda terorisma ago en la historio de la homaro. Forgesu 9/11-on aŭ Benghazi-on aŭ la Oklahomao-urbaj bombadoj. Kiuj estas la veraj teroristoj en la mondo? Sed mi fortunas. La problemoj kun la Toyota-a Korolo; la antaŭa maldekstra pneŭo sur la ŝofora flanko estis tuŝaĉita, ĉu per akcidenta frapado kun najlo aŭ eble kazo de vandaleco. Neniu iam scios la veron. Sed la pneŭo estas plata, neniom da aero estas subtenanta la suban bazon, ne eblas funkciigi la aŭton ien longtempe. Kion fari, kion fari? Mia patro, la mastro-menso, Hedero-Ligo-edukita, bone vojaĝis en Italio kaj Svislando kaj Meksiko, flua en la hispana kaj la mandaren-ĉina kaj la jida kaj la svahila, decidas, ke li mem ŝanĝos la platan pneŭon kun la ekstra pneŭo kiu kuŝiĝas oportune en la kofrujo. Vera vireca viro, vera simbolo de la vakero kun la intelekta usona hibrido, kiun mi adoras tiom. Li starigas la ilojn, la ekstran pneŭon, la ŝtraŭbingojn, la naboĉapon, la krikon, la krankon. Post la eltiro de la ŝtraŭbingoj el la originala pneŭo, li estas preta instalii la duan pneŭon. Kompreneble oni bezonas suprenkranki ĝis la aŭto estas sufiĉe alta por enplanti la ekstra pneŭo. Ĉiu scias tiun bazan fakton. Do ek. Sed estas kaoso. Ĉiufoje mia patro metas la krikon sub la aŭto kaj krankas al pli alta alto, la aŭto subfalas kaj moviĝas malantaŭen. "Haltu!" krias mia patro. "Kial la infero ĝi ne restos ankoraŭ?"

"Eble la ..."

"ŜŜŜŜ!! Mi laboras ĉi tie! "

"Mi nur provas helpi ... "

"Mi pripensas, estu trankvile!" Jen kutima konduto de mia patro. Li ne estas la plej pacienca individuo kiam li klopodas fini projektojn koncernantaj mekanikojn, praktikecojn, ilojn, novigojn. Mi devas esti pacienca kaj obeema kaj nur ĝisatendas ĝis li plenumas siajn celojn, tre kiel Geisha-virino al kliento. Li faras multajn ripetitaj provoj por simple igi, ke la aŭto restadas supre. Sed la kriko, flaveta iomete

superdimensia ilo kiu ne estas kongrua kun la angulo kaj la deklivo de la enveturejo en kiu la Toyota-a Korola-o estas metita, rifuzas kunlabori lasi mian patron kompletigi la mision de simpla pneŭo-ŝanĝo. Ni troviĝas en enveturejo en antaŭurba najbareco en kurioza agrabla strato de unu-etaĝa domoj kun lignaj pintoj, blankaj leterkestoj, Kristnaskaj lumoj de bluaj kaj rozkoloraj kaj blankaj kaj oranĝaj kaj Avo-frostaj eltranĉaĵoj, malgrandaj kamionoj kaj ĉiaterenaj aŭtoj kaj aliaj Toyota-oj kaj Honda-oj, blankula-rubemaj bebopatrinaĵoj marŝante siajn infanojn en la beboĉaretoj post la kolektado de registaraj ĉekoj ĉar por ĉiu bebo, kiun oni elpuŝas eksteren, la registaro donas pli da mono. La tago estas malvarmeta kaj freŝa kaj bonodora kun aera klara vintrema veneto kiel la speco kiu estas la trankvilaĵo antaŭ la ŝtormoj de Ohio inter novembro kaj majo. De neĝ-kaj-hajlaj koŝmaroj kiuj paralizas la tutan loĝantaron en senfina trafiko kaj akcident-katastrofoj al la speco de tagoj de klara videbleco kiam la sola defio estas plenkovri la korpon por eviti la osto-malvarmegigantan malvarmegon kiu drenas ajnan ĝojon aŭ optimismon de la averaĝa civitano de tiuj nordaj ebenlandoj, kie iam loĝis la Siuoj, tiam la britoj kaj francoj, tiam la germanaj farmistoj, tiam la urbaj areoj de orient-eŭropaj enmigrintoj kaj la nigruloj el la Sudo por eskapi sklavecon. Tio estas Ohio, tiu estas Usono, ĉiuj estas konstante leviĝantaj leviĝantaj leviĝantaj, nur esti prokrastita per simpla loko kaj taktika eraro kun la kriko. Kiel mia patro. Li estas senfine frustrita.

“Mi ne povas igi, ke la aŭto estas premfiksita konvene. Ĝi falas. Ĝi falas! Kion ni faros?! Kion ni faros?! Ni devas rebonigi la aŭton! Oni ne povas ne havi aŭton en Usono!”

“Tial Usono fariĝu Japanio,” mi aldonas per sarkasma maniero. Mia patro ne amuziĝis. Nun ne estas la tempo aŭ loko por ŝercoj kaj kaŭsticaj observoj.

“Silentu kaj elpensu tion, kion ni faru! Kiujn ni telefonu? Kiujn ni telefonu ?!”

“Nu, ĉu vi memoras, ke ni havas asekuron kiu pritraktas ĉiajn problemojn. Eble ni povas venigi iun ĉi tien por ripari ĝin. Ĉu vi

memoras?” La lumo ŝaltiĝas en sia super-ŝargita cerbo. Li malstreĉiĝas senprokraste de sia mania stato.

“Ho jes. Telefonu ilin.” Mi poste telefonas la asekuro-krizo-vojflankan servon per mia malnova Verizon-a telefono. Kompreneble ĝi estas nur malgranda preskaŭ-nenio kompare al modernaj telefonoj. Mi ne povas vidi filmojn sur ĝi aŭ fari videojn aŭ premi iun butonon por ricevi retpoŝtojn, kontroli bankokontojn, kontroli fejsbuko ene de sekundoj, legi pri filmetoj, famuloj, sandviĉoj, trinkaĵoj, politikaj argumentoj pri Trumpismo kontraŭ Klintonismo, retpoŝtaj skandaloj kaj malaminda retoriko pri islamanoj kaj latinuloj en Usono farante ĉiujn problemojn. Sed la telefon-vokoo trairas. “Dankon por la voko al asekuro-krizo-vojflanka servo,” respondas nazema agaca ina voĉo kiu sonas kiel miksaĵo de Novjorka kaj Suda. “Se vi telefonas por posttreno aŭ aliaj servoj, bonvolu premi unu. Para servicia en espanol, marque numero dos. “Ne, mi ne volas servon en la hispana. Tio estas Usono, diable! Ni volas la anglan! Ni batalis Meksikon preni Kalifornion, Arizonon, Nov-Meksikon, ktp for de ili por ne havi la hispanan en la lando! Mi finfine parolas kun viva homo. “Saluton, mia nomo estas anonim-delikatsent-grumble-dorlotit-bubaĉo kiu ne scias kiel ŝanĝi pneŭon ... Mi havas problemojn kun la kriko kaj ne povas ŝanĝi la pneŭon mem. Ĉu vi povas sendi iun por ŝanĝi la pneŭon por mi?” “Certe, tio ne estas problemo, sinjoro. Mi nur bezonas vian polisan nombron. “Mi elprenas ŝiman kaj ŝiritan kopion de mia asekur-karto kiu montras la polisan nombron, identiĝan nombron, jaron, manufakturiston, kaj modelon. La polisa nombro estas absurde longa, “123456789S kiel sendiaj komunistoj, E kiel en Ekonomia reakir-plano por Soveti-Mond-Superpotenco, 458.” “Bone, dankon. Kaj ĉu vi estas en sekura loko?” “Jes, en mia enveturejo. Ĉu tio estas sufiĉe sekura por vi?” “Jes, tio estas tre sekura.” “Sed iu drog-konfuzita maniulo, kiu ricevas sian fidrogojn de Meksiko, kiu sendas ilin al Usono, laŭ nia nova Prezidanto, povus rabi min dum mi estas en mia enveturejo, ĉu ne?” “Mi ne scias pri tio, sinjoro. Mi nur volas scii se vi estas en sekura loko.” “Tiom sekura kiel oni povas esti en la mondo.” “Bone, ni sendos iun tien. “Mi supozas, ke ŝi ne komprenis mian spritaĵon. Ho nu, ne ĉiu havas Salvador-Dalí-similan senton de ĉiama ironio kaj absurdeco, Camus-

o kaj Sartre-o kaj Tom Stoppard-o kaj Steve Martin-o ne povas tuŝi ĉiun pensmanieron en la konstelacioj en la universo kaj en ĉiuj planedoj kaj steloj kaj sun-sistemoj en la galaksio.

Mia patro kaj mi atendas 45 minutojn por la serva persono alveni por simple ŝanĝi pneŭon. Ni estas irititaj. Ni malsatas. Ni diskutas kie ni manĝos poste tiun tagon. “Ĉu vi volas la hindan bufedon?” mia patro petas. “Ne, hinda manĝaĵo estas tro spica kaj butera. Diareo. Kial vi opinias ke ili ĉiam surportas vindotukojn sur siaj kapoj? Ne estas por modo.” “Bone, ĉinoj?” “Mi preferas simple aŭdi mian patrinon paroli dum unu horo ol esti proksime ĉina kuirejo.” “Bone, estas turka restoracio nomita Café Enver Paŝa kaj Mustafa Kemal disbatas la malpurajn Armenojn kaj Grekojn trans la strato?” “Ĉu meleagraĵo estas servita en tia restoracio?” “Mi opinias ne. Estas tie ŝafido kaj kaboboj kaj sovlako kaj baklavo.” “Tio estas stulta. Ili servu meleagraĵon en turka restoracio.” “Kie do ni manĝu tiam?” “Dankon al Dio estas apude la Danku-Dion-ke-nun-estas-vendreda restoracio.” “Bone, ni iros tien tiam, kiam la pneŭo estos ŝanĝita.” La riparisto alvenas; blua kapuĉo kun Miĉigano en grandaj aŭdacaĵaj oraj leteroj benditaj sur la fronto. Kuraĝa homo en Ohio. Kalva, ruĝa barbo, tre kiel vikingo venkanta kaj rabanta kaj seksperfortanta la novajn terojn. Sed li estas ĉi tie por ŝanĝi pneŭon. Li ekzamenas la krikon kaj poste penas kun sia propra kriko.

“Jen la problemo, amikoj. La enveturejo de via enveturejo kaj la pozicio de la aŭto igas, ke neebblas por mi ŝanĝi la pneŭon. Eĉ kun mia kriko. Vi devos trovi alian homon posttrenti ĝin. Mi bedaŭras pri tio. Tio ne estas mia kulpo. Ĝuu la belan tagon.” Mia patro estas furioza.

“Atendu minuton. Vi estas diranta ke ni atendis 45 minutojn por vi kaj vi venis ĉi tien kaj vi ne povas fari ion? Tio estas freneza! Kia kaculo vi estas?”

“Ho, mi nur diras al vi, sinjoro, ke pro da angulo de aŭto estas nenio, kion mi povas fari pri tio. Multe mi bedaŭras.”

“Jes, bone, mi procesos kontraŭ la asekuran kompanion pro ĉi tio! Ili ne povas fari tion al siaj klientoj! Sendi iun ĉi tien kaj li ne povas eĉ ŝanĝi la pneŭon! Kio estas la kialo eĉ havi asekuran polison?! ”

“Nur posttrenu ĝin al loko por priservi ĝin, poste akiru novan pneŭon, ĉio tiam estos bona.”

“Ne diru al mi tion, nun vi nur foriru.”

“Bone. Havu bonan tagon. Kaj Feliĉan Kristnaskon. ”

“Jes, Feliĉan Ĥanuka-on. Ne ĉiuj el ni estas kristanoj tie. Ekzistas multaj aliaj religioj, mia amiko.”

“Nu, bone.” La Miĉigana montaranaĉa mekaniko tiam promenis for en sian veturilon sur la antaŭurba strato kiu kondukis al nenia grava loko kaj foriris el nia neŭrozaj religie-konfuzitaj vivojn por ĉiam kaj eterne. Kiam ni iam vidus tiun Aleganan idioton denove? Kiu scias kaj kiu pripenas pri tio? Jen la sekva misio fari: posttreni la aŭton trenita al serva loko por ke oni povas trakti la problemon tie. Tio signifos alian horon de atendado, alian horon de turmento kaj malespero kaj mizero kaj demandanta sin se ĝi estos sukcesa aŭ malsukcesa, bonaĵo aŭ fiasko, feliĉaĵo aŭ malgajaĵo, finfina longdaŭra prospero aŭ senfina mizero kaj senespereco . Nur tempo kaj la asekuraj personoj povas diri tion.

Mi telefonas la asekuro-krizo-vojflankan servon denove. La sama nazema agaca ina voĉo. La sama sensenca proceduraj malordo kaj tumulto kaj frenezeco kaj idioteco, stulta, neriparebla, malobeema, nefleksebla, mishegoss, demenco, gran brulo freneza, molto Ohime! kiel Dono Giovannio diras en la opero kun sia nomo. Mi fine parolas al nova klient-helpa persono. “Saluton. Vi ĵus sendis por mi iun por servi mian aŭton, ŝanĝi platan pneŭon. Li ne povis fari tion ŝajne pro la angulo aŭ io simila. Mi ne scias multe pri aŭtoj. Mi estas pli sperta pri mez-20-a-jarcentaj politikaj ŝanĝoj kaj radikalismo kaj moderna manio kun teknologio kaj absurdeco. Li diris, ke mia aŭto bezonas esti posttrenita. Mi do supozas ke mi telefonas vin por aranĝi la posttrenadon. Estas fireston-a aŭtoriparejo en la urbocentro.

Mi opinias, ke ĝi estas sufiĉe fidinda.” “Konsentite, vi do volas ke via aŭto estu posttrenita? Tio ne estas problemo. Mi nur bezonas la polisan nombron. “Uĥĥĥĥ! Denove?! Ĉu via komputila sistemo ne jam havas tion? Tio estas la kialo por komputiloj kaj datumbazoj! Por stoki la tutan informon por ke la homoj ne bezonas memori tion denove kaj denove! Komputiloj! Robotoj! Datumoj, PC-oj, durdiskoj, gigabajtoj, megabajtoj, http-oj, la mondo-larĝo-araneaĵo, la maŝinoj kaperas, la Ĉesanto regas la teron kaj forviŝas la homaron. Mi reproduktas la saman polisan nombron. Mi diras al ŝi tre eksplicite, “Al la aŭto la antaŭa maldekstra pneŭo mankas, ekzistas nur tri pneŭoj sur la aŭto. Bonvolu memori do sendi la kamionon, kiu povos levi aŭton al kiu mankas pneŭo.” “Tio ne estu problemo, sinjoro.” Ĉio estas ĉiam neniuj problemoj. “La kamiono estos instalita kun speciala rado-altiga boĝio por levi vian aŭton kiu ne havas pneŭon.” Dankon. Gracias. Grazie. Kamsa Hamnida. Xie Xie. Origato gozaimasu.” “Bone, mi dankas vin, sinjorino.” Hm, mi supozas ke ŝi ne scipovas la hispanan, la italan, la korean, la ĉinan, kaj la japanan. Kia malklerulino. Ĉiu homo devu povi paroli ĉiujn tiujn lingvojn flue.

Alia horo pasa, alia horo de malsato kaj malpacienco kaj furiozo kaj rankoro al la sistemo, la sensencaĵo, la unu-afero-post-alia-afero, la turniĝadoj kaj kirliĝoj de la moderna kapitalisma diktatoreco kaj la militem-leĝo kiu vere regas la tiel nomata libera mondo, ke Usono provas trudi al ĉiuj senhelpaj triamondaj landoj per tut-terena bombado, ŝok-kaj-timaj taktikoj, la neniigo de Alepo kaj aliaj siriaj urboj en la mortfesto de la senfina civila milito inter la insida mava fireĝimo de Bashar-al -Assad kaj la ribeluloj kiuj volas re-noblighi Sirion denove. Ili prenis paĝon aŭ du el la Usona politika manifesto. Karlo Markso kaj Donald Trumpo laboris kune por eldoni siajn librojn kaj atingi tut-mondan publikon, eĉ la Sirianojn. Ĝi estas vere treega konsiderinda momento en monda historio. Fine, kamiono venas. Ĝi estas kondukita per juna afro-usona viro, sinistra kaprobarbo, brilaj blankaj dentoj, kalva, kapabla, li scias sian taskon, tre ĝentila, eble iom malkomforta pro laborado por blankulaj homoj. Ekzistas diĥotomio kaj kelkfoje malica rilato inter la nigruloj kaj la blankuloj ĉi tie en Usono. La nigruloj kulpigas la blankulojn por

jaroj de sklaveco, rasismo, subpremado, misuzo, neado de bazaj civilaj rajtoj. La blankuloj vidas la nigrulojn kiel homojn, kiuj efikaĉas ilian pacan Usonan socio; ili estas drogemuloj kaj bravulaĉoj kaj gangsteroj kaj prostituitinoj kaj prostituistoj, ili turnas sin al krimo, vulgareco, balaaĵo, nenieco, nescio kiel natura trajto alportita ĉi tien de la afrika ĝangalo. La ŝipoj de la Eŭrop-Afrik-sklavkomerco neniam estu alportita ilin de Eburbordo. La tribaj gvidantoj estu protektita sian popolon kaj ne estu vendita ilin al la malvirta blankulo. Sed ĉi tiu stup-kamiona ŝoforo ŝajnas esti sufiĉe amikema ulo. Li parolas en tiu unika nord-nigra dialekto.

“Bone, sinjoro, ĝi aspektas kiel ĉar la spaco super la alirvojo kaj la angulo, mi ne estos kapabla meti mian kamionon tie. Ĝi ne okazos. Vi devos voki alian stup-kamionon kun la boĝio.” La indigno ŝveliĝas en mia patro.

“Sed ni diris al la asekuraj homoj ke mi bezonas kamionon kun speciala rado-altiga boĝio.”

“Mia kamiono ne havas ĝin. Mi ne povas fari tion. Tiel estas la cirkonstancaro.

“Sed tio estas ridinda! Ni atendis unu horon por la unua ulo kiu ne povis helpi al ni. Poste alian horon ni atendis por vi kiu ankaŭ ne povas helpi nin! Kiu do diable povas helpi nin?! Huh ?!”

“Kiel mi diris, mi scias ke ne pravas, sed vi devas havi stup-kamionon kun boĝio. Tio estas la procedo por movi tiun aŭton. Mi povas fari nenion por vi.”

“Nu, vi envenigas la malbenitan fikamionon ĉi tie senprokaste! Mi estas malsana pro la maltrankvilo kun vi aŭto-popolo! Mi bezonas tiun aŭton posttrenita al la malbenita fifireston-a aŭtoriparejo nun aŭ mi jurpersekutos VIN kaj la unuan mekanikiston kaj ankaŭ la asekurajn homojn ĝis vi ĉiuj estas sangaditaj seka! Ĉu vi aŭdas min?!”

“Kiel mi diris, mi ne penas stumbli vin. Vi devas alvoki dal ili por akiri stupon kun boĝio. Mi estas for de ĉi tie. Paco al vi.” La ŝoforo tiam malrapide trotetas sur la strato, reen en la geton, aŭ en la antaŭurbojn aŭ en ajnan larĝan malferman ebenaĵon de la Granda Usona dezerto por rekomenci sian vivon de feliĉa nescio. Eble tiuj uloj kun la malplej kvanto de sciado estas la uloj kiuj retenas la plej kvanto de kontento kun sia ekzisto. Mia patro estas sur la rando de kompleta apopleksio, ŝaŭmo ĉe la buŝo, letargio, kiel Othello en Akto Kvar Sceno Du post lago laboris sian sorĉon kun la trompo kiel la itala drogo mandragora, venenante la pensojn de Othello ke Desdemona-o estas malfidela kun Cassio, kaj prenis la poŝtukon de Othello, kiun la patrino de Othello aĉetis de egipta aŭguradistino. Ĉiuokaze, Patro estas livida.

“Ni devas voki tiujn di-damnitajn asekur-homojn denove! Nur forgesu ĝin!”

“Mi vokos, mi vokos.”

Denove la samaj senpensaj interagoj kun la maŝino, la homo, la polisa nombro, la sencela babilado en ajnaj eblaj fremdlingvoj, kiujn mi povas paroli: la latina, la samoana, la finna, la tagaloga, la mongola, la kantona, la hakka, la turka, la uzbeka, la paŝta ([la triba lingvo de Kabulo en Norda Afganio](#)), la pola, la armena, la helen-greka, la provoj ĉe humuro pri la fulmrapidaj ŝanĝoj de la usona politika sceno de superliberala Obama-a demokratio kie viroj, virinoj, kaj geinfanoj ricevas senpagan i-Telefonon kaj senpagan medicinan prizorgon kaj senpagan manĝaĵajn kuponojn al la izolismo kaj fermenseco kaj paranojo de Trump-o kie ĉiu hispanlingvulo estas danĝera kontraŭleĝ-enmigrinto kiu saltas super nia Usono/Meksika bordo por vendi drogojn kaj por seksperforti niajn virinojn, ĉiu islamano estas teroristo kiu volas eksplodigi niajn konstruaĵojn kaj mortigi niajn homojn kaj efektivigi Ŝaria-an juron en la Blanka Domo, in Ŝallah tiu estos, la profeto Mohamedo, paco estu sur li kiam ni eksplodigas Kapitol-Holmo, ni havos ĝin. Ĉiu nigrulo estas enfiksita en la geto je malriĉeco. Tio estas la nova Usono revenonte la malnovajn tagojn kiam blankuloj ĉiam pravis kaj

ĉiuj aliuloj neniam pravis. Usono por la usonanoj kaj forgesu ĉiujn aliulojn. Rosjo la nitistino. FDR-o. Tiru vian propran pezon. Riparu mem vian aŭton. Tiuj estis la tagoj.

Mi diras al la asekura ulo ĉifoje, “METU ĜIN EN VIAJ NOTOJ: Certiĝu ke la stup-kamiono HAVAS la boĝion levi la aŭton kiam estas nur tri pneŭoj!” “Mi bedaŭras, sinjoro, sed al kiu flanko de la aŭto mankas la pneŭo?” “La antaŭa! La antaŭa maldekstra!” “La antaŭa kiu?” “La antaŭa maldekstra!! ĈU VI SCIPOVAS LA ANGLAN?!” “Jes, mi estas flua en la angla lingvo, sinjoro.” “Gratulojn! Nun posttrenu mian aŭton! Eble vi povas mortigi du birdojn per unu ŝtono! Lernu la anglan kaj posttrenu aŭton! Ĉu tio estas tro giganta tasko por vi?!” “Ho, ne, sinjoro, tio ne estas problemo! La nova stup-kamiono estas alvenonta post kvardek kvin minutoj. “Alia tekstmesaĝo pri la stup-kamiona nomo kaj loko, la estimita tempo de alveno, la kreditkarda numero, la re-voka numero, la sekvada aparato. Ĉe tiu punkto mi estas preta nur frakasi la aŭton. Ĝi neniam estos trenata ien.

Fine, per miraklo pli miriga kaj admirego-inspiranta ol tiam, kiam Moseo apartigis la Ruĝan Maron sub la vergo de la fortula Eternulo, la Berlina Muro malsupreniĝis, la Imperia Japana Mararmeo kaj Aerarmeo detruis la usonan ŝiparon ĉe Perl-Haveno, Havajo per unu embusko, la 19 al-Qaeda-aj teroristoj detruis la Mondkomercan Centron en Novjorko kaj Usonan Maramean Komandcentron en la Pentagono en Vaŝingtono dum unu tago je septembro 11, 2001, la ĝusta stup-kamiono alvenas. Tiu ulo vere havas la ĝustan ilaron por konvene treni la aŭton al kiu mankas unu pneŭo sur la antaŭo! Nekredeble! La usona sistemo de posedaĵoj, miskomunikado, kaj tutmondiĝo kiuj alkondukas al malkapablo kompreni homojn kun kiuj oni devas kunlabori kaj kunkonversacii, efikas! Li levas la aŭton per la boĝio, movas la aŭton al la strato, mia patro kaj mi sekvas la stup-kamionan ŝoforo-savinto-mesion laŭ la malpura vojoj, sur la 70-okcidentan ŝoseon kiu iras al urbocentro. Gigantaj Bud-Malpezaj fabrikaj signoj, Tutland-asekur-firmaj konstruaĵoj, konkretaj ŝtalaj oficejoj, konstruejoj kun ŝarĝleviloj dehakante malnovajn entreprenojn por instalii novajn kunproprietajn loĝblokojn,

apartamentaj kompleksoj, bibliotekoj, muzeoj, restoracioj, ktp. La malsuprenpremataj uloj atendas ĉe la bushaltejoj ĉie sur Stratoj Broad, Majn, Avenuo Kleveland, Avenuo Grant, por iri al sia asistismaj lokoj, siaj sen-elirejaj minimum-salajraj laborpostenoj, siaj vivoj de analfabeteco kaj nescio, siaj drog-domoj, la tragedio de drogoj en Usono, la malŝparo de homaj vivoj kaj inteligenteco.

Ni alvenis malantaŭ la stup-kamiono al la granda fireston-a aŭtoriparejo en la urbocentro. La situacio estis finfine solvita. Ni povis movi la difektitan aŭton de nia domo al la urbocentra loko kiu fine restarigi la aŭton al la originala stato de laŭceleco, bontenado, komforto, konveneco. Ĝi alportos min de A al B, aŭ A al Z. Mi povas veturi sur la ĉefvojoj, flankovojoj, tra trotuaroj per aŭdacaj manovroj se mi tiel elektus. Mi povus havi vetkurojn kiel en la kinofilmoj Usona Murskribaĉo kaj Graso. Sed ĉiam estas delogiloj. Oni ne travivas tra vivo sen la unu lasta baro kiu malhelpas la atingon de la finfina premio. Martin Luther King-o la dua havis multajn barojn, la judoj fuĝantaj Egiptujon al la Promesita Lando eltenis jarojn da vagado kaj malsato atingi la finan sonĝon. La garantio. La garantio. Ĉu la jar-garantio de la Toyota-a Korola-o kovrus ajnan kaj ĉiujn servadojn kiujn la aŭto eble bezonus? Pneŭoj, fluido, rimenoj, bremsoj, pedaloj, stirradoj, rapidometro, radioricevilo, oleo, intertransmisiilo, motoro? Mi ne scias! Mi havas neniun indicon! Mi ne havas la dokumentaron por la garantio en mia aŭto! Kion mi faru! Kion mi faru! Mi ne scias kiajn servojn, kiujn mi diru al la fireston-aj aŭtoriparejoviroj, ke ili faru ĉar mi ne scias tion, kiom ĝi kostos, tion, kio la problemoj estas! Ili povas fari bazajn diagnozojn je la aŭto kontraŭ 99 dolaroj! Poste pneŭa anstataŭigo kontraŭ 88 dolaroj! Sed kio pri aliaj eblaj damaĝoj?! La garantio! Usono! Komplikiĝoj! Financaj drenadoj!

Mia patro kaj mi pasigos la sekvantan tagon klopodante malkovritie, kie ho kie estas tiu supozita garantio kaj sia paperoj, multe kiel klopodi trovi Carmen-San-Diegon. Kie ili povus esti? Ĝi povus esti en la gant-kupeo, en la malantaŭa sidloko, hejme en la kuirejo, la salono, la pianoĉambro, ĉe la origina koncesio tie, kie la aŭto estis

aĉetita. Eble la koncesio retenis la paperojn kiel provo pri fraŭdo je la aĉetantoj! Lando de tromp-artistoj kaj tiaj impertinentuloj!

Mi prenas ĉi tiun okazon prelegi al mia patro pri la kialo, ke Usonoo fariĝu Japanio. “Rigardu, paĉjo, mi ne volas diri ke la usona popolo bezonas iĝi japana. Ili ne devas havi flavan haŭton kaj oblikvajn okulojn kaj manĝi kun haŝioj kaj konsumi krudan fiŝon kaj rizon. Ili ne devas havi conformistan imperiisman sintenon kiu lokigas ilin kiel la supera raso kaj ĉiuj aliaj popoloj sur la tero estas malsuperaj hibridoj kiuj bezonas esti koloniigitaj kaj sklavigitaj. Ne, mi estas diranta, ke Usono devas plibonigi sian publikan transporton! Ĉiu urbo devas esti konektita per fervojo facile kaj malmultekoste kiel okazas en Japanio! Ek de Nov-Jorko al Los-Anĝeleso, 10- dolara trajnorajdo, ĵus kiel ek de Saporio en la norda Hokaid-insulo al Nagasako! Rigardu Tokion! La plej efika kaj vasta metroa sistemo en la mondo! Ŝinjuku-o! Akusuka-o! Ŝibuya-o! Ropongi-o! Kaj oni povas iri ek de Tokio al Kioto, al Osaka-o, al Nagoya-o, Kobe-o, Hiroŝimo, ĉiuj per trajnoj! La japanoj ne bezonas konduki! Ili fabrikas aŭtojn tiel bone por gajni monon, sed kondukado estas nekoncerna! Mi volas vidi, ke Usono adoptu la japanan modelon pri publika transporto. Tiel ni ĉiuj povos vivi en feliĉeco kaj komforto! Ne plu dramoj kun aŭto-detruado, miskomprenoj kun idiotoj kiuj traktas klientojn! Sakeo! Samurai-o! Banzai-o! Kobe-o al Kioto, Tokio al Osaka-o, kiel Klevlando al Naŝvilo, Louisvil-o al Milvokio, Jakson-o, Misisipio al Sankta Luiso! Antaŭhaltigu, ke aŭtoj fariĝias niajn vivojn vivantaj inferoj! Sufiĉas! Iĝu Japanion! Fariĝu efike! Fariĝu sane! Banzai-o!

La respondo de mia patro, “Ĉu nun ni povas manĝi?”

Bukaj-aj esperantistaj frenezetuloj

Kolumbuso, Ohio, estas plago, kloako, defalaĵejo de nenieco, kun mortema, senfina, senmensa agrikulturo kaj sporta obsedo. La popolo amas sian uson-futbalon kaj siajn Jozef-Cuervojn kaj BudLajtojn, siajn realecajn spektaklojn, siajn grandekranajn televidilojn, siajn stereofoniajn sistemojn, sian antaŭurbojn kun banalaj komercaj centroj, siajn sportajn aŭtojn, sian Maseratojn, siajn sport-utilecajn veturilojn, siajn promenadojn kun francaj pudeloj, siajn vanilajn latte-ojn ĉe Starbukoj, la malvarman, ventet-plenan, balzaman veteron, kiu enblovas el okcidenta Ontario kaj venas malsupren tra Miĉiganon kaj Detrojton en Ohion, preter la ekzotajn ruinojn de Toledo kaj Klevlando, tra la karn-kaj-terpoman, malgrand-animan sed ĉarman provincismon de kaduka Jongstojno, fola Zajnsvilo, malagrabla Dajtono, cindrogriza Astabulo, kaj bagatela Pataskalo.

Farmistoj, profesoroj, asekur-vendistoj, advokatoj, kuracistoj, senvestiĝistinoj, prostituitinoj, drogaĉ-vendistoj, blankulaj anglosaksaj protestantanoj, judoj, italoj, irlandanoj, ĝermanoj, karibianoj, somalianoj, niĝerianoj, kaj Atestantoj de La Eternulo ĉiuj popolas ĉi tiun paroleman kaj senordeman ĉefurbon de la bukaj-a ŝtato. La domoj en la universitata regiono, germana vilaĝo, kaj itala vilaĝo estas lignaj kaj havas la malnov-stilan ĉarmon de tiuj domoj konstruitaj antaŭ la dua mondmilito. Ili havas riĉe poluritan alabastron kaj ŝtonajn kanapojn sur la verandoj kaj velkintajn ŝtofojn sur la seĝoj kaj hamakoj. La ĉielo estas ĉiam brilkolor-griza kaj samtempe malgaj-nigra kaj ŝvebas super la vintra malagrableco dum la monatoj de novembro al majo. Neniam estas ĉesigo de ĉi tiu mallumo; la nuboj baras sunlumon kaj varmon. La ŝoseoj estas ŝtopitaj per aŭtoj veturigataj per ekscititaj kaj koleraĵ mez-klasanoj kiuj estas ĉagrenantaj pro la pagado de la fakturoj por siaj ekscese multekostaj domoj en tiuj puraj famili-celitaj lasu-ĝin-al-Kastor-aj, tut-usonaj antaŭurboj de Ŭortingtono, Poŭelo, Dublino, Malnova Ŭortingtono, kaj Hiliardo. Ili estas la perfektaj lokoj por kreskigi

familion, maljuniĝi kun la amita edz(in)o, kolekti soci-sekurecon kaj pension, ludas ravan raŭndon de golfo, plani la feriojn al Eŭropo kaj la Karibio kaj la emeritiĝon en Florido aŭ en Teksasa kondominio. Ili estas la idealaj lokoj por hormone-tirataj adoleskantoj agi sur siaj seksaj scivolemoj en malpuraj parkejoj ekstere de la polaris-a kaj tutel-a butikcentroj aŭ la barns-kaj-nobla vendejoj je la 16-strata kaj segilmuelej-strata transirejo. Kolumbuso, Ohio estas glora kaj intelekta rifuĝo ĉe la centro de la Ohiŝtata tereno, kie brilaj kaj kuriozaj kolegiaj studentoj povas ĝisfundlegi la senfinan kvanton de libroj, teatraĵoj, lernolibroj, akademiaj tezoj, kuirlibroj, mapoj, katalogoj, kaj kolorigaj libroj. Ĝi estas loko kie oni povas perdiĝi en la brua varieco sur Haj Strato dum evitante la senhejmajn virojn almozpetantajn por moneroj ekstere de cindrogriza, rompita, fatras-plena McDonalds-o en 18-a Avenuo kaj Haj. La viroj tie ĉiam krias je la naivaj suburbaj universitataj studentoj, "Donacu iom da monero, donacu iom da monero!"

En tia urbo, en kiu stokejoj, fabrikado, uzinoj, aŭtovendado, administrado de privataj kluboj, kaj aliaj similaj financ-ligataj profesioj regas la scenon, intelekta vivo estas malabundaj kaj tre multe dezirata. Homoj bezonas ion por distri sin for de la mizero de burĝaj mez-klasaj kutimoj. Tiam, kiam la kalkuloj, impostoj, kaj aŭtaj asekuroj estas pagitaj, kaj la geinfanoj estas senditaj al luksaj, privataj universitatoj en Ĉikago, Kalifornio, Bostono, Vaŝingtono D.K., Nov-Jorko, aŭ Nov-Jerzejo, oni devas havi manieron por amuziĝi preter la spektado de "Observado la Kardaŝianojn" aŭ de la metamorfozo de Bruso Jenero igi belan Kajtlinon Jeneron aŭ de la ŝokema kampanjo por la prezidanteco farita de Donald Trumpo en 2016 kiam li deklaris, ke Meksiko sendas ĉiujn siajn problememajn homojn al Usono, t.e. la meksikanoj kiuj estas ebruloj kaj seksperfortistoj kaj mallaboristoj kiuj senĉese enkasigi monon de la usona registaro. Viro kiu havis tian bezonon estas Grito Aŝermano. Grito estis juda je la patra flanko kaj greka, itala, meksikia, dana, kaj kenja je la patrina flanko. Li estis donita la nomon Grito ĉar tiam, kiam li naskiĝis, la kuracistoj ne povis retenigi per siaj manoj lian korpon kiam li eliris de la patrina utero kaj faris sian eniron en ĉi tiun brutan mondon. La kuracistoj deklaris, ke li

estas la pli glita bebo, kiun ili iam ajn vidis dum siaj tutaj profesiaj jaroj, kaj tiel lia nomo estis elpensita.

Glito kreskis en la normala, prospera, burĝa ekzisto, kiu estas la usona revo por ĉiuj enmigrintoj kiuj fuĝas al Usono por eskapi malriĉecon, koruptecon, maljustan revenuan malegalecon, neeban vivkondiĉojn, kaj malbonkvalitan sanzorgon en siaj hejmlandoj. Li havis agrablajn lerneajn dancfestojn, kisesiojn en la malantaŭa sidloko de la Buiko de sia patro, kaj kaŝu-vin-ajn ludojn en la verdaj arbustoj de la enorma suburbana najbaraĵo kun siaj amikoj, kiuj estis infanoj de malsamaj fonoj kun ruĝvangaj vangoj kaj larĝokula, infanaĝa senkulpeco. Lia patro estis en Kolumbuso ekde kiam li diplomiĝis en universitato en la Nordoriento, aŭ Konektikuto aŭ Nov-Jerzejo, kaj trovis sin nekapabla atingi enlason en leĝolernejojn ĉe Kolumbio aŭ Jalo aŭ Kornelo aŭ Harvardo, kion sia patro deziris ĉar li sciis, ke diplomoj de tiuj supronivelaj hederoligaj lernejoj estis la solaj diplomoj kiuj estas signifoplenaj al la grandaj leĝofirmaoj en Nov-Jorko aŭ Ĉikago aŭ Losanĝelo, kie ĉiuj brilaj junaj leĝolernejaj postdiplomitoj deziras labori por perlabori tiun centmildolaran pojaran salajron kaj atingi la sukceson al kiu la gepatroj puŝas ilin kun la celo ke vivo ne ŝajnus esti malplena, sen signifiga, malluma trogo al maljuneco kaj morto. Glito kaj la patro kun ĉagreno akceptis matrikuli ĉe la leĝolernejo ĉe Kapitulo Universitato en urbocentro Kolumbuso ĉe Kvara Avenuo. Tio estas du blokoj for de Stratoj Alt kaj Brod, ĉirkaŭita de almozuloj kun poliestirenaj tasoj, kiuj petas por la ŝanĝmono esti enfaligita de la senpaciencaj, arogantaj profesiuloj, kiuj laboras en la teknologiaj centroj aŭ en la Nationwid-a asekura kompanio aŭ en la kongresejoj. Estas kolombiaj kolbasaj budoj kaj perfortaj virinoj kun tatuoj kaj malalttranĉitaj roboj. Estas malnovaj flegistinoj atendante por la buso por eliri al la orienta flanko aŭ al la pli malvirtaj kvartaloj kiu konektas kun Alt Strato kiam oni vojaĝas norden al Mallonga Nordo kaj la universitato, kie senrimedaj postdiplomaj studentoj, liber-spirituloj, drogaĉvendistoj, kaj kafej-laboristoj vivantaj en malpureco en eta apartamentoj priploras pri la bezonon eskapi al Kalifornio aŭ Arizono sed fakte neniam forrompos for de la kruelega subpremado de la mezokcidenta-stila fermita menso. Patro studis

ĉiutage ĉe Kapitolo Universitato interne de tiu ĥaosa ĉirkaŭaĵo de la 1970-aj jaroj. Tio estis la epoko de Niksono kaj Fordo kaj Kartero, disko, ok-trakiloj, rulsketadaj himnoj, la kantada grupo Reĝino, Ŭatergat-o, la energia krizo, la rompigo de la baroj kun Ĉinio, la alteco de la Malvarma Milito, la Nov-Jorka senkurentiĝo, Filo-de-Sam-o, la juda poŝtoŝiceja laboristo kiu murdis junulinojn pro la komandoj de demono hundo, Serpico, la filmo "Ĉiuj la Viroj de la Prezidento", Studio 54, la Duko de Hazardo, kaj poliesteraĵoj vestoj.

Nun estas jaro 2015 kaj la mondo estas en katastrofo. Glito estas mezaĝa kaj suferas je grandega krizo kaj hejme kaj profesie. Obama estas prezidanto kun la sansistemo Obamakaro en plena efiko, eŭropaj nacioj estas sur la rando de kolapso, Grekio kaj Portugalio kaj Irlando estas preskaŭ bankrotaj kaj suferas de amasa senlaboreco, la recesio de 2008 ankoraŭ havas kontinuajn efektojn je la generacio kiu venis el la ĥaoso de la Buŝ-a administrado, la abomenaj militoj en Irako kaj Afganio malplenigas la ekonomion pro troa elspezado je militaj penadoj premlatigi la malbonajn mez-orientajn teroristojn kaj trovi tiujn ĉiam-elusivan amasdetruilojn. Ĉinio estas la kreskanta monda superpotenco. Usono estas sur la deklivo. Ĝia urboj havas naŭzajn dekadencojn kaj amasoj da senesperaj krimo, vandaleco, malordo, kaj rubo, kaj urino svarmas ĉie. En la lando la kondiĉoj estas malagrablaj de Nov-Anglio al la Sudokcidento kaj al la marĉoj de Louisiana kaj al la putriĝa Miamio. Kanado ŝajnas esti ideala loko por junaj usonanoj forkuri dum tiu tempo de kadukiĝo kaj malĝojo. Glito estas spertinta traŭmaton; ĉio, tion li antaŭe kredis kiel infano, ŝajnas iom sencela: la serĉo por mono, belaj virinoj, rapidaj aŭtoj, senhonta, ekstravaganca vojaĝado. Kiam li estis juna viro li estis sovaĝa kaj malretenita. Li ofte iris je neplanitaj veturoj al la Sudo kaj tra Teksaso kaj en Meksikurbo kaj Acapulco, je subitaj flugoj al greka insulo kaj vojaĝoj en Nov-Jorko por vespermanĝi ĉe la restoracio de Sardinio kun Brodŭaj-aj produktantoj. Li iradis al senvestiĝejoj ĉe Henderson Vojo kaj en Reynoldsburgo ekstere de Brajs kaj Livingston Vojo, kie li sendube povis akiri la veran guston de la ohia laborist-klasa idioteco. Li amis tian vivon de nescio; li amis, ke li ne devas legi romanojn, ne devas studi fremdajn kulturojn, ne devas spekti CNN-

on aŭ Foks-novaĵojn. Li ignoris Raĥelon Madoŭon kaj Lupon Bliceron kaj Andersonon Cuperon. Tiuj homoj estis idiotoj.

Sed en mezaĝo ĉio ŝanĝas. Sintenoj ŝanĝas kaj la scio de morteco igas ke oni volas esplori pluajn eblojn, malsamajn vivmanierojn, kaj novajn perspektivojn pri tiel, kiel oni devus vivi. Glito komencis studi aliajn kulturojn, li ekstudis hispanan gitaron, filipinan kuirarton, kamboĝajn lingvajn lecionojn, flandran dancadon, kaj finnan kaligrafion. Unu de la malmultaj amikoj de Glito kiu restis en Kolumbuso estis maljunulo nomata Rudiakaniso kiu vivis en la Klintonvila kvartalo for de Haj Strato proksime al la Grajslanda Plazo. Klintonvilo estis ĵazema kaj duon- unika speco de loko tie, kie blankulaj geneedukitoj miksigis sin kun la artaj elegantaj homoj kiuj vivis tie je bizara miksaĵo. Estas japanaj enmigrintoj kiuj starigis siajn bifstekojn restoraciojn apud eminentaj ohi-ŝtataj instruistoj pri jida, aŝkenazi-juda, kaj ĝermana historia studoj. Estas barataj vendejoposedantoj de la Guĝarato kaj aŭtovendistoj kiuj estas tri generacioj for de kamparanoj en Limo, Ohio aŭ Indiano aŭ Okcidenta Virginio. La kvartalo estis kruda, la trafiko atendis neniam ĝis tiam, kiam la semaforoj ruĝiĝis, kaj la piediranto-vojetoj estis neefikaj. La homoj atendantaj por la buso estis ĉiam kolera kaj ĉagrenitaj kvazaŭ iliaj vivoj estas perditaj en nenieco. Rudiakaniso vivis kvin blokojn for de tiu kvartalo en malsupremez-klasa, modesta areo de unu-etaĝaj domoj kiuj indikas uson-stilon de pli frua epoko. Estis grandaj leterkestoj dekstren ĉe la faco de la trotuarrando kaj la domoj estas pentritaj blankaj kaj bluaj kaj verdaj kun krestetoj. Heĝoj de arbustoj ĉirkaŭas la malgrandajn lo ĝejoj, kio donis al ili realan usonan banalecon kaj normalecon. Vjetnamio-militaj veteranoj estis la najbaroj de Rudiakaniso. Ili estis viroj kiuj spertis tiom traŭmaton pro la rigardado je la pereado de siaj kamaradosoldatoj en la Vjetnama ĝangalo pro atakoj de Napalmo ke ili ne plue povis labori kaj do vivis per malkapablec-transpagoj el la federala registaro. Flor-infanaj judaj virinoj el Kolorado kaj Kentukio ankaŭ vivis ĉirkaŭ la areo kaj Rudiakaniso estis afabla al ĉiuj. Li estis mallonga, ronda, kalva, kaj feliĉokulita vireto kiu havis fremdan akcenton. Lia patro estis germano de francohugonota deveno kaj lia patrino estis rusa aristokrato de Sankta Peterburgo antaŭ ol la revolucio de 1917 kaj

Lenin kaj liaj bolŝevismaj amikoj sturmis la Vintran Palacon kaj ruinigis ĉiun amuzon por ĉiuj. La gepatroj de Rudiakaniso renkontis unu la alian en Latvio dum la 1930aj jaroj tiam, kiam Sovetunio regis. Rudiakaniso naskiĝis en Rigo, tiu granda ĉefurbo ĉe la latva marbordo. Li kreskis parolante la latvan, la germanan, kaj la rusan. La familio transloĝiĝis el Rigo al la Nigrarbaro en Germanio kiam Rudyakanis havis naŭ jarojn. Rudiakaniso kaj lia familio estis feliĉaj homoj en Germanio ĝis la dua mondmilito ekeksplodis kaj Rudiakaniso trovis sin en dramo kaj tragedio. Li estis Hitlerojunulano. Li estis trejnata malami la judojn, malami la francojn, malami la anglojn, kaj malami la polojn. Post la milito Rudiakaniso kaj liaj gepatroj fuĝis el Eŭropo pro la timo, ke baldaŭ tria mondmilito denove eksplodos. Ili vojaĝis ŝipe el Anglio al Bostono. En Bostono ili vojaĝis trajne al Oregono. Rudiakaniso, havante nun nur dek naŭ jarojn, estis tre ekscitata pro tio. Al li la vojaĝo estis granda aventuro. Por liaj patrino kaj patro, tamen, tio estis teruranta ŝanĝo. Antaŭe iliaj tutaj vivoj pasigis en eleganta Eŭropo. Nun ili estis irantaj vivi en Oregono inter arbaristoj kaj kamparuloj! Surprize en Oregono Rudiakaniso floris. Li diplomiĝis el mezlernejo kaj kolegio kaj poste ricevis postdiploman titolon tie. Tiam la tuta familio transloĝiĝis al Kolumbuso kie Rudiakaniso trovis laboron. Sed al siaj gepatroj, tamen, loĝi en Kolumbuso, Ohio, estis loĝi sur Plutono dum loĝi en Oregono estis nure loĝi sur Jupitero! Estis ŝoke por kleraj geeŭropanoj veni al tia bovinourbo de terkulturistoj kaj malkleraj sportidiotoj. Ekde tiu tempo Rudiakaniso pasigis siajn tutan vivon en Kolumbuso en tiu sama domo. Li neniam geedziĝis kaj neniam eskapis la feran manon de siaj gepatroj ĝis tiam, kiam ili forpasis kaj li fariĝis maljunulo.

Glito vizitus Rudiakanison dum sia libera tempo. La domo de Rudiakaniso ĉiam estis je stato de kompleta malpureco kaj malordo. Estis libroj, revuoj, ĵurnaloj, dokumentoj, manĝaĵ-kovriloj, kaj ladskatoloj ĉie sur la planko kaj sur la sofoj kaj la seĝoj. Malordo regis komplete. Glito ofte sugestis al Rudiakaniso, ke li dungu servistinon aŭ eĉ edziĝu kun meksika virino por ke ŝi purigu la domon. Rudiakaniso forridis tiujn sugestojn, dirante ke li estas tro maljuna kaj tro rigida por edzeco aŭ dungi hejmhelistinon. En sia

libera tempo, nuntempe preskaŭ ĉiam en izoliteco, Rudiakaniso tradukis malnovajn rusajn poemojn de Puŝkino aŭ Lermontovo en la anglan. Li legis germanajn romanojn verkitaj de Tomaso Manno kaj Hermano Hesseo kaj Goetheo kaj perdus sin en mondo de fantazio. Unu tagon li subite ekparolis al Glito per sia latva/rusa/germana akĉento, “Vi scias, sen miaj tradukoj kaj miaj romanoj, mi verŝajne pafus min! Ĉiaokaze, ĉu vi volas kekseton?”

Glito estis koncernata. “Kial vi pasigas tiom da tempo sola? Kaj kial tiuj tradukoj estas tiom gravaj por vi? Kiu vere pripensas pri Lermontovo? ”

“Nu, mi havas grupojn al kiuj mi vizitadas foje.”

“Kiajn grupojn?”

“Lingvajn grupojn. Estas la franc-lingva klubo, la hispan-lingva klubo, kaj la Esperanto-klubo”.

“Ĉu Esperanto? Kio estas Esperanto?” Glito estis ja konfuzata de tiu vorto.

“Ĝi estas lingvo elpensita de viro en Pollando en 1889. Li esperis ke tiu lingvo fariĝus universala kaj homoj en la tuta mondo do povus paroli unu la alian.”

“Kial vi vizitadas ĉiujn tiujn klubojn?”

“Ĉefe renkonti knabinojn. Je mia aĝo mi ne povas renkonti ilin alimaniere, kaj mi ankoraŭ povas paroli al belaj junaj virinoj kaj eble havas la fantazion, ke ili volus havi rilatojn kun mi. Eble ili ne scias, ke mankas al mi la povo havi erektiĝon plue.”

“Ĉiam estas viagro.”

“Ho, ne, mi aŭdis rakontojn pri tio, ke ĝi igos, ke oni daŭras tro longe, ekzemple kvin horojn. Tion mi ne volas! Sed venu, venu kun mi hodiaŭ al la Esperanto-klubo. Mi kredas ke vi ĝuos ĝin. ”

“Nu, bone. Kial ne? Mi ne perdos ion se mi iros tie kun vi.”

Je tiuj vortoj la mezaĝa, eksvojaĝema viro kun nov-akirita intelekta scivolemo kaj la maljuna Latvo kun deklivo por flirtado kun konfuzitaj junaj virinoj suriris la hidrargokoloran Saturnon de Glito. Tiu mezgranda aŭto, kiu estis fabrikita en 1999 dum la prosperaj jaroj de la registaro de Klintono, estis brila kaj stilema kaj indikas usonan riĉecon kaj lukson kaj la neceson montri al la resto de la mondo, ke Usono estas la numero-unu-a superpotenco. Ĝi triumfas super ajna alia lando, kiu provas efektivigi Unua-Mondan statuson el la ŝlimo kaj ŝimo de siaj mizeraj estintecoj. Glito kaj Rudiakaniso veturigis sur Indianola Avenuo kie homoj skuis siajn kapojn draste tien kaj reen je la sono el muĝoskatoloj kiuj estis bruegantaj la plej bonan hip-hop-an muzikon de la lastaj dudek jaroj. Glito drame manovris la aŭton en perfortan kunfandon de Aŭtovojo I-71 kaj Indianola Avenuo. Tiu itinero kondukis al la urbocentro kaj la ĉefa biblioteko, vasta kaj tre ampleksa biblioteko kiu estis voĉdonita esti unu de la plej bonaj en Usono de Tajm kaj Neŭsŭik gazetoj. La Esperanto-kunveno estis okazonta en la kvina etaĝo de tiu amasa, titania komplekso. Ĝi situis apud Jeferson Strato kaj Grant Avenuo en kruda parto de la urbocentro sur la orienta flanko de Haj Strato. Oni devas esti zorgema piedirante el la aŭto por iri al la biblioteka enirejo. Bonŝance Glito kaj Rudiakaniso povis parki sube en la subtera garaĝo, kie parkspacoj estis malabundaj kaj kie la biletaj servistoj ĝenerale estis amikemaj afrikaj viroj kiuj ridis je la stultajn ŝercojn, kiujn homoj diris tiam, kiam ili pagis la du-dolaran parkkotizon. “Ho, tio estas komika, jes ja!” Ĉi tio donis al homoj senton de komforto en mondo, kiu povas esti fojfoje malvarma kaj timiga. Rudiakaniso piediris malrapide, uzante bastonon, de la garaĝo en la bibliotekon, kie eklektika kafejo en la vestibla areo estis disponebla servi ilin bongustajn dolĉaĵojn. Rudiakaniso aĉetis ĉokoladokreman nubetpufaĵojn kaj Glito aĉetis salamsandviĉon kaj skatolon de Sinjoro Pibbo, kiu estis malofta plezuro en Ohio. La du viroj sidis sur ferarĝentaj seĝoj, apud baraktanta, socia-dependa familio, kiu estas argumentinta pri fakturoj kaj socialaj asignaĵoj kaj sanproblemoj.

Subite 40-kaj-kelkaj-jara viro kun malrektliniigitaj dentoj, seboŝmirita hararo, hida akneo, pala vizaĝhaŭto, kaj granda biciklokasko sur la kapo alproksimigis Gliton kaj Rudiakanison. Tiu viro havis superenergian mienon; ŝajnis ke li ĵus konsumis pli ol 50 tasojn da kafo unuglutege. Li estis maltrankvile spiritema kaj havis la energion de maljuna infano en la korpo de mezaĝa viro. Ŝajnis ke la infana animo neniam eliris el li. Li komencis paroli laŭte kaj ĥaose al la du viroj. “Hej, pardonu, pardonu, mi estas malfrua ĉar mia busvetura permesilo perdiĝis ĉar vi scias kiel la vivo estas tiam, kiam oni foje simple ne povas trovi busveturan permesilon en la rubejo ĉar rubo amasiĝas en la domo tiam, kiam ne ekzistas homo, kiu purigas la rubejon kaj ĝi simple amasiĝas ĉar aĵoj ĉiam amasiĝas kaj konstruas sin ĉar la mondo funkcias tiel sed mi estas studinta la rusan kaj mi kredas ke mi majstris la rusan kaj mi nun estas flua en la rusa post nur kvin tagoj, nur kvin tagoj, kaj mi scias ĉiujn rusajn vortojn kaj frazojn en la libro, se libro eĉ ekzistas, ha ha ha! Tio estas tiel amuza, ĉar estas neniuj libro, neniuj rusa libro, Hahaha! Ĉu vi komprenas tiun ŝercon?!” Glito kaj Rudiakaniso estis iom perturbitaj. Glito estis ankaŭ hororita. Rudiakaniso decidis klarigi. “Glito, tiu estas Davido. Li estas ano de nia Esperanto-grupo.”

Glito flustris diskrete en la orelon de Rudiakaniso, “Ĉu ĉi tiu ulo estas ano de nia grupo? Ĉu li ĵus eliris el psikiatra malsanulejo?”

Rudiakaniso ne komprenis. “Kion?!”

“Mi diris, ĉu li ĵus eskapis el psikiatra hospitalo?”

“Mi ne povas aŭdi vin, mia malnovaj oreloj ne funkcias.”

“Ne gravas.”

Tiu freneza viro en la biciklokasko, Davido, subite sternis grandan politikan mapon de Eŭropo sur la tablon kaj ekkriegis entuziasme pri io.

“Vidu, tio estas mapo de Eŭropo ... Eŭropo estas lando sur la alia flanko de la mondo ... estas tie multaj francaj vinoj kaj kukaĵoj kaj

aliaj aĵoj, en Italio kaj ĉie, kaj ili ŝatas manĝi belgan ĉokoladon en Svislando kaj polan kolbason en Grekio. Ne maltrankviliĝu ĉar mi faris la esploron. Mia plano estas iri perbicikle al ĉiuj landoj en la lando de Eŭropo kaj havi intelektajn konversaciojn kun la homoj en tiuj lokoj per iliaj denaskaj lingvoj. Tio estas la kialo ke nun mi majstris 12 malsamajn eŭropajn lingvojn, inkludante la svahilan. Ĉu vi ne scias ke svahila estas eŭropa lingvo en la lando Eŭropo?! Tio estas medicina scienco! La lingvo de scienco ne povas esti pruvita malĝusta! ”

Rudiakaniso flustris nun en la orelon de Glito “Pardonu lin, li vivas en ia felando. Li ne estas normala en la kapo. Li ofte estas en la loka psikiatra malsanulejo.”

Glito replikas, “Mi ne estas surprizita pri tio. Mi miras ke la kuracistoj foje liberigis lin. ”

La tri viroj tiam pluiris piediri al la konferenca ĉambro en la ĉefa etaĝo de la biblioteko. Ĝi estis formita per blankaj muregoj kun ornamaj paneloj kaj granda kverka tablo ĉe la centro de la ĉambro. Blanka afiŝego kun algebraj ekvacioj estis je la dekstra flanko. Ĉe la kverka tablo sidis grupo de homoj kun tre serioza kaj strikta aspekto. Unu estis malmola tipo kun manikmankanta leda jako kaj tatuoj ĉie sur la brakoj kaj kolo. Li havis kapon mallonge razitan kaj ŝtalsimilajn okulojn. Oni ne atendus ke tiu tipo de viro ĉeestus intelektan konferencon pri obskura lingvo kiu ne estas grava al la plimulto da homoj en la mondo. Estis tie ankaŭ du edziĝintaj paroj. Unu paro estis juna. Eble ili havas preskaŭ dudekajn jarojn. La viro estis bela kaj magra kun la oft-usona trajto de mallonga bruna hararo kaj muskola torso. La tre bela virino havas flav-brun-verdajn okulojn kaj palan mongolian vizaĝkoloron. La alia paro estis pli maljuna. La viro havis tre grandan abdomenon kaj la virino estis korpulenta kaj antaŭe estis blondulina sed nun ŝi estis grizulino. Ŝi tamen havis ian eksplodeman vivoforton tiam, kiam ŝi moviĝis. Glito rimarkis ke la du virinoj estas rusaj kaj la du viroj estas usonanaj. Ili estis interretogeedzecoj kiuj estis aranĝitaj per Anastasiadate.com-o aŭ MeetNataliya.com-o. Glito opiniis ke tio estis drola pro tio ke la

virinoj ŝajnis havi nenion diri al siaj usonaj edzoj kaj li konis ke la geedzeco estis aranĝitaj nur por ke la sinjorinoj povus eskapi severan Rusion kaj la rabie koruptan reĝimon de Vladimiro Putino por vivo de libereco en feliĉa Usono. Davido fervore aliris al unu el la rusaj virinoj kaj kriegis, "Privyet! Da! Dosvedanya!" La juna rusa virino estis konfuziĝinta kaj respondis en la angla kun forta akcento, "Kial vi estis diranta saluton kaj ĝis revido al mi en sama frazo?" Davido respondis, "Mi ne faris tion. Mi volis diri saluton kaj gaja." La rusino tiam diris, "Dosvedanya estas ĝis revido, ne gaja." Davido insistis al la rusa virino, "Ho, vi evidente ne scipovas la rusan!! Mi parolas la rusan flue!!!!!" "Ho, vere mi ne scipovas la rusan!!??!", ŝi replikis. La maljuna rusa virino nun decidis havi iom da amuzo. Ŝi diris agrable al Davido, "Otkuda vy uznali Rossii tak khorosho?" Davido kompreneble ne komprenis tiun frazon. "Hej, ne parolu tiel rapide! Vi estas denaska ruslingva parolantino de tiu kontinento. Mi ne estas tia." "Mi opinias ke vi mensogis al ni, vi ne scipovas la rusan tiel bone." "Duh, ja mi regas tiun lingvon! Okej?! Da?! Da?! Ruskie?!" Glito estis penanta ne eksplodi je ridado pro tiu interparolado. La maljuna virino turnis sin al la juna virino kaj diris ruslingve, "Etot chelovek sumasshedshiy absolyutnoye. Net Russkaya zhenshchina nikogda ne vyyti za Negon zamuzh tol'ko, chtoby poluchit 'zelenuyu kartu." (Tiu viro estas absoluta freneza. Neniu rusa virino edziĝus lin nur akiri verdkarton.) La pli juna virino respondis, "Nek odna zhenshchina iz lyuboy gonki nikogda ne budet s etim chelovekom." (Neniu virino de ajna etneco edziĝus tiun ulon.) Davido aŭskultis atente al ilia interparolado kaj diris, "Da! Da! Mi scias, ĉu ne?" La du virinoj tiam turnis sin al li kun malestimo. "Bonvolu, ne ŝajnigu ke vi povas kompreni nin, ĉu bone? Vi ne scipovas la rusan."

Subite enorma grandega fortulo envenis en la konferencan ĉambron. Li havis preskaŭ sep-futojn, havas 400 funtojn, kaj havis malmolajn trajtojn kaj grandan nazon, strasosimilajn nigrajn okulojn, ridetantan vizaĝon, kaj malzorgan, senatentan, neatentan, neglekteman, preterlaseman perspektivon pri vivo. Li estis viro kiu povas forridi ĉiajn problemojn en la mondo per amikemo kaj agrablemo pri kiuj Glito estis aŭtomate ĵaluza. Tiu giganto surportis

Nur-Por-Membran jakon el la jaro 1981 kiu laŭ li estis ankoraŭ je stilo. Rudiakaniso alproksimigis la viregon kaj diris rave, "Eŭgeno, vi fine venis al la konferenco!" Eŭgeno, la kolosulo, respondis per perceptebla ukraina akcento, "Jes, mi venas al Esperantolingva konferenco! Mi venas ĉar mankas al mi alia farindaĵo! La aŭtofabriko ĉe Hondo maldungis min! Kion mi faru kun mia tempo nun?! Mi ne povas trovi alian laboron en Usono! Mi ja reiros Ukrainion iam, kiam ne estos milito tie, sed nuntempe mi atendas ĉi tie en Kolumbuso."

Glito estis ege scivola pri Eŭgeno. "Via nomo estas Eŭgeno?" "Jes, Eŭgeno Smolenskismirnofo! Tio estas mia nomo! Ĉu vi ŝatas ĝin, Da??!" "Kaj kial vi estas ĉi tie en Kolumbo?" "En Ukrainio, estas nenio! Nichego! Nada, kiel oni diras en Kanado, ej?! Mi havis nenion tie. Mia patro volis ke mi laboru en bieno en malgranda vilaĝo nomata Kolmonsk-Potosk. Mi diris al li, "Ne, mi transloĝiĝos al Usono! Tie mi riĉiĝos! Tie mi veturigos rapidan aŭton! Tie mi edziĝos al belegan usonaninon en vakerĉapelo! Patro diris ke mi malsatiĝos se mi forvojaĝos el Ukrainio! Nu. Ĉu mi estas malsatiĝanta nun?!" "Sed vi estas senlabora nun, ĉu ne?" "Kio estas tio?" "Ekstere de laboro." "Ĉu mi estas ekstere de la laborejo? Jes!" "Ne, mi volis diri ke vi diris ke vi estas senlaborulo." "Ho, jes, la stulta Hondo! Ili forpuŝis min el laboro! Manko de laboro! Kaj nun mi ne povas pagi la lupagon. Kaj mi havas filinon kiun mi devas nutri! Ŝi nun havas nur sep jarojn sed baldaŭ ŝi estos preskaŭ virino. Memkompreneble mi bezonas nutri ŝin. Mi ne scias kiel mi faros tion! Tio estas problemego por mi en mia nuna situacio." "Kial vi venis al Kolumbuso tiam, kiam vi venis al Usono el Ukrainio? En Usono estas ja multaj urboj." "Kial al Kolumbuso? Mi ne scias! Mi rigardas mapon de Usono kaj mi vidis Kolumbuson. Mi tiam diras al mi, "Bone, mi iros al tiu loko!" "Sed la plejmulto da enmigrintoj en Usono iras al Nov-Jorko aŭ al Losanĝeleso." "Mi neniam povos pagi la altegan lupagon en tiuj lokoj. Tio estus tro multe! Kiel diable la homoj tie povas transvivi?" "Sed estus pli multe da laborejoj por vi en pli granda urbo, ĉu ne?" "Ne gravas! Mi vivos per registara mono kiel multaj usonanoj jam vivas!! Tio estas bona afero!!! Usonon Dio Benu!!!!"

Glito vidis ke ĉi tiu rabema, petolema, kaj giganta ukraina rifuĝinto, Eŭgeno, estis homo kun kiu li ne estas eble konversacii. Mankis kialo daŭrigi la konversacion. Glito volis nun foriri la konferencon. Evidente tiu ĉirkaŭaĵo ne estis taŭga por li. Estis ĉi tie aŭ mense nestabilaj usonanoj aŭ bizaraj enmigrintoj kiujn li vere ne komprenis psikologie aŭ lingve. Lia provo iĝi pli intelektula ne estis sukcesoplena en tiu klopodo. Neatendite Rudiakaniso ekkomencis tusegadi kaj kolapsis al la grundo. Ĉiuj homoj en la ĉambro, Glito, Eŭgeno, Davido, la rusinoj kaj iliaj usonaj edzoj, ekstaris zorgplene. Glito instinkte moviĝis al la korpo de Rudiakaniso sur la planko dum ĝi tordiĝis. Li sputis ŝaŭmon el la buŝo kiu iris sur la granitajn plankon de polurita marmoro. Glito decidis tiam meti Rudiakanison sur siaj ŝultroj kaj porti lin reen al sia auto. Li do transportis lin al lia domo en Klintonvilo kaj atendis la ambulancon kaj la hospitalaj laboristoj tie. Antaŭ ol li forveturis, Glito diris senĝene al la Esperanto-grupo, "Estis ĉarme renkontiĝi kun vi ĉiuj." Sur la veturiĝo de la urbocentro al Klintonvilo Glito rigardis kun solena timo je la mirindaĵoj de Kolumbuso. Kolumbuso estas malgaja, griza, urba metropolo en la mezo de bienoj kaj maizkampoj kaj nenieco. Kolumbuso estas urbo kiu elsaltas el nenie sed evoluas tanejojn, bierfarejojn, vervan urban centron dum la tago, prosperajn teatrajn scenojn ĉe la Palaco kaj ĉe la Ohio, kaj lokalojn por artista realigo ĉe la Kolumbusa Akademio de Arto kaj Desegno kaj ĉe la Mallonga Norda Galerioj. Ĝi havas la belan ĉarmon de la meza parto de Usono kaj agrablecon kiu miksiĝis kun la neŭroza grandurba atmosfero, la grizon de la ĉielo, la odoraĵojn pro la fumoj leviĝantaj el la Budlita bierofabrika, la gargantuan titanian ŝtalon de la Najŝonŭajd-a asekura konstruaĵo, la esperojn de laboremaj, senprivilegiaj malaltklasuloj sur la grizaj urbobusoj, la belecon de la virinoj piedirante en la urbocentro en someraj roboj kaj pajlaj ĉapeloj, la ĝojon de kafejoj kaj la feliĉaj grekaj kaj aziaj festivaloj, la ĉarmon de la parkoj (t.e. [Ŝiler Parko](#), [Gudal Parko](#), kaj [Franklin Parko](#)), la bruon de ŝoseaj trafikŝtopiĝoj ĉe 270 kaj 71, la preskaŭan senfinecon de landstrato 315 irante tra la tuta urbo kaj en la malproksimajn regionojn de Delaŭaro kaj Pikeringtono, la variecon, la malordon, la senhejmulojn ĉe la angulo de Stratoj Alt kaj Stajt, la riĉulojn, kiuj loĝis en la meblitaj kondominioj sur Moŭnd Strato kaj

en Germana Vilaĝo, la variojn de kolbasoj, kaj la gloron de John Glenn, kiu estas kaj la kvina homo en kosmo kaj ankaŭ la pli maljuna homo en kosmo. La naskiĝloko de R. L. Stein estas ĉi tie. La komika imago de James Thurber soras el tiuj stratoj. La italoj en Itala Vilaĝo donas al la urbo iom da etna amplekso. La grekoj ĉe Goodal kaj Alt plibonigas la urbon per siaj Zorba-simila pasio por vivo. Tiuj pensoj superŝutis Gliton dum li transportis la malsanan kaj mortantan Rudiakanison reen al la malgranda dometo en la bela usona kvartalo kun la judaj hipioj, la vjetnamiomilitaj veteranoj, la japanrestoraciaj laboristoj, kaj la guĝaratanoj. Glito kuŝigis Rudiakanison sur la sofon kaj ene de kelkaj horoj li glitis en pacan morton. Glito aranĝis la enterigon de Rudiakaniso kaj ordigis liajn financajn aferojn ĉar Rudiakaniso estis sola en vivo ĉar li neniam eskapis la tiranan melankolion de siaj severaj rifuĝintaj gepatroj. Glito envenis por mallonga tempo en novan mondon preter sia komforta zono, sed tiu mondo ne impresis lin. Rudiakaniso estis lia sola vera amiko en tiu mondo fakte, kaj nun li estis for. Glito ploris dum li preparis movi antaŭen for de Rudiakaniso kaj reen al la taskoj de vivo.

La maldigna maljunulino

Bertolt Breĥt (Brecht), 1898-1956

Tradukis: Barry Friedman

Mia avino estis 72-jaraĝa, kiam mortis mia avo. Li posedis malgrandan litografiejon en badenia urbeto kaj laboris tie kun du aŭ tri helpantoj ĝis sia morto. Mia avino prizorgis sen servistino la mastrumaĵon, zorgis por la malnova, kaduka domo, kaj kuiris por la homoj kaj infanoj. Ŝi estis malgranda, magra virino kun viglaj lacertokuloj, sed malrapida parolmaniero. Kun apenaŭ sufiĉaj monrimedoj, ŝi edukis kvin infanojn – el la sep, kiujn ŝi naskis. Per tio, ŝi malpligrandiĝis kun la jaroj.

Koncerne la infanojn, du knabinoj iris al Ameriko kaj du el la filoj ankaŭ foriris. Nur la pli juna, kiu havis malfortan sanon, restis en la urbeto. Li iĝis presisto kaj akiris multe tro grandan familion.

Ŝi do estis sola en la domo post kiam mia avo mortis.

La infanoj korespondis inter si pri la problemo de ŝia sorto. Unu kapablis oferti preni ŝin en sia hejmo, kaj la presisto deziris transloĝi kun sia familio al ŝia domo. Sed la maljunulino reagis malamike al la proponoj kaj nur volis akcepti malgrandan monsubtenon de ĉiuj infanoj, kiuj kapablis fari tion. La jam delonge antikviĝinta litografiejo vendis por preskaŭ nenio, kaj ankaŭ ekzistis ŝuldoj.

La infanoj skribis al ŝi, ke ŝi do ne povus resti tute sola, sed kiam ŝi tute ne akceptis tion, ili cedis kaj ĉiumonate sendis al ŝi iom da mono, Malgraŭ ĉio, ili pensis, la presisto ja loĝis tie en la urbeto.

La presisto ankaŭ devigis sin de tempo al tempo raporti al siaj gefratoj pri la patrino. Liaj leteroj al mia patro, kaj tio, kion mia patro

lernis dum vizito kaj post la enterigo de mia avino du jarojn poste, donas al mi imagon pri tio, kio okazis dum ĉi tiuj du jaroj.

Ŝajnas, ke de komence la presisto estis elreviĝita, ke mia avino rifuzis akcepti lin en la sufiĉe granda kaj nun malplena domo. Li loĝis kun kvar infanoj en tri ĉambroj. Sed la maljunulino daŭrigis ĉiuokaze nur tre malfirmajn interrilatojn kun li. Ŝi invitadis la infanojn dum ĉiu dimanĉa posttagmezo por kafo, kaj tio verdire estis ĉio.

Ŝi vizitis sian filon unu aŭ du fojojn kvaronjare kaj helpis al sia bofilino berkonfitii. La junulino konkludis el kelkaj ŝiaj rimarkoj, ke la malgranda apartamento de la presisto estis tro malvasta por ŝi. La presisto ne povis sin deteni de enmeti krisignon en sia raporto pri tio.

Al skribita demando de mia patro pri tiu, kiun la maljunulino nun faris, li respondis sufiĉe lakone, ke ŝi iradis en kinejon.

Oni devas kompreni, ke tio ne estis ordinara agado, almenaŭ ne laŭ ŝiaj infanoj. Antaŭ 30 jaroj la kineo ankoraŭ ne estis tio, kio ĝi estas hodiaŭ. Temis pri mizeraj, malbone ventolitaj lokoj, ofte instalitaj en eks-keglejoj, kun kriegantaj afiŝoj antaŭ la enirejo, kiuj anoncis murdojn kaj pasiotragediojn. Verdire, nur dekelkjaruloj aŭ, pro la malheleco, amantaj paroj iradis tien. Sola maljunulino ja devis frapi la atenton tie.

Kaj oni ankaŭ devis pripensi alian aspekton de ĉi tiu kinejovizitado. La enirkotizo ja estis malmultkosta, sed ĉar la plezuro rangis proksimume inter la dolĉaĵoj, ĝi signifis “elĵetitan monon”. Kaj elĵeti monon ne estis respektinde.

Krome, mia avino ne nur ne havis regulan kontakton kun sia filo en la urbeto, sed ŝi ankaŭ vizitis aŭ invitis neniun el siaj gekonatoj. Ŝi neniam iris al la kafsocietoj de la urbeto. Anstataŭe, ŝi ofte vizitis la metiejon de ŝuriparisto en malriĉa kaj eĉ iom fifama strateto, en kiu, precipe posttagmeze, sidadis diversaj ne tre respektindaj estuloj, senlaboraj kelnerinoj kaj junaj metiistoj. La ŝuriparisto estis mezjara viro, kiu cirkuladis en la tuta mondo sen atingi ion. Oni

ankaŭ diris, ke li drinkis. Ĉiuokaze, li ne estis konvena kontakto por mia avino. .

La presisto aludis en letero, ke li avizis al sia patrino pri tio, sed ricevis sufiĉe fridan respondon. “Li ja vidis ion” estis ŝia respondo, kaj ĉi tio estis la fino de la interparolo. Ne estis facile paroli kun mia avino pri aferoj, kiujn ŝi ne volis pridiskuti.

Proksimume duonan jaron post la morto de mia avo la presisto skribis al mia patro, ke la patrino nun manĝis ĉiun duan tagon en gastejo.

Kia novaĵo!

Avinjo, kiu dumvive kuiris por dekduo da personoj kaj ĉiam nur manĝis la manĝorestaĵojn, nun manĝis en gastejo! Kio Okazis al ŝi?,

Baldaŭ poste, komercvojaĝo alkondukis mian patron en la proksimecon, kaj li vizitis sian patrinon. Li trovis ŝin forirontan. Ŝi redemetis sian ĉapelon kaj metis antaŭ li glason da ruĝa vino kun biskotoj. Ŝi ŝajnis esti tute serena, nek tre ekscitita nek tre neparolema. Ŝi demandis pri ni, kvankvam ne tre detale, kaj precipe volis scii, se la infanoj havis ĉerizojn. En tio, ŝi do kondukis tute kiel ĉiam. Memkompreneble la ĉambro estis ege pura, kaj ŝi aspektis sana.

La sola indiko de ŝia nova vivo estis, ke ŝi ne volis iri kun mia patro al la tombejo por viziti la tombon de sia edzo. “Vi povas iri tien sola”, ŝi diris pasante, “ĝi estas la tria de la maldekstra en la dekunua vico. Mi devas ankoraŭ iri ien.”

La presisto eksplikis poste, ke ŝi verŝajne devis iri al ŝia ŝuriparisto. Li ege plendis.

“Mi sidas ĉi tie en ĉi tiuj truoj kun mia familio kaj havas nur kvin horojn da malbone pagita laboro, kaj krome, mia astmo denove ĝenas min, kaj la domo ĉe la Cefa Strato estas vakanta.”

Mia patro luis ĉambron en la gastejo, sed li antaŭvidis, ke sia patrino do invitus lin loĝi ĉe ŝi, almenaŭ kvazaŭe, sed ŝi ne parolis pri tio. Kaj eĉ kiam la domo estis plena, ŝi ĉiam obĵetis, ke li ne loĝis ĉe ili kaj aldone elspezis la monon por la hotelo!

Sed ŝajnis, ke ŝi finis kun sia familivivo kaj iris sur novaj vojoj, nun, kiam ŝia vivo ekfiniĝis. Mia patro, kiu posedis multe da humoro, trovis ŝin “tute gajan” kaj diris al mia onklo, ke li devus lasi, ke la maljunulino faru tion, kion ŝi deziris.

Sed kion ŝi deziris?

La sekvanta novaĵo estis, ke ŝi ordonis breggkaleŝon kaj veturis al ekskursloko, dum ordinara ĵaŭdo. Breggkaleŝo estis granda, altrada ĉevaltirita vehiklo kun sidlokoj por tutaj familioj. Kelkaj malmultaj fojoj, kiam ni genepoj vizitis, la avo ordonis la breggkaleŝon. Avinjo ĉiam restis enhejme. Kun mallaŭdanta manmovo ŝi rifuzis alveni. Kaj post la breggkaleŝa afero sekvis vojaĝo al K., pli granda urbo, ĉirkaŭ du fervojhoroj for. Tie okazis ĉevalkurado, kaj al la ĉevalkurado vojaĝis mia avino.

La presisto nun estis plene kaj tute timigita. Li volis, ke kuracisto estu konsultota. Mia patro skuis la kapon, kiam li legis la leteron, sed li rifuzis la konsultadon de kuracisto.

Al K. mia avino veturis ne sole. Ŝi kunprenis junan knabinon, duone menshandikapantinon, kiel skribis la presisto, kiu estis la kuirejknabino de la gastejo, en kiu la maljunulino manĝis dum ĉiu dua tago. Ekde nun, ĉi tiu “kriplulino” gravis. Ŝajnis, ke mia avino ŝategis ŝin. Ŝi kunprenis ŝin al la kinejo kaj al la ŝuriparisto, kiu cetere montriĝis esti socialisto, kaj oni diris, ke la du virinoj kartludis en la kuirejo, trinkante glason da ruĝa vino.

“Nun ŝi aĉetis ĉapelon kun rozoj por la kriplulino,” la presisto skribis malespere. “Kaj nia Anna ne havas komunirobon!” , .

La leteroj de mia onklo iĝis tute histeriaj, temis nur pri la “maldigna konduto de nia kara patrino” kaj alie malkaŝis nenion. La plian konon

mi lernis de mia patro.

La gastejisto palpebrumante flustris al li: -“S-ino B. nun ja amuziĝas, kiel oni aŭdas.”

Efektive, mia avino vivis tute ne lukse eĉ dum ĉi tiuj lastaj jaroj. Kiam ŝi ne manĝis en la gastejo, ŝi plej ofte konsumis nur iom da ovmanĝaĵo, iom da kafo, kaj precipe siajn amatajn biskotojn. Anstataŭe, ŝi permesis al si malmultekostan ruĝan vinon, de kiu ŝi trinkis glaseton dum ĉiuj manĝoj. Ŝi bontenis la domon tre puran, kaj ne nur la dormĉambron kaj la kuirejon, kiujn ŝi uzis., Tamen ŝi hipotekis la domon sen la scio de siaj infanoj.“ Oni neniam informiĝis pri tio, kion ŝi faris kun la mono. Ŝajnas, ke ŝi donis ĝin al la ŝuriparisto. Post ŝia morto, li transloĝis al alia urbo kaj laŭdire malfermis tie pli grandan magazenon por laŭmezuraj ŝuoj.

Ĝustadire, ŝi vivis du vivojn unu post la alia. Unue, la unuan, kiel filino, kiel edzino, kaj kiel patrino, kaj poste, la duan simple kiel S-ino B., sola persono sen devoj kaj kun modestaj, sed sufiĉaj monrimedoj. La unua vivo daŭris ĉirkaŭ ses jardekojn, la dua ne plu ol du jarojn.

Mia patro lernis, ke dum la lasta duonjaro ŝi permesis al si certajn liberecojn, kiujn normalaj personoj tute ne konis. Ekzemple, dum lafsomero okazis, ke ŝi leviĝis frue je la tria kaj promenis tra la malplenaj stratoj de la urbeto, kiun ŝi do posedis tute sola. Kaj la pastron, kiu vizitadis ŝin, por esti kun la maljunulino en ŝia soleco, ŝi laŭdire invitis al kinejo!

Ŝi tute ne estis soleca. Evidente la ŝuripariston vizitadis nur gajaj personoj, kaj oni multe rakontis. Tie ŝi ĉiam metis botelon da sia propra ruĝa vino kaj el ĝi ŝi trinkis sian glaseton dum la aliaj homoj rakontis kaj insultis la dignajn aŭtoritatulojn de la urbo. Tiu ruĝa vino restis rezervita por ŝi, sed kelkfoje ŝi kunportis pli fortajn trinkaĵojn por la societo.

Ŝi mortis tute subite, dum aŭtuna posttagmezo en ŝia dormĉambro, sed ne en la lito, sed sur ligna seĝo apud la fenestro.

Ŝi invitis la “kriplulinon” por la vespero al kinejo, kaj la knabino do estis ĉe ŝi, kiam ŝi mortis. Ŝi havis 74 farojn.

Mi vidis foton de ŝi, kiu montras ŝin sur la mortlito kaj estis farita por la infanoj.

Oni vidas etan vizaĝeton kun multaj faltoj kaj mallarĝlipa, sed larĉa buŝo. Multe da malgrandaĵoj, sed nenio da etanimaĵoj. Ŝi elgustis la longajn jarojn de servuto kaj la mallongajn jarojn de libereco kaj konsumis la panon de la vivo ĝis la lasta panero.

Filino de Rappaccini

De Nathaniel Hawthorne

Tradukita el la angla de Barry Friedman

Ni ne memoras ke ni vidis iujn tradukitajn specimojn de la produktaĵoj de M. de l'Aubepine – fakton oni miru malpli, ĉar lia propra nomo estas nekonata al multaj de liaj samlandanoj kaj al la studento de fremda literaturo. Kiel verkisto, li ŝajnas okupi bedaŭrindan pozicion inter la Transcendentalistoj (kiuj, sub unu nomo aŭ alia, havas sian porcion en la tuta nuntempa literaturo de la mondo) kaj la granda korpo de plum-kaj-inkaj viroj kiuj alfrontas la intelekton kaj simpatiojn de la homamaso. Se ne tro rafinita, ĉiaokaze tro malproksima, tro ombrema kaj frivola en siaj manieroj de evoluo taŭgi la guston de la lasta klaso, kaj tamen tro populara por kontentigi la spiritajn aŭ metafizajn bezonaĵojn de la unua, li devas nepre trovi sin sen aŭdienco, krom ĉi tie kaj tie individuo aŭ eble izolita klinko. Liaj verkaĵoj, por doni pravecon al ili, ne estas tute malplenaj de imago kaj originaleco; ili eble estus gajnita al li pli grandan reputacion, se ne por enradikita amo de alegorio, kiu inklinas doni al liaj intrigoj kaj karakteroj aspekton de scenoj kaj homoj en la nuboj, kaj forviŝi la homan varmecon el liaj konceptoj. Liaj fikcioj estas foje historiaj, kelkfoje de la nuna tago, kaj kelkfoje, kiel oni povas malkovri ĝis nun, havas malmultan aŭ neniun referencon al tempo aŭ spaco. Ĉiuokaze, li ĝenerale kontentigas sin per tre malgrava brodado de eksteraj manieroj – la plej malforta ebla falso de la reala vivo – kaj klopodas krei intereson per iu malpli evidenta aparttraĵo de la subjekto. Foje spiro de la naturo, pluvero de patoj kaj tenereco, aŭ glimo de humuro, trovos sian vojon en la mezon de liaj rimarkindaj imagaĵaroj, kaj igos, ke ni senti nin kvazaŭ, post ioma pripenso, ni ankoraŭ estis ene de la limoj de nia denaska tero. Ni nur aldonos al ĉi tiu tre malprofunda rimarko, ke la produktaĵoj de M. de l'Aubepine, se la leganto eble prenos ilin precize laŭ la ĝusta vidpunkto, povas doni amuzon dum libertempa

horo same kiel la produktaĵoj de aliaj pli brilaj homoj; se alie, ili nur malfacile ne povas aspekti troe kiel sensencaĵoj.

Nia aŭtoro estas volumenega; li daŭras skribi kaj eldoni kun tiel laŭdinda kaj nedefigebla malkoncizeco kvazaŭ liaj penoj estis kronitaj per la brila sukceso, kiu tiel juste interrilatas kun tiuj de Eugene Sue. Lia unua apero estis per kolekto de noveloj en longa serio de volumoj titolita "Contes deux fois racontés." La titoloj de kelkaj el liaj pli freŝaj verkoj ([ni citas el la memoro](#)) estas la jenaj: "Le Voyage Celeste a Chemin de Fer", 3 tom., 1838; "Le nouveau Pere Adam kaj la nouvelle Mere Eve", 2 tom., 1839; "Roderic; ou le Serpent a l'estomac," 2 tom., 1840; "Le Culte du Feu", folio-volumo de peza esplorado pri la religio kaj rito de la malnovaj persaj Gebaroj, publikigita en 1841; "La Soiree du Chateau en Espagne," 1 tom., 8vo, 1842; kaj "L'Artiste du Beau", ou Le Papillon Mecanique, "5 tom., 4to, 1843. Nia iomete peniga legado de ĉi tiu konsternanta katalogo de volumoj lasis poste certan personan korinklinon kaj simpation, kvankam neniel admiron por M. de l'Aubepine; kaj ni dezirus uzi la malgrandan eblon en nia potenco enkonduki lin favore al la usona publiko. La sekva rakonto estas traduko de lia "Beatrice; ou la Belle Empoisonneuse", ĵus publikigita en "La Revue Anti-Aristocratique". Ĉi tiu ĵurnalo, redaktita de la Komte de Bearhaven, dum kelkaj jaroj kondukis la defendon de liberalaj principoj kaj popularaj rajtoj kun fideleco kaj kapableco, inda je ĉiuj laŭdo.

Junulo, nomata Giovanni Guasconti, venis antaŭ tre longe el la pli suda regiono de Italio, por persekuti siajn studojn ĉe la Universitato de Padua. Giovanni, kiu havis nur malmultan provizadon de oraj dukatoj en sia poŝo, prenis loĝejojn en alta kaj tenebra ĉambro de malnova konstruaĵo, kiu aspektis ne neinda por esti la palaco de Padua nobelo, kaj kiu, fakte, montris super sia enirejo la armeajn sigelojn de familio longe formortinta. La juna fremdulo, kiu ne estis malstudita en la granda poemo de sia lando, memoris, ke unu el la prapatroj de ĉi tiu familio, kaj eble okupanto de ĉi tiu propra palaco, estis pentrita fare de Dante kiel partoprenanto de la senmortaj agonioj de lia Infero . Ĉi tiuj rememoradoj kaj asocioj, kune kun

la tendenco esti soluleca, naturo por junulo kiu estas por la unua fojo ekstere de sia denaska sfero, kaŭzis ke Giovanni ĝemas forte dum li ĉirkaŭrigardis la dezertan kaj magre meblitan apartamenton.

“Sankta Virgulino, signor!” kriis maljuna Dame Lisabetta, kiu, venkite per la rimarkinda beleco de la ulo, bonkore klopodis doni al la ĉambro loĝeblan aeron, “kia ĝemo estis tio elveni el la koro de juna viro! Ĉu vi trovas ĉi tiun malnovan biendomon sombra? Por la amo de la Ĉielo, do metu vian kapon el la fenestro, kaj vi vidos tiel luman sunbrilon kiel vi forlasis en Napolo. ”

Guasconti faris mekike tion, kion la maljunulino konsilis, sed ne povis konsenti sufiĉe kun ŝi, ke la suno de Paduo estis tiel gaja kiel tiu de suda Italio. Tia ĝi estis, tamen, ke ĝi falis sur ĝardenon sub la fenestro kaj donis siajn nutremajn influojn sur diversajn plantojn, kiuj ŝajnis esti kultivitaj kun superplenumita zorgo.

“Ĉu ĉi tiu ĝardeno apartenas al la domo?” demandis Giovanni.

“Ĉielo malpermesu, signor, krom se ĝi donus pli bonajn herbojn ol ĉiuj, kiuj nun kreskas tie,” respondis maljuna Lisabetta. “Ne; tiu ĝardeno estas kultivita de la propraj manoj de Signor Giacomo Rappaccini, la fama kuracisto, kiu, mi garantias lin, estis priaŭdita ĝis Napolo. Oni diras, ke li distilas ĉi tiujn plantojn en medikamentojn, kiuj estas tiel potencaj kiel ĉarmo. Ofte vi povas vidi la signor doktoro je laboro, kaj eble la signora, lia filino, ankaŭ, kunigas la strangajn florojn, kiuj kreskas en la ĝardeno. ”

La maljunulino nun faris tion, kion ŝi povis por la aspekto de la ĉambro; kaj, rekomendante la junulon al la protekto de la sanktuloj, forprenis ŝin.

Giovanni ankoraŭ ne trovis pli bonan okupacion ol subenrigardi en la ĝardenon sub sia fenestro. De ĝia aspekto, li juĝis ĝin esti unu el tiuj botanikaj ĝardenoj, kiuj estis en Padua pli frue ol en aliaj lokoj en Italio aŭ en la mondo. Aŭ, ne nekredeble, eble unufoje ĝi estis la plaĉeja palaco de luksa familio; ĉar estis la ruino de marmorfonto en la centro, skulptita per malofta arto, sed tiel lamentinde disbatis,

"Sam," li diras, "kio estas ducent kvindek dolaroj, fine? Ni havas la monon. Ankoraŭ unu nokton kun tiu ĉi infano sendos min al lito en frenezulejo. Kune kun estante ĝisosta ĝentlemano, mi opinias, ke s-ro Dorset estas elspezemulo ĉar li faris al ni tian liberalan oferton. Vi ne preterpasos la ŝancon, ĉu? "

"Mi diros vin la veron, Bill," ĉi tiu ŝafideto ankaŭ afekciis miajn nervojn. Ni alportos lin hejmen, pagos la elaĉeton kaj faros nian eskapon. "

Ni alportis lin hejmen tiun nokton. Ni persvadis lin iri, dirante al li, ke lia patro aĉetis por li arĝent-surmetitan fusilon kaj paron da mokasenoj, kaj ni ĉasus ursojn la sekvan tagon.

Estis nur la dek-dua horo kiam ni frapis ĉe la pordo de Ebenezer. Ĝuste en la momento, kiam mi estus eliginta la dek kvincent dolarojn el la skatolo sub la arbo, laŭ la originala propono, Bill estis kalkulanta ducent kvindek dolarojn en la manon de Dorset.

Kiam la infano eksciis, ke ni lasos lin hejme, li ekhurlis kiel vapor-orgeno kaj tenis sin tiel firme kiel hirudo sur la kruro de Bill. Lia patro forŝiris lin iom post iom, kiel mustardplastro.

"Kiom longe vi povas teni lin?" demandas Bill.

"Mi ne estas tiel forta kiel mi antaŭe estis," diras maljuna Dorset, "sed mi opinias, ke mi povas promesi al vi dek minutojn."

"Sufiĉe," diras Bill. "En dek minutoj mi trairos la centrajn, sudajn kaj mezokcidentajn ŝtatojn kaj estos kuranta tre rapide por la kanada landlimo."

Kaj, tiel malhela tiel ĝi estis, kaj tiel grasa kiel Bill estis, kaj tiel bona kuristo kiel mi estas, li estis almenaŭ mejlo-kaj-duonon for de Pinto antaŭ ol mi povis reatingi lin.

Nutraĵo

Ashley Rindsberg

Traduko: Barry Friedman

Kiam ŝi havis 32 jarojn, mia patrino ekmanĝis sin ĝis morto. La tero estis frostigita dum monatoj. Sed eĉ se al ŝi estus permesita planti etan vegetaĵan bedon, kiel ŝi antaŭe faris, en la hejmo, en kiu ni iam loĝis, la tero estus produkita nenion. En tiuj hororaj tagoj, en tiu sangotrasorbigo lando, la sola afero, kiu disfloras, estis ironio.

Mi ne scias kiam, ĝuste, ŝi mortis. Aŭ, por esti akurata, kiam ŝi estis murdita. Sed mi ja scias, ke estis post kiam ŝi postvivis la devigitajn translokigojn, la selektojn, la batojn, kaj, je la fino, eĉ la bombadojn de la koncentrejo. Tio estis kiam ŝi mortis. Kaj ne estis unu el Ili, kies nomojn mi neniam ekparolos ([promeso, kiun ŝi devigis min fari](#)), kiu faris ĝin. Sed unu el la aliaj, unu el la usonanoj, tie por savi ŝin kaj homojn kiel ŝi. Ironio sur ironio.

Tiuj usonaj soldatoj jam eltenis jarojn da infero. Ili jam vidis - kaj certe faris - abomenaĵojn per si mem. Kaj tamen la vido de la koncentrejoj rompis ilin. Ili vidis tiujn pikdratajn kriptojn popolitajn per karn-kaj-sangaj fantomoj, homajn aĵojn, kiuj aspektis kvazaŭ ili estus elfositaj el siaj tomboj kaj ŝovitaj reen en la vivon. Estis tro multe por ĉi tiuj buĉad-hardiĝitaj soldatoj. Ili estis premigita ne de kunpasiono, multe tro malforta vorto, sed de malsana lumanta mizero, terura brulanta malĝojo por la grandegeco antaŭ iliaj okuloj.

Foje mi pensas pri la usonano, kiu faris ĝin. Mi pensas pri li tiel, kiel mi pensas pri la bestioj, kiuj tenis mian patrinon ŝlosita ene de ellaborita kaj zorge planita koŝmaro. Mi volas malami lin. Eĉ nun, ĉiujn ĉi jarojn poste, mi volas damaĝi lin. Mi volas trovi liajn infanojn,

kaj la infanojn de liaj infanoj. Sed tamen mi scias, ke tio ne estis lia kulpo, kiu ajn li estis. Tute ne.

Sed kiam li transdonis C-porcion al malsateganta virino, kiu voris ĝin kiel la besto, en kiun ŝi fariĝis, kaj rigardis lin per la okuloj de malsatego, kaj li donis al ŝi alian, kaj eble alian, li ne povis pridubiti, kion li faras. Li certe sciis, ke tiom da manĝaĵo, post tiom da jaroj kun neniu manĝaĵo, mortigus ŝin. Ironio de ironioj.

Ĉu li, en sia kompato, estis ŝia mortanĝelo? Post ĉio, kion ŝi suferis - krimojn, kiujn mi ne kuraĝas nomi, pro timo realigi ilin denove - eble li sciis, ke li devas fini ŝin el ŝia mizero antaŭ ol tiu mizero povus plene realiĝi ekster la saturnalio de la koncentrejo. Lia bonkoreco estis hororago. (Ĉu vi iam vidis malsategantan virinon morti pro manĝaĵo?) Lia donaco la pleja formo de ŝtelo. Ironioj senĉesaj.

Ĉiutage mi estas devigita konsumi morton por vivi. Mi sidiĝas al manĝo kaj fiksrigardas la teleron. Mi vidas la perforton en ĝi. Mia mano hezitas, kiam mi metas bolvon da glaciaĵo antaŭ mia nepino - kion mi faras al ŝi? Iu ofertas al mi biskviton kun mia teo kaj mi ektremas. Ironio inversigas, tordas realecon ĉirkaŭ si mem. La universo ridas.

Sed hodiaŭ mi kvietigas la ironion. Hodiaŭ mi ĉesas konsumi. Tiuj, kiuj laŭ siaj bonaj intencoj prizorgas pri mi - intencoj tiel puraj kiel tiuj de la usonano - ne scias la decidon, kiun mi faris. Tuj antaŭ ol la infanoj venos por sia vizito, mi metos rostaĵon en la fornon aŭ bakos kukon. Mi sufokiĝos pro la fetoro de bruligita, putranta karno kaj spiros la fiajn, insidajn vaporojn de kreskanta pasto. Sed tio estas pli bone ol alfronti ilian insiston, ilian senkulpan bezonon rekuraĝigi sin, ke la mondo ne estas, kaj ne povas esti, tio, kion mi scias, ke ĝi ĉiam estis.

Hodiaŭ mi naskiĝas denove, al la sama patrino, kiu naskis min. Mi trinkas ĉi tiun tason da teo, dolĉigitan per salo, kaj forpuŝas teleron da nuksoj kaj daktiloj, konsolaj donacoj de nia morba postvivado. Mi etendas la manon al la mano de mia patrino, kiel

mi etendis al ĝi dum la momentojn antaŭ ol ili prenis min for de ŝi, kaj mi sentas, ke ŝia mano etendiĝas al mi.

La Vulpo kaj la Vinberejo

El la hebrea: Barry Friedman

Iam estis malsata vulpo. La vulpo iris laŭ la vojo kaj vidis vinberejon. Ĉirkaŭ la vinberejo estis alta barilo. Li ĉirkaŭiris la vinberejon plurfoje kaj trovis malgrandan truon sub la barilo. Li provis eniri la vinberejon kaj ne povis.

Kion fari?

Li fastis tri tagojn, ĝis li maldikiĝis. La vulpo eniris la vinberejon, manĝis kaj manĝis ĝis li dikiĝis. La vulpo provis foriri kaj ne povis ĉar li estis tro dika. Kion fari?

Li fastis tri pliajn tagojn ĝis li denove maldikiĝis kaj poste li povis foriri.

Elirinte, li turnis sian vizaĝon kaj rigardis la vinberejon kaj diris:

"Vinberejo, vinberejo! Kiel bona vi estas! Kaj kiel bonaj estas viaj fruktoj! Ĉio, kio estas en vi, estas bona kaj bela! Sed kio estas la avantaĝo de tio? Mi malsatis kiam mi eniris kaj mi malsatas kiam mi eliris!"

Papera Menagerio

Ken Liu

El la originala angla tradukis Barry Friedman

Unu el miaj plej fruaj memoroj estis tiam, kiam mi estis ploreganta. Mi rifuzis esti trankviligita, negrave kion ajn panjo kaj paĉjo provis.

Paĉjo rezignis kaj forlasis la dormoĉambron, sed panjo prenis min en la kuirejon kaj sidigis min ĉe la matenmanĝa tablo.

"Kan, kan," ŝi diris, dum ŝi tiris pakfolion de sur la fridujo. Dum jaroj, panjo zorge tranĉis la envolvaĵojn ĉirkaŭ Kristnaskaj donacoj kaj ŝparis ilin supre de la fridujo en dika stako.

Ŝi demetis la paperon malsupren, simplan flankon turnita supren, kaj komencis faldi ĝin. Mi ĉesis plori kaj rigardis ŝin, scivoleme.

Ŝi turnis la paperon kaj denove faldis ĝin. Ŝi plisis, pakis, enŝovis, rulis, kaj tordis ĝis la papero malaperis inter ŝiaj kavaj manoj. Tiam ŝi levis la faldita paper-paketo al ŝia buŝo kaj blovis en ĝin, kiel balonon.

"Kan," ŝi diris. "Laohu." Ŝi metis la manojn malsupren sur la tablon kaj delasis.

Papera tigreto staris sur la tablo, la grandeco de du pugnoj kunmetitaj. La haŭto de la tigro estis la bildŝablono sur la pakpapero, blanka fono kun ruĝaj sukerbastonoj kaj verdaj kristnaskaj arboj.

Mi kontaktis la kreaĵon de panjo. Ĝia vosto ekmoviĝis, kaj ĝi lude saltis al mia fingro. "Rawrr-sa," ĝi grumblis, la sono ie inter kato kaj susurantaj ĵurnaloj.

Mi ridis, konsterniĝis, kaj karesis ĝian dorson per montrofigro. La papera tigro vibris sub mia fingro, ronronante.

"Zhe jiao zhezhi," panjo diris. Ĉi tio nomiĝas origamio.

Mi ne sciis ĉi tion tiutempe, sed la speco de panjo estis speciala. Ŝi tiel enspiris en ilin ke ili dividis ŝian spiron, kaj tiel moviĝis kun ŝia vivo. Ĉi tio estis ŝia magio.

* * *

Paĉjo elektis panjon el katalogo.

Iufoje, kiam mi estis en mezlernejo, mi demandis al paĉjo pri la detaloj. Li provis instigi min paroli denove al panjo.

Li subskribis por la enkonduk servo dum la printempo de 1973. Foliuminte tra la paĝoj konstante, li pasigis ne pli ol kelkajn sekundojn sur ĉiu paĝo ĝis li vidis la bildon de panjo.

Mi neniam vidis ĉi tiun bildon. Paĉjo priskribis ĝin: Panjo sidis sur seĝo, ŝia flanko al la fotilo, surportante mallozan verdan silkan ĉeongsam-on. Ŝia kapo estis turnita al la fotilo tiel ke ŝiaj longaj nigraj haroj estis arte drapiritaj super ŝiaj brusto kaj ŝultro. Ŝi rigardis eksteren al li per la okuloj de trankvila infano.

"Tio estis la lasta paĝo de la katalogo, kiun mi vidis," li diris.

La katalogo diris ke ŝi havis dek ok jarojn, amis danci, kaj parolis bone la anglan ĉar ŝi estis el Honkongo. Neniu el ĉi tiuj faktoj estis vera.

Li skribis al ŝi, kaj la kompanio sendis iliajn mesaĝojn tien kaj reen. Fine, li flugis al Honkongo por kunsidi kun ŝi.

"La homoj ĉe la firmao skribis ŝiajn respondojn. Ŝi konis neniun anglan krom 'saluton' kaj 'ĝis revido.' "

Kia virino metas sin en katalogon, por ke ŝi estu aĉetita? La lica mi pensis, ke mi scias tiom multe pri ĉio. Malestimo sentis bona, kiel vino.

Anstataŭ rapidiĝi en la oficejon por postuli sian monon reen, li pagis kelnerinon ĉe la hotelrestoracio traduki por ili.

"Ŝi rigardus min, ŝiaj okuloj kaj timema kaj esperplena, dum mi parolis. Kaj kiam la knabino komencis traduki tion, kion mi diris, ŝi komencis rideti malrapide."

Li flugis reen al Konektikuto kaj komencis peti la paperojn por ke ŝi venu al li. Mi naskiĝis jaron poste, en la Jaro de la Tigro.

* * *

Laŭ mia peto panjo ankaŭ faris el pakpapero kapron, cervon kaj akvobubalon. Ili kurus ĉirkaŭ la salono dum Laohu postkurus ilin, grumblante. Kiam li kaptis ilin, li premis malsupren ĝis la aero eliris el ili kaj ili fariĝis nur plataj, falditaj paperpecoj. Mi tiam devus blovi en ilin por re- ŝveligu ilin por ke ili povu ĉirkaŭkuri iom pli.

Foje la bestoj havis problemojn. Iam la akvobubalo saltis en pladon da sojsaŭco sur la tablo ĉe la vespermanĝo. (Li volis enŝlimiĝi, kiel vera akvobubalo.) Mi elprenis lin rapide sed la kapilara ago jam tiris la malhelan likvaĵon alte supren en liajn krurojn. La saŭco-moligitaj kruroj ne tenis lin, kaj li kolapsis sur la tablon. Mi sekigis lin en la suno, sed liaj kruroj post tio kurbiĝis, kaj li ĉirkaŭkuris lame. Panjo finfine envolvis liajn krurojn en saranvolvaĵo, por ke li povu enŝlimiĝi ĝis sia koro kontentiĝis (nur ne en sojsaŭco).

Ankaŭ Laohu ŝatis salti al paseroj kiam li kaj mi ludis en la malantaŭa korto. Sed unufoje randohava birdo pro malespero rebatis kaj ŝiris lian orelon. Li ĝemis kaj ektremis dum mi tenis lin kaj panjo flikis lian orelon per glubendo. Li evitis birdojn post tio.

Kaj tiam iun tagon mi vidis televiddokumentarion pri ŝarkoj kaj petis al Panjo unu el mia propra. Ŝi faris la ŝarkon, sed li malfeliĉe ĉirkaŭfrapetis sur la tablo. Mi plenigis la lavujon per akvo, kaj enmetis lin. Li multe ĉirkaŭnaĝis feliĉe. Tamen post iom da tempo li iĝis malseka kaj diafana, kaj malrapide malleviĝis ĝis la fundo, la faldoj malfariĝis. Mi etendis la manon por savi lin, kaj tiam mi havis nur malsekan paperon.

Laohu kunmetis siajn antaŭajn piedojn ĉe la rando de la lavujo kaj apogis sian kapon sur ili. Oreloj malleviĝintaj, li faris mallaŭtan grumblon en sia gorĝo, kiu sentigis min kulpa.

Panjo faris novan ŝarkon por mi, ĉi-foje el stanfolio. La ŝarko vivis feliĉe en granda orfiŝbovlo. Laohu kaj mi ŝatis sidi apud la bovlo rigardi la stanfoliŝarkon postkuranta la orfiŝon, Laohu algluante sian vizaĝon kontraŭ la bovlo sur la alia flanko tiel ke mi vidis liaj okuloj, pligrandigitaj ĝis la grandeco de kafotaso, fiksrigardis min de trans la bovlo.

* * *

Kiam mi havis 10 jarojn, ni translokiĝis al nova domo trans la urbo. Du el la najbarinoj venis por bonvenigi nin. Paĉjo servis al ili trinkaĵojn kaj poste pardonpetis pro tio, ke li devis forkuri al la servaĵofirmao por pritrakti la fakturojn de la antaŭa posedanto. "Bonvenon al mia domo. Mia edzino ne multe parolas la anglan, do ne pensu, ke ŝi estas malĝentila pro ne paroli kun vi."

Dum mi legis en la manĝoĉambro, panjo malpakis en la kuirejo. La najbarinoj interparolis en la salono, ne penante esti aparte kvietaj.

"Li ŝajnas sufiĉe normala viro. Kial li faris tion?"

"Io pri la miksado neniam ŝajnas ĝusta. La infano aspektas nefinita. Deklivaj okuloj, blanka vizaĝo. Eta monstro."

"Ĉu vi pensas, ke li povas paroli la anglan?"

La virinoj silentis. Post iom da tempo ili venis en la manĝoĉambron.

"Saluton! Kiel vi nomiĝas?"

"Jack," mi diris.

"Tio ne sonas tre ĉineme."

Tiam panjo venis en la manĝoĉambron. Ŝi ridetis al la virinoj. Ili tri staris en triangulo ĉirkaŭ mi, ridetante kaj kapjesante unu al la alia, sed ili havis nenion diri, ĝis paĉjo revenis.

* * *

Marko, unu el la najbaraj knaboj, venis kun siaj agfiguroj de Stelmilitoj. La lumglavo de Obi-Wan Kenobi eklumis kaj li povis svingi siajn brakojn kaj diri, per eta voĉo, "Uzu la Forton!" Mi tute ne pensis, ke la figuro tre similas al la reala Obi-Wan.

Kune, ni rigardis lin ripeti ĉi tiun prezenton kvin fojojn sur la kaftablo. "Ĉu li povas fari ion alian?" Mi demandis.

Marko estis ĝenita de mia mia demando. "Rigardu ĉiujn detalojn," li diris.

Mi rigardis la detalojn. Mi ne estis certa, kion mi diru.

Marko estis seniluziigita de mia respondo. "Montru al mi viajn ludilojn."

Mi havis neniujn ludilojn krom mia papera menaĝerio. Mi alportis Laohu el mia dormoĉambro. Tiam li estis tre eluzita, ĉie flikita per glubendo kaj gluo, pruvo de la jaroj da riparoj kiujn mi kaj panjo faris sur li. Li ne plu estis tiel facilmove kaj piedfirma kiel antaŭe. Mi sidigis lin sur la kaftablon. Mi povis aŭdi la saltemetajn paŝojn de la aliaj bestoj malantaŭe en la koridoro, timeme kaŝrigardante en la salonon.

"Xiao laohu," mi diris, kaj haltis. Mi ŝanĝis al la angla. "Ĉi tio estas Tigro." Singarde, Laohu paŝis antaŭen kaj ronronis ĉe Marko, flarante siajn manojn.

Marko ekzamenis la Kristnask-envolvan bildŝablonon de la haŭto de Laohu. "Tio tute ne aspektas kiel tigro. Ĉu via panjo faras ludilojn por vi el rubo?"

Mi neniam pensis pri Laohu kiel rubo. Sed rigardante lin nun, li vere estis nur peco de pakpapero.

Marko denove puŝis la kapon de Obi-Wan. La lumglavo ekbrilis; li movis la brakojn supren kaj malsupren. "Uzu la Forton!"

Laohu turnis sin kaj saltis, faligante la plastan figuron de la tablo. Ĝi trafis la plankon kaj rompiĝis, kaj la kapo de Obi-Wan ruliĝis sub la kanapon. "Rawwww," Laohu ridis. Mi aliĝis al li.

Marko pugnobatis min, forte. "Ĉi tio estis tre multekosta! Oni nun eĉ ne povas trovi ĝin en la vendejoj. Ĝi verŝajne kostis pli ol tio, kion via paĉjo pagis por via panjo!"

Mi stumblis kaj falis sur la plankon. Laohu grumblis kaj saltis al la vizaĝo de Marko.

Marko kriegis, pli pro timo kaj surprizo ol doloro. Laohu estis ja nur farita el papero.

Marko ekprenis Laohu kaj lia graŭlo estis sufokita kiam Marko ĉifis lin en sia mano kaj ŝiris lin je duonoj. Li buligis la du paperpecojn kaj ĵetis ilin al mi. "Jen via stulta malmultekosta ĉina rubo."

Post kiam Marko foriris, mi pasigis longan tempon provante, sen sukceso, kunlui la pecojn, glatigi la paperon kaj sekvi la faldojn por refaldi Laohu. Malrapide, la aliaj bestoj venis en la salonon kaj kolektiĝis ĉirkaŭ ni, mi kaj la ŝirita pakpapero kiu antaŭe estis Laohu.

Mia batalo kontraŭ Marko ne finiĝis tie. Mark estis populara en la lernejo. Mi neniam volas pensi denove pri la du semajnoj kiuj sekvis.

Mi venis hejmen tiun vendredon je la fino de la du semajnoj. "Xuexiao hao ma?" panjo demandis. Mi diris nenion kaj iris al la banĉambro. Mi rigardis en la spegulon. Mi tute ne aspektas kiel ŝi, tute ne.

Ĉe la vespermanĝo mi demandis al paĉjo: "Ĉu mi havas ĉinaĉan vizaĝon?"

Paĉjo demetis siajn manĝbastonetojn. Kvankam mi neniam rakontis al li, kio okazis en la lernejo, li ŝajnis kompreni. Li fermis la okulojn kaj frotis la ponton de sia nazo. "Ne, vi ne havas tion."

Panjo rigardis paĉjon, ne komprenante. Ŝi turnis sin al mi. "Sha jiaochink?"

"La anglan," mi diris. "Parolu la anglan."

Ŝi penis. "Kio okazas?"

Mi forpuŝis la manĝbastonetojn kaj la bovlon, kiuj estis antaŭ mi: kirlitaj verdaj paprikoj kun kvin-spica bovaĵo. "Ni manĝu usonan manĝaĵon."

Paĉjo provis rezoni. "Multaj familioj kuiras ĉine foje."

"Ni ne estas aliaj familioj." Mi rigardis lin. Aliaj familioj ne havas panjojn kiuj ne apartenas.

Li rigardis for. Kaj tiam li metis manon sur la ŝultron de panjo. "Mi alportos al vi kuirlibron."

Panjo turnis sin al mi. "Bu haochi?"

"La anglan," mi diris, levante la voĉon. "Parolu la anglan."

Panjo etendis la manon por tuŝi mian frunton, kontrolante mian temperaturon. "Faŝao la?"

Mi forpuŝis ŝian manon. "Mi fartas bone. Parolu Angle!" Mi estis krianta.

"Parolu la anglan al li," diris paĉjo al panjo. "Vi sciis, ke ĉi tio okazus iam. Kion vi anticipis?"

Panjo faligis la manojn al sia flanko. Ŝi sidis, rigardante de Paĉjo al mi, kaj reen al paĉjo. Ŝi provis paroli, haltis, kaj denove provis, kaj denove haltis.

"Vi devas," diris paĉjo. "Mi estis tro facila je vi. Jack devas usoniĝi."

Panjo rigardis lin. "Se mi diras 'amo', mi sentas ĉi tie." Ŝi montris al siaj lipoj. "Se mi diras 'ai', mi sentas ĉi tie." Ŝi metis la manon sur sian koron.

Paĉjo kapneis. "Vi estas en Usono."

Panjo kurbiĝis sur sia sidloko, aspektante kiel la akvobubalo, kiam Laohu kutimis sursalti lin kaj elpremi la aeron de vivo el li.

"Kaj mi volas iom da veraj ludiloj."

* * *

Paĉjo aĉetis al mi plenan aron da agfiguroj de Stelmilitoj. Mi donis la Obi-Wan Kenobi al Marko.

Mi pakis la paperan menaĝerion en granda ŝuskatolo kaj metis ĝin sub la liton.

La sekvan matenon la bestoj eskapis kaj revenis al siaj malnovaj, plej ŝatataj lokoj en mia ĉambro. Mi kaptis ilin ĉiujn kaj remetis ilin en la ŝuskatolon, glubendante la kovrilon. Sed la bestoj faris tiom

da bruo en la skatolo, ke mi fine ŝovis ĝin en la angulon de la subtegmento kiel eble plej malproksimen de mia ĉambro.

Se panjo parolis al mi ĉine, mi rifuzis respondi ŝin. Post iom da tempo, ŝi provis uzi pli da la angla. Sed ŝia akcento kaj rompitaĵoj frazoj embarasis min. Mi provis korekti ŝin. Fine ŝi tute ĉesis paroli se mi estus apude.

Panjo komencis mimi, se ŝi bezonis diri ion al mi. Ŝi provis brakumi min tiel, kiel ŝi vidis usonajn patrinojn en televido. Mi opiniis, ke ŝiaj movoj estis troigaj, necertaj, ridindaj, malgraciaj. Ŝi vidis, ke mi ĉagreniĝis, kaj do haltis.

"Vi ne traktu vian patrinon tiel," diris paĉjo. Sed li ne povis rigardi min en la okulojn dum li diris tion. Profunde en sia koro, li verŝajne komprenis ke estis eraro preni ĉinan kamparanknabinon kaj atendi ke ŝi konformus en la antaŭurboj de Konektikuto.

Panjo lernis kuiri uson-stile. Mi ludis videoludojn kaj studis la francan.

De tempo al tempo mi vidis ŝin ĉe la kuireja tablo studante la simplan flankon de pakpaperfolio. Poste nova paperbesto aperis sur mia noktotabulo kaj penus karesi min. Mi kaptis ilin, elprenis ilin ĝis la aero eliris el ili, kaj poste forŝtopis ilin en la skatolon en la subtegmento.

Panjo finfine ĉesis fari la bestojn kiam mi estis en liceo. Tiam ŝia angla estis multe pli bona, sed mi jam havis tiun aĝon, kiam mi ne interesiĝis pri tio, kion ŝi volas diri, kiam ajn lingvon ŝi uzis.

Kelkfoje, kiam mi venadis hejmen kaj vidis ŝian etan korpon okupite moviĝante en la kuirejo, kantante kanton en la ĉina al si, estis malfacile por mi kredi, ke ŝi naskis min. Ni havis nenion komunan. Ŝi povus esti same el la luno. Mi rapidadis al mia ĉambro, kie mi povus daŭrigi mian tutamerikan serĉadon por feliĉeco.

Paĉjo kaj mi staris, unu ĉiuflanke de panjo, kuŝantaj sur la hospitala lito. Ŝi ankoraŭ ne havis kvardek jarojn, sed ŝi aspektis multe pli maljuna.

Dum jaroj ŝi rifuzis iri al la kuracisto pro la doloro en ŝi, kiun ŝi diris, ke ne gravas. Kiam ambulanco finfine enportis ŝin, la kancero disvastiĝis multe preter la limoj de kirurgio.

Mia menso ne estis en la ĉambro. Ĝi estis la mezo de la enuniversitata rekruta sezono, kaj mi koncentriĝis pri vivresumoj, transskribaĵoj, kaj strategie konstruitaj intervjuaj horaroj. Mi ruzplanis pri kiel mensogi al la kompaniaj rekrutantoj plej efike, por ke ili proponu aĉeti min. Mi komprenis intelekte, ke estas terure pripensi ĉi tion dum la patrino kuŝis mortanta. Sed tiu kompreno ne signifis, ke mi povus ŝanĝi kiel mi sentis.

Ŝi estis konscia. Paĉjo tenis ŝian maldekstran manon per ambaŭ siaj. Li klinis sin por kisi ŝian frunton. Li ŝajnis malforta kaj maljuna en maniero kiu ekkonsternis min. Mi konstatis, ke mi scias preskaŭ same malmulte pri paĉjo kiel pri panjo.

Panjo ridetis al li. "Mi bonfartas."

Ŝi turnis sin al mi, ankoraŭ ridetante. "Mi scias, ke vi devas reiri al la lernejo." Ŝia voĉo estis tre malforta kaj estis malfacile aŭdi ŝin super la zumado de la maŝinoj alkroĉitaj al ŝi. "Iru. Ne zorgu pri mi. Ĉi tio ne estas grava afero. Nur faru bone en la lernejo."

Mi etendis la manon por tuŝi ŝian manon, ĉar mi pensis, ke tion mi faru. Mi estis trankviligita. Mi jam pensis pri la reven-flugo, kaj la hela Kalifornia sunbrilo.

Ŝi flustris ion al paĉjo. Li kapjesis kaj forlasis la ĉambron.

"Jack, se —" ŝi estis kaptita de tusado, kaj ne povis paroli dum iom da tempo. "Se mi ne sukcesas, ne estu tro malĝoja kaj ne vundu vian sanon. Koncentru vian vivon. Nur konservu kun vi tiun skatolon,

kiun vi havas en la subtegmento, kaj ĉiujare, ĉe Qingming, nur elprenu ĝin kaj pensu pri mi. Mi estos kun vi ĉiam."

Qingming estis la Ĉina Festivalo por Mortintoj. Kiam mi estis tre juna, panjo skribis leteron dum Qingming al siaj mortintaj gepatroj en Ĉinio, dirante al ili la bonajn novaĵojn pri la pasinta jaro de sia vivo en Usono. Ŝi laŭtlegis la leteron al mi, kaj se mi komentis pri io, ŝi ankaŭ skribis ĝin en la letero. Tiam ŝi faldis la leteron havi formon de papera gruo, kaj eligis ĝin, okcidenten. Ni tiam rigardis, kiel la gruo svingis siajn rigidajnflugilojn dum sia longa vojaĝo okcidenten, al Pacifiko, al Ĉinio, al la tomboj de la familio de panjo.

Jam pasis multaj jaroj de kiam mi laste faris tion kun ŝi.

"Mi scias nenion pri la ĉina kalendaro," mi diris. "Nur ripozu, panjo."

"Nur konservu la skatolon kun vi kaj malfermu ĝin foje. Nur malfermu —" ŝi komencis tusi denove.

"Estas en ordo, panjo." Mi karesis ŝian brakon mallerte.

"Haizi, mama ai ni —" Ŝia tuso denove ekregis. Bildo de antaŭ jaroj ekbrilis en mian memoron: Panjo diranta ai kaj poste metis la manon sur sian koron.

"Bone, panjo. Ĉesu paroli."

Paĉjo revenis, kaj mi diris, ke mi bezonas frue alveni al la flughaveno, ĉar mi ne volis maltrafi mian flugon.

Ŝi mortis kiam mia aviadilo estis ie super Nevado.

* * *

Paĉjo maljuniĝis rapide post kiam panjo mortis. La domo estis tro granda por li kaj devis esti vendita. Mia koramikino Susan kaj mi iris helpi lin paki kaj purigi la lokon.

Susan trovis la ŝuskatolon en la subtegmento. La papera menaĝerio, kaŝita en la neizolita mallumo de la subtegmento dum tiom longe, fariĝis fragila kaj la helaj pakpaperaj bildŝablonoj paliĝis.

"Mi neniam vidis tian origamion," diris Susan. "Via panjo estis mirinda artistino."

La paperaj bestoj ne moviĝis. Eble kia ajn magio, kiu animis ilin, ĉesis kiam panjo mortis. Aŭ eble mi nur imagis, ke ĉi tiuj paperaj konstruaĵoj iam vivis. La memoro de infanoj ne estu fidita.

* * *

Estis la unua semajnfino en aprilo, du jarojn post la morto de panjo. Susan estis ekster la urbo dum unu el siaj senfinaj vojaĝoj kiel administradkonsilisto kaj mi estis hejme, pigre trarigardante la televidkanalojn.

Mi paŭzis ĉe dokumenta filmo pri ŝarkoj. Subite mi vidis, en mia menso, la manojn de panjo, dum ili kunfaldis kaj re-kunfaldis stanan folion por fari ŝarkon por mi, dum mi kaj Laohu rigardis.

Susuro. Mi rigardis supren kaj vidis, ke bulo da pakpapero kaj disŝirita glubendo estas sur la planko apud la librobreto. Mi alproksimiĝis por preni ĝin por la rubo.

La paperbulo moviĝis, disfaldis sin, kaj mi vidis, ke ĝi estas Laohu, pri kiu mi ne pripensis dum tre longa tempo. "Rawrr-sa." Panjo evidente kunmetis lin post kiam mi rezignis.

Li estis pli malgranda ol mi memoris. Aŭ eble nur, ke tiam miaj pugnoj estis pli malgrandaj.

Susan metis la paperajn bestojn ĉirkaŭ nian loĝejon kiel dekoracion. Ŝi verŝajne lasis Laohu en sufiĉe kaŝita angulo ĉar li aspektis tiel fadenmontra.

Mi sidiĝis sur la planko, kaj etendis fingron. La vosto de Laohu ekmoviĝis, kaj li lude saltis. Mi ridis, karesante lian dorson. Laohu ronronis sub mia mano.

"Kiel vi fartas, malnova kamarado?"

Laohu ĉesis ludi. Li ekstaris, saltis per kateca gracio en mian genuon, kaj komencis disvolvi sin.

Sur mia genuo estis kvadrato da faldplena pakpapero, la simpla flanko supren. Ĝi estis plenigita per densaj ĉinaj ideografiaĵoj. Mi neniam lernis legi la ĉinan, sed mi konis la ideografiaĵojn por filo, kaj ili estis supre, kie oni atendus ilin en letero adresita al iu, skribita per la mallerta, infaneca manskribo de panjo.

Mi iris al la komputilo por kontroli la Interreton. Hodiaŭ estis Qingming.

* * *

Mi kunportis la leteron en la urbocentron, kie mi sciis, ke la ĉinaj ekskursautoj haltis. Mi haltigis ĉiun turiston, demandante: "Nin hui du zhongwen ma?" Ĉu vi povas legi la ĉinan? Mi ne parolis la ĉinan de tiel longe, ke mi ne estis certa, ĉu ili komprenas.

Juna virino konsentis helpi. Ni kune sidiĝis sur benko, kaj ŝi laŭtlegis la leteron al mi. La lingvo, kiun mi provis forgesi dum jaroj, revenis, kaj mi sentis, ke la vortoj enprofundiĝas en min, tra mia haŭto, tra miaj ostoj, ĝis ili forte premis mian koron.

* * *

Filo,

Ni ne parolis delonge. Vi tiom koleras, kiam mi provas tuŝi vin, ke mi timas. Kaj mi pensas, ke eble ĉi tiu doloro, kiun mi sentas ĉiam, nun estas io serioza.

Mi do decidis skribi al vi. Mi skribos en la paperaj bestoj, kiujn mi faris por vi, kiujn vi tre ŝatadis.

La bestoj ĉesos moviĝi kiam mi ĉesos spiri. Sed se mi skribas al vi tutkore, mi postlasos iom el mi sur ĉi tiu papero, en ĉi tiuj vortoj. Tiam, se vi pensas pri mi dum Qingming, kiam la spiritoj de la forpasinto rajtas viziti siajn familiojn, vi ankaŭ vivigos la partojn de mi, kiujn mi postlasas. La estaĵoj, kiujn mi faris por vi, denove saltos kaj kuros kaj alsaltos, kaj eble vi tiam vidos ĉi tiujn vortojn.

Ĉar mi devas skribi tutkore, mi bezonas skribi al vi ĉine.

Dum la tuta tempo mi ankoraŭ ne rakontis al vi la historion de mia vivo. Kiam vi estis malgranda, mi ĉiam pensis, ke mi rakontos al vi la historion kiam vi estos pli maljuna, por ke vi povu kompreni. Sed iel tiu ŝanco neniam aperis.

Mi naskiĝis en 1957, en Vilaĝo Sigulu, Provinco Hebei. Viaj geavoj estis ambaŭ de tre malriĉaj kamparanaj familioj kun malmultaj parencoj. Nur kelkajn jarojn post kiam mi naskiĝis, la Grandaj Malsatkatastrofoj trafis Ĉinion, dum kiu tridek milionoj da homoj mortis. La unua memoro, kiun mi havas, estis vekiĝi, vidante mian patrinon manĝi grundon, por ke ŝi povu plenigi sian ventron kaj lasi la lastan peceton da faruno por mi.

Aferoj pliboniĝis post tio. Sigulu estas fama pro sia zhezhi-a papermetio, kaj mia patrino instruis min kiel fari paperbestojn kaj doni al ili vivon. Tio estis praktika magio en la vivo de la vilaĝo. Ni faris paperajn birdojn por forpeli akridojn de la kampoj, kaj paperajn tigrojn por fortendi la musojn. Por Ĉina Novjaro mi kaj miaj amikoj faris ruĝajn paperajn drakojn. Mi neniam forgesos la vidon de ĉiuj tiuj draketoj, kiuj zomas trans la ĉielon supre, tenante ŝnurojn da eksplodantaj petardoj por fortimigi ĉiujn malbonajn memorojn de la pasinta jaro. Vi estus ŝateginta ĝin.

Tiam venis la Kultura Revolucio en 1966. Najbaro turnis sin kontraŭ najbaro, kaj frato kontraŭ frato. Iu memoris, ke la frato de mia patrino, mia onklo, foriris al Honkongo jam en 1946, kaj

fariĝis komercisto tie. Havi parencon en Honkongo signifis ke ni estis spionoj kaj malamikoj de la homoj, kaj ni devis esti kontraŭluktataj ĉiumaniere. Via kompatinda avino — ŝi ne povis toleri la misuzadon kaj ĵetis sin en puton. Poste kelkaj knaboj kun ĉasmuskedoj trenis vian avon iun tagon en la arbaron, kaj li neniam revenis.

Jen mi, dekjara orfo. La sola parenco, kiun mi havis en la mondo, estis mia onklo en Honkongo. Mi ŝteliris iun nokton kaj grimpis sur vartrajnon irantan suden.

Malsupre en Guangdong-provinco kelkajn tagojn poste, kelkaj viroj kaptis min ŝtelante manĝaĵon de kampo. Kiam ili aŭdis, ke mi provas iri al Honkongo, ili ridis. "Estas via bonŝanca tago. Nia komerco estas alkonduki knabinojn al Honkongo."

Ili kaŝis min en la fundo de kamiono kune kun aliaj knabinoj, kaj kontrabandis nin trans la landlimon.

Ni estis prenitaj al kelo kaj estis diritaj, ke ni staru alte kaj aspektu sanaj kaj inteligentaj por la aĉetantoj. Familioj pagis al la magazeno kotizon kaj venis por trarigardi nin kaj elekti unu el ni por "adopto".

La familio Chin elektis min por prizorgi siajn du knabojn. Mi ellitiĝis ĉiumatene je la kvara por prepari matenmanĝon. Mi nutris kaj banis la knabojn. Mi aĉetis manĝaĵojn. Mi lesivis kaj balais la plankojn. Mi sekvis la knabojn kaj faris tion, kion ili volas. Nokte mi estis ŝlosita en ŝranko en la kuirejo dormi. Se mi estis malrapida aŭ faris ion malbonan, mi estis batita. Se la knaboj faris ion malbonan, mi estis batita. Se mi estis rimarkita provante lerni la anglan, mi estis batita.

"Kial vi volas lerni la anglan?" demandis Sinjoro Chin. "Ĉu vi volas iri al la polico? Ni diros al la polico, ke vi estas el Ĉinio kontraŭleĝe en Honkongo. Ili amus havi vin en sia malliberejo."

Ses jarojn mi vivis tiel. Iun tagon maljunulino, kiu vendis fiŝojn al mi en la matena merkato, tiris min flanken.

"Mi konas knabinojn kiel vin. Kiom da jaroj vi havas nun, ĉu dek ses? Iun tagon, la viro, kiu posedas vin, ebriiĝos, kaj li rigardos vin kaj tiros vin al si kaj vi ne povas haltigi lin. La edzino ekscios, kaj tiam vi pensos, ke vi vere estas en infero. Vi devas eliri el ĉi tiu vivo. Mi konas iun, kiu povas helpi."

Ŝi sciigis min pri usonaj viroj, kiuj volis aziajn edzinojn. Se mi povos kuiri, purigi kaj prizorgi mian usonan edzon, li donos al mi bonan vivon. Tio estis la sola espero, kiun mi havis.

Kaj tiel mi estis en la katalogo kun ĉiuj tiuj mensogoj kaj pro tio mi renkontis vian patron. Ne estas tre romantika rakonto, sed estas mia rakonto.

En la antaŭurboj de Konektikuto mi estis soleca. Via patro estis afabla kaj milda kun mi, kaj mi estis tre dankema al li. Sed neniu komprenis min, kaj mi komprenis nenion.

Sed tiam vi naskiĝis! Mi estis tiel feliĉa kiam mi rigardis en vian vizaĝon kaj vidis nuancojn de mia patrino, mia patro, kaj mi mem. Mi perdis mian tutan familion, ĉion el Sigulu, ĉion, kion mi iam sciis kaj amis. Sed jen vi, kaj via vizaĝo estis pruvo, ke ili estas realaj. Mi ne elpensis ilin.

Nun mi havis iun kun kiu paroli. Mi instruus al vi mian lingvon, kaj ni kune povus refari malgrandan pecon de ĉio, kion mi amis kaj perdis. Kiam vi diris al mi viajn unuajn vortojn, en la ĉina kiu havis la saman akĉenton kiel mia patrino kaj mi, mi ploris dum horoj. Kiam mi faris la unuajn zhezhi-bestojn por vi, kaj vi ridis, mi sentis, ke ne ekzistas zorgoj en la mondo.

Vi iom kreskis, kaj nun vi eĉ povus helpi vian patron kaj mi interparoli. Mi estis vere hejme nun. Mi finfine trovis bonan vivon. Mi deziris, ke miaj gepatroj estus ĉi tie, por ke mi povus kuiri por ili, kaj ankaŭ doni al ili bonan vivon. Sed miaj gepatroj ne plu vivis. Ĉu vi scias tion, kion la ĉinoj opinias pri kiu estas la plej malĝoja sento en la mondo? Estas, ke infano finfine kreskigu la deziron prizorgi siajn gepatrojn, nur ekkonscii, ke ili jam delonge malaperis.

Filo, mi scias, ke vi ne ŝatas viajn ĉinemajn okulojn, kiuj estas miaj okuloj. Mi scias, ke vi ne ŝatas viajn ĉinemajn harojn, kiuj estas miaj haroj. Sed ĉu vi povas kompreni kiom da ĝojo alportis al mi via ekzistado mem? Kaj ĉu vi povas kompreni, kiel mi angoris, kiam vi ĉesis paroli kun mi kaj ne lasos min paroli kun vi en la ĉina? Mi sentis, ke mi estas perdanta ĉion denove.

Kial vi ne parolos kun mi, filo? La doloro malfaciligas la skribon.

* * *

La juna virino redonis al mi la paperon. Mi ne povis toleri rigardi ŝian vizaĝon.

Sen rigardi supren, mi petis ŝian helpon por desegni la karakteron por ai sur la papero sub la letero de panjo. Mi skribis la karakteron denove kaj denove sur la papero, interplektante miajn plumstrekojn kun ŝiaj vortoj.

La juna virino etendis la manon kaj metis ĝin sur mian ŝultron. Tiam ŝi leviĝis kaj foriris, lasante min sola kun mia patrino.

Sekvante la sulketojn, mi refaldis la paperon estigi Laohu. Mi lulis lin en la angulo de mia brako, kaj dum li ronronis, ni komencis la promenadon hejmen.

La Faden de la Araneo

Ryuunosuke Akutagawa

Traduko: Barry Friedman

Estis normala tago en la Ĉielo. Estis mateno, kaj Budho staris apud lageto. En la lageto estis multaj floroj. La floroj sidis sur la supro de la akvo, kaj ili estis tre belaj. Budho komencis marŝi. Li ĉirkaŭiris la lageton kaj rigardis la florojn. La floroj havis belan odoron. Laodoro kreskis ene de la floroj kaj moviĝis en la aeron. La tuta aero ĉirkaŭ Budho odoris mirinde.

Budho ĉesis marŝi, kaj forte rigardis la lageton. Inter la floroj estis akvo, kaj sub la akvo, estis Infero.

La akvo estis kiel vitropeco. Supre, estis la Ĉielo, bela kaj aminda. Malsupre, estis Infero, malbela kaj terura. La akvo staris inter la du lokoj.

Tra la akvo, Budho povis vidi ĉiujn terurajn aferojn en Infero.

Unue, estis la rivero Sanzu. Ĝi estis rivero plena de drakoj, kaj ĝi havis ponton irantan super ĝi. Nur bonaj homoj povis marŝi trans la ponton. Estis demonoj starantaj en la akvo, kaj se malbonuloj irus trans la ponton, la demonoj prenis ilin kaj ĵetus ilin en la akvon, por ke ili estu manĝitaj de la drakoj.

Ankaŭ, estis la Monto de Kudriloj. Ĝi estis grandega monto farita el akraj kudriloj. Kiam vere malbonaj personoj venis al Infero, ili devis surgrimpi la Monton de Kudriloj.

Estis ankaŭ la Lago de Sango. La Lago estis farita el tre, tre varma akvo, kaj ĝi odoris terure. Malbonuloj en Infero devis naĝi en la bolanta akvo, kaj ilia sango plenigis la Lagon. Kaj kompreneble

estis multaj aliaj teruraj aferoj en Infero, sed Budho ne ŝatis rigardi ilin.

Inter la grupoj de malbonaj homoj en Infero, ekzistis unu viro nomita Kandata. Kandata estis tre malbona viro. Li mortigis homojn, ŝtelis de homoj, kaj eĉ bruligis domojn kun homoj en ili. Li estis vere malamiko de ĉiuj bonaj homoj. Sed unufoje en sia vivo, li faris ion bonan, kaj Budho rememoris tion.

Unu fojon, Kandata promenis tra densa arbaro. Li estis ŝtelonta de viro, kiu loĝis en la arbaro. Dum li iris, li vidis araneon apud li. Kandata levis sian piedon, kaj estis staronta tuj sur la araneo kaj mortigi ĝin, sed tiam li haltis.

'Ne ne. Eĉ io tiel malgranda havas kialon por vivi. Estus vere malbone forpreni ĝian vivon.'

Do li lasis vivi la araneon, kaj iris por ŝteli de la viro.

Dum Budho rigardis malsupren en Inferon, li pensis pri kiel Kandata savis la araneon. Li decidis ke Kandata fakte ne estis tiom malbona. Ĉar li savis la araneon, Budho opiniis ke li donu al Kandata ŝancon forlasi Inferon.

Feliĉe, apud la lageto de belaj floroj, araneo marŝis. Ĝi estis araneo de Ĉielo. Ĝi havis mirindan verdan koloron, kaj ĝi estis faranta belan oran fadenon. Kutime, araneoj nur faris malfortajn, blankajn fadenojn, sed la ora fadeno de ĉi tiu araneo estis forta kaj farita el brila oro. Do Budho prenis la oran fadenon de la araneo kaj faligis ĝin en Inferon profunde sub li.

Ĉe la fundo de Infero, Kandata naĝis en la Lago de Sango, kune kun multaj aliaj malbonaj homoj. Foje, li vidis ion helan, kaj li pensis, ke ĝi estas io, kio povus savi lin. Sed kiam li rigardis pli forte, li vidis, ke ĝi estas nur la kudriloj sur la Monto de Kudriloj, brilantaj en la lumo. Ĉirkaŭ li homoj ploris pro doloro kaj malĝojo. Kandata ĉesis plori, ĉar li estis tro laca. Li sentis sin vere aĉa, ĉar li sciis, ke li

neniam forlasos Inferon. Li naĝis en la Lago de Sango, estante kvieta kaj malĝoja.

Kandata vidis ion brilantan, sed li sciis, ke ĝi estas nur kudrilo, do li ne suprenrigardis. Sed ĝi daŭre brilis, do finfine li levis la kapon. Super li, en la mallumo de la ĉielo de Infero, estis io hela kaj ora. Ĝi estis longa fadeno kiu malrapide malsupreniris en Inferon.

Kandata ne povis kredi siajn okulojn. Lia ŝanco forlasi Inferon venis al li kiel donaco. Li grimpus sur la fadenon, kaj elgrimpus el Infero! Se li estus bonŝanca, li eble eĉ povus grimpi en la Ĉielon. Li ne plu devus naĝi en la Lago de Sango, kaj grimpi la Monton de Kudriloj. Li estus libera!

Do Kandata grimpis el la Lago kaj kuris al la ora fadeno. Li prenis ĝin en la manojn. La fadeno estis maldika, kaj facile tenebla. Kandata grimpis supren kaj supren kaj supren. Ĉar li ŝteladis tiom multe, li estis tre lerta pri grimpado, do ne estis problemo grimpi sur la ora fadeno. Tamen, inter la Ĉielo kaj la Infero estis miloj kaj miloj da mejloj, do eĉ por granda grimpisto kiel Kandata, ĝi estis malfacila vojaĝo.

Grimpinte dum longa tempo, Kandata estis laca, do li decidis havi paŭzon. Li rigardis sub si por vidi kiom malproksimen li grimpis. Li vidis, ke la Lago de Sango estas tre, tre for, kaj ke li grimpis multajn mejlojn. Eĉ la Monto de Kudriloj estis tre for sub li. Se li daŭre grimpus, li forlasus Inferon. Li sentis grandan feliĉon ene de si.

‘Mi faris ĝin! Mi faris ĝin!’ li kriis, kaj ridis.

Sed tiam li sentis ion sub si sur la fadeno. Li rigardis malsupren, kaj vidis, ke multaj aliaj malbonaj homoj en Infero vidis la fadenon. Ili nun sekvis lin, grimpante supren kaj supren kaj supren.

Kandata vidis ĉi tion, kaj li estis surprizita, kaj malĝoja. Li pendis tie, rigardante malsupren al la aliaj malbonaj homoj. La fadeno ne estis dika, do li miris, ke ĝi povas teni tiom da homoj sen rompiĝi. Sed se tro da homoj grimpus sur la fadenon, ĝi povus rompiĝi, kaj ili

ĉiuj refalus en Inferon. Pli kaj pli da homoj grimpis el la Lago de Sango, kaj komencis grimpi la fadenon.

Kandata kriis al la homoj malsupre, 'Hej, vi teruraj homoj! Vi teruraj homoj tie malsupre! La fadeno de ĉi tiu araneo estas mia. Ĝi apartenas al mi, kaj nur al mi! Kiu diris al vi, ke vi ĉiuj povas grimpi supren? Eliru, eliru!'

Tiam, subite, la fadeno de la araneo rompiĝis. Ĝi faris Klakon, kaj Kandata falis. Li falis malsupren kaj malsupren kaj malsupren. Finfine, li alteriĝis en la Lago de Sango kun SURMARIĜO, kune kun ĉiuj aliaj malbonaj homoj. La fadeno de la araneo pendis en la aero, hele brilante kiel la kudriloj sur la Monto de Kudriloj, dum ĉiuj malbonaj homoj sidis malsupre.

Budho staris apud la lageto en la Ĉielo, kaj rigardis ĉion, kio okazis. Li havis malgajan mienon sur la vizaĝo. Li denove komencis ĉirkaŭpaŝi la lageton. Li donis al Kandata ŝancon eliri el Infero, sed Kandata montris, ke li estas vere malbona homo, kaj do Budho devis resendi lin rekte al Infero. Li ŝajnis tre malĝoja pri tio.

Dume, la floroj en la lageto daŭre odoris bele. Ili daŭre faris sian belan odoron tra la tuta Ĉielo, kaj ili ne pensis pri Kandata. La verda araneo daŭre faris sian oran fadenon, kaj ĝi ne pensis pri Kandata. Estis normala tago en la Ĉielo, kaj baldaŭ estos tagmezo.

Ŝercoj

I

Grupo de turistoj vizitis krokodilan bienon. Ili estis en sekura kaŝo meze de la lago plena de krokodiloj. La bienposedanto sugestis: "Kiu saltos en la akvon kaj sukcesos naĝi al la bordo, tiu ricevos milionon da dolaroj".

La respondo estis nur la surdiga silento...

Subite iu viro saltis en la akvon. Postkurita de voremaj krokodiloj, preskaŭ per superhoma penado, li atingis la bordon sendifekta.

La kamparano donis al li ĉekon por miliono da dolaroj kaj anoncis: "Ni havas gajninton!"

Ricevinte la premion, la viro kaj lia edzino revenis al la hotelo.

Jam en la ĉambro, la ulo, ankoraŭ streĉita kaj laca, diris al sia edzino: "Karulino, mi ne saltis memstare... Iu puŝis min en lagon!!!

La edzino ridetis kaj mistere respondis: "Mi scias, karulo, mi scias..."

La moralo de la rakonto estas: "Malantaŭ ĉiu sukcesa viro - ĉiam estas virino."

II

Farmisto havis 5 inajn porkojn. Ĉar li bezonis monon, li decidis preni ilin al la gubernia foiro kaj vendi ilin. En la foiro li renkontis alian farmiston kiu posedis 5 virporkojn. Ili parolis dum iom da tempo, kaj tiam ili decidis parigi la porkojn kaj poste dividi la monon egale.

La farmistoj vivis 60 mejlojn dise unu de la alia. Do ili konsentis, ke ĉiu veturus 30 mejlojn, trovus kampon tie, kaj lasus la porkojn pariĝi sur tiu kampo.

La sekvan matenon la farmisto kun la 5 inaj porkoj leviĝis je la 5-a, metis la porkojn en la familian aŭton kaj veturis la 30 mejlojn. Dum la porkoj pariĝis, li demandis la alian farmiston: "Kiel mi scios ĉu la porkoj estas gravedaj?"

La alia farmisto respondis: "Se ili kuŝos en la herbo morgaŭ matene, ili estos gravedaj. Se ili estos en la koto, ili ne estos gravedaj."

La sekvantan matenon la porkoj estis en la koto. Do li ŝprucis ilin, metis ilin denove en la aŭton, kaj alportis ilin por provi denove. Ĉi tio daŭris ĉiun matenon dum pli ol semajno. Ambaŭ farmistoj laciĝis.

La sekvan matenon la farmisto kiu havis la 5 inajn porkojn estis tro laca por ellitiĝi. Li do diris al sia edzino: "Karulino, bonvolu rigardi eksteren kaj diri al mi, ĉu la porkoj estas en la koto aŭ en la herbo."

"Nek," respondis la edzino. "Ili estas en la aŭto kaj unu el ili estas hupanta la kornon!"

III

75-jaraĝa Georgo diras al sia kuracisto: "Mi pensas, ke la aŭdo de mia edzino eble estas malbona. Kiel mi povas testi ŝian aŭdon?"

La kuracisto diras: "Iam, kiam ŝia dorso estas al vi, faru al ŝi demandon; kaj vidu, ĉu ŝi respondas. Se ŝi ne respondas, faru kelkajn paŝojn antaŭen kaj demandu denove. Daŭre faru ĉi tion ĝis ŝi respondos. Tiam vi scios."

Kelkajn tagojn poste Georgo venas en la domon kaj vidas la dorson de sia edzino al li dum ŝi kuiras vespermanĝon. Do, de trans la ĉambro li diras, "Saluton karulino, kio estas por

vespermanĝo?" Ne estas respondo, do li faras kelkajn paŝojn antaŭen kaj denove demandas: "Kio estas por vespermanĝo, karulino?" Ankoraŭ ne estas respondo. Li denove faras kelkajn paŝojn antaŭen kaj demandas, ankoraŭ ne estas respondo.

Fine li malproksimiĝas je ĉirkaŭ unu futo de ŝi kaj diras en ŝian orelon: "Kio do estas por la vespermanĝo?"

Ŝi turnas sin, metas la manojn sur la koksojn, ĝemas kaj diras: "Nun, la kvaran fojon ni manĝos kokidon.